# EDUARD PETIŜKA

# MALNOVAJ GREKAJ MITOJ



traduko el la ĉeĥa lingvo

# PRI LA TRADUKO


| | |
|---|---|
| **Tradukis** | Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser<br>el la ĉeĥa, kun la permeso de la filo<br>de la aŭtoro |
| **Aŭtoro** | Eduard Petiška |
| **Titolo originala** | Staré Řecké Báje A Pověsti |
| **Eldonejo** | ALBATROS PRAGO |
| **Lingve kontrolis** | la ĉeĥo Vladimir Türk. |
| **Aranĝis** | Hans-Georg Kaiser<br>Frank Vohla |
| **Finredakto** | je la 13-a de marto en la jaro 2024 |

# PROMETEO

La blua ĉielo speguliĝis en la akvoj kaj la akvoj estis plenaj de fiŝoj. En la aero flugis svarmoj de birdoj kaj surtere sur la herbejoj paŝtis sin brutaroj. Sed neniu gardis la brutarojn, neniu kaptis la fiŝojn kaj neniu aŭskultis la kantadon de la birdoj. Surtere ankoraŭ mankis la homo.

Malgaje vagadis Prometeo, posteulo el la diogento de la Titanoj, ĉirkaŭ la tero kaj serĉis vane vivestaĵon, kiu iras rekte kiel li, kaj kiu similas al li laŭ aspekto. Tamen li vidis, ke la tero donis vivon al la herboj, floroj kaj arboj. La pluvakvo falis surteren kaj konservis la vivon en la naturo. Kie ne pluvis, tie mortis arboj kaj arbustoj kaj ekestis dezerto. Kiam Prometeo ekkonis la forton de la tero kaj de la akvo, li miksis argilon kaj akvon kaj formis el tio la unuan homon. Li similis al la dioj. Atena, la diino de l‘ prudento kaj de l‘ saĝo enspiris spiriton en la senvivan figuron kaj la griza argilo ruĝiĝis, la koro komencis bati en ĝi kaj la brakoj kaj gamboj faris la unuajn movojn. Tiel Prometeo metis la unuajn homojn en la mondon.

Dum longa tempo la homoj ne sciis kiel uzi la spiriton, la donacon de Atena. Ili vivis kiel infanetoj. Ili vidis, sed ne ekkonis, ili aŭskultis, sed ne komprenis, ili iris kiel en sonĝo. Ili povis nek baki brikojn nek ĉarpenti trabojn nek konstrui domojn. Kiel formikoj ili svarmis sur kaj sub la tero kaj serĉis protekton en malhelaj kavernoj. Ili eĉ ne sciis, ke sekvas la printempon la somero, la someron la aŭtuno kaj la aŭtunon la vintro.

Jen iris Prometeo inter la homojn kaj instruis ilin konstrui domojn, legi, skribi kaj kalkuli kaj ekkoni la naturon. Li instruis la homojn enjugigi bestojn kaj konstrui ĉarojn, tiel, ke la homoj ne plu devis porti ŝarĝojn sur la dorso. Li montris al ili, kiel oni

konstruas ŝipojn kaj kiel plifaciligas veloj la laboron de la rudristoj. Li kondukis ilin en la profundon de la tero al kaŝitaj trezoroj. Kupron, feron, arĝenton kaj oron eligis la diligentaj manoj de la ministoj el la ŝaktoj.

Pli frue la homoj ne konis sanigilojn, ili ne sciis, kio utilas al ili kaj kio malutilas. Prometeo montris al ili, kiel oni miksas sanigajn ungventojn kaj medikamentojn. Li instruis al la mirantaj homoj ĉiujn artojn kaj la homoj lernis fervore.

La dioj sur sia diomonto Olimpo rigardis kun misfido la homaron, kiu lernis de Prometeo laborojn, artojn kaj sciencojn. Speciale la mastro de ĉiu dioj, Zeŭso, pli kaj pli koleriĝis de tago al tago. Li vokis Prometeon al si kaj diris al li: „Vi instruis al la homoj labori kaj pensi, sed vi ankoraŭ ne instruis ĝuste al ili honori la diojn, oferi al ili kaj kliniĝi. Vi ja scias, ke de la dioj dependas, ĉu la jaro estas fekunda ĉu malfekunda, ĉu la tero suferas mizere aŭ ĉu kreskas ĉio abunde. La dioj regas la sorton de la homoj. Ankaŭ mi ĵetas miajn fulmojn tien, kien plaĉas al mi. Iru al la homoj kaj diru al ili, ke ili oferu al ni, aliokaze trafos ilin nia kolero."

La homoj alportos oferojn al la dioj", respondis Prometeo, „sed vi, ho Zeŭso, elektu, kion ili oferu."

Kaj Prometeo buĉis taŭron kaj volvis la viandon en la haŭton de la besto, kaj metis la stomakon sur ĝin. Sur la alian flankon li donis la ostojn, sed kaŝis ilin per la graso tiel, ke ili ne videblis. La ostomonto kovrata per graso estis pli granda kaj ŝajne ankaŭ pli bona. Apenaŭ li estis preta, Zeŭso flaris la allogan odoron de la antaŭpreparita ofero kaj grimpis de la ĉielo malsupren sur la teron al Prometeo.

Prometeo ekrigardis Zeŭson kaj vokis: „Dioj, elektu, kiu parto estas pli plaĉa al vi. „Kion vi, mastro de la dioj, elektos, tion oferos la mortidevaj homoj.“

Zeŭso ekkonis, ke Prometeo volas trompi lin. Sed li kaŝis sian koleron kaj elektis intence la monton, kiu brilis pro la graso.

Prometeo alpaŝis ridete kaj forŝovis la grason. Aperis la nudaj ostoj. Kiam li fortiris la taŭrohaŭton, odoris la freŝa viando. De tiam la homoj oferis al la dioj la grason kaj la ostojn, sed la viandon ili retenis por si mem. Sed Zeŭso ne lasis nepunita la aŭdacan agadon de Prometeo. Li decidis forpreni la fajron de la homoj. Ili ricevis la pli bonan parton, la viandon, nun ili do manĝu ĝin nekuirita. La diopatro samtempe ordonis al la nuboj, ke ili estingu per pluvelverŝiĝoj ĉiujn fajrojn. Sovaĝa ŝtormo disblovis la ardantan cindron kaj blovis ĝin en la maron. Tiel la homoj perdis la fajron, kiun ili bezonis por la vivo kaj la laboro. Ili povis nek baki panon nek kuiri, la forĝejoj staris forlasitaj kaj la metiejoj senhomiĝis. Dum fridaj tagoj kaj frostaj noktoj la homoj nenie povis varmigi sin.

Prometeo vidis ilian malfeliĉon, kompatis ilin kaj ne forlasis ilin dum ties mizero. Li sciis, ke en la palaco de Zeŭso tage kaj nokte brulas vigla fajro. En la malhelo de la nokto li ŝteliris sur la Olimpon en la oran palacon de la diopatro. Mallaŭte, rimarkate de neniu, li prenis brulantan ŝtipon de la fajro de Zeŭso kaj kaŝis ĝin en kava bastono. Gaje li revenis kun la fajro al la homoj. Li portis al ili tion, kion ili tiom sopiris.

Denove lumis la flamoj en la fornoj kaj metiejoj de la homoj, la odoro de kuiritaj manĝoj kaj de rostita viando grimpis ĉielen kaj penetris ankaŭ en la nazon de la diopatro. Zeŭso rigardis al la tero kaj vidis, kiel la fumo grimpas el la kamentuboj. Jen kaptis lin dia kolero. Tuj li punis la homojn denove. Li vokis la lamantan Dion

Hefesto, la dion de la artoj, al si. Hefesto loĝis sub fulganta vulkano, kie li havis sian metiejon. Al li Dio ordonis skulpti la statuon de belulino. Hefesto obeis lin kaj baldaŭ staris antaŭ Zeŭso belega statuo, kian la mondo ankoraŭ ne vidis. La diino Atena donis al ŝi multekostan vualon, brilete blankan robon kaj pompan zonon. Afrodito, la diino de l' beleco donis al ŝi eksterordinare grandan ĉarmon, kaj la heroldo de la dioj, Hermeso, donacis al ŝi la doton de la vigla parolo kaj karan flateman voĉon. Poste ili kronis ŝin. Zeŭso enmanigis al ŝi oran skatolon, kaj donis al ŝi la nomon Pandora, do tiu, kiu estas pridonacita per ĉio. La ruza Hermeso kondukis Pandoran teren al Epimeteo, al la frato de Prometeo.

Prometeo ofte avertis sian fraton akcepti donacojn de la dioj. Sed ĉe la vidaĵo de la bela Pandora forgesis Epimeteo ĉiujn avertojn kaj konsilojn. Afable li akceptis ŝin en sia domo. Li estis scivola, kion la dioj sendis al li en la skatolo kaj petis la knabinon levi la kovrilon. Servoprete Pandora malfermis la skatolon. Jen flugis kun siblado, lamentoj kaj hurlado, epidemioj, doloroj kaj suferoj el ĝi, cirklis super la domo kaj disvastiĝis super la tutan teron, kiu ne konis tiajn malbonojn. Ankaŭ Pandora teruriĝis kaj rapide fermis la skatolon. Sed ĉiuj malbonoj jam fuĝis el la skatolo, kaj nur la espero restis en ĝi. Epidemioj kaj suferoj ilin tute premis malsupren kaj tial penetris tiom malmulte da espero en la mondon.

Epidemioj kaj mizero ĵetiĝis sur la loĝejojn de la homoj kaj je ties kalkanoj sekvis la morto. Doloroj kaj inkubaj pensoj vekis la homojn el la dormo kaj malicaj sonĝoj timigis ilin. Nur espero malmulte estis inter la homoj. Ĝi preskaŭ tute restis en la skatolo de Pandora.

La kolero de Zeŭso trafis ankaŭ Prometeon. La diopatro ordonis al Hefesto kaj al ties helpantoj, ke ili forĝu Prometeon per la plej pezaj kaj plej firmaj ĉenoj al alta roko en la montaro Kaŭkazo.

Nur malvolonte Hefesto obeis la ordonon de Zeŭso, sed li forĝis Prometeon tiom proksime al la roko, ke li eĉ ne povis moviĝi. Alte super abismo, el kiu rampis nebuloj, pendis Prometeo inter ĉielo kaj tero, sed li ne submetiĝis, li ne petis pri graco.

Kiam Zeŭso vidis, ke Prometeo ne petis pri pardono kaj fiere eltenis sian sorton, li sendis gigantan aglon al li. La aglo ĉiutage sidiĝis sur la katenitan Prometeon, hakis per akra beko la hepaton el ties korpo kaj manĝis ĝin. En la nokto postkreskis la hepato de Prometeo kaj la aglo matene havis novan manĝon je dispono. Al tiaj eternaj turmentoj verdiktis Zeŭso Prometeon. Pasis multaj jaroj, sed Prometeo ne submetiĝis.

Post jarcentoj, kiujn Prometeo travivis en soleco kaj turmentoj, trovis lin Heraklo, filo de Zeŭso. Serĉante la orajn pomojn de la Hesperidinoj, li aperis tie. Ĝuste la aglo alflugis por satigi sin. Heraklo metis flanken sian klabon, streĉis la tendenon de sia arko, celis kaj mortigis per ununura pafo la grandan rabobirdon. Poste li disrompis la katenojn de Prometeo kaj liberigis lin. Sed por pacigi Zeŭson kaj plenumi ties malbenon, Prometeo devis porti je fingro feran ringon, en kiu estis inkludita ŝtoneto de kaŭkaza roko. Tiamaniere Prometeo estis katenita poreterne tiel, kiel Zeŭso intencis tion.

De tiam portas la homoj ringojn kun ŝtonoj, por memoro pri la agado de Prometeo. Ili portas ilin ĝis nun, kvankam ili jam delonge forgesis Prometeon, kiu ne submetiĝis al la dioj kaj dum ilia malfeliĉo estis fidela al la homoj.

*Originalo: PROMÉTHEUS*

# DILUVO

Al la diopatro penetris la sciigo, kiom fiiĝis la homoj, kaj ke ili eĉ ne hezitas entrepreni krimojn. Li decidis malsuprengrimpi sur la teron por konvinkiĝi per propraj okuloj, ĉu la homoj efektive rabas kaj murdas, ĉu ili preferas la mensogon kompare al la vero kaj mokegas la diojn. Afliktite kaj kun kolero li ekkonis ĉie, kie li aperis, ke la homoj estas ankoraŭ pli fiaj ol ilia famo. Oni priŝtelis la aliajn kaj eĉ ridis antaŭ ties okuloj. Gastigantoj atakis la dormantajn gastojn kaj mortbatis ilin, infanoj ĝojis pri la morto de siaj gepatroj kaj sopire atendis la heredaĵon, edzinoj venenigis sian edzon kaj fratoj uzis la arkon kontraŭ la frato. Zeŭso sentis sin pli bonfarte en senhoma roka tristejo ol en la urboj kaj vilaĝoj de la homoj.

Iam vespere Zeŭso venis en la palacon de la reĝo de Arkadio, al Likaono. La homoj ekkonis, ke proksimiĝis dio kaj komencis preĝi. Sed Likaono mokis ilin. Li tenis kaptitaj virojn el la gento de la molosoj. Iun el ili li mortbatis kaj ordonis kuiri lin. Kiam la vojaĝantoj estos satiĝintaj de la homa viando kaj profunde dormos, li volis mortigi ilin.

Servistoj portis al Zeŭso pelvojn kun vaporantaj manĝoj. Ekkoninte, per kia terura manĝo la reĝo lin regalis, li ekkoleregis. Li ĵetegis fulmon sur la palacon de la krima reĝo Likaono kaj orelsurdiga tondro disvastiĝis en la tuta reĝolando. Ĉie elpafiĝis flamoj kaj voris avide la posedon de la reĝo. Likaono mem fuĝis kun mortotimo el la brulanta palaco kaj provis fuĝi de la kolero de Zeŭso. Li malfermis la buŝon, sed pro timego li eĉ ne kapablis eligi sonon. Kiam li fine reakiris la voĉon kaj volis ekkrii, el lia buŝo aŭdiĝis hurlado. Li falis sur siajn brakojn kaj gambojn kaj sentis kiel sur sia tuta korpo kreskas felo, kiel lia vizaĝo tordiĝas en hundecan buŝegon, el Likaono fariĝis lupo, kiu eterne soifas

pri sango. Ekde tiu tempo li ŝteliras ĉirkaŭ gregoj en paŝtejoj kaj liaj okuloj sovaĝe radias tiel, kiel tiam, kiam li ankoraŭ estis reĝo.

Zeŭso reiris en la ĉielon kaj kunvokis la konsilion de la dioj. La dioj rapide kuris trans la Lakta Vojo en la marmoran halon, en kiu Zeŭso sidis morne kaj pripenseme sur sia trono. Apenaŭ ili kolektiĝis, eksonis la voĉo de la diopatro. Li raportis, kion li vidis kaj travivis surtere.

„Unu palacon mi jam frakasis per fulmo“, li diris, „sed necesas puni ĉiujn homojn. Mi neniigus ilin per la fajroj de miaj fulmoj, sed mi timas, ke tia grandega brulo povus transiri ankaŭ ĉielen. Ni ĉiuj konas la aŭguron, ke iutage tero, maro kaj ĉielo ekflamiĝos kaj forbruliĝos la mondo. Tial mi intencas sendi grandan diluvon sur la teron kaj liberigos ĝin de la fieco de l‘ homa gento.“

Kaj Zeŭso enfermigis la nordoventon, kiu forpelas la nubojn, en kavernon kaj la sudoventon li ellasis. La sudovento batis per siaj malsekaj flugiloj kaj ekflugis. Sur ties frunto sidis densa nebulo kaj el la griza barbo torentis pluvo. Per la dekstra li premis kaj ŝiris nigran nubegon, el kiu torentis pluvelverŝiĝoj. La mara dio Pozidono helpis al sia frato Zeŭso. Li alvokis ĉiujn riverajn diojn kaj ordonis al ili, ke la torentoj ŝvelu kaj eliru la bordojn, por ke la digoj kunrompiĝu, kaj por ke la loĝejoj de la homoj estu inundataj. Jen grimpis la riveroj el siaj riverujoj kaj inundis vilaĝojn kaj urbojn, kovris grenokampojn, arbustojn kaj arbojn. La akvo grimpis trans la tegmentojn de la domoj kaj kovris baldaŭ eĉ la pintojn de la turoj. La homoj naĝante provis savi sin, sed la vipanta pluvo fordrivigis ilin, kaj nur malmultaj sukcesis atingi la montopintojn. Sed baldaŭ suprengrimpis la akvo ankaŭ ĝis super la pintoj kaj forlavis la homojn en la profundojn de la nova senborda maro. Aliaj surboatiĝis kaj surŝipiĝis kaj batalis sur la koleraj ondoj pri la nuda vivo. Ili fiaskiĝis pro la rokaj klifoj, kiuj

antaŭ ne longa tempo ankoraŭ estis la krestoj de la plej altaj montoj. Scivolaj fiŝoj naĝis profunde sub la marnivelo tra arbokronoj kaj svarmis en la domoj kaj temploj, kies fenestroj kaj pordoj pro la sturmantaj ondoj estis enpremitaj. Cervoj, virkaproj kaj lupoj batalis vane kontraŭ la ondoj, kaj en la arbaroj loĝis delfenoj. La kontinentoj transformiĝis en ununuran maron. Ankaŭ diversaj birdoj falis en la akvon, ĉar ili nenie povis ripozi. Tiuj, kiujn la ondoj ne voris, mortis pro malsato.

En la regiono Focio elstaris ankoraŭ la monto Parnaso en la inundo. Tien stiris arkeo kun Deŭkaliono, jen filo de Zeŭso, kaj ties edzino Pirro. Prometeo avertis ilin sufiĉe frutempe kaj donis al ili firman ŝipeton. Kiam Zeŭso ekkonis, ke de la tuta homaro postrestis nur Deŭkaliono kaj Pirro, lojalaj, honestaj kaj diotimaj homoj, li dispelis la nubojn kaj montris al la tero la ĉielon kaj al la ĉielo la teron. Ankaŭ Pozidono, kiu per tridenta forko malserenigis la maron, metis flanken la tridenton, li alvokis sian filon Tritonon, ke li blovu sian gigantan konkotrumpeton. Tritono povis blovi tiom forte, ke tio aŭskulteblis en la tuta mondo. Li blovis kaj la akvo komencis sinki, la riveroj reiris en siajn riverujojn kaj la maro inter siajn bordojn.

Deŭkaliono kaj Pirro surteriĝis ĉe la monto Parnaso, falis sur la genuojn kaj dankis al la dioj pro sia savo. Poste ili ĉirkaŭrigardis kaj vidis nur tristan teron. En la branĉoj de la arboj pendis ankoraŭ la ŝlimo, kaj ĉio estis kvieta, sen vivo. Deŭkaliono ĝemis: „Kara Pirro, nur ni sole postrestis de la homaro. Kion ni faru? Se mi nur, kiel mia patro Prometeo, povus doni al la argilo homan formon kaj enspiri vivon!“ Kun ploroj en la okuloj preĝis Deŭkaliono kaj Pirro sur la ŝtupoj de preskaŭ tute ruiniĝinta kaj per mosko prikreskata templo de la diino Temiso, la patrino de Prometeo. Ili petegis ŝin, ke ŝi helpu al ili revekigi la mortan teron je nova vivo.

La diino estis kortuŝita kaj konsilis al ili: „Paŝu el la templo, vualigu viajn kapojn kaj ĵetu malantaŭ vin la ostojn de la granda patrino!“

Profunde enpense ili paŝis el la templo eksteren. Ili ne povis kompreni, kiel la diino povis postuli de ili ĝeni la pacon de siaj antaŭuloj. Longan tempon ili cerbumis. Subite Deŭkaliono havis la ideon, ke kiel patrino estis celata la diino de la tero.

„Tero estas por ĉiu el ni la granda patrino“, diris Deŭkaliono, „kaj ŝiaj ostoj povas esti nur ŝtonoj en la argilo.“

Sed li dubis, ke la ŝtonoj povus vivigi la teran surfacon. Tamen li kaj Pirro kolektis ŝtonojn kaj ĵetis ilin malantaŭ sin. Kaj jen okazis miraklo. Apenaŭ falis la ŝtonoj surteren, ili perdis sian duron, kaj kio je ili estis malseka, fariĝis karno. Kio estis je la ŝtonoj dura kaj necedema, ŝanĝiĝis en ostojn, kaj la vejnoj el la ŝtonoj fariĝis vejnoj en la homa korpo. La ŝtonoj, kiujn ĵetis Deŭkaliono, fariĝis viroj, kaj tiuj, kiujn ĵetis Pirro, fariĝis inoj.

Tiel ekestis nova homa gento, nelacigebla en la laboro kaj rezistema kontraŭ suferoj kaj doloroj. Ĝi devenis de la ŝtonoj kaj estis malcedema kaj dura kiel ili.

*Originalo: POTOPA*

# FAETONO

La juna Faetono iutage kuris plorante al sia patrino.

„Neniu akceptas, ke mia patro estas unu el la dioj“ li diris plorsingulte. „Mi ludis kun la knaboj kaj ili ridis pri mi. Ili diris, ke mi nur fanfaronas.“

La patrino brakumis kaj konsolis lin: „Via patro, filĉjo mia, estas efektive unu el la dioj. Rigardu supren al la ĉielo. La suno, kiu brulas sur la ĉielo, lumas kaj brilas, estas via patro. Li vidas, kiel vi ludas kun la knaboj, kiel vi banas vin en la rivero, li vidas ĉion, kio okazas surtere. Via patro estas la sunodio Helios.“

Faetono rigardis al la ĉielo, kaj sopiris sian patron. „Mi iros al li“, li diris al la patrino, „ mi volas viziti lin.“

La patrino ne kontraŭdiris ion.

„Iru do.“ Ŝi karesis lian hararon. „Li certe volonte vidos vin. Vi devos ĉiam iri orienten, ĝis kiam vi atingos grandan rokon. Sur la rokon kondukas pado, kaj je la fino de la pado, sur la pinto de la roko, staras la sunburgo de via patro Helios.“

Plena de malpacienco Faetono pretigis sin kaj ekmarŝis. Li iris kaj iris, ĉiam orienten, ĝis li atingis altan rokon. La burgo de la sunodio brilis en la malproksimo, kaj la altaj oraj kolonoj, sur kiuj ĝi staris, brulis sur la ĉielo kiel flamoj. La duflugila burga pordego, forĝita el arĝentaj radioj, lumis renkonte al Faetono, kvankam surtere sub la altaj rokoj jam dum longa tempo estis nokto.

Faetono paŝis en la sunoburgon. Li devis halti kaj fermi la okulojn pro la giganta torento de lumo. Meze de la halo sidis sur trono ornamita per diamantoj dio Helios. Ĉirkaŭ li staris en cirklo la horoj, tagoj, monatoj, jaroj kaj jarcentoj. Kiam Faetono estis kutimiginta pri la brilo kaj la helo, li ekvidis apud la trono de la patro ankoraŭ aliajn figurojn. Ridetantaj staris tie la juna Printempo kun laŭrokronita hararo, Somero kun spikokrono, Aŭtuno tute priŝprucita per vinbera suko kaj la glacia Vintro kun hirta griza hararo. Kaj jen jam eksonis kiel sonorilo tra la burgo la voĉo de dio Helios: „Estu bonvena, Faetono, filo mia. Kial vi venis al mi?“

Faetono venkis sian timon kaj paŝis kuraĝe antaŭ sian patron. „Surtere oni ridas pri mi. Oni diras, ke mi mensogas kaj fanfaronas. Oni ne akceptas, ke mia patro estas unu el la dioj. Mi petas vin, se vi povas, montru al ili, ke mi efektive estas filo via.“ Helios prenis la briletantajn radiojn de la kapo, mangestis Faetonon al si kaj brakumis kaj kisis lin.

„Vi estas filo mia, Faetono“, li diris, „kaj mi volas pruvi tion al vi. Deziru al vi tion, kion vi volas, kaj mi plenumos la deziron.“

Faetono ridis fiere: „Mi scias, ke vi ĉiutage veturigas oran, de sorĉoĉevaloj tiritan ĉaron de oriento al okcidento trans la ĉielon, mi deziras almenaŭ unufoje rajti veturigi tiun ĉaron.“

Jen Helios ekteruriĝis kaj bedaŭris sian promeson. „Nur ne tion“, li parolis insiste al la filo, „deziru al vi ion alian. Vi estas juna kaj ne povus reteni la sovaĝajn ĉevalojn. La vojo de la sunoĉaro estas peniga. Matene la ĉaro grimpas krute en la ĉielon, kaj kiam ĝi atingas la plej altan punkton, ekkaptas eĉ min kapturno pro la tagmeza alto. Poste troviĝas antaŭ la ĉaro la kruta vojo malsupren al la maraj ondoj. Necesas forta mano, por ke la ĉaro kun la ĉevaloj kaj la kondukanto ne ĵetiĝu transkapiĝe en la profundon.“

Sed la sunodio povis paroli ion ajn, Faetono ne lasis konvinki sin. Li sopire avidis pruvi al siaj amikoj kaj al ĉiuj homoj surtere, ke li estas la filo de la sunodio. Kaj la dio ne povis rompi sian promeson.

Ĝemante Helios prenis la filon je ŝultro kaj kondukis lin al la ora ĉaro, kiu radiis blindige al ĉiuj flankoj. Dum Faetono miris pri la majesta vidaĵo, la matenruĝo oriente malfermis la purpuran pordegon kaj ebligis la rigardon al halo plena de rozoj. La nokto fuĝis pro la matena ruĝo kaj venis la tempo jungi la fajroĉevalojn al la ĉaro.

La sunodio priŝmiris la vizaĝon de la knabo per sorĉungvento por gardi lin de la radioj kaj donis al li lastajn konsilojn: „Kara filo, ĉar vi ne volas rezigni pri la danĝera veturo, atentu, ke vi ne veturigu la ĉaron tro alte, ĉar vi tiel bruligus la ĉielon; sed se vi veturigus la ĉaron tro malsupre, vi bruligus la teron. Tial tenu vin ĉiam en la mezo inter ĉielo kaj tero. Ne uzu la vipon, ĉar la ĉevaloj tute per si mem sturmos antaŭen. La vojon vi ekkonos facile, vi vidos la spurojn de miaj radoj. Veturigu la ĉaron laŭ ili.“

Faetono kapjesis, sed li eĉ ne aŭdis, kion diris la patro. Tuj li saltis sur la ĉaron, prenis la bridilojn kaj gaje rapide galopis el la patra burgo. La briltrema ĉaro disŝiris la nebulon, kaj sub la hufoj de la sunoĉevaloj saltis fajreroj en la aero. Unue la ĉevaloj galopis en la kutima spuro tiel, ke la hararo de Faetono flagris petole enaere. Sed tiam ili sentis, ke ili estas kondukataj de fremda necerta mano, kaj ke la ĉaro estas malpli peza ol kutime. Jen ili forlasis la konatan spuron. Dum sovaĝa veturo ili ĵetis la ĉaron tien kaj tien kaj kuregis kun ĝi tien, kien plaĉis al ili. Plena de timo Faetono rigardis de la ĉiela alto malsupren sur la teron. Profunde sub li kuŝis montoj, riveroj kaj urboj en la radianta lumo de la ĉaro. Faetono ektremis kaj kapturno kaptis lin. La bridiloj glitis el liaj manoj kaj falis per si mem sur la dorsojn de la ĉevaloj. La ĉevaloj

baŭmis kaj rapidegis ĝis la steloj kaj denove tra la fumonuboj teren. Kie la sunoĉaro proksimiĝis al la tersurfaco, leviĝis flamoj alten. La tero sekiĝis kaj diskrevis, en la tero malfermiĝis nigraj fendoj. La reĝo de la submondo observis kun timemo la lumon, kiu penetris tra la fendigita terŝelo en la eternan tenebron de lia regno. Siblante vaporiĝis la riveroj, ankaŭ la montoj varmegiĝis ĝis blanka ardo kaj disfalis en polvon. Faetono vidis la frakasitaĵojn de la brulanta mondo. La brulvarmega aero pikadis lin enbuŝe kaj pulme, la ĉaro ardis sub li. En Afriko, kie la sunoĉaro kliniĝis al la tero, nigriĝis la haŭto de tutaj popoloj, kaj ekestis gigantaj dezertoj. Eĉ la maro bolis, kaj la fiŝoj kaŝiĝis surgrunde de la maro. Sed la turmentita Tero petegis la diopatron Zeŭso, ke li savu ĝin. Zeŭso aŭdis kaj akceptis la peton de patrino Tero, li ĵetis sian fulmon kaj puŝis Faetonon el la sunoĉaro. Jen baŭmis la ĉevaloj kaj ŝiris sin el sia jungilaro. Sed Faetono falegis sen konscienco tra la ardanta spaco surteren.

Akvaj feinoj trovis la mortan Faetonon kaj entombigis lin. Profunde funebrante patro Helios kaŝis sian vizaĝon, kaj meze de la tago fariĝis nokto, heligita nur de la bruloj, kiuj puŝis de la tero siajn flamojn ĉielen.

La patrino de Faetono vagadis dum longa tempo tra la mondo kaj serĉis la tombon de sia filo. Lastfine trovinte ĝin, ŝi kisis plorante la teron, sub kiu kuŝis la filo. Ankaŭ la fratinoj de Faetono profunde afliktiĝis. Ili ploris kaj plendis dum monatoj. Jen ili eksentis, ke ili ne plu povas foriri de tiu loko, la piedoj firme enradikiĝis, despere ili trafosis siajn hararojn, kaj anstataŭ la hararoj susuris folioj sub iliaj fingroj.Ili fariĝis arboj. Ilia patrino volis savi ilin kaj elŝiris ties kreskantajn branĉetojn. Jen gutis likvogutoj el iliaj vundoj kaj firmiĝante fariĝis sukceno. Pro la doloro la fratinoj ŝanĝiĝis en alnojn.

La sunodio funebras ĝis nun pri sia filo. Vespere post sunsubiro gutas el la steloj, el arĝentaj okuloj de la nokta ĉielo, larmoj. La homoj nomas tion roso.

*Originalo: FAETHÓN*

## ORFEO

En la greka regiono Trakio vivis antaŭ mallonga tempo la fama kantisto Orfeo. Li ludis liron kaj kantis tiel bele, ke neniu povis rezisti lian kantadon. La birdoj silentiĝis kaj aŭskultis liajn kantojn, la sovaĝaj bestoj venis el la arbaro kaj sekvis lin. La lupo kuris apud la ŝafo, la vulpo apud la leporo, kaj neniu suferigis alian. Eĉ la serpentoj rampis el siaj truoj por aŭskulti lin, kaj la ŝtonoj kuntiriĝis, por ke la kantanta Orfeo evitu ilin survoje. La riveroj ĉe lia kantado haltis kaj la fiŝoj naĝis al la surfaco, por ke ili pli bone povu aŭdi liajn kantojn.

La homoj aŭskultis lin, ridis aŭ ploris, laŭ tio, kiel lia kanto sonis. Ili forgesis siajn afliktojn kaj devis agi tiel, kiel li celis per sia kanto. Al la lokoj kaj al la manĝofestoj por gastoj, kie kantis Orfeo, venis eĉ la dioj. Ili venis trans la Laktan vojon al la tero, pro lia voĉo.

Ankaŭ la nimfoj, la najadoj, grimpis el la ondoj, tuj kiam ili ekaŭdis lian kantadon. En iun el ili enamiĝis Orfeo, li kondukis ŝin hejmen kaj edzinigis ŝin. La nimfo estis Eŭridico kaj ŝi estis tiel karesema, kiel la kantoj de Orfeo. Dum mallonga tempo ili feliĉe kunvivis. Iutage Orfeo devis foriri, kaj Eŭridico restis hejme sola. En la soleco ŝi sopiris la delikate verdajn herbejojn, kie fontoj kaj rojoj murmuras. Tie loĝis en la briletantaj akvoj ŝiaj kamaradinoj, la najadoj. Ŝi rememoris ilin kaj decidis ilin viziti.

Ŝi elkuris kaj jam ĝojis, ke ŝi surprizos siajn kamaradinojn. Sur la plej mallonga vojo ŝi kuris trans la herbejojn. Subite ŝi eksentis en piedo pikantan akran doloron, kiu disvastiĝis en ŝia tuta korpo. Ŝi rigardis al la tero kaj ekvidis malaperi serpenton en la herbejo. Senkonscie ŝi falis surteren. La serpenta veneno haltigis ŝian koron. Eŭridico mortis, kaj nek la plorado de ŝiaj kamaradinoj, la nimfoj, nek la despero, kiam Orfeo trovis ŝin, povis reveki ŝin.

Orfeo entombigis la mortan Eŭridicion kaj kun ŝi ĉiujn gajajn kantojn. Malĝoje li vagadis tra la mondo, kaj la larmoj de la homoj verŝiĝis sur iliajn vangojn, kiam ili aŭdis liajn novajn kantojn. La folioj sur la arboj ĝemis, kaj la sovaĝaj bestoj eliradis kun malsekaj okuloj el la arbara densejo.

Nenie surtere Orfeo trovis trankvilon. Seninterrompe li pensis pri sia Eŭridicio kaj la perdita feliĉo. Eĉ la tempo ne povis mildigi lian doloron kaj funebron. Post longa senkonsola vagado li decidis grimpi en la submondon, kie loĝas la ombroj de la mortintoj. Tie regis la animojn de la homoj, kies korpoj mortis surtere, la dio Hadeso kun sia edzino Persefono. La dion de la submondo Orfeo volis peti redoni Eŭridicion per permeso al ŝi, ke ŝi rajtu trarompi la leĝon de l‘ morto kaj revenu surteren al la vivantoj.

Orfeo paŝis en okcidenta direkto, ĉar tie, en granda malproksimo troviĝis kaŝita en nigraj rokoj la enirejo al la submondo. Li iris, kaj kiam ŝajnis al li, ke li eraris pri la vojo, li komencis kanti malgajan kanton pri la morta Eŭridicio. La kanto kortuŝis la arbojn, kaj ili montris al li per la branĉoj, kie troviĝas okcidento, kaj la kompatema herbaro klinis la tigojn tien, kie troviĝas la vojo submonden.

Finfine Orfeo ekvidis vicon de senmovaj cipresoj kaj multajn nigrajn rokojn, kiuj perdiĝis en la griza nebulo. Li penetris en la mortan nebulon. Subite antaŭ li ekardis tri paroj de fajraj okuloj kaj ekaŭdeblis sovaĝa bojado. Tiel salutis Orfeon la trikapa hundo Cerbero, la terura gardisto ĉe la pordego de la submondo. Li flaris la vivantan homon. Sed Orfeo komencis kanti kaj en la tri sangaj buŝoj silentiĝis la bojado. La giganta hundo sternis sin kaj enlasis Orfeon en la mortulan regnon. Kantante Orfeo grimpis la krutan padon malsupren. Li evitis la lokojn, kie elsaltis flamoj kiel langoj. Sed eĉ la flamoj rigidiĝis, kaj ilia brulo mildiĝis, tuj kiam lia voĉo penetris al ili.

Orfeo miksiĝis inter la mutajn ombrojn de la animoj. Ili ĉiuj rapidis al la bordo de la morna rivero Stikso. Baldaŭ venis la ŝipeto kun la maljuna Karono, kiu transigadis la grizajn figurojn al la submondo. Orfeo saltis post la animoj de la mortintoj en la pramon, sed Karono ekkonis, ke vivanto paŝis en la ŝipeton. Li rifuzis transporti Orfeon al la alia bordo. Sed kiam la malfeliĉa Orfeo komencis kanti, li kortuŝis ankaŭ la maljunan Karonon ĝis larmoj. Li permesis al Orfeo kunveturi.

La pramo albordiĝis, kaj la animoj de la mortintoj iris al la tribunalo. Sed Orfeo ekserĉis la mastron de la submondo. Li iris trans la herbejon, sur kiu vagadis tiuj, kiuj surtere estis nek bonaj nek malbonaj. Li vidis la terenon de la beatuloj; Elizion, kie restadis la animoj de la bonaj homoj, kaj la mornan Tartaron, kie pentofaris kun suferoj kaj turmentoj la animoj de la mortintoj pro fiagoj, kiujn ili kulpis surtere. Kien ajn paŝis Orfeo kun sia kantado en la Tartaro, tie la suferado haltis tiom longe, kiom li kantis. La turmentitaj animoj forgesis siajn torturojn kaj aŭskultis lin. La ombro de la morta reĝo Tantalo forgesis sian eternan malsaton kaj soifon, per kiuj punis lin la dioj, la ombro de la reĝo Sisifo ripozis dum certa tempo de sia streĉa kaj vana laboro.

Meze de la mortula regno sidis sur nigra trono la reĝo de la submondo, la morna Hadeso. Nigra hararo pendis sur lian frunton, kaj en la blanka vizaĝo ardis nigraj okuloj. Apud li sidis Persefono en nigra vesto kaj ŝia blanka vizaĝo konturiĝis sur ĝi kiel la luno en nokta nubaro. Orfeo hirtiĝis ĉe tia vidaĵo, sed lia amo estis pli forta ol lia timo. Li kantis antaŭ la potenca reganta paro.

Li kantis pri la amo al Eŭridicio kaj pri la morto, kiu antaŭtempe kondukis ŝian animon en la regnon de la sonĝoj. Pri sia doloro li kantis, pri sia funebro sen fino kaj sen limoj. Li petis la diojn de la submondo permesi rekonduki Eŭridicion surteren, ĉar ja tamen neniu mortideva homo evitas sian lastan vojaĝon. Ankaŭ Orfeo kaj Eŭridicio ja iutage venos en la mortulan regnon.

Hadeso kaj Persefono aŭskultis kortuŝite lian kantadon.

„Mi volas plenumi vian deziron“, diris Hadeso, turnante sin al Orfeo, kiam tiu estis fininta sian prezentadon. „Eŭridicio pro mi reiru inter la vivantojn. Sed sur la vojo el la submondo vi ne rajtos rigardi vian edzinon. Se vi rigardos ŝin antaŭ ol vi estos denove sur la tera surfaco, ŝi malaperos kaj reiros al la ombroj, kaj vi neniam denove vidos ŝin.“

Plena de ĝojo dankis Orfeo, kaj post mangesto de la mastro el la submondo proksimiĝis lante la ombro de Eŭridicio por sekvi la edzon al la supra mondo.

Ili iris sur la konata pado al la tera surfaco, grimpis en la pramon de Karono kaj veturigis sin al la alia bordo.

Malrapide ili paŝis tra pejzaĝo de nemezureble granda kvieto. Orfeo iris antaŭe kaj aŭskultis, ĉu li aŭdas post si la paŝojn de Eŭridicio. Sed li aŭdis nur siajn proprajn paŝojn, jen kaptis lin terura timo. Eble Eŭridicio postrestis malantaŭ li kaj, ne konante

la vojon, eraris pri ĝi, eble okazis al ŝi io malbona. Pro sia timo Orfeo forgesis sian promeson kaj turnis sin al ŝi. Tiumomente antaŭ liaj okuloj malaperis la bildo de Eŭridicio en nenion, kaj la amatino mortis je dua fojo. Facila spireto tuŝis la frunton de Orfeo kiel lasta kiso kaj poste li staris ĉe la vojo en la kvieto tute sola. Despero okupis lin, li kuris sur la pado malsupren kiel freneziĝinto, li vokis Eŭridicion kaj kuregis senspire ĝis la ŝipeto de Karono. Sed ĉifoje li vane petis la pramiston transbordigi lin. Dum sep tagoj vagadis Orfeo surborde de la submonda rivero kaj provis denove atingi la regnon por la mortintoj. Dum sep tagoj nur larmoj estis lia nutraĵo. Ĉio estis vana. Malgaje li reiris al la tera surfaco kaj iris en tristan montaron. Sur nuda monta ebeno li kantis al la rokoj kaj al la vento pri sia malfeliĉo. La arboj ĉirkaŭe ne plu moviĝis pro lia voĉo. Antaŭ ol Orfeo finis sian kantadon, la nuda montodeklivo estis prikreskata per densejo, per juna arbareto; kaj birdoj kaj aliaj bestoj setlis en ĝi. Orfeo kantis kaj lia kanto cirklis super la arbopintoj, kaj la vento portis ĝin al la loĝejoj de la homoj. Kie ajn homoj troviĝis, ili silentiĝis pro kortuŝiteco.

Tiutempe migris tra la regiono aro de bakĥaninoj, adorantinoj de la dio de l‘ vino kaj de orgia gajeco. Ebriaj kaj kvazaŭ frenezaj ili ĵetiĝis en la arbareton, kie Orfeo kantis sian malgajan kanton. Lia malĝoja prezentado incitis la petolemulinojn, kaj iu el ili ĵetis al Orfeo tirson, do bastonon ĉirkaŭvolvitan de vinberujoj; alia levis ŝtonon kaj ĵetis lin al la kantisto. Sed la ŝtono kaj la tirso falis antaŭ Orfeo surteren, retiritaj de la forto de la kantado. La ekstazulinoj nun ĉiuj ĵetis ŝtonojn, kaj pro ilia kriĉado la kantado de Orfeo apenaŭ plu aŭdeblis. Nur de tiu momento la ŝtonoj atingis sian celon kaj koloriĝis per la sango de Orfeo. La kantado silentiĝis kaj finiĝis kun ties vivo. La bakĥaninoj dispecigis en la ektazo de sia fiagado ankaŭ la bestojn, kiuj ĉirkaŭis Orfeon kaj ankoraŭ ne vekiĝis el la sorĉo.

La sciigo pri la morto de Orfeo disvastiĝis sur la tuta tero. Pro li funebris ne nur la homoj, sed la tuta naturo priploris lin.

La arboj kiel signo de sia funebro deĵetis la foliojn, la rokoj disverŝis larmojn, kaj la riveroj ŝvelis, kvazaŭ torentus en ili la larmoj de la tuta lando. La arbaraj elfinoj kaj la nimfoj taŭzis sian hararon kaj vestis sin per nigraj vualoj.

La animo de Orfeo grimpis en la submondon. Nun la pramisto Karono ne plu rifuzis veturigi la kantiston en la mortulan regnon. Li estis nun ombro inter ombroj. Jam de malproksime Orfeo ekkonis sian Eŭridicion kaj rapidis renkonte al ŝi. Li povis rigardi ŝin kaj turni sin malantaŭen al ŝi, li ne plu perdis ŝin.

La dio Bakĥo ne lasis nepunita la fiagadon. Li transformigis per sorĉo la piedojn de la krimulinoj en radikojn, iliajn korpojn en trunkojn kaj branĉojn, kiuj seninterompe estis skuataj de la vento. La kadavron de Orfeo entombigis la muzoj, la diinoj de l‘ arto kaj de l‘ saĝeco. La kapon de Orfeo, kiun la bakĥaninoj deŝiris, drivis kun la liro sur la ondoj de la rivero Evros kaj tra la Egea maro ĝis la plaĝo de la insulo Lesbo. De tiam la najtingaloj sur la insulo kantas pli bele ol aliloke, kaj la insulo fariĝis la lulilo de famaj kantistoj. Ankaŭ la fama greka poetino Sapfo tie estis naskita.

La liro de Orfeo, kiu drivis sur la rivero, ankoraŭfoje aŭdeblis mallaŭte, kaj la morta kapo kantis je lasta fojo kvietan kanton. La ondoj kaj la bordoj ripetis la mallaŭtan kantadon. Ĝis nun la riveroj kantas, kion ili memoras pri la kantado de la morta Orfeo.

*Originalo: ORFEUS*

# FONDO DE TEBO

En Fenicio, en la urbo Cidono, regis reĝo Agenor. Lia filino Eŭropo estis vaste konata pro sia beleco, ne nur ĉe la homoj, sed ankaŭ ĉe la dioj. Neniu malpli altranga ol Zeŭso, la diopatro, enamiĝis al ŝi.

Iumatene iris la bela Eŭropo kun siaj amikinoj sur floroherbejo ĉe la mara bordo. La amikinoj plukis florojn kaj sidiĝis poste en la ombron de la arboj kaj plektis kronojn. Kiam ili rigardis supren de sia plektado, ili laŭte elspiris pro surprizo. Antaŭ ili staris majesta blanka taŭro kun malgrandaj kornoj, kiuj estis travideblaj kiel kristaloj. Ĝi kondutis tiel afable, ke Eŭropo kaj la aliaj knabinoj baldaŭ tute perdis sian timon. Eŭropo transdonis manplenon de floroj al ĝia rozkolora buŝego, kaj ŝiaj amikinoj kronis ĝiajn kornojn. La taŭro ludis kun la knabinoj kaj dancpaŝete proksimiĝis al ili per siaj hufoj, ĝi klinis la nukon kaj surgenuiĝis per la antaŭaj kruroj, kvazaŭ li volus inviti ilin por promena rajdo. Ridante Eŭropo sidiĝis sur la dorson de la miriga besto kaj vokis al siaj amikinoj, ke ili sidiĝu al ŝi. Sed la taŭro ne atendis la ceterajn knabinojn, sed leviĝis kaj fuĝis kun Eŭropo rekte en la maron. Plena de timo kaj teruriĝo Eŭropo komencis lamenti kaj plori, sed tio ne helpis al ŝi. La taŭro naĝis eksteren en la vastan maron, kaj la bordo kun la vekriantaj knabinoj malaperis baldaŭ post la horizonto. Ĉirkaŭe nenio plu videblis krom la blua mara surfaco. La suno subiris, enĉiele kaj en la respegulo de la ondoj ekbrilis la unuaj steloj, kaj la taŭro naĝis kun Eŭropo ankoraŭ plu. Jen aperis antaŭ ili en la malhelo la nigra ombro de nekonata bordo. La taŭro naĝis al la bordo kaj grimpis kun la senkonsciulino sur la sekan teron. Delikate la taŭro metis Eŭropon sur la molan herbejon kaj foriĝis. Sed el la varma nokta tenebro aperis la amdiino Afrodito. Ŝi kliniĝis al la time ŝokita ulino kaj konsolis ŝin. „Ne timu“, ŝi diris mallaŭte, „nenio malbona okazos al vi,

estis diopatro Zeŭso mem, kiu transformiĝis en taŭron kaj forportis vin, ĉar li enamiĝis al vi. Via nomo estos senmorta. La kontinento, kiu akceptis vin, estos nomata dum eterneco Eŭropo.“

Tiel vivis Eŭropo kun Zeŭso, kaŝita en fora lando. Ŝia patro Agenor profunde funebris pro ŝi. Li elsendis heroldojn, por ke ili almenaŭ sendu sciigon pri la malaperinta filino al li. Sed la heroldoj revenis kaj silentis. Neniu povis konsoli la reĝon, eĉ ne per la plej eta espero. Jen li alvokigis sian filon Kadmo.

„Foriru“, li diris al li, „ekserĉu por mi vian fratinon kaj konduku Eŭropon hejmen. Traserĉu la tutan mondon kaj kvietigu mian afliktón. Sed sen ŝi vi ne rajtos reveni!“

Kadmo kunvokis siajn plej kuraĝajn militistojn, elektis el ili aron kaj ekmarŝis enmonde por serĉi sian fratinon. Li tramigris konatajn kaj malpli konatajn landojn kaj tute fremdajn, ĉiam plu kaj plu. Ĉie li demandis pri Eŭropo, sed neniu sciis ion pri ŝi. Multajn bordojn ili atingis, multajn riverojn ili transiris, sed ĉio estis vana.

Iutage li kaj liaj akompanantoj eraris pri la vojo kaj retroviĝis sur vojo nekonata. Ili sekvis ĝin kaj renkontis post sufiĉe longa tempo migranton. Ili demandis lin, kien kondukas la vojo, kaj eksciis, ke ili atingos tiuvoje Delfon.

„Mi vidas, ke vi venis el malproksimo. Eble vi celas aventurojn, eble vi serĉas iun. Sed kiel ajn estu, ĉar vi nun foje estas sur la vojo al Delfo, demandu la orakolon pri konsilo. Eble la dioj mem montris al vi tiun vojon.“

Kadmo ekĝojis. Jam antaŭ longa tempo li aŭdis pri Delfo. En la fama orakolejo de Delfo sidis sur alta trikrura seĝo super rok-

fendo la orakolo Pitia. Ŝi enspiris la ebriigajn vaporojn, kiuj leviĝis el la rokfendo, kaj en ebrio ŝi elkriis siajn miskompreneblajn profetaĵojn, kiujn pastro surskribis kaj transdonis al la konsilpetintoj.

Kadmo dankis al la migranto, kaj kiam ili alvenis en Delfon, li iris al la orakolo kaj demandis pri konsilo. La pastro transdonis al Kadmo la sekvan profetaĵon: „Ne serĉu plu vian perditan fratinon, kaj ankaŭ ne reiru en vian patrujon. Sur soleca herbejo vi trovos junan bovinon, kiu ankoraŭ ne portis jugon. Sekvu ĝin, kaj tie, kie ŝi sin sternas, konstruu urbon kaj nomu ĝin Tebo.“

Kadmo sekvis la volon de la dioj. Li ekiris kun siaj akompanantoj por serĉi la solecan herbejon, por ke plenumiĝu, kion diris la orakolo.

Baldaŭ ili trovis la herbejon kaj ankaŭ la junan bovinon, kiu paŝtis sin sur la suka herbejo. Ili sekvis ĝin, trairis sur ĝia spuro rivereton kaj vastan erikejon. Fine la bovino haltis, retrorigardis al Kadmo kaj al ties akompanantoj, levis la kapon kaj eligis longe etenditan muĝadon. Poste ĝi lante sternis sin. Kadmo surgenuiĝis kaj kisis ĝojigite la fremdan teron, kiu fariĝu lia hejmloko. Al la akompanantoj li ordonis, ke ili alportu puran fontakvon por la oferado.

La arbaro, kiun la kunuloj de Kadmo enpaŝis, ankoraŭ ne konatiĝis kun la tranĉa eĝo de hakilo. Ili hakis vojon tra la densa arbustaĵo, ĝis ili atingis murmurantan fonton, kiu abunde kaj pure ŝprucis el roko kaj kies akvo saltetis trans malsekaj rokoj kaj disvastigis ĉirkaŭ si agrablan frideton. Ili surgenuiĝis por ĉerpi la akvon.

Jen ili aŭdis el roka kaverno bruadon kaj snufadon. La densejo ĉe la fonto disiĝis, kaj la ekterurigitaj viroj ekvidis gigantan skvaman drakon kun sange ruĝa kresto, kiu etendiĝis de la kapo ĝis la vostofino. El la okuloj de la monstro fulmis flamoj, kaj la monstro estis plena de veneno. Ĝi malfermis vaste la faŭkon, malkaŝante tiel tri svingiĝantajn langojn kaj tri vicojn da dentoj kaj elpuŝis venenajn vaporojn. Tiujn, kiujn ĝi ne sufokis per sia venena spiro, ĝi frakasis per sia skvama korpo kaj disŝiris ilin per siaj teruraj ungegoj.

La suno grimpis ĝis sia zenito, la ombroj fariĝis pli mallongaj, sed la kunuloj de Kadmo ne revenis. Kadmo ektimis, ke io malbona okazis al ili.

Li prenis siajn glavon kaj lancon kaj komencis serĉi ilin. En la densejo li trovis elhakitan padon kaj fine li atingis la rokon kun la fonto. Jen kuŝis liaj mortbatitaj kamaradoj, kaj super la kadavroj levis la drako minace sian kapon.

Kadmo rigardis sen timo la sange koloriĝintajn okulojn de la drako kaj vokis: „Aŭ, karaj amikoj, mi fariĝos via venĝinto aŭ via kamaradomorta!“

Li levis grandan rokon kaj ĵetis lin al la drako. Tia roko boriĝus eĉ en firman urbomuron, sed la drakon li ne vundis. Ĝi desaltis de ties skvama kiraso kaj incitis nur la drakan koleron. La drako kliniĝis por salti al la atakinto. Sed Kadmo ĵetis sian lancon kaj traboris per ĝia akra pinto la kirason de la drako. La drako turnis la kapon kaj firme mordinte retenis la lancon kaj disrompis ĝin. La pinton ĝi ne povis eltiri, ĉar ĝi sidis firme en la vundo. La drako ekfuriozis pro doloro, turnis sin al Kadmo, malfermŝiris sian mortigan faŭkon kaj provis mortigi la heroon per sia nigra, venena spiro. Kadmo sufiĉe frutempe ekkonis ties intencon kaj saltis malantaŭ gigantan arbon. Li tenis preta duan lancon kaj puŝis

ĝin per tiom da forto en la drakan gorĝon, ke ĝi traboris la monstron kaj samtempe proksiman kverkon. La drako baraktis kaj elŝiris la kverkon kun ties radiko. El lia gorĝo torentis sango, kaj baldaŭ ĉirkaŭe ĉio estis kovrita de ruĝa koloro – la herbejo, la musko kaj la branĉoj de la arboj. La mortanta monstro batis ankoraŭ kelkajn fojojn per la vosto dekstren kaj maldekstren, faligis kelkajn krakantajn arbojn kaj poste ĉesis moviĝi.

Dum Kadmo rigardis la mortbatitan drakon kaj miris pri ties giganta korpo, paŝis al li la diino Atena. „Semu la dentojn de la morta drako“, ŝi ordonis al li.

Kadmo plugis la teron per lanco kaj metis en la sulkojn la drakodentojn. Subite la plugita tero super la drakosemo komencis moviĝi, el la tero puŝiĝis glav- kaj lancopintoj, plumtufoj, kaskoj, kapoj, koloj kaj brakoj plenaj de tintantaj armiloj. La tuta kampo plenigis sin per militistoj kun levitaj armiloj. Kadmo ektimis kaj prenis sian glavon.

Sed unu el la militistoj kriis al li: „Ne miksiĝu en nian batalon! Tio estas afero nia! Kaj li batis per la glavo al la plej proksima militisto. Tiu traboris lin per bone celita lanco. Antaŭ la okuloj de Kadmo disvolviĝis akra batalo, kaj la militistoj mortigis sin reciproke. Tio ankaŭ ne povis esti alia. Ili devenis ja de la dentoj de la drako, kiu estis filo de la militdio Areso.

La batalkampo kovriĝis per mortigitaj viroj. Nur kvin postrestis, kaj tiuj interpaciĝis. Ili estis fortaj kaj kuraĝaj, ĉar ili komencis sian vivon per kruda batalo.

Kun ili Kadmo fondis burgon kaj la urbon Tebo.

*Originalo: ZALOŽENÍ THÉB*

# PENTEO

Reĝo Penteo de Tebo estis filo de unu el la filinoj de Kadmo kaj de unu el la kvin venkintoj, kiuj naskiĝis el drakosemo. Li ne neis la sangon de sia batalista patro. Lin ĝojigis nur la vidaĵo de bone armitaj militistoj. El ĉiuj homoj li ŝatis plej multe tiujn, kiuj plej longdistance povas ĵeti lancon, kaj el ĉiuj aĵoj li plej multe ŝatis la glavon, je kiu ankoraŭ ne sekiĝis la sango. La tintado de armiloj estis por li la plej dolĉa muziko. Ĉion alian li malestimis. Li konis ĝojon, sed nur tiun de la batalo. Li konis gajecon, sed nur la krutan gajecon de militisto. Li permesis al si homan liberecon, sed nur en malamika lando, kien li venis kun glavo ĉemane. Li ne agnoskis diojn, malestimis profetaĵojn kaj fidis nur armilojn kaj fortajn brakojn.

Sed ĝuste tiu morna tereno de militista sinteno kaj perforto alogis la gajan dion de la ĝojo, de la libereco kaj de l' vino. Oni nomis lin Bakĥo aŭ Dionizo, li veturis al proksima arbareto sur ĉaro tirata de tigroj, ĉirkaŭata de adeptaro el viroj kaj ulinoj. Kaj ĉiuj vivĝoje plezurigis sin per kantado kaj dancado. Inter ili kapriolis faŭnoj, jen idoloj kun pintigitaj oreloj. Iliaj kaprinaj kruroj per la hufoj stamfis laŭ la takto de la gajaj kantoj.

Multaj damoj de Tebo malligis sian hararon, haste kuris al la akompanantaro de Dionizo en la arbaron. Ankaŭ viroj kronitaj per hedero forlasis la urbon, eksiĝis kaj rapidis al Dionizo por fordoni sin al la glorado de l' vivo.

Kiam Penteo eksciis tion, li kvazaŭ eksplodis pro kolero. Li ne komprenis kiel viroj povas forgesi la armilojn kaj aliĝi al Dionizo. Por li Dionizo ne estis dio, sed malkuraĝa ĉarlatano, kiu nek regas la glavon nek kapablas veturadi per ĉevaloj nek scias kiel batali. Li malamegis liberecon kaj gajecon, kaj la kantadon kaj dancadon

li konsideris fiulinaĵoj. Pri ĉiu himno por la vivo li pensis galhumore. La vivo por li havis valoron nur tiukaze, se li povas riski ĝin por la venko en batalo.

Li kunvokis siajn servistojn kaj ordonis: „Kuru en la arbaron, certa dubinda Dionizo volas konkeri Tebon per kantado kaj dancado. Sed al mi vere pli plaĉus, se iu volus konkeri ĝin per fajro kaj feraj armiloj. Kuru kaj konduku ĉi tien tiun Dionizon en ĉenoj!“

La olduloj konsterniĝis, kiam ili aŭdis la parolon, kaj la blinda orakolulo Tiresio avertis la malsaĝan reĝon. Sed tiu ne koncedis. Lia kolero elverŝiĝis kun muĝado kaj sen pripenso kiel montara rojo. Se io ie metis sin en lian vojon, li ekŝaŭmis kiel rojo, kiu kunpuŝiĝas kun roko, kiu ĝenas ties fluon.

La servistoj post ne tre longa tempo revenis kaj trenis kun si viron, kies manoj estis kunligitaj malantaŭ la dorso.

„Ĉu li estas Dionizo?“ ekkriis la reĝo Penteo.

„Dionizon ni ne trovis“, sin senkulpigis humile la servistoj antaŭ la reĝo. „Ni kondukis ĉi tien nur iun el lia akompanantaro.“

„Kiu ajn vi estas, vi mortos“, decide diris Penteo, „por averti viajn kamaradojn. Sed antaŭe diru al mi, kial vi gloris tiun Dionizon?“

„Mi estas Aceteo“, diris sen timo la juna viro: „patro mia havis nek kampojn nek bovojn. Li estis nur povra fiŝkaptisto, la maro donis al li la eblon vivteni sin. Sed mi ne volis esti fiŝkaptisto kaj ĉiam je la sama bordo. Mi iris sur la maron, lernis gvidi ŝipojn laŭ la steloj kaj fariĝis ŝipisto. Iam ni haltis ĉe nekonata bordo por havigi al ni freŝan trinkakvon. Mi grimpis sur monteton kaj rigardadis la terenon. Jen maristo ekvidis kiel juna viro proksim-

iĝas al nia ŝipo, jen fremda linda junulo. La knabo ŝanceliĝis kvazaŭ ankoraŭ dormema aŭ ebria de vino. La vestoj kaj la vizaĝo de la junulo estis tiel eksterordinaraj, ke mi baldaŭ ne plu dubis pri tio, ke li certe estas dio. Sed la maristoj moke ridis al mi kun antaŭĝojo, ĉar ili volis vendi la knabon kiel sklavon. Por tia belaspekta predo oni laŭdire ricevas multan monon. Mi ekkverelis pri tio kun ili, kaj de la tumulto vekiĝis ankaŭ la junulo, kiu ĝis tiu momento profunde dormis sur la ferdeko. Li frotadis siajn okulojn kaj demandis: „Kie mi estas? Kien vi veturigas min?“

„Kaj kien vi volus?“ ridetante demandis la ŝipanoj. „Diru do kien vi volas, kaj ni veturigos vin tien.“

‚Veturigu min al la insulo Nakso‘, respondis la junulo. ‚Tie mi estas hejme.‘

Mi ekstiris la ŝipeton al tiu flanko, kie estas Nakso, sed la maristoj ŝovis min flanken. Ili mem transprenis la rudron kaj stiris en la mala direkto. Ili ne volis plenumi la promeson kaj intencis konduki la junulon en sklavecon.

Mi petis ilin, ke ili ne rompu la promeson. Ili ridis kaj diris al mi, ke mi okupiĝu pri mi mem, ke ĉe la rudro staros ili de nun. Ankaŭ la junulo ekkonis, ke la ŝipo moviĝas en alia direkto, li ŝajnigis plori kaj petis denove, ke ili veturigu lin al Nakso. La plorado kaj la petoj ŝajne kaŭzis nur, ke ili movigis la junulon eĉ pli for de lia hejmo.

Sed subite okazis stranga afero. Mi ĵuras al vi, reĝo, ke mi diras la veron. Subite la ŝipo haltis, kvankam la ankro ne estis elmetita kaj la maristoj remis tiom forte, kiom ili kapablis. Ili hisis la velojn kaj denove remis tiom, ke fluis ilia ŝvito. Mi cerbumis, kiel tio povas esti kaj jen mi vidis miraklon. El la ondoj kreskis tigoj de hedero kaj volvis sin kiel serpentoj ĉirkaŭ la remiloj, kaj tuj la

hedero firmtenis ĉiujn remilojn kaj serpentumis sur la masto supren, kaj jam la tuta ŝipo estis prikreskita per folioj. Sur la ferdeko antaŭe staris la junulo kun sia tuta pompo, kronita per vinberaj folioj, ĉirkaŭata de tigroj kaj de panteroj. Li estis dio Dionizo mem.

Mi rigardis al la terurigitaj maristoj kaj ekvidis, kiel ili malheliĝis sur la tuta korpo, iliaj brakoj mallongiĝis kaj iliaj haŭtoj transformiĝis. Ili ŝanĝiĝis antaŭ miaj okuloj en delfenojn kaj iliaj glataj korpoj glitis unu post la alia en la marajn ondojn. El dudek maristoj sur la ŝipo restis nur mi mem kaj plena de angoro mi atendis, kiam ankaŭ miaj brakoj ŝanĝiĝos en naĝilojn kaj mi rekte iros maren.

Sed Dionizo rigardis kun rideto al mi kaj alvokis min, ke mi transprenu la stirilon. Ni turniĝis al Nakso kaj tie mi komencis mian servon ĉe li.“

„Sufiĉas!“ aŭdigis sin reĝo Penteo. „Mi estas jam sata pri viaj fabeloj. For de mi en la karceron kaj al la torturiloj!“

La gardistoj kondukis la kaptiton en la karceron kaj foriris por prepari la torturilojn. Sed intertempe, kvazaŭ per si mem, malfermiĝis la pordoj de la prizono kaj nevideblaj manoj liberigis la karcerulon de la ĉenoj. Kiam la gardistoj revenis al sia viktimo, la karcero estis malplena.

Al Dionizo forkuris ankaŭ la patrino de la reĝo kaj aliaj damoj el la palaco. La kolera reĝo impetis el la palaco por ĵetiĝi sur ilin. Li volis puni per la propraj brakoj la adeptojn de Dionizo. Sed survoje li estis trafata de eksterordinara frenezeco. Li ekvidis sur la ĉielo du sunojn. Kaj kiam li retrorigardis, li vidis malantaŭ si du urbojn anstataŭ unu.

Arboj, herbejoj kaj rokoj, ĉio ĉi komencis trembrili antaŭ liaj okuloj. Li aŭdis amuzan ridadon kaj kantadon el la anaro de Dionizo, sed li ne vidis, kie estas la homoj, kiuj kantas. Li iris al alta pino, per tremantaj brakoj li kaptis la branĉojn kaj grimpis supren. Li pensis, ke li havos de supre pli bonan eblon ĉirkaŭrigardi.

El la aero tondris voĉo: „Rigardu, tie sur la pino sidas nia plej granda malamiko."

La tuta akompanantaro de Dionizo rigardis supren. Ebriaj de la vino kaj de la ensorĉigo fare de Dionizo, ili ne ekkonis la reĝon kaj opiniis, ke en la branĉoj de la pino sidas iu predobirdo. Ĉirkaŭarbe ili komencis ĵeti ŝtonojn kaj branĉojn sur ĝin, ĝis eltiriĝis la radikoj kaj la pino falis teren kun la reĝo. Ĉiuj ĵetis sin sur lin kun bastonoj kaj kondutis, kvazaŭ la reĝo estus sovaĝa rabobesto. Kaj la patrino, blindigita de Dionizo, mortbatis sian filon. Tiel pereis reĝo Penteo kaj la homoj ne kompatis lin. Ili denove vivis laŭ sia natura maniero kaj nur por sia defendo uzis glavon.

*Originalo: PENTHEUS*

## MIDASO

En Frigio, en Malgranda Azio regis antaŭ longa tempo reĝo Midaso, granda adoranto de la dio Dionizo. Li vivis en pompa burgo kaj estis nemezureble riĉa. Li mem pensis pri si, ke li estas ankaŭ nemezureble ruza kaj, ke nur li kapablas plej bone decidi ĉion. Kaj kiel tio kutime okazas, ĉar li estis reĝo kaj havis la potencon, neniu kontraŭdiris ion pri lia orgojlo.

Iutage kamparanoj kondukis al la reĝo ebrian maljunulon, kiu apenaŭ tenis sin sur la piedoj. Ili kulpigis lin, ke ili trovis la viron en la reĝaj vinberaj ĝardenoj, kie li plukis la plej belajn kaj plej grandajn vinberojn. Ili ne devis plendi eksplicite. La kalva, de la drinkado grasventra oldulo, estis tute kovrita mentone kaj je la manoj per la suko de maturaj vinberoj, eĉ sur la verda krono de lia kapo kroĉiĝis malhelaj makuloj kaj lia krono estis tute ĉifita.

Midaso tuj ekkonis, ke la oldulo estas Sileno, amiko de Dionizo, kiu apartenis al la aro de la gaja dio. Li iam edukis la malgrandan Dionizon kaj de tiam ne plu forlasis lin. La reĝo solene kaj ĝoje bonvenigis la raran gaston. Li ordonis prepari la plej bonan manĝon, alporti hosojn kun la plej bona vino kaj li alvokis kantistojn kaj muzikistojn, por ke ili kantu kaj ludu ĉe la festeno. Dek tagojn kaj dek noktojn la reĝo festenis kun Sileno kaj la aliaj invititaj gastoj. La arĝentaj pokaloj dum la tuta tempo ne elsekiĝis, ili trinkis la vinon sen aldono de akvo, kio plezurigis kaj ĝojigis la gastojn. Dek tagojn la servistoj nutris la flamojn en la kuirfornoj kaj la kradoj ne havis tempon fridetiĝi. La tabloj fleksiĝis kaj kraketis sub la ŝarĝo de la plenaj pladoj, kaj la tuta palaco zumis kiel abelujo. Tage kaj nokte sonis el la burgo kaj flutoj kaj liroj kaj ĝoja kantado.

Je la dekunua tago la reĝo kunstarigis el la ebrietaj gastoj festprocesion. Al Sileno li donis azenon, ĉar li sciis, ke Sileno plej prefere rajdas sur azeno. La aliaj akompanis la karan gaston sur ĉevaloj, sur ĉaroj kaj surpiede. Kantante kaj jubilante ili iris en la najbaran landon, kie Dionizo ĝuste restadis.

Ili renkontis la dion Dionizo, kiu sidis sur ora, de tigroj tirata veturilo kaj serĉis sian patrecan edukinton. Li ĝojis, kiam li ekvidis Silenon sur azeno en tia nobla akompano, ornamitan per floroj kaj folioj.

„Deziru al vi, kion vi volas“, la dio vokis al la reĝo, „por tiu servo mi plenumos al vi deziron. Kiun donacon vi deziras?“

Midaso kliniĝis antaŭ Dionizo kaj montris vizaĝon kiel eble plej prudentan: „Ho faru, ke ĉio, kion mi tuŝas, transformiĝu en oron.“

Dionizo ridis pri la deziro de la reĝo kaj parolis: „Vi, reĝo, prefere estu elektinta pli bonan donacon. Sed via deziro plenumiĝos.

Feliĉa Midaso revenis hejmen. Li estis fiera pri sia ruzeco. Neniam estos sur la mondo reĝo pli riĉa ol li! Senpacience li provis jam survoje, ĉu la dio efektive plenumis sian deziron. Li derompis de arbo branĉeton kaj apenaŭ fidis siajn okulojn. La branĉeto kun la folioj flave eklumis pure ore. Li levis ŝtonon kaj tenis mane trembrilan oraĵon. Li tuŝis argilan bulon, kaj ankaŭ la argila bulo tuj estis el oro. Li preteriris kampon, plukis kelkajn maturajn spikojn, kaj en liaj fingroj ektintis oro. Li ĉirkaŭiris en la reĝa ĝardeno, etendis la manon al pomo, kaj tuj ora pomo falis de la arbo en ĝin.

Tute freneza pro ĝojo Midaso kuris en la burgon, kaj apenaŭ li tuŝis la pordegon, ĝi ekbrilis ore.

Li fortiris la kurtenon, kaj jam la kurteno rigidiĝis je ora vando.

Jen li ordonis pretigi abundan luksan manĝon. Li lavis siajn manojn kaj observis kun malsaĝa ridado, kiel oriĝanta akvo traglitas inter la fingroj. Li sidiĝis al la tablo kaj prenis la panon. Sed antaŭ ol li povis ŝovi paneron en la buŝon, li tenis en la mano anstataŭ pano puran oron. Li prenis la rostaĵon, sed la rostaĵo ekbrilante transformiĝis en oron. La reĝo vokis la servistojn al si, por ke ili nutru lin. La servistoj donis la manĝon al lia buŝo, sed tuj kiam

liaj lipoj tuŝis ĝin, li mordis sur oron. Eĉ la vino en lia buŝo transformiĝis en oron.

Jen enmeze de la abunda oro la reĝon kaptis hororo. Ekregis lin teruro pro la deziro, ĉar li ekvidis ĉirkaŭiri la embuskantan morton. Tremante pro timo li rapide ordonis seli sian ĉevalon. Galopante li postrajdis Dionizon kaj rimarkis plena de hororo, ke ankaŭ la brido en la mano ŝanĝiĝis en oron.

Ĝoja kantado perfidis al li la lokon, kie Dionizo kun sia akompanantaro ripozas. Midaso saltis de la ĉevalo kaj surgenuiĝis antaŭ la dio: „Pardonu al mi, favora dio, mian deziron“, li lamentis, „kaj liberigu min de mia turmento!“

Dionizo kompatis la malfeliĉulon kaj donis konsilon al li: „Iru al la rivero Paktolos“, parolis la dio, „kaj tute trempu vin en la akvon. Tiel vi forlavos de vi vian malfeliĉan deziron.“

Sen hezito Midaso rapidegis al la rivero, ĵetiĝis en la akvon kaj lavis ankaŭ la kapon kaj la hararon. Ekde tiu tempo oni trovas en la rivero oran sablon kaj la homoj diras, ke la rivero estas orhava.

La reĝo ĝojis, ke li liberigis sin de la terura donaco kaj ekde tiam eĉ ne plu volis vidi oron. Pli prefere li migradis sur herbejoj kaj en boskoj kaj aŭskultis kiel Pajno, la mastro de la paŝtejoj kaj protektanto de la gregoj, ludas per sirinkso, do per kana pajnoŝalmo. La bokpieda kornohava dio Pajno saltetis tute kovrita per feloj tra la arbaroj kaj ludis kun la nimfoj memkaŝadon kaj timigis la migrantojn. Kaj kiam li sidiĝis en la ombron de la arboj, li blovis sur sia septuba fluto multajn gajajn kantetojn. Tiuj plaĉis al la reĝo pli ol ĉio alia en la mondo.

Pajno vidis, kiel plaĉas la kantoj kaj komencis imagi, ke li ludmuzikas pli bone ol la muzogvidanto Apolono. Li vokis la dion de la

montaro Patmolos al si, por ke li decidu, kiu ludas pli bone, li aŭ Apolono.

Tmolos konsentis kaj deŝovis de siaj orelegoj la branĉojn de pramaljunaj arboj.

Unue ludis Pajno sovaĝan barbaran kanton. Ĉe la arbara rando staris Midaso kaj aŭskultis ĝojigite la flutosonojn, kiuj kriĉadis kiel ŝrikantaj birdovoĉoj, kiuj fajfis kiel la vento en la rokoj kaj saltetis tra la aero kiel riveraj ondoj super ŝtonojn.

Pajno finis sian ludadon kaj Tmolos donis signon al la dio Apolono. Apolono forĵetis la purpuran mantelon kaj ekkaptis per la maldekstra mano la belegan liron.

Softe li tuŝis la kordojn, kaj la kordoj komencis rave kanti. En la vespera kvieto la dolĉaj sonoj leviĝis kvazaŭ sur delikataj arĝentaj flugiloj en la ĉielon.

Kortuŝite de la kantado de Apolono, Tmolos petis Pajnon, ke li mallevu sian sirinkson antaŭ la liro de Apolono.

La ĉiela kantado de Apolono venkis la kantetojn de Pajno.

Midaso aŭskultis la juĝon nevole. Ĉar li pensis, ke li komprenas ĉion kaj estas elektita prijuĝi ĉion, li vokis: „Tio ne estas ebla, la kanteto de Pajno estis centfoje pli dolĉa. Al mi ĝi plaĉas, kaj se plaĉas al mi, ĝi devas esti pli bona. Ĉu mi ne havas orelojn?“

Kolere Apolono proksimiĝis al la reĝo kaj tuŝe pinĉis perfingre liajn orelojn. Tiuj tuj ŝanĝis sian formon, fariĝis pli longaj kaj kovris sin per griza felo.

„Nun vi havas la orelojn, kiujn vi meritas“, diris la kolera dio kaj malaperis.

Midaso tuŝis sian kapon kaj palpis la longajn azenajn orelojn. Tro malfrue li pentis, ke li enmiksiĝis en la konkurson, kiun li ne komprenis. Li kuris hejmen kaj la azenaj oreloj batadis sur lian kapon. Hejme li metis al si grandan turbanon sur la kapon kaj kaŝis sub ĝi siajn orelojn. Sed post kelke da tempo la orelharoj tiom kreskis, ke li ne plu povis kaŝi ilin sub la turbano. Li do vokis sian serviston, kiu antaŭe ĉiam tondis la hararon de la reĝo, kaj malkaŝis sian sekreton al li. „Ekde nun scias tiun malĝojan sekreton nur ni ambaŭ! Perfidu ĝin al neniu, ĉar alie vi pagus por tio per via vivo!“

La servisto tremis je la tuta korpo, li ne kuraĝis diri al iu, kion li vidis sur la kapo de la reĝo. La sekreto tamen ŝarĝis lin tiom, ke li ne povis elteni tion. Li cerbumis kaj cerbumis, kiel li povus liberigi sin de la ŝarĝo, kaj tiam, en sendorma nokto, li havis ideon.

Matene li iris al la rivero malantaŭ la urbo, fosis en soleca loko truon en la teron kaj flustris en ĝin: „Reĝo Midaso havas azenajn orelojn.“

Tiam li fermŝutis la truon per tero kaj opiniis, ke li tiel entombigis sian sekreton eterne. Tio plifaciligis lian animon. Kontente li reiris en la urbon, kaj ekde tiu tempo nenio plu premis lin. Li tondis la hararon de la reĝo kiel antaŭe.

Ekde tiu jaro kreskis je tiu loko ĉe la rivero densa fragmito, kaj kiam la vento karesis ĝin, la fragmito susuris kaj flustris : „Reĝo Midaso havas azenajn orelojn.“

Tiel ĉiuj homoj eksciis la sekreton de la reĝo. Finfine la dioj foje bone videble signis la stultecon, ili pensis kontente. Sed bedaŭrinde Apolono ne donas al ĉiu stulta arogantulo tian grandiozan donacon.

*Originalo: MIDAS*

## TANTALO

En Lidio, regiono, kiu apartenas nun al Turkio, vivis en antikvaj tempoj reĝo Tantalo. Ne estis reĝo pli riĉa ol li. La monto Sipilo liveris al li oron; liaj kampoj etendiĝis dek du tagvojaĝojn. Kaj la spikoj sur ili estis duoble pli pezaj ol sur ĉiuj aliaj kampoj. Sur sukaj paŝtejoj gardis paŝtistaj aroj grandegajn brutarojn por li. Ankaŭ la dioj pridonacis Tantalon per sia favoro. Ili permesis al li sidi kun ili ĉetable sur la Olimpo, partopreni je iliaj festenoj kaj aŭskulti la interparoladojn de la senmortaj dioj.

Tamen Tantalo estis kutima mortideva homo. Ankaŭ por li ŝpinis la sortodiino Kloto la vivofadenon, la sortodiino Laĥeso kunvolvis la fadenon kaj la tria sortodiino, Atropo, atendis por detranĉi ĝin. Sed pri la morto Tantalo ne pensis.

„Mi partoprenas je la festenoj de la dioj“, li diris al si, „kaj nenio diferencigas min de ili. Ili enverŝas en mian pokalon la dian nektaron, mi manĝas kun ili la dian ambrozion kaj aŭdas, kion ili diras. Neniu homo povas dubi pri tio, ke ankaŭ mi estas dio.“

„Sed vi ne estas ĉioscia“ – anonciĝis en Tantalo la konscienco.

„Tia mi ne estas“, li koncedis, „sed kiu sciu, ĉu la dioj estas ĉiosciaj? Mi volas elprovi tion kaj konvinkiĝi.“

Tiam ĵus aŭdaculo el la Zeŭsotemplo de Kreto ŝtelis multekostan oran hundon. Li portis ĝin al Tantalo, ĉar li sciis, ke Tantalo ne timas la diojn.

Tantalo kaŝis la ŝtelitaĵon ĉe si. Baldaŭ venis kolerigita pastro en la palacon.

„Reĝo“, li diris, „ne estas kutimo, ke regantoj agas komune kun kutimaj ŝtelistoj. Redonu al la templo tion, kio ne apartenas al vi.“

„Mi ne scias, pri kio vi parolas“, respondis la reĝo.

„Ja kaŝu do la ŝtelitaĵon“, diris la pastro kun fulmantaj okuloj, „sed vin mem vi ne kaŝos kontraŭ la kolero de la dioj.“

„Se mi estus farinta ion malbonan“, diris Tantalo kun rideto, „certe jam scius tion la ĉiosciaj dioj kaj punus min.“ Kaj reĝo Tantalo ĵuris, ke li ne havas la oran statuon.

La pastro foriris sensukcese, kaj la reĝo estis konvinkita, ke la dioj nur ŝajnigas, ke ili scias ĉion. En vero ili sciis laŭ li ne pli ol la senmortuloj.

Sed tamen la dioj sciis ĉion pri la ago de Tantalo, sed ili atendis, ĉu la orgojla reĝo eble ankoraŭ fine preferos la veron kontraŭ la mensogo, la honestecon kontraŭ la ŝtelado kaj la justecon kontraŭ la maljusteco.

La aroganteco de Tantalo kreskis pli kaj pli. Jam ne sufiĉis al li, ke li rajtas trinki nektaron kaj manĝi ambrozion. Li ŝtelis diajn trinkaĵojn kaj manĝojn de la tablo de la dioj kaj portis ilin surteren al la homoj. Per ĉiu ago li mokis diajn kaj homajn leĝojn. Sed fine li elpensis teruran kaj senprecedencan agon.

Li mortbatis sian filon Pelopso kaj invitis la diojn por festeno en sian palacon. Ĉe la festeno li antaŭmetis al ili la viandon de sia propra filo. Demetra, la diino de l' rikolto, manĝis distrite pecon de la antaŭmetita manĝo, sed la aliaj dioj suprensaltis terurigite de la manĝotablo.

Ankaŭ Tantalo teruriĝis, li ekkonis, ke la dioj estas ĉiosciaj kaj surgenuiĝis antaŭ ili kaj petis pri kompato. Sed per sia lasta krimo li troigis siajn fiagojn. Zeŭso, la diogvidanto, ĵetis la hombestaĉan Tantalon en la plej profundan submondon de la Tartaro. Por ties fiagoj li kondamnis Tantalon per eternaj turmentoj.

En la mortula regno staras Tantalo, plagata de kruela soifo, en klara freŝa akvo. Apenaŭ li kliniĝas por malsekigi la elsekigitajn kaj krevfenditajn lipojn, malaperas la akvo sub liaj manoj kaj li tuŝas nur sekan sablon. Super li kreskas sur branĉoj la plej grandiozaj fruktoj, sed Tantalo ne povas kontentigi sian turmentan malsaton. Apenaŭ li etendas manon al piro, figo aŭ granato, levas ventoblovo la branĉojn kaj la fruktoj malaperas ie alte. Super la kapo de Tantalo pendas giganta roko, kiu minacas fali ĉiumomente sur lian kapon. Eterna mortotimo kunpremas la gorĝon de Tantalo. Trifojajn turmentojn suferas Tantalo en la ombra regno.

La dioj ĵetis la restaĵojn de Pelopso en kaldronon, el kiu la sortodiino Kloto eltiris lin eĉ pli bela ol li estis antaŭe. Nur peco de la ŝultro mankis de li, tiu peco, kiun manĝis Demetra pro distreco. La dioj anstataŭis la manĝitan pecon per peco el eburo. Ĉiuj devenintoj de Pelopso havis je ŝultro blankan makulon.

*Originalo: TANTALOS*

# NIOBO

Niobo estis reĝino en Tebo kaj la plej feliĉa damo proksime kaj malproksime. Pri ŝia edzo, reĝo Amfiono kaj pri tio, kiel bone li kapablas ludi la liron, parolis la homoj en tuta Grekio de unu mara bordo ĝis la alia. Kiam oni konstruis ĉirkaŭ Tebo urbomuron, sufiĉis, ke la reĝo Amfiono eksonigas per liro unu el siaj belegaj kantoj, jen la rokoj mem derompis sin kaj la rokoblokoj vojiris laŭ la dolĉa sonado de la liro ĝis Amfiono. Antaŭ li ili kunmetiĝis tute per si mem en urbomuron.

La patro de Niobo estis Tantalo. Ankaŭ pri lia amikeco al la dioj fieris Niobo. La grenejoj de la reĝo estis plenaj, la brutaroj grasaj kaj la trezorejoj en la palaco superfluis je oro kaj arĝento. Al Niobo mankis nenio. Sed plej fiera ŝi estis pri siaj sep alte kreskintaj filoj kaj siaj sep belaj filinoj.

Iam plektis ĉiuj piaj tebaj ulinoj laŭron en sian hararon, preparante sin por granda ofero al diino Leto kaj ties infanoj Apolono kaj Artemiso. Kolere Niobo observis la antaŭpreparojn por la ofero. Kaj la kolero pelis ŝin el la palaco. Ŝi iris kun sia akompanantaro sur la straton. Ŝia vesto estis ornamita per oraj broditaĵoj, la densa briltrema hararo, kiu ondadis trans ŝiajn ŝultrojn, memorigis pli pri diino ol pri mortideva homo. Kaj kiel diino ŝi paŝis en la aron de la preĝantaj ulinoj el Tebo, kiuj ŝutis incensaĵojn en la oferofajrojn.

„Ĉu vi freneziĝis?“ ŝi vokis al ili. „Vi preĝas al dioj, kiujn vi vidis ankoraŭ neniam! Kial vi ne oferas al mi? Vi konas min ja pli bone ol Leton. Mia edzo estas la fama reĝo Amfiono. Mia patro estis reĝo Tantalo, li partoprenis ĉe la festenoj de la dioj, li manĝis kun ili ambrozion kaj trinkis nektaron. Trezorojn mi havas pli ol iu ajn diino iam vidis. Kaj infanojn mi havas pli ol Leto. Mi havas

sep filojn kaj sep filinojn kaj Leto havas nur la filon Apolono kaj la filinon Artemiso. Mi havas majestan familian devenon, riĉon kaj multajn infanojn. Samrangas neniu el la diinoj rilate la feliĉon al mi. Kaj eĉ, se mia feliĉo malpliiĝus, mi havus ankoraŭ sufiĉe da ĝi. Iru for de la altaroj kaj finu la oferadon! Preĝu al tiu, kiu meritas tion!“

La piulinojn timigis la kolero de la reĝino. Ili demetis la laŭron el la hararo kaj forlasis la altarojn, sed sur la vojo hejmen ili mallaŭte preĝante petis la diinon Leto pri pardono.

Leto staris sur pinto de monto kaj vidis per siaj diaj okuloj ĉion, kio okazis en Tebo. Ŝia koro komencis forte bati en la brusto, kiam ŝi ekvidis, kiel Niobo forpelis la piulinojn de la altaroj.

„Infanoj“, ŝi diris al dio Apolono kaj al diino Artemiso, „mi, via patrino, estas senhonorigita de ordinara mortideva ulino. La impertinenta Niobo forpelis la piulinojn de mia altaro. Siajn sep filinojn kaj sep filojn ŝi metis super vin ambaŭ kaj mokis pri mi!“

Leto volis daŭrigi sian plendadon, sed Apolono vokis: „Lasu tion, patrino! Per tio vi nur forŝovus la punon.“

Apolono kaj Artemiso vualigis sin en nubon kvazaŭ estus mantelo. Kaj kaŝitaj al homaj okuloj, ili lasis porti sin ĝis la proksimeco de la muroj de Tebo.

Antaŭ la burga muro ekzercis en bataloj kaj batalludoj la sep filoj de Niobo. La plej maljuna el ili galopis ĉiam en cirklo sur fortika ĉevalo kaj tenis firme la bridilojn de la ŝaŭmanta ĉevalo. Subite li ekkriis kaj falis de la besto: En lia brusto tremis sago de Apolono. La dua filo aŭdis la flirtadon de la arkoŝnuro kaj la fajfadon de sago. Li ĉirkaŭrigardis kaj teruriĝis pri la malhela senmova nubo sur la ĉielo. Li liberigis la bridilojn kaj rapidigis la ĉevalon. Tamen

dum la fuĝo atingis lin la sago de Apolono kaj traboris lian nukon. Du pli junaj filoj luktis bruston ĉe brusto. Jen streĉita arko sendis mortigan sagon. Ambaŭ kune trapikitaj de la sama pafaĵo falis surteren kaj samtempe eligis la lastan spiron. La kvina filo alkuris por helpi al ili, sed antaŭ ol li tuŝis iliajn korpojn, li falis trafite morta sur la teron. La sesan filon trafis sago je kruro. Dum li penis eltiri ĝin, trafis lin alia sago en la bruston, kaj kun la sango forlasis lian korpon ankaŭ lia vivo. La plej juna etendis la manojn al la ĉielo kaj petegis la diojn, ke ili indulgu lin. Apolono estis kortuŝita, sed jam ne povis revoki la sagon. Tiel pereis ankaŭ la plej juna filo.

La sciigo pri la teruraj murdoj disvastiĝis kiel malica ŝtormo ĝis Tebo. Reĝo Amfiono, freneza pro korafliktiĝo prenis glavon kaj trapikis sian bruston. Niobo elkuris de la palaco kaj hastis antaŭ la urbomuron, kie kuŝis ŝiaj sep mortaj filoj. Ŝi brakumis ilin larmante, ŝi superŝutis ilin laste per kisoj kaj la fiero denove ekflamis en ŝi. Ŝi turnis la malsekajn okulojn al la ĉielo kaj kriis: „Kruela Leto, delektiĝu je mia doloro kaj ĝoju, ke mi sepultas miajn sep filojn, kaj per tio ankaŭ mian vivon. Tamen restas al mi pli ol al vi! Mi ankoraŭ havas sep belajn filinojn!“

Ŝi ankoraŭ ne tute finparolis tion, kiam ekflirtis streĉita kordo de arko kaj unu el la sep filinoj, kiuj staris apud sia patrino, falis trafita de sago sur la fridiĝintan kadavron de frato. Diino Artemiso streĉis denove la arkon kaj la dua el la filinoj adiaŭis sin de la vivo. Ĉu ili fuĝis, ĉu ili kaŝiĝis, ĉiam trafis ilin sago de la punanta diino.

Postrestis nur la lasta, la plej juna filino kaj Niobo kovris ŝin per siaj korpo kaj vualo. Je la unua fojo ŝi etendis la manojn por peti, ke la diino lasu al ŝi tiun unuunuran filinon. Dum ŝi petegis, mortis la filino en ŝiaj brakoj. Niobo kvazaŭ orfiĝis enmeze de siaj mortaj infanoj. Nur la herboj ĉirkaŭ ŝi flustris mallaŭte: „Kiu el la senmortuloj povas certi pri sia feliĉo antaŭ la morto?“

Sen moviĝo, mergiĝinte en sian koraflikton, rigardis Niobo antaŭ sin. El ŝia vizaĝo iom post iom foriĝis la sango, ŝia hararo fariĝis peza, neniu venteto kapablis taŭzi ŝian hararon. En ŝia ŝtoniĝinta vizaĝo ankaŭ la okuloj ŝanĝiĝis en ŝtonojn, la brakoj kaj gamboj ŝtoniĝis, kaj ankaŭ la korpo, la sango kaj la vejnoj fariĝis ŝtonaj. Jen ŝtormego leviĝis antaŭ Tebo, brakumis Niobon kaj forportis la ŝtoniĝintan Niobo al Lidio, al ŝia hejmlando. Tie la homoj pilgrimas al la nova stranga roko. La roko havas la formon de damo, kaj el ties okuloj elverŝiĝas seninterrompe du fontoj de nesekigeblaj larmoj.

*Originalo: NIOBA*

## PELOPSO

Kiam Zeŭso ekzilis Tantalon en la ombran regnon, la reĝa trono estis sen regento. La juna Pelopso grimpis sur ĝin, sed li ne regis dum longa tempo. La reĝo de la najbara lando avidis la trezorojn de Tantalo, li invadis la landon kaj forpelis Pelopson el la reĝa palaco. Pelopso kun sia fidela servisto ekvojaĝis. Ili migris tiom longe, ĝis kiam ili alvenis en Grekion. Ili vagis tra mizeraj regionoj, kie la kampoj produktis nur ŝtonojn, kaj tra riĉaj urboj kun blankaj domoj kaj marmoraj skulptaĵoj. Iuvespere ili staris antaŭ la fortikaj muroj de granda urbo. Ili paŝis tra la urbopordego kaj serĉis tranoktejon. Sub la lastaj radioj de subiranta suno ili atingis la reĝan palacon. Sed kiom ili rigidiĝis ĉe la rigardo, kiu prezentis sin al ili! Antaŭ la palaco staris dek tri palisoj, kaj sur ĉiu estis pikita homa kapo.

Iu oldulo proksime haltis, observis ilian teruriĝon kaj parolis al ili: „Vi miras, ĉu?“ li diris. „Ĉiuj ĉi mortis pro ununura profetaĵo.“ „Mi ne konas dion, kiu povus profeti tiel kruele“, obĵetis Pelopso.

„La morto do ŝajnas al vi kruela, ĉu?“ diris ridetante kaj bonkore la oldulo. „Sed ankaŭ al nia reĝo ĝi ŝajnas kruela, kaj tial li prefere mortigas anstataŭ permesi sian murdigon.“

„Vi parolas kiel orakolo, kiel Pitia“, diris ĉagrenite la servisto al la oldulo, „prefere diru al ni rekte, pri kio temas en via urbo.“

La parolema oldulo kapjesis kaj komencis paroli: „Ĉe ni en la regiono Pisa regas reĝo Oinomaos. Li havas belan filinon, Hipodamo. Oinomaos iam pridemandis la orakolon pri sia sorto kaj ricevis sekvan profetaĵon: ‚La viro, kiu edzinigos vian filinon, estos la kaŭzo de via morto.‘ Kiu en tiu okazo ne timus pri sia vivo? Ankaŭ Oinomaos timas. Tial li devigas ĉiun, kiu aspiras edzinigi la belan Hipodamon, pri vetkonkurso. La konkurso estas elbatalata per ĉevaloĉaroj. Oinomaos havas ĉevalojn, kiuj estas pli rapidaj ol la nordovento. Al la edziĝemulo li donas antaŭecon, li eĉ oferas ankoraŭ al Zeŭso kaj nur poste komencas la persekutadon de la fremdulo. La konkursdistanco gvidas el Pisa al la altaro de Pozidono ĉe la Istmo de Korinto. Se la edziĝemulo alvenus kiel la unua, li rajtus edzinigi Hipodamon. Sed, se Oinomaos atingos la edziĝemulon antaŭ la celo, li rajtas trabori lin per lanco. Ĝis nun la reĝo ĉiun atingis antaŭ la celo. La kapoj sur la palisoj estas la kapoj de la edziĝaj aspirintoj. La reĝo per tio volas fortimigi ĉiujn, kiuj aŭdacas entrepreni la ĉevalkonkurson. Kaj eble li sukcesas. Jam delonge neniu plu anonciĝis.“

„Tion mi povas imagi“, diris la servisto de Pelopso. „Pri sia vivo ĉiu devas atenti. Se oni perdas ĝin, oni ĝin ne retrovos.“

La pripensema Pelopso silentis.

„Vi certe venis de tre malproksime“, diris la oldulo, esploreme rigardante Pelopson kaj la serviston. „Se vi serĉas tranoktejon, mi povos oferti al vi mian gastamikecon.“

„Ĉu vi aŭdas, mastro“, turnis sin la servisto plezurigite al Pelopso, „ni baldaŭ ripozos.“

Pelopso eldevigis sin el siaj pensoj, kaj la tuta triopo iris al la domo de la oldulo.

En tiu nokto Pelopso ne povis endormiĝi, li ŝteliris el la domo kaj stranga sopiro tiris lin al la reĝa palaco. Sur la firmamento montriĝis alta kaj blanka luno, la palaco brilis pro la luna lumo kaj la palisoj kun la kapoj de la malbeataj malfeliĉuloj ĵetis longajn tristajn ombrojn. Pelopso provis imagi, kiel aspektas tiu Hipodamo, por kiu tiom da viroj donis sian vivon. Tiumomente malfermiĝis pordeto en la palaca muro kaj aperis knabino en malhela vesto. Pelopso kaŝis sin post mura elstaraĵo kaj observis ŝin. Ŝia bela pala vizaĝo konkuris per beleco kun la brilaj steloj en la firmamento. Ŝi ĉirkaŭiris la palisojn kaj ĝemis profunde. Poste ŝi malaperis sur la sama pado, sur kiu ŝi venis. Ekscitite de sia stranga travivaĵo Pelopso reiris al la tranoktejo kaj turniĝadis ĝis la mateno sur sia kuŝejo.

La sunradioj tiklis la serviston vizaĝe, li vekiĝis kaj komencis laŭte pripensi la situacion: „Kara mastro, ni agos plej bone, se ni tuj matene survojiĝos. La tutan nokton mi sonĝis pri la ekzekutitoj. Mi pensas, ke ni ne estas sekuraj ĉi tie. Ni ekiru, ni diru adiaŭ kaj foriĝu el la urbo.“

„Hodiaŭ nokte“, diris Pelopso, „mi vidis Hipodamon. Ŝi estas bela kaj malĝoja. Mi iros al reĝo Oinomaos kaj petos edzinigi ŝin. Mi vetkonkursos kun li kaj devos gajni la ĉevalkonkurson. Mi liberigos Hipodamon de ŝia malĝojo kaj kun ŝi forlasos la regnon, por ke la orakolo ne plenumiĝu. Mi ne deziras, ke la reĝo mortu.“

„Kial la dioj koleras pri ni“, lamentis la servisto, „ke ili al vi, mastro, enflustris tian penson?“ Li saltis supren de la kuŝejo kaj

forkuris trovi la oldulon, por ke Pelopso rezignu pri la plano. Vane. Pelopso decidiĝis.

La sunoĉaro ĵus komencis grimpi supren sur sia ĉiela vojo, kaj jam staris la filo de Tantalo antaŭ la reĝo Oinomaos. Tiu aŭskultis Pelopson, kaj ĉar la juna, alte kreskinta kuraĝa junulo plaĉis al li, li konsilis, ke li rezignu. Sed Pelopso ne koncedis. Je la unua fojo Oinomaoson afliktis elaĉeti sian vivon per la vivo de juna fremdulo. „Se vi ne volas havi tion alie, pretigu vin“, finis Oinomaos la interparoladon, „morgaŭ ni vetkonkursos.“

En la halo de la palaco Pelopso ekvidis Hipodamon. Dum la taglumo ŝi ŝajnis al li eĉ pli bela ol en la lunolumo. Ŝi rigardis lin malgaje kaj tuj vualigis sian vizaĝon. Ankaŭ al ŝi plaĉis la juna fremdulo, tiel, kiel ĝis tiam neniu el ŝiaj edziĝemuloj.

La servisto atendis antaŭ la palaco. Apenaŭ li eksciis, ke lia mastro je la sekva tago vetkonkursos, li komencis plendi, kvazaŭ Pelopso jam estus morta. Ankaŭ Pelopso mem dubis pri sia venko. La ĉevaloj, per kiuj Oinomaos veturigis la ĉaron, estis donaco de la milita dio Areso. Ili apenaŭ venkeblis per ĉevaloj el surteraj staloj.

Plena de timemo Pelopso iris al la bordo de la rivero, kiu torentas al la maro. Tie li alvokis la dion Pozidono kaj petis lin pri helpo. Li petegis lin tiom pasie, ke la dio reagis. La rivero bruis kiel ŝtorma vento, kaj el la kirlataj ondoj aperis flugilaj henantaj ĉevaloj, de iliaj hufoj saltis fajreroj. Ili tiris malpezan ĉaron, kiu briletis kiel ŝaŭmo sur la ondokrestoj. Pelopso miris, dankis Pozidonon kaj promesis al li valoregan oferon.

En la nova ĉaro li ruliĝis je la sekva tago per la nekutima jungita ĉevalaro al la reĝo Oinomaos. Tiu jam ekvidis sian rivalon. Jam

de malproksime li ekkonis la ĉevalojn de Pozidono kaj pro ekscitiĝo li forgesis sian oferon, kiun li aliokaze antaŭ la starto kutime ofertis. Li ne cedis al Pelopso tiom grandan antaŭecon, kiom al ties antaŭuloj, li saltis nepacience sur la ĉaron kaj komencis persekuti lin.

La ĉaro kun la jungitaj ĉevaloj de Pelopso kvazaŭ flugis antaŭen, kaj nur polvonuboj montris, kie ĝi veturas. Antaŭ la okuloj de Pelopso ŝvebis la malĝoja bildo de Hipodamo kaj la deziro elaĉeti ŝin de ŝia koraflikto pelis lin pli kaj pli rapide al la celo. Post li rapidegis la ĉaro de la reĝo per ĉevaloj, kiuj estis pli rapidaj ol la nordovento. La reĝo havis sian propran morton antaŭ la okuloj kaj sciis, ke li povos eviti ĝin nur tiukaze, se li atingos Pelopson antaŭ la celo. Tial li pelis la ĉevalojn per sia tuta forto. La distanco inter ambaŭ ĉaroj malpliiĝis, kaj en la reĝo kreskis la espero kaj en Pelopso la malespero. Jam Pelopso estis tute proksima al la celo, kiam la reĝo preskaŭ atingis lin kaj levis la manon kun la lanco. Sed en tiu momento kunpuŝiĝis rado de la reĝa ĉaro kun ŝtono kaj disiĝis. La ĉaro kliniĝis kaj renversiĝis, sed la reĝo falis per la kapo sur ŝtonon kaj lia kapo estis frakasita. Li mortis ĝuste en tiu momento, kiam Pelopso pasis la celon.

Pelopso revenis kiel venkinto al Pisa. Kun ĝojo akceptis lin la fidela servisto kaj la popolo salutis lin kiel novan reĝon. Pelopso solene entombigis la kadavron de Oinomaos kaj geedziĝis kun Hipodamo. Li fariĝis fama reĝo. La duoninsulo, sur kiu li gajnis la vetkonkurson kontraŭ la reĝo Oinomaos, estis nomata laŭ li. Ĝi nomiĝas Peloponezo. En la urbo Olimpio li enkondukis por memoro pri sia venko la famajn Olimpiajn ludojn.
Sed feliĉa Pelopso ne estis. Post la sukcesa vetkonkurso li ekkverelis kun Mirtilo, servisto de Oinomaos.

„Se ne estus mi“, kriis Mirtilo, „via kapo kiel la dekkvara estus pikita sur palison antaŭ la palaco! Mi malfirmigis radonabon je

la ĉaro de Oinomaos, tial renversiĝis la reĝo kaj frakasiĝis. Kaj vi pagu nun por tio rekompencon!“

Indignite pri tio, ke Mirtilo fanfaronas pri sia murdo kaj postulas eĉ pagon por tio, li ĵetis la malfidelan serviston de roko en la maron. Mirtilo mortante malbenis Pelopson.

Kaj tiel la senfeliĉa idaro de Tantalo estis trafita de nova damniteco.

*Originalo: PELOPSO*

## PRI LA ORA ŜAFFELO

Iam vivis en Grekio reĝo, kies edzino devenis de dioj. Ŝi havis filon kaj filinon. La knabon ŝi nomis Frikso kaj la filinon Helo. La infanoj estis belaj kaj sanaj kaj la reĝo povis danki al la senmortaj dioj, ke ili donis al li pacon kaj feliĉon kun la familianoj. Sed li ne kapablis ŝati sian feliĉon. Li forpelis sian edzinon kaj edzigis sin je dua fojo. Tiel Frikso kaj Helo ricevis duonpatrinon. Tiu malamis la infanojn, insultis kaj turmentis ilin de matene ĝis nokte. La infanoj forkuradis de ŝi kaj kaŝiĝis prefere en la ĝardeno malantaŭ la reĝopalaco. Se la duonpatrino ne povis trovi ilin, ŝi fariĝis ankoraŭ pli malica kaj plendis pri ili ĉe la reĝo.

Ankoraŭ pli aĉaj tempoj venis por ambaŭ, kiam la duonpatrino naskis du filojn. Ŝi jam ne sciis kiel elpensi ankoraŭ pli da turmentoj al la infanoj kaj kiel ankoraŭ pli mensogi al la reĝo pri ili. Ŝi punis ilin mem kaj deziris, ke la reĝo punu ilin eĉ pli severe ol ŝi mem. Ŝi timis, ke la filoj devos dividi la reĝan heredaĵon kun la malamataj infanoj, ŝi cerbumis kiel ŝi povus atingi, ke la propraj

infanoj ricevu la tutan regnon. Malantaŭ sia blanka frunto ŝi kovis nigrajn pensojn. Ŝi decidis mortigi la infanojn. Sed, ĉar ŝi sciis, ke la reĝo ne permesus mortigi ilin, ŝi antaŭpreparis kruelan kaj insidan planon.

Sekrete ŝi vokis regionulinojn al si kaj diris al ili: „Mi scias, ke vi diligentas, sed tamen ne riĉas. Vi streĉe laboras kun viaj familianoj kaj tamen apenaŭ povas plenigi viajn grenejojn per grajnoj. Mi scias manieron, kiel vi povas triobligi la rikoltaĵon sur viaj kampoj. Kaj mi volonte sciigos la sorĉon al vi. Antaŭ ol vi semos la grenon surkampe, vi devos rosti la grajnojn. Vi vidos, ke viaj grenejoj eĉ ne sufiĉos por konservi la tutan rikolton. Sed malkaŝu tiun sorĉon al neniu, eĉ ne al viaj edzoj. Se vi rakontos pri tio al iu, ĉio missukcesos kaj la dioj punos vin pro la perfidita sekreto."

La regionulinoj dankis al la reĝino por tiu bona konsilo kaj rapidis hejmen. Ili vidis jam sian estontecan riĉon, orajn ĉarojn plenajn de oraj spikoj. Al neniu ili konfidis sian sekreton. Antaŭ la semado ili rostis sekrete la grajnojn kaj antaŭĝojis pri la rikolto. Baldaŭ montris sin sur la kampoj juna verdaĵo, sed ne la sveltaj grenotigoj, nur fiherboj kaj kardoj kreskis el la tero. En la tuta lando okazis misrikolto. La regionulinoj silentis, kaj neniu sciis, kial la semitaj semoj sur la kampoj ne fariĝis greno, tiel, kiel ĉiujare. Terura malsatoplago ekestiĝis.

La ruza reĝino konsilis al la reĝo, ke li pridemandu la orakolon de Delfo, kial la dioj sendis tian neimageblan malsatmizeron al la lando. La afliktita reĝo elsendis heroldon.

Sed antaŭ ol la heroldo survojiĝis, la reĝino vokis lin al si kaj plenigis liajn kunmetitajn manojn per oro. Ĉe tio ŝi diris al li: „Jen la unua duono de via rekompenco, kaj se vi bone faros tion, kion mi diros al vi, vi ricevos ankoraŭfoje la saman. Ne iru al Delfo, nur kondutu kvazaŭ vi irus tien, sed kaŝiĝu en la arbaro. Se venos

la tempo , kiam vi devus esti reveninta el Delfo, venu denove al ni en la palacon kaj transdonu al la reĝo la sekvan diron: „La malsato el via lando retiriĝos kaj la kampoj denove maturiĝos, se la dioj ricevos oferon. Sed la ofero estu Frikso kaj Helo.“

Ebria de la trezoro sur siaj manoj la heroldo promesis ĉion. Li ŝajnigis iri al Delfo kaj dum tio vagadis en la arbaro. De tie li revenis en la reĝan palacon kaj sciigis al la reĝo la teruran laŭdiran orakolon. Sed la reĝo pri plenumo de tia diro volis scii nenion. Tial la duonpatrino, kiu timis, ke la reĝo povus eviti la plenumon pro teruriĝo, fiagitis la malsatajn regionulinojn. „Iru“, ŝi diris, „kaj devigu la reĝon plenumi tion, kion la orakolo postulas, alie ni ĉiuj devos morti pro malsato! Mi celis vian plej bonan, nun ankaŭ la reĝo faru sian plej bonan. Tiom longe, kiom vivos Frikso kaj Helo, la kolero de la dioj ne trankviligeblos.“

Post tiaj paroloj homamasoj kunrotiĝis antaŭ la palaco kaj postulis de la reĝo, ke li obeu la volon de la dioj. La ribelantaj homoj kriis kaj minacis la reĝon, kaj tiu devis cedi.

La duonpatrino iuvespere enfermis la infanojn en ĉambreto, por ke ili ne povu fuĝi, ĉar ili estis oferendaj je la sekva tago. Por ĉiuj la nokto fariĝis longtempa. La duonpatrino estis sendorma pro ĝojo, ke ŝia kruela intrigo jam morgaŭ estos plenumita, de la reĝo la koraflikto rabis la dormon, kaj la infanoj kunpremiĝis en la nokta malhelo kaj pro timo apenaŭ spiris.

Tuj, kiam la unuaj radioj tuŝis la firmamenton, torentis aroj de homoj al la oferejo. Ili ĝojis, ke per la ofero la malbeno estos prenita de la kampoj, kaj ke finiĝos la malsato kaj la mizero.

Oni kondukis Frikson kaj Helon el la ĉambreto, kronis ilin kaj kondukis ilin poste al la altaro. La homoj silentiĝis. Frikso rigardis ŝajne je la lasta fojo ĉirkaŭ si kaj levis la okulojn al la blua ĉielo.

Jen li ekvidis lumantan nubon. Ĝi kreskis kaj kreskis, sinkis teren, vualis la homamasojn kaj la altaron kaj kaŝis en si ambaŭ infanojn. El la blanka nebulo saltis ora virŝafo kaj surgenuiĝis antaŭ Frikso kaj Helo. El la nebulo eksonis la mallaŭta voĉo de ŝia dia patrino: „Infanoj miaj, mi venis por savi vin. Sidiĝu do sur la virŝafon kaj ne timu.“

Frikso ekkuraĝis, grimpis sur la miraklobeston, de kiu eliris lumado kaj mankaptis ties kornojn. Malantaŭ li sidiĝis la fratineto Helo sur la oran felon. Apenaŭ ili sidis sur la dorso de la virŝafo, tiu grimpis ĉielen. Ĝi portis la infanojn malproksimen de la malica reĝino kaj de la ofera altaro.

„Firmtenu vin!“ Aŭdis la infanoj kvazaŭ el granda distanco la voĉon de la patrino.

Ili flugis tra la kvieto de la matena ĉielo. La ora virŝafo flugis tra la aero kiel ŝvebanta birdo. Tie kaj tie migranto levis manon al la okuloj kaj rigardis alten. Kun miro li pensis, ke leviĝis nova suno. La ora felo de la virŝafo radiis al ĉiuj flankoj.La infanoj flugis trans la firman teron kaj poste disvastiĝis sub ili la maro kun rokaj insuloj kaj kun ŝipoj, kiuj aspektis kiel etaj punktoj.

Frikso firme brakumis la kolon de la virŝafo kaj konsilis al la fratino: „Atentu, fratineto, ne rigardu profunden sub vin, por ke vi ne falu!“

Helo obeis la fraton kaj rigardis rekte al la migrantaj nubetoj. Dum longa tempo ŝi rigardis antaŭen, ĝis ŝajnis al ŝi, ke la virŝafo haltas, ke ĝi pendas inter ĉielo kaj tero, kaj ke la nuboj pretermigras ĝin. Ŝi volis konvinkiĝi, ĉu ili vere flugas, kaj rigardis tial profunden. Jen ŝi eksentis kapturnon pro la alto kaj pro la rapideco, kun kiu flugis la virŝafo. El ŝiaj manoj glitis la ora lano, ŝi perdis la firman tenadon kaj ekfalis, ŝi falis maren. Frikso provis

firme teni ĝin kaj preskaŭ mem falis. Rapide li kliniĝis sur la virŝafo, sed la fratinon glutis la ondoj. Jam li ne plu vidis ŝin. Sed la maro, en kiu Helo mortis, ricevis la nomon laŭ ŝi, Hela Maro, Helesponto.

Malĝoje Frikso daŭrigis la flugadon. Fruvespere li ekvidis montojn sur la horizonto. Ili aspektis kiel gigantoj, kaj iliaj neĝkovritaj pintoj lumis fajrece en la subiranta suno. Ĉe la piedo de la montoj etendiĝis fekunda tero. La ora virŝafo direktis sian flugon al la plej bela urbo de tiu lando kaj surteriĝis en freŝa herbejo antaŭ marmora kastelo. Frikso grimpis malsupren kaj ĉirkaŭrigardis. Vitoj volviĝis ĉirkaŭ la sveltaj marmoraj kolonoj de la palaco, kaj en kvar niĉoj en la ombro plaŭdis kvar fontanaj putoj. Sed ne en ĉiuj estis akvo. El la unua puto torentis freŝa frida lakto, el la dua dolĉa vino, el la tria valora oleo, kaj nur la kvara sendis strion el kristalklara akvo ĉielen. Sed ĝi ne estis ordinara akvo: somere ĝi estis glacie frida kaj vintre varma.

Dum Frikso admiris la miraklajn putojn, paŝis reĝo Eeto en la kastelan korton kaj invitis la knabon en la palacon. Li regalis lin kaj demandis, de kie li venis. Frikso rakontis pri la duonpatrino, pri la malica orakolo, pri la virŝafo kaj pri tio, kiel li perdis sian fratinon Helo. Aŭdante pri la ora virŝafo, la reĝo sopiris vidi ĝin. Frikso kondukis la reĝon antaŭ la palacon, kie la virŝafo ripozis sur la herbejo. La lumado, kiu eliris de ĝi, orumis arbojn, herbojn kaj arbustojn. Blindigite de la brilo, la reĝo devis permane kovri la okulojn.
„Mi volas oferi al Zeŭso la virŝafon kiel dankon por mia savo“, diris Frikso, „sed la oran felon mi donacos al vi, reĝo.“

La reĝo tre ĝojis pri la valora donaco. Post la oferado li portis mem la oran felon de la virŝafo en bosketon, kiu estis konsekrita al la milita dio Areso, kaj li fiksis ĝin per oraj najloj al branĉo de giganta kverko. Poste li petis sian filinon Medea, kiu sciis sorĉi,

ke ŝi voku el la profundo de la tero gardiston por la ora ŝaffelo. Medea komencis kanti sorĉajn dirojn, kaj subite rampis en la bosketon giganta drako kun akra kresto sur la dorso kaj kun fajreca faŭko, en kiu serpentumis tri venenaj langoj. Obeeme la drako kuŝiĝis antaŭ la kverkon kaj gardis tage kaj nokte pri la trezoro konfidata al ĝi. Frikso restadis ĉe reĝo Eeto kaj pli poste edzinigis filinon de la reĝo. La jaroj pasis. Frikso mortis, sed la famo de la ora ŝaffelo disvastiĝis tra la tuta mondo. La maljuna reĝo iradis al la kverko kaj ĝojis pri la vidaĵo de la radianta ŝaffelo. Orakolo antaŭdiris al li, ke trafos lian familion malfeliĉo, se li perdos la ŝaffelon. Tial li ĝojis, ke gardas lian trezoron tia monstro.

Multaj kuraĝuloj provis rabi la oran ŝaffelon de la reĝo. Sed tiuj, kiuj iris piede, mortis pro soifo en la ardanta sablo de la dezerto, kiu disigis la Eetan regnon de la cetera mondo. Tiuj, kiuj venis sur ŝipoj, fiaskiĝis en la longdaŭra kaj danĝera marveturo. Sed tiuj, kiuj tamen atingis la celon, ne povis fuĝi de la vorema atentema drako.

La ora ŝaffelo lumis en la lando de Eeto tage kiel la suno kaj nokte kiel la luno. Pro ĝi ekmarŝis ankaŭ tiuj herooj, kiujn gvidis Jazono.

*Originalo: O ZLATÉM ROUNU*

## JAZONO KAJ MEDEA

Maljuna reĝo mortis kaj postlasis du filojn. La pli aĝa nomiĝis Esono kaj la pli juna Pelio. Laŭrajte la pli aĝa transprenu la regadon. Sed apenaŭ la tombejaj kantadoj finsonis, uzurpis la ruza kaj brutala Pelio la tronon kaj forpelis sian fraton Esono el la urbo. La milda Esono de tiam vivis en provinco. Sed ankaŭ tie li ne trovis pacon. Li timis, ke lia intrigema frato povus preni la vivon de lia filo Jazono. Tial li lasis pretigi funebron, kvazaŭ Jazono estus mortinta kaj sendis sian filon sekrete en la montojn al saĝa kaj nobla kentaŭro. La kentaŭroj estis parte homoj kaj parte ĉevaloj, kiuj havis kvar krurojn kun ĉevalaj hufoj. La kentaŭro, al kiu Esono sendis sian filon, estis prudenta kaj forta. Li ekzercis kaj edukis jam multajn grekajn heroojn.

Jazono loĝis ĉe la kentaŭroj en kaverno kaj hardigis sin en la montoj kaj arbaroj. Li ekzercis siajn forton kaj lerton pri luktado, kurado kaj pafado de la arko. Kaj la kentaŭro enkondukis lin en la instruon pri la saĝo. Tiel li fariĝis korpe kaj spirite forta. Kiam li fariĝis dudekjara, li forlasis la montojn kaj iris al reĝo Pelio por postuli de li la tronon, kiun tiu perforte rabis de la patro. Esono tiam estis jam morta.

Sur la vojo en la urbon Jazono venis al tre ŝvelinta rivero. Ĉe la bordo sidis maljunulino kun ĝibo, kiu plendadis kaj petis lin: „Aĥ, kara migranto, estu tiel bona kaj portu min trans la riveron! Vi estas juna kaj forta, sed mi estas jam maljuna kaj disrompiĝema.“

Jazono pro kompato prenis la maljunulinon sur siajn brakojn kaj portis ŝin transen. Ĉe la bordo li sinkis per piedo profunde en la ŝlimon. Nur sur la firma tero li rimarkis, ke li perdis ŝuon. Sed li ne volis halti por serĉi la ŝuon kaj rapidis al la urbo. Vane li ĉirkaŭrigardis pro la maljunulino. Ŝi malaperis. Li ne sciis, ke la

maljunulino estas la diino Hera, la edzino de la diopatro Zeŭso. Ŝi transformiĝis por kontroli, ĉu Jazono havas bonan koron. La bonkora junulo plaĉis al Hera, kaj de tiam ŝi protektis lin sur ĉiuj liaj vojoj.

Kun nur unu ŝuo surpiede, vualita en pantera felo kaj kun du lancoj ĉemane Jazono venis en la urbon. Ĉe la foirplaco li vidis aron de homoj. Oni pretigis feston por honori la dion Pozidono. Ekvidinte la alte kreskintan heroon kun la aspekto de juna dio, ili opiniis, ke unu el la senmortuloj venis al la festo. Nur Pelio ektimis. Li rimarkis, ke la fremdulo havas nur unu ŝuon. Li rememoris malnovan profetaĵon. Ĝi avertis lin pri viro kun nur unu ŝuo, ĉar tiu viro pereigos lin.

Ruze li kaŝis sian teruriĝon kaj demandis: „Kiu vi estas, fremdulo, kaj kiun vi serĉas en nia urbo?“„Mi estas la filo de Esono“, diris Jazono, „kaj venas al vi, reĝo. Mi ne volas forpreni la trezorojn, kiuj apartenis al mia patro, sed mi volas peti vin, ke vi transdonu la tronon, kiu laŭrajte estu por mi.“

„Volonte mi cedas al via deziro“, respondis Pelio sen cerbumo, „vi devas plenumi al mi nur unu peton. Mi farus tion mem, se mi ne estus tiom aĝa. Ĉiunokte aperas al mi la ombro de mia duonfrato Frikso kaj postulas de mi, ke mi vojaĝu al Kolĉido al reĝo Eeto kaj portu la oran ŝaffelon al Grekio. Lia animo – tiel diras Frikso – trovos pacon nur tiam, kiam la ora ŝaffelo estos reveninta en la hejmlandon. Iru kaj alportu ĝin. Vi famiĝos kaj la morta Frikso en la tombo trovos pacon. Tuj kiam vi estos reveninta kun la ora ŝaffelo, mi cedos al vi la tronon kaj la regadon.“

Jazono konsentis. Li ne sciis, kia danĝera aventuro atendos lin. Pelio subridetis por si pri la helpopreteco de Jazono kaj li ne dubis pri tio, ke la nebonvena trona aspiranto pereos en la veturo al Kolĉido.

Jazono sendis heroldojn en ĉiujn angulojn de Grekio por alvoki kunveturi la plej grandajn heroojn de Grekio por la ora ŝaffelo. La plej kuraĝaj viroj kolektiĝis ĉirkaŭ Jazono. Ankaŭ Heraklo kaj Tezeo estis inter ili kaj ankaŭ ne mankis la kantisto Orfeo. Sperta konstrumastro ĉarpentis firman ŝipon por la herooj. Ili nomis ĝin laŭ li Argo, kaj sin mem ili nomiĝis argonaŭtoj.

Antaŭ la ekveturo ili oferis solene al Pozidono kaj al ĉiuj maraj dioj. Post la oferado ili grimpis sur la ŝipon. Kvindek remistoj ekremis per sia tuta forto kaj baldaŭ ili havis la havenon malantaŭ la dorsoj.

Ili velis tra nekonataj maroj, preter nekonataj landoj kaj insuloj. Ĉe favora vento ili hisis la velojn kaj la ŝipo fluge rapide moviĝis antaŭen. Ĉe senventeco ili remis pene kaj la ŝvito fluis de iliaj fruntoj. La fremda maro estis plena de danĝeroj. Fulmotondroj kaj ŝtormoj reĵetis la ŝipon. Ili vojeraris enmeze de pluvelverŝiĝoj, tondrado kaj fulmado. Malicaj gigantoj setlintaj ĉe la bordoj de la insuloj ĵetis rokajn blokojn al la ŝipo tiel, ke la ondoj verŝiĝis sur la ferdekon de la ŝipo.

Sed la diino Hera protektis Jazonon. Ŝia helpo, la aŭdaco de la herooj kaj la sagoj de Heraklo superfortis ĉiujn danĝerojn. Sed la fortega Heraklo baldaŭ forlasis la argonaŭtojn. Iam ili paŝis sur firman teron, kaj tie la amiko de Heraklo malaperis en la arbaro; Heraklo serĉis lin kaj ne revenis. Diopatro Zeŭso forvokis lin por aliaj taskoj.

Dum longa tempo velis la ŝipo, kaj la lando de la ora ŝaffelo ankoraŭ estis malproksima. La suno ardis, la argonaŭtoj suferis pro soifo kaj sur la ŝipo ne plu estis trinkakvo. Tial ili albordiĝis ĉe la sekva bordo. La bordo estis rokeca kaj neregalema. Kelkaj el ili serĉis fonton. Dum ili portis trinkakvon sur la ŝipon kaj haste trinkis, proksimiĝis al la herooj malĝoja skeleteca figuro. Blinda

maljunulo ŝanceliĝis inter la rokoj kaj tenis bastonon en malforta mano. Ĉe la bordo li renversiĝis tute lacigite. La argonaŭtoj saltis al li kaj helpis lin leviĝi.

„Mi estas Fineo“, diris la maljunulo mallaŭte per tremanta voĉo, „la dioj donis al mi la kapablon aŭguri, sed mi misuzis tiun kapablon. Rigardu min. Tiel punas la senmortuloj. La venĝodiino prenis mian vidkapablon, kaj ĉiutage ŝi sendas al mi harpiojn, kiuj kaptas la manĝon for de mia buŝo. Eble vi savos min de mia sufero kaj liberigos min de la eterna malsato. Laŭ la diro de malnova profetaĵo ĉi tie albordiĝos ŝipo, kiu alportos la savon de mia turmento.“

La argonaŭtoj jam antaŭe aŭdis pri la terura sorto de la reĝo Fineo. En tuta Grekio la kantistoj kantis pri li. Volonte ili promesis helpi al li. Ili plenigis teleron per rostaĵo kaj transdonis la manĝon al li, por ke li satiĝu. Sed apenaŭ la maljunulo sidiĝis kaj volis enbuŝigi mordaĵon, eksusuris en la aero la flugiloj de la harpioj, jen abomenindaj birdoj kun oldulinaj kapoj kaj vulturaj korpoj. Per kurbigitaj ungegoj ili prenis la manĝon de la maljunulo kaj forprenis ĝin de lia buŝo. La argonaŭtoj kriis, sed la harpioj ne lasis fortimigi sin. Nur kiam la herooj eltiris siajn glavojn, la harpioj, ektimigitaj de la brilaj klingoj, forflugis kaj neniam plu revenis.

Nun la argonaŭtoj fortigis la maljunulon per nova manĝo.

Avide Fineo voris tion, kion ili antaŭmetis al li kaj dankis laŭte al siaj liberigintoj. Por pagi ilin, li diris al ili, kio atendas ilin kaj li donis al ili konsilojn por la vojaĝo.

„Vi drivos al du gigantaj rokoj“, li parolis, „ili estas nomataj Simplegadoj. Tiuj rokoj ne sidas firme en la mara grundo, sed drivas sur la maro kaj denove kaj denove kunpuŝiĝas. Ili frakase

muelus vin kiel grenerojn. Antaŭ ol vi traveturos inter ili lasu flugi kolombon. Tuj kiam la kolombo ekflugos, prenu la remilojn kaj rapide traveturu inter la rokoj. Poste turnu vin orienten. Tie troviĝas Kolĉido, la lando de la ora ŝaffelo. La palacon de Eeto vi facile rekonos. Ĝi havas multajn turojn, proksime de la burgo estas bosko dediĉita al la milita dio Areso. Kaj en la bosko gardas neniam dormanta drako la oran ŝaffelon. Via tasko estas malfacila, sed vi havas la diinon Hera ĉe via flanko, kaj en la okazo de nepra bezono, la diino de l' amo, Afrodito, helpos al vi."

La maljunulo silentiĝis kaj liaj blindaj okuloj fikse rigardis malproksimen, kvazaŭ li vidus je la horizonto la turojn de la burgo de Eeto kaj la boskon, super kiu ŝvebas en lazura aero la ora brilo de la mirakla ŝaffelo.

La argonaŭtoj adiaŭis Fineon kaj grimpis senpacience sur sian ŝipon. Per fortaj remilbatoj ili proksimiĝis al la lando de Eeto.

Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam ili aŭdis el la foro teruran tondradon kaj krakadon. Antaŭ ili aperis du gigantaj rokoj, la Simplegadoj. La rokoj kunpuŝiĝis per orelsurdiga tondrado kaj la ekfuriozantaj ondoj rapidegis surmare ĝis la ŝipo de la argonaŭtoj. Tiuj haltigis sian ŝanceliĝantan ŝipon kaj flugigis kolombon. Ĵus la rokoj denove disiĝis kaj la kolombo malaperis inter ili. Poste la rokoj krake kunpuŝiĝis kaj kiam ili denove disiĝis, la argonaŭtoj revidis la kolombon, kiu jam flirtis gaje transe de la rokoj. Ĝi celis la sekvan bordon en Kolĉido. Sur la ŝaŭmkronita maro drivis nur kelkaj plumetoj, kiujn la roko tiris el la vosto de la kolombo.

Nun la herooj ekmovis sian ŝipon. Kirlego tiris ilin inter la rokojn. Ili remis per sia tuta forto por veturi el la danĝera loko. La rokoj jam denove proksimiĝis unu al la alia kaj levis gigantan ondegon. Sur la kresto de la ondego ŝanceliĝis la ŝipo de la argonaŭtoj. La

remistoj kvazaŭ despere remis per sia tuta forto, tiel, ke la remiloj preskaŭ rompiĝis kaj la ŝipo sur la ondego eldanĝeriĝis. Malantaŭ la herooj la rokoj tondre kunpuŝiĝis kaj frakasis la ornamon de la rudro.

Antaŭ la ŝipo troviĝis denove la vasta maro. Ĉiuj elspiris profunde, estis kvazaŭ ili revenus el la mortula regno en la vivon.

Antaŭ ol ili atingis Kolĉidon, ili trovis neatenditajn akompanantojn. Ĉe la bordo de sola insulo staris kvar junuloj en ĉifonitaj vestoj kaj vokis al la ŝipo. La ŝipo Argo albordiĝis kaj Jazono kun kelkaj aliaj herooj paŝis sur la firman teron. La junuloj kuris al ili kaj la unua vokis: „Bonaj homoj, helpu al ni! Nia ŝipo rompiĝis. Kaj la ondoj portis nin al tiu forlasita insulo.“

„Ni pretas helpi al vi“, diris Jazono, „sed kiuj vi estas kaj kien vi celas iri?“

„Certe vi aŭdis pri Frikso“, diris la junulo, „pri Frikso, kiu flugis sur ora virŝafo al Kolĉido. Reĝo Eeto edzigis lin kun sia filino Ĥalkiopo. Ni estas la filoj de Frikso kaj de Ĥalkiopo. Frikso mortis kaj Ĥalkiopo vivas ĉe reĝo Eeto. Ni marveturis, sed ŝtormo sinkigis nian ŝipon.“

Jazono ĝojis, ke li povas helpi siajn parencojn en mizera situacio. La antaŭuloj de Frikso kaj Jazono devenis el la sama genro. Li invitis la knabojn grimpi sur la ŝipon. Ili havis ja la saman celon. Kaj li rakontis, ke ili veturas al Kolĉido pro la ora ŝaffelo.

La filoj de Frikso ektimis kaj konsilis al la herooj, ke ili rezignu pri sia intenco.

„Eeto estas kruela reĝo“, ili diris, „kaj potenca. Li regas pri multnombra popolo kaj apenaŭ transdonos sian trezoron.“

Tio ne timigis la argonaŭtojn. Ili sciis jam, ke la tasko ne estas facila kaj estis deciditaj preni la oran ŝaffelon per perforto, se la reĝo ne donos ĝin libervole al ili.

La filoj de Frikso ricevis novajn vestojn de la argonaŭtoj kaj velis kun Jazono al Kolĉido. Tage kaj nokte la remiloj batadis la maran surfacon. Je la tago, kiam ili atingu Kolĉidon, ili aŭdis subite super siaj kapoj la susuradon de gigantaj flugiloj. Super la ŝipon flugis aglo al la Kaŭkaza montaro al la katenita Prometeo por satiĝi je li. Per siaj fortaj flugilbatoj li ekkirlis la aeron tiom, ke la veloj plenigis sin kiel de vento. Mallongan tempon post tio la argonaŭtoj aŭdis el la foro la ĝemadon de la turmentata Prometeo. Poste silentiĝis la ĝemado kaj la aglo revenis. Liaj flugiloj dum momento malheligis la sunon, ĝi flugis trans la ŝipon kaj malaperis post la horizonto.

Vespere aperis la bordo de Kolĉido. La turoj de la palaco siluete montriĝis en la ruĝo de la subiranta suno. Lacigite de la longa veturo, la herooj ankris la ŝipon kaj sternis sin por dormi.

Tuj kiam Helios grimpis sekvamatene sur la sunoĉaron, Jazono kolektigis la argonaŭtojn por interkonsiliĝo. Ili decidiĝis, ke unue Jazono kun du aliaj herooj kaj la filoj de Frikso iru al Eeto kaj provu ricevi la oran ŝaffelon per petado. Senhezite ili survojiĝis.

Ili venis en la urbon kaj admiris la majestan konstruaĵon de la reĝa palaco. En la antaŭkorto ili ekvidis la kvar mirakloputojn. Ankoraŭ tiam torentis el ili lakto, vino, oleo kaj neniam frostanta akvo. Ili miris tiel, kiel multajn jarojn antaŭe miris Frikso.

Kiel la unua ekvidis la alvenintojn la pli juna reĝa filino Medea. Ŝi ekkriis pro surprizo. Ĥalkiopo aŭdis la krion kaj kuris el la palaco. Kun malfermitaj brakoj ŝi rapidis renkonte al siaj perditaj

filoj kaj kisis ilin pro ĝojo. Ankaŭ reĝo Eeto iris renkonte al la vizitantoj kaj invitis ilin en la palacon. Medea sekvis ilin kiel ombro kaj ne povis lasi siajn okulojn de Jazono. La alte kreskinta heroo kun la vizaĝo de juna dio plaĉis al ŝi ekde la unua momento tiom, ke ŝi apenaŭ povis kaŝi sian ekscitiĝon. Sed neniu rimarkis tion. En la palaco estis vigla maltrankvilo. Servistoj alportis pladojn kun manĝo kaj la herooj manĝis kaj trinkis. Ĉe la manĝo raportis la filoj de Frikso al sia avo Eeto pri siaj aventuroj, pri sia ŝippereo kaj sia savo. Kiam ili finiĝis, Eeto demandis ilin mallaŭte, kiuj estas la fremduloj.

Unu el la filoj de Frikso flustris:„Ili estas grekoj, la gvidanto estas Jazono. Ili venis al Kolĉido por ricevi la oran ŝaffelon de nia patro Frikso. Malica reĝo okupis la tronon de Jazono kaj ne volas redoni ĝin, antaŭ ol li ricevos la oran ŝaffelon. Li esperis, ke Jazono en la veturo pereos aŭ, ke murdos lin vi. La plej aŭdacaj herooj de Grekio venis kun sia ŝipo kaj ankrumas ĉe nia bordo.“

Eeto ekruĝiĝis kaj ekfuriozis pro kolero: „Danku al la dioj“, li vokis al la grekoj, „ke sub mia tegmento mi akceptis vin kiel gastojn, aliokaze mi torturigus vin ĝismorte! Kiel mi aŭdis, vi celas havi la oran ŝaffelon kaj sekrete certe intencas regi Kolĉidon. Mi ne sciis, ke mi sidas kun insidaj perfiduloj ĉetable!“

La grekoj eksaltis kaj volis respondi sammaniere. Sed Jazono retenis ilin kaj respondis milde: „Pardonu al ni, reĝo. Ni ne venis kiel rabistoj en vian domon. Ni nur obeis la ordonon de tirana reĝo kaj volas peti vin tute amike pri la ora ŝaffelo. Se vi donos ĝin al ni, ni pretas montri nin dankemaj. Se milito minacos vin, ni estos viaj aliancanoj, se vi bezonos fortajn virojn kun akraj glavoj, tiukaze fidu al niaj brakoj kaj armiloj.“

Kun morna mieno Eeto aŭskultis la parolon de Jazono kaj pripensis, kiel li povus plej bone forigi la maloportunajn gastojn. Li

retenis sian koleron kaj diris per trankvila voĉo: „Por kio multaj vortoj? Se vi estas tiel kuraĝaj herooj, vi povos ricevi la oran ŝaffelon. Mi ŝategas kuraĝon. Sed unue vi devos pruvi ĝin en ekzameno. Mi havas du taŭrojn kun feraj kornoj, el kies naztruoj fulmas fajro. Per ili mi plugas kampon. En la sulkojn mi semas drakodentojn kaj el la semo kreskas militistoj. Kontraŭ ili mi batalas. Matene mi komencas plugi kaj vespere mi ripozas post la sukcesa batalo. Se sukcesos ankaŭ vi, Jazono, vi povos veturi hejmen kun la ora ŝaffelo.“

„Ne restas alia eblo al mi“, respondis Jazono, „ol provi tion. Mi scias, reĝo, ke vi metas treege malfacilan taskon al mi. Sed sen la ora ŝaffelo mi ne rajtas reveni hejmen.“

„Estu tiel, kiel vi volas“, diris la reĝo, „sed vi agus pli bone, se vi rezignus pri la tasko kaj forveturus per via ŝipo.“

Jazono kaj liaj akompanantoj ekstaris kaj forlasis la palacon. Ili rapidis al la aliaj argonaŭtoj por raporti, kiel reĝo Eeto akceptis ilin, kaj kiujn kondiĉojn li metis al ili.

Malantaŭ fenestro de la palaco montris sin vizaĝo. Medea postrigardis Jazonon, ĝis kiam li malaperis inter la maljunaj arboj de la reĝa palaco. Sola ŝi komencis plori. Ŝi havis kompaton pri li kaj luktis kun si mem, ĉu ŝi helpu al la juna heroo kontraŭ la propra patro aŭ ĉu ŝi translasu lin al ties sorto.

Intertempe Eeto kunvokis la noblulojn de Kolĉido por interkonsiliĝo. Li interkonsiliĝis kun ili, kiel oni povos neniigi la fremdulojn. Tuj kiam la sovaĝaj taŭroj estos frakasintaj Jazonon, liaj viroj ataku la grekan ŝipon kaj forbruligu ĝin. La fremduloj, kiuj ne mortos pro la brulo sur la ŝipo, estu mortbatendaj sur la bordo.

La filoj de Frikso treme ektimis pri siaj savintoj, ili iris al sia patrino Ĥalkiopo kaj petis ŝin paroli kun Medea. Nur Medea povus helpi Jazonon. Ŝi kapablas sorĉi kaj povas fari homon nevundebla kontraŭ fajro kaj armiloj. Ĥalkiopo ne kontraŭis la petojn de siaj filoj kaj promesis al ili peti ĉe Medea pri ties subteno.

Medea havis aĉan sonĝon. Ŝi sonĝis, ke ŝi mem venkis la taŭrojn kaj la drakomilitistojn. Sed Eeto ne volis transdoni la oran ŝaffelon al Jazono, ĉar batalis anstataŭ li Medea. Ekestis intensa kverelo, en kiu Medea prenis la partion de Jazono kontraŭ la patro. Eeto elpuŝis dolorkrion kaj Medea vekiĝis.

Plena de timo ŝi kuris al sia fratino Ĥalkiopo. Aĉaj antaŭsentoj okupis ambaŭ fratinojn. Medea timis pri la vivo de Jazono, Ĥalkiopo pri la vivo de siaj filoj. Eeto koleris pri la filoj de Ĥalkiopo, ĉar li supozis, ke ili alianciĝis kun la grekoj, kaj tial kondukis ilin al Kolĉido. Se la fremduloj estos punitaj, ankaŭ la filoj ne evitos la venĝon.

„Helpu la fremdulojn per via sorĉo“, petegis Ĥalkiopo Medean, „por ke Jazono en la terura batalo venku. Lia venko protektos ankaŭ miajn infanojn.“

La peto de la fratino fortigis la sekretan deziron de Medea helpi al la heroo, kiu tiom plaĉis al ŝi. Kaj tiel plenumiĝis la profetaĵo de Fineo, ke la amodiino Afrodito subtenos la heroojn.

„Timu nenion, Ĥalkiopo“, diris Medea, „la vivoj de viaj filoj, kaj via vivo estas tiom karaj al mi kiel mia propra. Mi helpos al la fremdulo.“

La nokto de la Kaŭkaza montaro grimpis malsupren. La argonaŭtoj dormis, nur ne la gardanta Jazono. Li iris ĉe la bordo antaŭen kaj malantaŭen kaj pensis pri la morgaŭa batalo. Jen li

aŭdis paŝojn en la malhelo. Misfideme li prenis la glavon. En la malforta lumo de la steloj aperis la filoj de Frikso. Ili alportis bonan sciigon de patrino Ĥalkiopo. Frue matene Medea atendos Jazonon en solece situanta templo kaj portos protektantan sorĉaĵon al li.

Medea dum la tuta nokto estis turmentita de maltrankvilo. „Ĉu ĝustas, se mi helpos al la fremdulo kontraŭ la propra patro? Ĉu trafos min la malbeno de la tuta popolo?“

Kun proksimiĝo de la mateno kreskis ŝia kuraĝo. Ŝi kaŝis sub sia vesto ujon kun sorĉa ungvento kaj rapidis al la templo, kie Jazono jam atendis ŝin. Ekvidinte la malhelan figuron de la heroo en la matena nebulo, ŝi timigite retroevitis en la duonlumo.

„Kial vi timas min?“ demandis Jazono flustrante. „Ne timu, mi venis por kunpreni la promesitan helpilon kaj mi vere ne scias, kiel mi danku pro tio.“

Medea ridetis timeme kaj transdonis al li la ujon. Dum certa tempo ili silentis, ĝis Medea retrankviliĝis kaj komencis paroli: „Jazono“, ŝi diris, „en la ujo estas ungvento. Priŝmiru per tio vian korpon kaj nek fajro nek armilo vundos vin. La ungvento entenas kaŝitan forton, vi estos forta kiel senmorta dio, sed nur dum unu tago, poste la sorĉo perdos sian forton. Tial ne evitu la batalon kaj ne hezitigu ĝin. Ankoraŭ plian konsilon mi havas por vi. Kiam la drakosemo kreskigos la militistojn, ĵetu ŝtonon inter la batalontojn. Ili batalos pri la ŝtono kiel hundoj pri peco da viando. Via glavo tiam laboros lude facile. Vi gajnos la oran ŝaffelon kaj povos forlasi Kolĉidon.“

Tiel ŝi parolis kaj larmoj ekfluis sur ŝiaj vangoj.

„Pensu en via hejmlando pri Medea. Ankaŭ mi volonte memoros pri vi.“

„Neniam mi forgesos vin“, respondis Jazono, „kaj se vi volas forlasi Kolĉidon kaj iri kun mi en mian patrujon, vi estos honorigata kiel diino ĉe ni. Nenio povus disigi nin krom la morto.“

Medea aŭskultis la vortojn de Jazono kun ĝojo. Ŝi deziris sopire forlasi Kolĉidon kaj veli kun Jazono al Grekio. Nur malvolonte ŝi disiĝis de li. Sed la suno jam lumis hele sur la ĉielo.

Reĝo Eeto iris al la destinita loko kun ora kasko kaj kun peza ŝildo, kvazaŭ armita por batalo. Post li paŝis granda homamaso. Ĉiuj atendis scivoleme Jazonon. La heroo intertempe banis sin kaj priŝmiris sin per la sorĉa ungvento. Liaj brakoj gajnis superhoman forton kaj lia brusto plenigis sin per nemezureble granda kuraĝo, tiel, ke li tremis pro senpacienco ĵeti sin en la batalon.

La argonaŭtoj kondukis Jazonon per ŝipo laŭ la bordo ĝis la loko, kie estis videbla la kampo ĉirkaŭita de homoj. Kun la armilo ĉemane saltis Jazono surteren kaj la homamaso silentiĝis atendoplene.

El subtera kaverno neatendite sturmis du grandegaj taŭroj. Per feraj hufoj ili stamfadis la teron kaj el iliaj nazotruoj blovis fajro kaj fumo. La grekoj pro ekscitiĝo forgesis spiri. La taŭroj klinis la kornojn por surpiki Jazonon kaj por frakasi lin. Sed Jazono tenis sian protektŝildon al ili kaj defendis sin kontraŭ iliaj atakoj, kvazaŭ li havus radikojn en la tero. Li ne sentis la brulon, kiun ili elpuŝis, la sorĉa ungvento gardis lin. Subite li forĵetis la ŝildon, ekprenis la kornojn de la taŭroj kaj devigis ilin per supermezura forto en la jugon. Nun ili estis jungitaj, sed ne moviĝis antaŭen. La heroo levis la lancon kaj pikadis ilin, ĝis kiam ili ekplugis.

La tero diskrevis kaj ekkirliĝis sub la peza plugilo. En la kampon ili fosis profundajn sulkojn. Finpluginte, Jazono eljungis la taŭrojn kaj ili malaperis en sia kaverno.

Sklavo alkuris kaj portis al Jazono kaskon plenigitan per drakosemoj. La heroo paŝis kelkfoje tra la kampo kaj semis la dentojn. Poste li iris al siaj amikoj por ripozi kaj fortigi sin per manĝo kaj trinkaĵo. Jam kreskis el la sulkoj militistoj kiel verdaj tigoj en printempo. Anstataŭ tigoj montriĝis kaskoj, lancoj, glavoj kaj ŝildoj, mornaj vizaĝoj kaj tre muskolecaj brakoj. Sur la kampo svarmis armitoj.

Tenante antaŭ si sian ŝildon, Jazono kuris sur la kampon kaj ĵetis mezen de la armitoj ŝtonon. Tuj ili ariĝis ĉirkaŭ la ŝtono, elingigis la glavojn kaj jetiĝis en la batalon. Eĉ en la plej furiozan batalon ĵetiĝis Jazono kaj falĉis la militistojn kiel alte kreskintajn herbojn.

Sur la kampo staris rekte plu nur unu viro: Jazono. De lia frunto fluis la ŝvito, sed liaj okuloj lumis. Li venkis.

Reĝo Eeto, silente kaj malice rigardante, reiris en la urbon. Li estis konvinkita, ke Medea helpis Jazonon kaj ĵuris puni ŝin pro tiu perfida ago. Rapide li kunvokis siajn noblulojn kaj interkonsiliĝis kun ili, kiel oni povus liberiĝi de la argonaŭtoj.

Vesperiĝis, sed Eeto ankoraŭ plu interkonsiliĝis. Medea en sia ĉambro iris tien kaj tien, ŝia koro estis plena de timemo. Ŝi divenis, ke la reĝo havas malicajn intencojn. Fine ŝi estis venkita de sopiro, malfermis la palacan pordegon per sorĉa diro kaj forkuris nerimarkite en la malhelon de la nokto. Sur la bordo de la maro la grekoj festis la venkon de Jazono kaj ekflamigis grandan bivakfajron. La fajra lumo montris al Medea la vojon al la argonaŭtoj.

„Savu vin kaj min“, ŝi vokis, „mia patro planas vian pereon! La oran ŝaffelon, Jazono, mi havigos al vi. Sed promesu, ke vi neniam forlasos min.“

„La dioj estas miaj atestantoj“, respondis Jazono, „ke mi kondukos vin hejmen en la domon de miaj patroj kiel mian laŭrajtan edzinon.“

Medea grimpis sur la ŝipon kaj la grekoj remis ĝis la proksimo de la bosko, en kiu pendis sur malnova kverko la ora ŝaffelo. La brila lumado, kiu eliris de la felo kaj kiu verŝiĝis sur la arbokronojn, konkuris kun la lumado de la luno sur la ĉielo.

Medea kaj Jazono elŝipiĝis kaj rapidis al la bosko. La drako aŭdis la paŝojn kaj la foliaro en la bosko tremis sub lia naza blovado. Kantante Medea proksimiĝis al la drako kaj pacigis ĝin per sia kantado. Poste ŝi tuŝis ĝian kapon per sorĉoherbo. El la tigo de la planto fontis kelkaj gutoj de endormiga suko. La drako fermis la okulojn kaj la faŭkon kaj endormiĝis je la unua fojo dum jaroj. Medea gestis al Jazono kaj la heroo prenis la oran ŝaffelon de la arbobranĉo. Feliĉe ili reiris kun sia predo sur la ŝipon kaj la grekoj akceptis ilin kun entuziasmo. Ili mire rigardis la oran ŝaffelon kaj ĉiu volis almenaŭ palpi ĝin. Sed Medea pelis rapidi la heroojn. Kaj tuj ili sidiĝis al la remiloj kaj veturis sur la matenan maron.

Eeto baldaŭ ekkonis, ke la fremduloj kun la ora ŝaffelo fuĝis de li kaj havas Medean ĉe si sur la ferdeko. Kun sia filo Apsirto kaj amaso de kolĉidaj militistoj li marŝis al la bordo. Ili vidis jam nur la mastpinton kaj pecon de la velo je la horizonto, kaj ankaŭ tiu baldaŭ malaperis el iliaj rigardoj. Koleriĝinte pelis Eeto siajn militistojn kun rapidaj ŝipoj surmaren kaj konfidis la komandopovon al la aŭdaca Apsirto.

Svarmo el kolĉidaj ŝipoj persekutis la ŝipon Argo kiel birdaro super la ĉielo. Ili preterveturis la heroojn kaj baris al ili la vojon. Ili postulis, ke Jazono metu Medean sur la insulon de la diino Artemiso. La reĝo de la najbara lando decidu, ĉu Medea revenu al la patro aŭ forvelu kun la grekoj.

Kun plendoj Medea perceptis la mesaĝon, ke fremda reĝo decidu pri ŝi. Ŝi timis, ke la argonaŭtoj povus transdoni ŝin. Tial ŝi memoris Jazonon pri ties ĵuro kaj petis lin ne forlasi ŝin.

„Mi ne forlasos vin“, diris Jazono, „sed sen ruzeco ni ne eliros el tiu kaptilo. Ĉiuj triboj ĉe la tuta bordo estas amikoj de la kolĉida reĝo kaj ne permesos al ni la pluan veturon. Se ni sukcesus neniigi Apsirton, la gvidanton de la kolĉidoj, la floto estus sen gvidanto kaj dum ilia konfuziĝo ni povus fuĝi.“

Jen Medea faris pro despero decidon.

„Mi ne povas reiri“, ŝi lamentis, „mi devas kompletigi la pereigan agon. La perfido, kiun mi sakrilegiis, kaj sakrilegios, iutage ŝarĝos min mem, sed mi ne plu povas reiri al la patro. Mi aranĝos kun mia frato Apsirto renkontiĝon kaj tiel transdonos lin al viaj manoj.“
Kaj Medea sekrete sciigis Apsirton, ke ŝi volas renkonti lin nokte sur la insulo de Artemiso kaj interkonsiligi kun li, per kiu ruzaĵo la ora ŝaffelo regajneblus. Apsirto nenion divenis pri la perfido. Akompanate nur de kelkaj militistoj, li nokte venis sur la insulon. Tie li renkontis Medean. Dum li parolis kun ŝi, ĵetiĝis Jazono kun sia glavo ĉemane el la densejo antaŭen. Medea ekkriis kaj forturniĝis. Jazono mortigis Apsirton kaj de ĉiuj flankoj alkuris la argonaŭtoj. Ili ĉirkaŭis la kunulojn de Apsirto kaj mortbatis ĉiujn.

Antaŭ ol la kolĉida militistaro senkonfuziĝis, la grekoj jam fuĝis sur la vastan maron. La kolĉidoj ne reiris hejmen. Pro timo pri la

kolero de reĝo Eeto ili decidiĝis setli por ĉiam ĉe la bordo, kie ili ankrumis.

La argonaŭtoj reveturis kun la ora ŝaffelo al Grekio. La sopiro pri la hejmlando pelis ilin antaŭen. Ĉifoje ili moviĝis sen malhelpo tra la Simplegadoj. De tiu tago, kiam la rokoj pasigis la ŝipon Argo al Kolĉido, ili ne plu moviĝis kaj restadis firme je sia loko.

Sed la argonaŭtoj preskaŭ fiaskis ĉe la insulo de la sirenoj. La sirenoj, nimfoj kun mirinde belaj voĉoj, sidis sur la borda roko, kaj kiam ili ekvidis ŝipon, ili ekkantis tiel dolĉe, ke la remistoj kaj la rudristo estis tute ebriigitaj kaj senvole proksimiĝis al la sirenoj. Sed sub la akvo kaŝiĝis akraj klifoj, je kiuj frakasiĝis ĉiu ŝipo. Orfeo ekkonis la minacan danĝeron. Li komencis kanti kaj ludi la liron kaj supersonis la voĉojn de la sirenoj. La rudristo rudris denove en la ĝusta direkto kaj la ŝipo estis savita. Apenaŭ liberiĝinte de la sirenoj, la argonaŭtojn atendis aliaj provadoj kaj danĝeroj. Kuraĝe ili rezistis kaj la ŝtormon kaj la sunardon kaj malsaton kaj soifon. Kaj diino Hera helpis ilin.

Post longa kaj peniga veturo ili revidis la patrion. Ili ankris la ŝipon kaj sendis rapidan heroldon al la reĝo Pelio en la urbon kun la sciigo, ke Jazono revenis de sia granda veturo kaj kunportas la oran ŝaffelon. Apenaŭ reĝo Pelio eksciis tion, li ordonis fermi la urbopordegojn kaj fortigi la remparojn per militistoj. La herooj ne revenu hejmen.

„Mi helpos al vi ricevi la oran ŝaffelon, Jazono, kaj mi helpos al vi ankaŭ grimpi sur la tronon, kiu laŭrajte apartenas al vi“, diris Medea. Ŝi murmuris sorĉan diron kaj ŝanĝiĝis en maljunulinon, kun korbo ĉe la brako. Sorĉaj fortoj portis ŝin en la urbon. Ŝi iris al la reĝa palaco kaj en la antaŭkorto ŝi laŭte komencis oferti valorajn ungventojn, ŝminkojn kaj odorantajn oleojn, kiujn ŝi havis en sia korbo.

„Ekkuru“, ordonis la reĝaj filinoj al servistino, „maljunulino ekstere ofertas siajn varojn. Konduku ŝin al ni.“

La servistino kondukis la transvestitan Medean en la palacon. La reĝaj filinoj tuj komencis traserĉi la korbon kaj Medea flatis ilin: „Domage, ke vi estas tiel junaj kaj belaj. Mi scias raran sorĉon, kiu rejunigas maljunajn homojn. Sed vi estas freŝaj kiel leviĝantaj steloj.“

„Almenaŭ montru al ni vian sorĉon“, petis la scivolaj reĝaj filinoj.

„Bonvolu alkonduki maljunan virŝafon kaj mi volonte montros al vi, kion mi kapablas“, diris Medea. Baldaŭ staris antaŭ Medea la plej maljuna virŝafo el la gregoj de la reĝo. Medea plenigis grandan kaldronon per akvo kaj hejtis ĝin. En la bolantan akvon ŝi ĵetis manplenon da herboj el sia korbo kaj ebriiga odoro disvastiĝis en la halo. Kun la helpo de la reĝaj filinoj Medea ĵetis la maljunan virŝafon en la bolantan akvon. Ne longe poste oni ekaŭdis blekadon kaj el la vaporo de la kaldrono saltis du blankaj ŝafidetoj.

„Tio efektive estas potenca sorĉo“, miris la reĝaj filinoj kaj alvokis sian patron. Reĝo Pelio ne volis fidi al ilia rakontado. Sed, kiam Medea ripetis sian sorĉan artifikon por li, ekmiris ankaŭ li kaj fidis al ŝi.

„Mi havas ideon, maljunulino“, diris Pelio, „provu tion ankaŭ je mi. Mi estas jam maljuna, kaj se mi plijunigos min, Jazono neniam ricevos mian tronon. Kaj faru min tute forta, por ke mi povu sukcesi en la batalo kontraŭ Jazono.“ Plena de avido reĝo Pelio saltis mem en la kaldronon – kaj elpuŝis teruran krion. Li ne trovis en la bolanta akvo la junecon, sed la morton.

Terurigite la reĝaj filinoj ĉirkaŭrigardis pro la maljunulino. Sed Medea estis malaperinta. Ŝi sciigis ĉie en la urbo, ke reĝo Pelio

estas morta, kaj ĉiuj akceptis la sciigon kun granda ĝojo. Ili ne amis la kruelan reĝon. Rapide ili malfermis la urbopordegojn kaj kondukis la argonaŭtojn en triumfa procesio al la palaco.

Sed Medea trovis en la nova hejmlando nek trankvilon nek feliĉon. Jazono forgesis sian promeson kaj serĉis alian fianĉinon. Tiel plenumis sin la diveno de la malfeliĉa filino de la reĝo de Kolĉido, ke per perfidoj kaj krimoj surtere gajneblas neniu feliĉo. Malesperiĝinte pro doloro Medea mortigis ankaŭ la junan fianĉinon de Jazono. Vane serĉis Jazono Medean post ŝia krimo, li ne trovis ŝin plu. Despere li ŝanceliĝis el la palaco. Jen li perceptis super si strangan bruadon. Li levis la okulojn kaj ekvidis en la aero flugantan ĉaron tiratan de drakoj. Sur la ĉaro staris Medea kun flirtanta hararo. Ŝi fuĝis surĉare kun la sorĉa jungilaro malproksimen de Jazono, kaj de tiam neniu denove ion aŭdis pri ŝi.

*Originalo: IÁSÓN A MÉDEA*

## HERAKLO

La plej fama el ĉiuj grekaj herooj, Heraklo, estis la filo de la senmorta diopatro Zeŭso kaj de la senmorta Alkmeno.

Jam kiel infano Heraklo estis pli forta ol plenkreskinta viro. Iam rampis al la liteto de la malgranda Heraklo du grandaj serpentoj, ili volviĝis ĉirkaŭ la dormantan infanon kaj kunpremis lian gorĝon. Heraklo vekiĝis kun krio, prenis la serpentojn per siaj manetoj kaj sufokis ilin per ununura kunpremo. La tuta mondo interparolis pri tiu miraklo, kiu okazis en Tebo. La blinda aŭguristo Tirezio antaŭdiris al la knabo heroan vivon plenan de laboro kaj fine de la vivo senmortecon.

Heraklo plikreskiĝis. La plej bonaj instruistoj kolektiĝis en Tebo por instrui al la juna heroo la plej gravajn artojn kaj sciencojn.

Li ekzercis lukti, uzi armilojn kaj veturigi rapidajn nepezajn ĉarojn. Heraklo estis instruiĝema lernanto kaj tio, kion la aliaj bezonis lerni dum longa tempo, li lernis dum kelkaj tagoj. Sed de la plej frua juneco li estis rapide kolera. Iam riproĉis lin la instruisto pri muziko; jen Heraklo ĵetis la liron al lia kapo tiel impete, ke la oldulo falis morta teren. Heraklo pentis sian agon kaj ploris pri sia instruisto. Sed la pento venis tro malfrue. Lia puno estis, ke li devis transloĝiĝi sur montajn paŝtejojn. Tie li paŝtis la gregojn kaj fariĝis inter la paŝtistoj eĉ pli forta junulo.

„Ek do, ni luktu“, li ofte vokis al siaj kunuloj. Sed baldaŭ neniu plu estis inter ili, kiun li ne estus venkinta.

La rabobestoj fuĝis de li, kvazaŭ ili scius, ke lia sago preteriras la celon neniam.

Tie, kie Heraklo estis, la grego estis sekure protektata. En la soleco de la montaj paŝtejoj li havis multe da tempo por pensadi. Li pensis pri sia infaneco, pri la profetaĵo de Tirezio kaj pri la estonteco. Enprofundiĝinte en pensojn kaj la kapon apogante permane, li vidis iutage iri du promenulinojn renkonte al li. La unua, vualita per blanka vesto, proksimiĝis malrapide kaj trankvile. La dua, en pompa vesto ore brodita kaj ornamita per juveloj paŝetis dance turniĝante kaj ĉirkaŭrigadis. Ŝi kuris antaŭ la unuan kaj tuj alparolis Heraklon: „Heraklo, vi ne scias, kiun vivon vi elektu, ĉu? Prenu min kiel akompanantinon. Mi konas la plej agrablan vojon. Vi manĝos kaj trinkos tiom, kiom vi volos kaj nur la plej bonajn kaj plej rarajn frandaĵojn. Vi havos nek laboron nek penon kaj ĉiuvespere atendos vin mola lito. Fremdaj homoj laboros por vi kaj vi ĝuos la fruktojn de ilia diligento.“

„Kiu vi estas, ke vi povas promesi ĉion tion?“ demandis surprizite Heraklo.

„Oni nomas min Volupto“, respondis la damo, „kaj mi havas amikojn en la tuta mondo.“

Jen alpaŝis la blanke vestita al ili kaj parolis: „Nenion, kio estas bona kaj dezirinda, la dioj donas al la homoj sen laboro. Se vi volas rikolti, vi devas unue semi. Se vi volas elstari, vi devas labori pli ol la aliaj kaj rezigni pri tio, kion ili koncedas al si. Se vi elektos min, mi ne promesos facilan vojon al vi. Oni nomas min Virto.“

„Ĉu vi ne hontas oferti al li laboron kaj penon?“ mokegis Volupto al Virto.

„Se vi sekvos Volupton“, diris Virto al Heraklo, „vi manĝos sen malsato kaj trinkos sen soifo kaj ne scios, kion vi deziru. Vi iros tra la vivo kiel pala ombro kaj postlasos nenion krom eltrinkitajn hosojn por vino. Se vi decidiĝos por mi, vi kreos grandajn verkojn.“

La figuroj disfluante malaperis. La heroo ne hezitis eĉ dum momento, kiun vojon li elektu. Li decidiĝis por Virto.

Por Heraklo fariĝis tempo reveni al Tebo. Li ĝojis nun trovi okazon por ŝanĝi siajn bonajn intencojn en agojn.

La malamika minia reĝo tiutempe ĉiujare sendis senditojn al Tebo por preni malkarajn tributojn de la tebanoj. Ilin renkontis Heraklo.

„Ne baru al ni la vojon. Ni estas senditoj kaj iras al Tebo por kunpreni tributojn“, kriis la minianoj al la heroo.

„Mi estas Heraklo kaj forlasis la gregon en la montaro por helpi al la subprematoj. Reiru al via reĝo kaj diru al li, ke Tebo ne plu pagos tributon!“ vokis Heraklo al la senditoj.

„Kial vi staras ĉi tie?“ kolere riproĉis la gvidanto de la minianoj siajn militistojn. „Unuopulo ja ne povas reteni nin!“

La batalistoj jetiĝis sur Heraklon, sed tiu deskuis ilin kiel plumojn. Li disrompis iliajn lancojn kaj kaptis la tutan senditaron kaj katenis ilin. Kunligitaj li resendis ilin al ilia reĝo. Poste li iris tute trankvile al Tebo. Antaŭ ol li ĉirkaŭrigardis en la urbo, venis al la reĝo de Tebo rapida heroldo de la minia reĝo. La malamika reĝo postulis de la tebanoj, ke ili transdonu Heraklon por puni lin. La timema reĝo de Tebo estus transdoninta Heraklon, se ne rezistus al li kelkaj junuloj de Tebo.

Ili iris al Heraklo kaj diris: „Ni ne volas submetiĝi al la volo de malamika reĝo. Aliĝu nin kaj gvidu nin kontraŭ la minianoj. Ni batalos laŭ via ekzemplo.“

„Kiel vi volas batali kontraŭ la malamika armeo, se vi ne havas armilojn?“ obĵetis Heraklo.

En Tebo tiam efekitve ne ekzistis armiloj. La malamikaj minianoj forportis tiam ĉiujn armilojn por esti certaj, ke la urbo ne povos leviĝi kontraŭ ili.

Sed tio ne senentuziasmigis la junulojn.

„Ni batalos per niaj nudaj manoj“, ili vokis, „ni kolektos ŝtonojn kaj venkos la malamikojn.

„Ni ja havas armilojn“, subite vokis iu el ili. „En la templo de la diino Atena pendas malnovaj armiloj. Niaj antaŭuloj akiris ilin kiel predon en venkoriĉaj bataloj kaj oferis ilin al la diino!“

Ĉiuj rapide kuris al la templo de Atena. Tumulte rapidege ili prenis la malnovajn armilojn de la templomuroj kaj kolektiĝis kun la armiloj ĉemane ĉirkaŭ Heraklo. Tiu kunmarŝis en la montaron, renkonte al la anoncita armeo de la minianoj. Ili lokis sin en pozicio sur pasejo, kie la malamiko ne povos uzi sian superecon. Ili ne atendis dum longa tempo. Baldaŭ anoncis leviĝantaj polvonuboj al la tebaj gvatistoj la alproksimiĝon de granda armeo. Jam videblis la brilado de la kaskoj kaj aŭdeblis la bruo de la ĉaroj. La postenuloj raportis al Heraklo la alvenon de la minianoj, kaj la heroo starigis sin fronte de siaj batalantoj. Kiel roko, kiu tondre falas en valon kaj ĉion ŝiras kun si kaj detruas, kio baras ties vojon, tiel ĵetiĝis la tebanoj sur la malamikon.

La terurigitaj minianoj defendis sin nur malforte. Kaj kiam Heraklo mortigis ankaŭ ties reĝon, ili forĵetis la armilojn kaj fuĝis en sian landon. La tebanoj persekutis la malamikojn ĝis ties ĉefurbo kaj detruis ĝin. En aŭro de gloro kaj ŝarĝitaj per riĉa predo, ili revenis al Tebo.

Tuta Grekio parolis pri la venko de Heraklo kaj liaj feliĉaj samlandanoj ne sciis kiel plej dece honori siajn heroojn. Eĉ la olimpaj dioj ĝojis pri la ago de Heraklo, ili donis al li donacojn. Apolono donis sagojn kaj pafarkon al li, Hefesto sagingon kaj Hermeso glavon. Tiajn pompajn armilojn vidis ankoraŭ neniu.

En Mikeno regis parenco de Heraklo, reĝo Eŭristeo. La malkuraĝa kaj malforta Eŭristeo enviis la famon de Heraklo kaj volis humiligi lin. Li estis la pli maljuna. Tial li postulis, ke Heraklo kiel la pli juna servu al li. Heraklo kontraŭis tion kaj demandis la orakolon de Delfo pri konsilo. La orakolo sciigis al li, ke li devos

plenumi dek laborojn por la unue naskita Eŭristeo. Poste li estos libera kaj povos forlasi sian parencon.

La orakolo ŝokis Heraklon. Pro aflikteco li perdis preskaŭ la menson kaj ne plu sciis, kion fari. Nur la bonkora tempo, kiu pasas kaj ankaŭ sanigas la vundojn de la herooj, mildigis la doloron de Heraklo. Ĝemante li komencis la vojaĝon al Mikeno.

„Ĉu finfine al la granda Heraklo plaĉas veni al mi?“ salutis lin kun moko Eŭristeo. Li volis diri eĉ plian, sed li prefere silentis. La okuloj de Heraklo ardis kiel flamoj. Kun klinita rigardo la reĝo komisiis la unuan laboron al li. „Unue portu al mi la felon de la leono de Nemeo“, li diris kaj sekvis la forkurantan heroon per la okuloj. Kaj li deziris al li la plej malican.

La leono estis terura rabobesto. Multaj ĉasistoj jam foriris por mortigi ĝin kaj revenis neniu. Heraklo tuj survojiĝis. La homoj, kiujn li survoje renkontis, jam sciis, kion intencas fari la heroo kaj ili flustris: „Heraklo volas mortigi la leonon de Nemeo. Li estas forta, sed kiu sciu, ĉu li sukcesos? La leonon de Nemeo vundis ankoraŭ neniu armilo. Ĝi estas nevundebla.“

La heroo ne atentis tion. Silente li migris kun siaj brilantaj olimpaj armiloj en tiujn arbarojn, en kiuj estis hejme la timata leono. Per sia glavo li batadis al si vojon tra la densejo, ĝis kiam li atingis lokon, kien eĉ ne birdoj kuraĝis flugi, kaj kie regis pli granda kvieto ol en tombejo. Eĉ la susurado de la arboj sonis tie timeme. Tie montriĝis la nigra groto de la leono. Heraklo sidiĝis antaŭ la enirejon kaj atendis. Kiam komenciĝis la vespera krepusko, oni aŭdis en la arbaro krakadon. La leono revenis de la ĉasado kaj frakasis per siaj ungegoj la sekajn branĉojn. Heraklo levis la arkon kaj celis al la kreskaĵetoj ĉe la arboj. Aperis grandega leono kaj skuis sian sange priŝprucitan kolhararon. La sago fajfante flugis tra la aero, sed depuŝiĝis de la felo de la leono kiel de roko.

La heroo celis plian fojon. Sed ankaŭ la dua sago ne trapenetris la felon de la nevundebla bestaĉo. Kiam li ekprenis la trian sagon, la leono turnis lante la kapon kaj ekvidis la pafinton. Li kliniĝis por eksalti. Heraklo evitis flanken, kaj kiam la leono antaŭ li surteriĝis, li batis sian klabon per sia tuta forto sur la kapon de la besto. Obtuzigite ŝanceliĝis la leono. Heraklo saltis al ĝi kaj ĉirkaŭprenis la gorĝon de la besto per siaj manoj kaj sufokis ĝin. Li detiris de la morta leono la felon, surmetis ties kapon kiel kaskon kaj ĵetis la antaŭpiedegojn sur siajn ŝultrojn kaj kaŝis sin en la felo.

Kiam li paŝis en la leona felo en la palacon de Mikeno, Eŭristeo lasis fali elmane la trinkpokalon pro teruriĝo.

„La leono, la leono!“ li kriis kaj fuĝis rapidege el la halo kvazaŭ starus antaŭ li la vivanta leono de Nemeo. „Fermu la halopordojn“, li kriis al la servistoj, „ĝi tie staras kaj malfermegas la faŭkon!“ Li stumblis sur la ŝtuparo malsupren en la kelon, li kaŝiĝis en barelo kaj fermis super si la kovrilon. Daŭris longan tempon ĝis kiam li fidis al la servistoj, ke la leono efektive estas morta, kaj ke Heraklo alportis nur ĝian felon. Nur tiam li ekkuraĝiĝis, levis la kovrilon kaj montris al la servistoj sian palan terurigitan vizaĝon. Li grimpis el la barelo kaj ordonis: „Heraklo ne plu havu la permeson iri en la kastelon. Mi sendos al li miajn komisiojn pere de servisto.“

Heraklo ridis elkore pri la timo de la reĝo kaj retenis la leonan felon, ĝi protektis lin dum lia tuta vivo kiel la plej firma kiraso.

Ankoraŭ li ne ripozis de la ekskurso, jen jam alvenis la heroldo de la reĝo kaj deklaris: „La reĝo ordonas al vi, Heraklo, mortigi la hidron, kiu dezertigas la regionon ĉirkaŭ la urbo Lerno.“

Al Heraklo ne restis io alia krom survojiĝi. La hidro estis terura drako, serpento kun naŭ kapoj, el kiuj la meza estis senmorta. Ne malproksime de Lerno la heroo renkontis junan paŝtiston.

„He, amiko“, li vokis al la paŝtisto, „montru al mi la vojon al la hidro. Mi volas mortigi ĝin.“

„Mi ne konsilus tion al vi“, vokis la paŝtisto, „la hidro sufokis mian tutan ŝafgregon kaj mian fraton ĝi tiris en marĉon. Ĝin povus venki nur Heraklo.“

„Mi estas Heraklo“, respondis la heroo, „kaj mi mortigos la drakon.“

Eksciinte, ke la migranto estas Heraklo, vekiĝis ankaŭ en la paŝtisto la kuraĝo, li kondukis la heroon al la rando de la marĉo, en kiu la hidro havis sian kavernon. Heraklo pafis brulantajn sagojn en la kavernon tiom longe, ĝis kiam la monstro montriĝis en la taga lumo. Kun snufado kaj siblado ĝi elrampis, kaj ĝiaj naŭ supren etenditaj koloj ŝanceliĝis super la marĉo.

La heroo svingis sian glavon kaj komencis detranĉi unu kapon post la alia de la hidro. Tio estis vana laboro. Por ĉiu detranĉita kapo tuj postkreskis du novaj. Grandega mara kancero alrampis kaj helpis la hidron. Ĝi enfermis la brakojn de Heraklo. La heroo frakasis la kanceron per la klabo kaj vokis al la paŝtisto, ke li alportu brulantajn lignopecojn al li. La kuraĝa paŝtisto alportis branĉojn, ekbruligis kaj transdonis ilin al la batalanta Heraklo. Tiu detranĉis la kapojn de la hidro kaj tuŝadis per la flamo la vundojn. Sur la bruligita loko ne plu kreskis kapo. Tiel li sukcesis neniigi ĉiujn naŭ kapojn. La senmortan kapon li enfosis kaj rulis ŝtonon sur ĝin. La tuta marĉo plenigis sin per la nigra venena sango de la hidro. Heraklo trempis siajn sagojn en la sangon. Kiu post tio estis trafita de tia sago estis tuj morta.

Tiam Heraklo adiaŭis sin de la paŝtisto kaj revenis al Mikeno. Li sciigis al Eŭristeo, ke li plenumis sian taskon. Sed Eŭristeo jam sciis tion. La sciigo pri la ago de Heraklo jam disvastiĝis en tuta Grekio.

Kun gala menso pripensis la reĝo, kiun taskon li ankoraŭ povus meti al Heraklo.

Li sendis Heraklon en la montaron kun la komisio, ke li havigu al li la apron, kiu dezertigadis la kampojn de la kamparanoj en la valo. Kaj Heraklo portis la vivantan apron sur la dorso al Mikeno. La reĝo sendis lin al la cervino de la diino Artemiso. Kaj Heraklo kondukis la belegan beston kun la ora kornaro al la reĝa palaco. La reĝo komisiis Heraklon forpeli la stimfalajn birdojn el Grekio. Tiuj havis ferajn ungegojn kaj bekojn kaj povis pafi siajn ŝtale durajn plumojn kiel sagojn. Sed Heraklo forpelis la stimfalajn birdojn el Grekio.

„Mi metas al Heraklo tro facilajn taskojn“, diris la reĝo al si mem. „Iujn bestojn mortigi aŭ kapti, tio estas ebla, eĉ se ili estas bestoj miraklaj. Mi devas elpensi taskon, kiu ne estas plenumebla kaj kiu ridindigos Heraklon.“

Li sendis la serviston al Heraklo kun la sekva komisio: „Iru al la reĝo Aŭgio kaj purigu dum ununura tago liajn stalojn.“

Aŭgio havis trimilkapan brutaron kaj kiam li aŭdis, kial Heraklo venis al li, li ridis.

„Se vi plenumos la taskon dum unu tago purigi la stalon, mi volonte donos al vi tricent bovojn el mia grego“, li diris al la heroo. Li opiniis, ke Heraklo neniel povos plenumi tiun taskon.

Heraklo ne hezitis kaj iris tuj por rigardi la gregon de la reĝo. Aŭgio tenis sian brutaron enfermita malantaŭ granda muro kaj ne purigis siajn grandegajn stalojn jam dum jaroj. La heroo atente rigardis ĉion kaj pelis la bovojn el la staloj. Poste li renversis parton de la muroj kaj kondukis akvon el du proksimaj riveroj en la stalojn. La malpuran sterkofluon li elkondukis tra la pordego kaj rekondukis ĝin en la originajn riverujojn. Tiel li purigis la stalojn sen uzi iujn ilojn kaj tute ne malpurigis sin mem.

Reĝo Aŭgio ne fidis al siaj okuloj, kiam li vidis vespere la purigitajn stalojn. Sed li rifuzis al Heraklo la promesitan donacon.

Eŭristeo estis konvinkita, ke Heraklo ĉifoje ne plenumos la komisiitan laboron. Sed Heraklo staris antaŭ la palaco de Mikeno kun la plenumita komisio kaj atendis novan.

La konfuzita reĝo Eŭristeo ne havis alian ideon ol sendi Heraklon al Kreto, por ke li konduku la sovaĝan taŭron al li. La heroo kondukis ankaŭ la sovaĝan taŭron al Mikeno. Eŭristeo elsendis lin por la furiozaj ĉevalinoj de Diomedo, kiuj nutris sin per la viando de homoj. Kaj kiam Heraklo revenis ankaŭ kun ili vivanta kaj sana, ĝemis Eŭristeo. Li ne plu havis ideon pri nova tasko. Jen ĉirkaŭbrakis lin filino kaj diris: „Vi elsendas Heraklon ĉiam nur pro bestaĉoj. Elsendu lin foje por belaĵo! Kiel volonte mi havus la zonon de la amazona reĝino! Ĝi estas laŭdire pli belega ol la plej multekostaj zonoj, kiujn oni faras ĉe ni en Mikeno. Heraklo transdonu ĝin al mi. Kaj tio estas tre malfacila tasko.“ La reĝo ĝojis pri tiu konsilo kaj ordonis al Heraklo, ke li iru al la amazonoj por preni la valorplenan zonon.

La amazonoj estis tribo de militistinoj. La novnaskitajn knabojn ili elmetis kaj plenkreskigis nur la knabinojn. Ili ne lernis teksi kaj kuiri, sed rajdi kaj skermi. Heraklo divenis, ke la batalo kontraŭ ili ne estos facila.

Eŭristeo ankaŭ ĉifoje deziris la pereon deHeraklo. Sed la reĝina filino elkore deziris, ke Heraklo revenu kun la zono. Ŝi bonŝancis. Post malfacilaj bataloj Heraklo fariĝis la posedanto de la valor-plena zono kaj portis ĝin al la reĝo Eŭristeo.

„Nun restas nur la deka tasko“, lamentis la reĝo kaj decidis for-sendi Heraklon kiel eble plej malproksimen. „Li konduku la gregon de la giganto Geriono al mi“, li ekpensis. „Geriono havas tri korpojn, ses brakojn kaj ses gambojn kaj lia grego estas gard-ata de sovaĝa dukapa hundo.“ Li alvokis sian heroldon kaj sciigis al Heraklo sian ordonon.

La lando, en kiu paŝtis sin la grego de Geriono, troviĝis malprok-sime okcidente. Heraklo devis veturi trans maron kaj trairi dezer-ton. Post longa vojaĝo li alvenis en Afrikon. Tie vivis la giganto Anteo, filo de patrino Tero. Kiam li ekvidis Heraklon, li iris ren-konte al li.

„Haltu, migranto“, vokis Anteo al la heroo. „Mi permesas al neniu preteriri min en la direkto de okcidento, se tiu ne luktis kontraŭ mi.“

Heraklo vidis, ke li ne povas eviti la giganton. Li do akceptis la luktadon. Ambaŭ, la giganto kaj la heroo, provis surdorsigi la alian. La tero sub iliaj piedoj tondris, ili spirkraĉis kaj iliaj fruntoj trembrilis pro ŝvito, sed neniu el ili venkis. Ĉiufoje, kiam Heraklo sukcesis surterigi Anteon, la giganto gajnis novajn fortojn kaj lude facile deskuis la heroon. Tio okazis, ĉar patrino Tero enfluig-is novan forton al sia filo. Heraklo ekkonis, ke tiom longan tem-pon, kiom la giganto tuŝas la teron, li estas nevenkebla. Tial li kaptis Anteon ĉe la koksoj kaj levis lin supren kaj sufokis lin en la aero.

Post la lukta venko tramigris Heraklo la elsekigitan afrikan kontinenton kaj atingis la bordon ĉe markolo, kiun ni nomas nun la Gibraltara markolo. Ĉe ambaŭ flankoj de la markolo li starigis memore al sia vojaĝo du gigantajn ŝtonkolonojn. La malnovaj grekoj nomis ilin la kolonoj de Heraklo. En tiu regiono la suno ardis neelteneble, ĝi brulvundadis la haŭton, kaj antaŭ Heraklo estis ankoraŭ longa vojo. Jen la sunodio Helios ekkompatis la turmentatan heroon. Li pruntedonis al li sian ŝipeton, en kiu li ĉiunokte veturis de okcidento al oriento por poste denove grimpi en la sunoĉaron kaj veturi kun la nova tago supren en la ĉielon. En la ŝipeto Heraklo rapide atingis la landon de la giganto Geriono.

Apenaŭ li paŝis sur la teron, ĵetiĝis kun kolera bojado la dukapa hundo de Geriono sur lin. Heraklo mortbatis ĝin per sia klabo kaj kunpelis la gregon distritan sur la herbejoj. Poste li pelis la gregon tien, kie leviĝas la suno, ĉar tie ie troviĝas Grekio. La bovoj ne volis forlasi la sukajn herbejojn. Ili haltis kaj malĝoje muĝis. Geriono aŭdis la muĝadon kaj proksimiĝis kiel ŝtormo sur siaj ses kruroj. Je ĉiu el siaj ses manoj li tenis armilon. Minacante li svingis lancojn kaj glavojn kaj aspektis kiel tuta militistaro. Heraklo streĉis sian arkon kaj pafis sagon al la giganto. La trafita giganto kuris ankoraŭ dum iom da tempo antaŭ ol li sinkis teren. La veneno de la hidro, per kiu Heraklo estis priŝmirinta la sagojn, komencis efiki. Per ununura sago Heraklo mortigis la potencan giganton.

Tial iuvespere eksonis antaŭ la reĝopalaco de Mikeno la muĝado de grandega bovogrego. Heraklo paŝis antaŭ Eŭristeon: „Reĝo, mi pelis la gregon de Geriono antaŭ vin. Per tio mi plenumis mian dekan taskon. Maldungu min el viaj servoj!“

Sed la ruza Eŭristeo jam tenis preta elturniĝon: „Mi ankoraŭ ne povas maldungi vin“, li diris, „vi ĝis nun nur ok taskojn plenumis

laŭorde. Du taskojn mi ne povas agnoski. Nu, ĉu vi sola mortigis la drakon de Lerno? Paŝtisto helpis al vi. Kaj por la purigo de la staloj de Aŭgio vi postulis pagon.“

„Sed la reĝo ne donis al mi la promesitajn bovojn“, obĵetis Heraklo.

„Se li estus doninta ilin al vi, vi ilin estus preninta“, diris Eŭristeo, tial mi ne povas akcepti la purigadon de la staloj.“

„Faru, kiel plaĉas al vi“, plena de ĉagreno respondis Heraklo. „Mi plenumis dek taskojn“, mi ankaŭ plenumos dekdu.“

Sed Eŭristeo diris: „Atendu nur, Heraklo, nun mi fine havas por vi taskon, kontraŭ kiu ĉio tio, kion vi plenumis ĝis nun, estas tute senvalora. Mi volas elsendi vin por la oraj pomoj el la ĝardeno de la Hesperidinoj.“

Aŭdante, kion la reĝo postulas de li, Heraklo fariĝis kolera: „Kiel mi portu la orajn pomojn de la Hesperidinoj al vi, kvankam neniu homo scias, kie troviĝas ilia ĝardeno.“

„Tial estas tasko, kiu indas al viro nomata Heraklo“, diris la reĝo kun rideto, sed sen rigardi al la okuloj de la heroo.

Heraklo forlasis la palacon, iris en la mondon kaj demandis ĉie pri la vojo al la Hesperidinoj.

Neniu havis konsilon por li. Dum li serĉis, li eĉ pliigis sian famon. Kie ajn malica giganto aŭ sovaĝa besto turmentis la homojn, Heraklo pretis helpi. Lia klabo, lia glavo kaj liaj venenaj sagoj estis neniam sen laboro. Tiel li venis en sia migrado ankaŭ al la Kaŭkaza montaro. Obtuze eksonis en la montoj la ĝemado de la katenita Prometeo. La heroo sekvis la voĉon. Ĵus la aglo, kiu

turmentadis Prometeon, komencis forflugi. Heraklo streĉis la arkon kaj mortigis la aglon per bone celita sago.

Rapide li grimpis sur la rokon, disbatis la katenojn de Prometeo kaj liberigis lin. Prometeo ĉirkaŭbrakis sian savanton, dankis al li kaj demandis kiel li povas rekompenci lin. Heraklo raportis al Prometeo pri sia vana vagado de la oraj pomoj kaj Prometeo sciis konsilon.

„Vi devas tramigri Afrikon, ĝis kiam vi atingos la giganton Atlaso“, li diris. „Petu lin, ke li prenu la orajn pomojn por vi. Ne provu tion mem. La ĝardeno estas gardata de kvar nimfoj, de la Hesperidinoj kaj de la terura centkapa drako Ladono. La drako neniam dormas kaj ĉiu el ties kapoj kolere eligas akrajn sonojn kaj siblas per alia voĉo. Sed la giganto Atlaso certe subigos ĝin.“

Heraklo ĝojis pri la konsilo de Prometeo. La vojon al Afriko li jam konis. Sub la ardanta afrika suno li rapidis al la giganto Atlaso. Li prenis eĉ ne la tempon al si serĉi tranoktejon kaj dormis sub libera ĉielo. Denove dormante iam, kovrita nur per sia leona felo, li sentis subite facilan jukadon sur la brakoj kaj survizaĝe.

Malferminte la okulojn, li vidis svarmon de pigmeoj. Kelkaj alportis ŝnuregojn kaj provis kateni la heroon, aliaj formiĝis kiel armeo por ataki lin. Ili rampis trans la bruston de Heraklo, pripalpis lian vizaĝon kaj tiris sin supren per lia hararo. La heroo ne povis ne ridi, vidante la seriozajn penojn de la etaj pigmeoj. Li laŭte ridis elkore kaj la nanoj falis de li kiel skuitaj de tertremo, Heraklo metis kelkajn nanojn en sian leonan felon kaj prenis ilin kun si.

„Vin mi kunprenos al Grekio“, li diris ridante kaj ĵetis la leonan felon kun la nanoj transŝultren.

Poste li migris al la lando de la Hesperidinoj, ĝis kiam li renkontis la giganton Atlaso. Tiun la dioj ŝarĝis per malfacila laboro. Li devis apogi la ĉielan volbaĵon, por ke ĝi ne falu surteren. La neimageble granda giganto jam de malproksime videblis.

„Kion vi serĉas ĉi tie?“ riproĉe grumblis la giganto al Heraklo.

„Reĝo Eŭristeo elsendis min por la oraj pomoj de la Hesperidinoj“, diris Heraklo, „tial mi venas al vi kun la peto, ke vi alportu ilin por mi.“

„Mi volonte prenos ilin por vi“, respondis la giganto, „sed vi vidas, ke mi apogas la ĉielon. Mi ne povas forlasi mian lokon.“

„Mi portos intertempe la ĉielan volbaĵon anstataŭ vi“, ofertis Heraklo kaj prenis la ĉielon sur siajn potencajn ŝultrojn.

Atlaso endormigis la drakon en la ĝardeno de la Hesperidinoj, li mortbatis ĝin kaj revenis kun tri oraj pomoj al Heraklo. Li staris antaŭ la heroo, vidis kiel li kliniĝis sub la ŝarĝo de la ĉielo kaj ne emis repreni la ŝarĝon sur la proprajn ŝultrojn.

„Heraklo, mi trovis plaĉon je la libero“, diris Atlaso, „kaj mi vere ne sentas la emon porti la firmamenton plu.“

„Bone“, respondis Heraklo ruze, „sed permesu al mi almenaŭ meti ion sub mian kapon. Mi timas, ke la ŝarĝo povus dispremi mian kranion.“

Atlaso ne ekkonis la ruzaĵon kaj prenis la ĉielon sur siajn ŝultrojn, por ke Heraklo povu serĉi herbojn kaj muskojn kiel subaĵon.

Liberiĝinte de ŝarĝo, la heroo tuj prenis la orajn pomojn kaj forkuris tiom rapide, kiom li povis.

Reĝo Eŭristeo jam delonge supozis, ke Heraklo survoje perdis sian vivon. Kaj subite, post tiom da jaroj, staris la heroo sana kaj vivanta antaŭ li. Li transdonis al li la orajn pomojn de la Hesperdinoj kaj skuis el la leonfelo la pigmeojn. La reĝo miregis.

Eŭristeo konservigis la orajn pomojn en la templo de diino Atena. Sed la diino redonis ilin en la ĝardenon de la Hesperidinoj, tiel, kiel la dia leĝo postulas tion.

Al la reĝo pli kaj pli konsciiĝis, ke li ne humiligis la heroon per la laboroj, sed helpis al li fariĝi nemezureble fama. La popolo rigardis Heraklon kiel sian protektanton kaj savanton. Ne estis lando, kies loĝantoj ne havis kaŭzon esti dankemaj pro certa heroa ago de Heraklo. Jam la mencio de lia nomo vekis kuraĝon kaj entuziasmon en la koroj de la ceteraj grekoj.

„Reĝo“, diris Heraklo al Eŭristeo, „mi atendas vian lastan taskon.“

„Iru – “, pripensis la reĝo, „en la submondon kaj konduku la inferan hundon Cerbero al mi!“

La trikapa hundo Cerbero gardis la enirejon en la regnon de la mortuloj. Li enlasis la ombrojn de la mortintoj, sed neniun reen sur la teron. Eŭristeo tre ĝojis pri sia ideo. Tian danĝeran taskon li ankoraŭ ne komisiis al Heraklo.

Heraklo survojiĝis en la direkto de okcidento, kaj la deziro liberigi sin el la servoj de la reĝo pelis lin rapidi. En la okcidento sub nigraj rokoj kaŝiĝis la kaverno, kiu kondukis en la submondon.

Hadeso, la reganto de la mortula regno mem, baris la vojon al Heraklo.

„Haltu, Heraklo!“ li vokis. „Kial vi volas grimpi malsupren al la ombroj? Vi vivas kaj ne apartenas en la regnon de la mortuloj.“

„Mi venis pro ordono de reĝo Eŭristeo“, diris Heraklo. „Li donis al mi la lastan taskon. Mi konduku Cerberon, la gardohundon de la submondo al Mikeno. Se mi sukcesos, la reĝo maldungos min kiel servanton kaj mi estos libera.“

„Cerberon vi volas forkonduki, ĉu?“ miris Hadeso. „Se vi kuraĝas pri tio, prenu ĝin al vi, sed nur kun unu kondiĉo: „Vi devos subigi ĝin sen armiloj.“

Heraklo konsentis. Cerbero salutis lin per kolera bojado, kaj el liaj tri fajraj okulparoj fulmis flamoj. Sovaĝe li ĵetiĝis sur Heraklon. La heroo disetendis la gambojn kaj ĉirkaŭpremis la monstron per pugnigitaj manoj. Cerbero baraktadis kaj provis enspiri freŝan aeron, sed Heraklo ne cedis, ĝis kiam la infera hundo estis malsovaĝigita. La briditan hundon li kondukis al la tera surfaco. Je la unua fojo Cerbero ekvidis la tagan lumon. Pro timo gutis venena ŝaŭmo el ĝia buŝo. Kaj tien, kie la ŝaŭmo falis, kreskis venenaj fiherboj.

La homoj de Mikeno fuĝis de Heraklo, kiam li alvenis kun la monstro el la submondo. Eŭristeo aŭdis la bruon antaŭ la palaco kaj paŝis scivole antaŭ la pordegon. Ĉe la rigardo de la trikapa hundo li rigidiĝis terurigite kaj tremis je la tuta korpo. Li rekuris en la palacon, batfermis la pordegon kaj firme riglis ĝin. Malantaŭ la pordo li kriis al Heraklo, ke li rekonduku la hundon tien, de kie li forkondukis ĝin. Kaj Heraklo ne plu montru sin ĉe li.

Kontente Heraklo forlasis Mikenon, rekondukis la hundon en la submondon kaj estis libera. Lia servado estis finita. Sed ne finiĝis lia maltrankvila vivo plena de aventuroj. Nenie li setlis. Li migris

tra la mondo kaj tien, kie plaĉis al li kaj kien oni vokis lin, por ke li helpu per sia forto kaj sia menso.

En sia vagado li venis al burgo de potenca reĝo, kiu havis belan filinon kun la nomo Iolo. La reĝo ĵus aranĝis faman vetbatalon pri arkpafado. La venkinto de la konkurso ricevu la belan Iolon kiel edzinon. Ankaŭ Heraklo anonciĝis por la konkurso kaj provis bonŝanci kun la ceteraj kandidatoj. Inter la edziĝemuloj estis spertaj pafarkistoj, kaj la plej bonaj estis la reĝo mem kaj ties filoj. Jam ŝajnis, ke la reĝo venkos kaj ke la edziĝemuloj devos foriĝi sensukcese. Jen Heraklo kun sia fama arko antaŭenpaŝis. Ĉiuj silentiĝis kaj observis atente la heroon. Estis kvazaŭ la celo altirus la sagojn de Heraklo. Li eĉ ne unufoje maltrafis la celon kaj la ĉagrenigita reĝo devis deklari lin venkinto. Sed sian filinon li ne volis doni al li. Li trovadis ĉiam denove elturniĝon kaj ĉiam denove transŝovis la geedziĝon, ĝis kiam Heraklo plena de kolero forlasis la reĝan burgon.

Kun gala humoro pri la maljusteco, kiun li spertis, li decidis viziti reĝon Admeton, kiu estis lia amiko. Li trovis la urbon de Admeto en profunda funebro. Despere kaj silente la reĝo akceptis la heroon kaj kondukis lin al la portilo, sur kiu kuŝis morta la reĝino Alkesto. Ŝi estis tute vualita en blankajn vestojn. Nur ŝia vizaĝo estis freŝa kaj ĉarma kiel dum ŝia vivo.

„Al la solenaĵo pri mortinto vi venis, amiko mia“, diris Admeto kaj liaj okuloj plenigis sin de larmoj.

„Mi grave malsaniĝis“, komencis paroli la malfeliĉa reĝo per tremanta voĉo, „kaj la morto jam cirklis ĉirkaŭ la palaco por forkonduki min en la submondon. Sed dio Apolono, mia protektanto, petis la sortodiinon, ankoraŭ ne fortranĉi mian vivofadenon, se ŝi trovos iun, kiu libervole mortos anstataŭ mi. Mia kompatinda edzino, mia bela Alkesto, eksciis tion kaj oferis por mi

sian vivon. Ŝi volis savi mian vivon kaj tiel donacis al mi duoblan morton: ŝian kaj mian. De ŝia morto mi vagas tra la palaco kiel ombro kaj nutradas min nur per miaj larmoj.“

Heraklo estis profunde tuŝita. Mallaŭte li foriris. Okupite de doloro la reĝo eĉ ne rimarkis, ke Heraklo estis foririnta. La heroo prenis la plej bonan ĉaron kaj la plej rapidajn ĉevalojn kaj rapidis kiel la vento al la kaverno, kiu kondukas al la submondo. La vojon li jam konis bone.

Cerbero timplene hurletis, retiris la voston kaj retroevitis de la heroo. Heraklo sturmis en la mortulan regnon, la tero tondris sub liaj paŝoj, kaj en la rokoj montriĝis fendetoj. Hadeso ekteruriĝis pri la nekutima bruo en sia kvieta regno kaj iris renkonte al Heraklo.
„Reĝo de la mortintoj“, parolis Heraklo al la mastro de la submondo, „la animo de la ĉarma Alkesto venis libervole en vian regnon por savi sian edzon. Permesu al ŝi reiri en sian korpon.“

Tute afliktite Hadeso observis la fendetojn en la rokoj kaj observis la laŭtan enpenetrinton. Li pensadis dum certa tempo kaj fine konkludis, ke estas pli bone resendi la animon de la reĝino Alkesto antaŭ ol la forta Heraklo renversigos la murojn de la submondo.

„Mi volas resendi la animon de la reĝino en ŝian korpon“, li diris malvoleme, „sed vi tuj forlasu mian regnon kaj promesu ne reveni al mi.“

Heraklo promesis tion volonte kaj revenis el la submondo al la suno. Li grimpis sur sian ĉaron kaj veturigis ĝin rapide al la palaco.

Dum tio la ploranta Admeto rimarkis, kiel la vangoj de la reĝino fariĝis rozkoloraj. La spiro komencis movi ŝian bruston, ŝiaj okulharoj tremis kaj Alkesto malfermis la okulojn. Ŝi ridetis al sia edzo. Admeto frotis siajn okulojn, li pensis, ke bona dio ekkompatis lin pro lia korpremiteco kaj sendis dolĉan revon al li. Des pli terura estos la revekiĝo. Jen Alkesto komencis paroli kaj la reĝo ekkonis, ke tio, kion li imagis revo, estas reala. Ŝi rakontis, kiu donis la vivon al ŝi, kaj nur nun rimarkis Admeto, ke Heraklo estis for.

La feliĉaj geedzoj salutis Heraklon kiel sian plej grandan bonfartiganton. Honore al li la reĝo aranĝis grandan feston. Ĉiuj urbanoj jubilis, ridis kaj kantis. Post sep tagoj la eterne maltrankvila heroo adiaŭis sin de la gastafabla Admeto kaj la fidela Alkesto kaj turnis la dorson al la burgo kaj la urbo. Survoje atingis lin la frato de la bela Iolo, pri kies favoro li batalis antaŭ ne longa tempo per sia arko.

„Heraklo, ne koleriĝu“, li diris al la heroo, „sed vi devos liberigi vin de aĉa suspekto. Post kiam vi forlasis la burgon de mia patro, mankis en la reĝaj staloj ĉevaloj kaj muloj, kaj la patro supozas, ke prenis vi ilin. Venu, helpu al mi trovi la ŝtelinton, kaj tiel pruvu vian senkulpon.“

La maljusta kulpigo vekis la subitan koleron de Heraklo. Pro sia kolero li kaptis la reĝan filon je la zono kaj ĵetis lin en abismon kaj la nuko de la malfeliĉa heroldo rompiĝis.

La koleremo de Heraklo ĉagrenis lian patron Zeŭso. Li donis al li la forton por helpi kaj ne por murdi pro koleremo. Li punis la heroon per aĉa febro. La forta Heraklo fariĝis subite malforta kiel rompiĝema oldulo. La febro forbruligis ĉiujn liajn fortojn. Turmentite de la malsano li pridemandis la orakolon de Delfo.

Tiu konsilis al li: „Vendigu vin por tri jaroj en sklavecon, tiel vi povos repacigi la diojn.“

La afliktita Heraklo kun kelkaj amikoj iris sur ŝipo veturonta al Azio. Kaj tie liaj amikoj vendis lin kiel sklavon. La forta belstatura heroo baldaŭ trovis elstaran aĉetanton. La reĝino Omfalo aĉetis lin. Heraklo fariĝis sana kaj ne restis senaga. Li helpis al la reĝino liberigi ŝian landon de rabistoj kaj li kondutis tiel kuraĝe, ke la reĝino miris pri li. Kiam ŝi eksciis, ke la sklavo estas la fama Heraklo, ŝi donacis la liberon al li kaj havigis al li ĉiujn oportunaĵojn en sia palaco. En la luksa vivo li iom post iom komencis forgesadi sian heroecon. Lia vira kuraĝo iĝis ulineca, li surmetis damajn vestojn kaj klabo kaj arko restis neŭzitaj en angulo. Sed la tri jaroj rekomenditaj de la orakolo pasis kaj Heraklo retrovis sin mem. Li rememoris pri siaj heroaj agoj kaj turnis la dorson al la reĝino kaj la dolĉa neniofarado.

Ankoraŭ plian fojon li volis edzinigi reĝan filinon. Ĉifoje li trovis plaĉon je la bela Dejanero. Li ne estis la ununura edziĝemulo. Ankaŭ la rivera dio Aĥeloo, kiu povis transŝanĝi sian figuron, volis edzinigi Dejaneron. Li venis al ŝia patro kaj kiel taŭro kaj kiel bunta drako kaj fine kiel taŭrokapa homo. Dejanero teruriĝis pro li kaj ploris timeme, ke li forkondukos ŝin. Heraklo alvenis dum la ĝusta tempo tien. Forta kaj granda kiel li estis, kun la ondanta leonfelo transŝultre, li tuj plaĉis al Dejanero kaj ŝi deziris sopire, ke fariĝos li ŝia edzo. Sed la reĝo ne kuraĝis rifuzi iun el la potencaj kandidatoj kaj tial proponis, ke Heraklo kaj Aĥeloo batalu pri lia filino.

Ambaŭ kandidatoj akceptis la proponon kaj ĵetiĝis en la batalon. Heraklo pafis unu sagon post la alia, kaj kiam tio montriĝis tute senutila, li prenis la klabon kaj batadis la sendoloran Aĥeloon tiel, ke la tuta palaco resonis de la batoj. La rivera dio denove persekutis Heraklon kaj provis surpiki Heraklon per siaj taŭro-

kornoj. Heraklo prefere forĵetis la klabon, kaptis Aĥeloon ĉe la koksoj kaj komencis lukti kun li. Ili batalis bruste ĉebruste, je iliaj tempioj ŝvelis la vejnoj, sed ili ne cedis. Malvaste kunkroĉiĝinte ili renversiĝis teren. Kaj tie Heraklo sukcesis meti sin sur Aĥeloon. Li premis la dion teren. Aĥeloo ŝanĝiĝis en glitan serpenton kaj provis forgliti. Sed la heroo firme tenis lin per firma mano kaj dispremus lin, se Aĥeloo subite ne estus reŝanĝinta en taŭron. La taŭro klinis la kapon kaj komencis furiozan atakon. Heraklo kaptis la taŭron je unu korno kaj ĵetis lin tiel krude teren, ke korno derompiĝis. Nun Aĥeloo agnoskis sian malvenkon kaj malaperis el la palaco.

Oni aranĝis grandiozan feston. Heraklo edzinigis Dejaneron kaj dum longa tempo li trovis pacon. Ŝi naskis filon al li, Hilon. Kaj Dejanero supozis, ke nenio plu povos endanĝerigi ŝian feliĉon. Sed en Heraklo nur dormetis la malnova maltrankvilo, ĝi vekiĝis de tempo al tempo, kaj ĉiufoje pli forte. Li ne povis elteni vivi sur unu loko. Jen li rememoris, ke li almenaŭ povus viziti longtempan amikon. Por tiu vizito akompanis lin lia edzino. Survoje ili venis al larĝa rivero, trans kiu kentaŭro portadis la vojaĝantojn. Ekzistis bonaj kaj saĝaj kentaŭroj, tia instruis Jazonon, sed ekzistis ankaŭ fiaj kaj malice pensantaj. Malica kentaŭro estis ankaŭ tiu, kiu portadis la vojaĝantojn trans la riveron. Heraklo ne bezonis helpon. Li grimpis mem en la riveron, al la kentaŭro li konfidis nur sian edzinon, por ke li portu ŝin al la alia bordo. La kentaŭro portis la belan Dejaneron trans la riveron kaj ŝi ekplaĉegis al li. Li rapidis kaj kiam li vidis, ke Heraklo postrestis, li decidis rabi ŝin.

Heraklo tuj ekkonis la perfidon kaj postpafis al la fuĝanta kentaŭro iun el siaj venenaj sagoj. Spite al la granda distanco li trafis lin kaj la kentaŭro renversiĝis. El lia brusto fluegis sango. Mortante li diris kun malfortiĝanta voĉo al Dejanero: „Volonte mi volas doni al vi, bela Dejanero, ankoraŭ donacon, por pruvi al vi,

ke mi ne estas tiom malbona, kiom Heraklo pensas. Verŝu iom de la sango, kiu fluas el mia vundo, en ujon. Se Heraklo iam ajn intencos forgesi aŭ forlasi vin, kolorigu per la sango lian vestaĵon kaj li neniam de vi foriros. Sed diru tion al neniu, alikaze la sorĉo ne efikos.“

La kentaŭro diris tion kaj mortis. Dejanero fidis al li, kaptis iom de la varma sango kaj kaŝis rapide la ujon, ĉar jam Heraklo proksimiĝis per rapidaj paŝoj. La plua vojaĝo al la amiko de la heroo pasis glate kaj sen aventuroj.

Baldaŭ poste Heraklo komencis militiron kontraŭ la patro de Iolo. Li ne povis pardoni al li la perfidon de ties promeso kaj la riproĉon pri la ŝtelado de la ĉevaloj kaj muloj. Tial li marŝis kun la armeo antaŭ la reĝan urbon, sieĝis kaj konkeris ĝin. Urbo kaj burgo ekflamiĝis kaj la reĝo en la fumantaj ruinaĵoj trovis la morton. Lian filinon Iolo Heraklo arestis, li sendis ŝin kun la aliaj kaptitoj hejmen al sia edzino.

Senpacience Dejanero atendis en la palaco sciigon. Jen alvenis triumfmarŝe la heroldoj de Heraklo.

„Ni venkis“, sciigis la heroldoj al Dejanero, „la submondo plenigis sin de niaj malamikoj. Jen la unuaj kaptitoj senditaj al vi de Heraklo; li mem baldaŭ sekvos kun la armeo.“

Dejanero rigardis la kaptitojn kaj haltis antaŭ la ĉarma Iolo. „Kiu ŝi estas?“ ŝi demandis heroldon kaj mangestis al la plorantino.

„Tio estas la reĝa filino Iolo“, respondis la heroldo. „Heraklo iam volis edzinigi ŝin. Li venkis tiam en la pafarka konkurso, sed la reĝo rompis sian promeson kaj ne volis eldoni ŝin kiel edzinon de Heraklo.“

Ĉagreno kaj aflikteco okupis Dejaneron. Ŝi timis, ke Heraklo forlasos ŝin, ĉar li havos de nun Iolon en sia domo. Ŝi timis, ke li forgesos ŝin pro la bela fremdlanda reĝa filino. La malĝojigaj pensoj persekutis ŝin dum ĉiu paŝo. Pro sia aflikteco ŝi rememoris pri la konsilo de la kentaŭro. Ŝi prenis la ujon kun la sango de la kentaŭro el la kaŝejo kaj iris en la kelon, por ke neniu vidu ŝin. Tie ŝi kolorigis per la sango novan veston; kiun ŝi kudris por Heraklo. La pompe koloritan veston ŝi donis al servisto, kiu portu ĝin kun saluto de ŝi kiel donacon al la venkinta Heraklo.

Tagoj pasis, sed Heraklo ne revenis. Lia filo Hilo iris renkonte al li por heroldi la plej novajn sciigojn al la senpacienca patrino. Plendante li revenis sen la patro. Plorsingulte li raportis al la patrino, kion li vidis.

Heraklo post la finita batalo oferis al la senmortaj dioj. Por la festo li surmetis la novan vestaĵon, kiun sendis Dejanero al li. Sed meze de la ofera festo, kiam la fumo de la ofero jam grimpis ĉielen, Heraklo renversiĝis kun kruelaj doloroj. Li kriis kvazaŭ furiozaj rabobestoj karne atakus kaj disŝirus lin per la dentoj, kaj lia unua vorto estis la nomo de la edzino: „Dejanero! La vesto, kiun vi sendis al mi, disbrulas miajn sangon kaj ostojn en la korpo. Portu min rapide sur ŝipon, forkonduku min, por ke mi ne mortu en fremda lando!“

Terurigite aŭdis Dejanero la vortojn de sia filo. Plena de despero ŝi kuris en sian ĉambron kaj puŝis glavon en sian bruston. Tro malfrue venis Hilo por helpo. Ŝia animo estis jam survoje en la ombran regnon.

La mortanta Heraklo velis en la hejmlandon kaj portigis sin sur montopinton. Tie la amikoj konstruis brulŝtiparon, la heroo sidiĝis sur ĝi kaj petis ilin, ke ili ekbrulu la ŝtipojn. Sed neniu el la amikoj pretis fari tion. Post longa hezitado Filokteto fine metis

brulantan torĉon al la ŝtipoj. La mortanta heroo dankis por tiu servo per la donaco de sia pafarko kaj per la mortigaj sagoj. Apenaŭ la flamoj leviĝis kiel langoj el la brulŝtiparo, estis senditaj de la ĉielo fajraj fulmoj kaj potenca tondrobato. Densa lumanta nubo sinkis sur la brulŝtiparon kaj portis la heroon supren al la Olimpo. Atena gvidis Heraklon en la ĉielan halon de la dioj.

Tiel plenumiĝis la profetaĵo de la blinda divenisto Tiresio, ke post heroa vivo, plena de laboro, Heraklo fariĝos senmorta.

Kaj ankaŭ surtere la memoro pri li restis senmorta. Ĉie, kie li helpis al la homoj, kie li protektis kaj liberigis ilin de malbono, kie li batalis por justeco kontraŭ maljusteco, oni pensis pri li kun dankemo kaj honoris lin. De buŝo al buŝo rapidis la legendo pri la kuraĝa Heraklo, ĝi traflugis la jarcentojn ĝis en nian tempon. Kaj ni transdonas ĝin nun al la estonteco.

*Originalo: HÉRAKLES*

## PERSEO

Al la reĝo Akrisio augŭris iam orakolo, ke mortigos lin la propra nepo. La reĝo timis pri sia vivo kaj pensis pri tio kiel malhelpi tion. Li kunvokigis ĉiujn siajn laborsklavojn kaj ordonis al ili, ke ili fosu sub la reĝa burgo kelon kaj poste fermu ĝin per fera pordego. En la volbaĵon li kondukis sian filinon Danao kaj fermis la pordegon zorgeme. Li sendis nutraĵojn en ŝian prizonon, sed ne ellasis ŝin, por ke la terura profetaĵo neniam plenumiĝu.

La plendoj kaj ĝemoj de la enkarcerigita reĝa filino penetris ĝis la oreloj de la diopatro. Zeŭso kompatis la solecan knabinon, penet-

ris en formo de ora pluvo en la kelon kaj heligis la subteran tenebron. Li enamiĝis en la belan Danao, kaj ne daŭris longan tempon, ĝis kiam la princidino naskis knabeton. Li ricevis la nomon Perseo.

Iam promenis reĝo Akrisio en la burga korto kaj aŭdis larmadon de infano. Unue li pensis, ke tio estas la vento, kiu hurlas ĉirkaŭ la burgaj turoj. Sed la plorado venis el la tero. Plena de surprizo kaj teruriĝo kuris Akrisio al la fera pordego kaj malfermis la kelon. Plorante Danao ĵetiĝis al la kolo de la patro kaj petis indulgi la etan Perseon kaj ŝin mem. La reĝo puŝis ŝin de si kaj rapidis en la burgon. Li tro timis la morton por povi havi kompaton.

Li ordonis al la gardistaro meti la filinon kaj la nepon en grandan keston, fermi ĝin per najloj kaj ĵeti la keston en la maron. Obeeme la gardistoj plenumis la ordonon. Antaŭ ol la tago pasis, la maraj ondoj forportis la keston, en kiu sidis la malfeliĉa Danao kun la malgranda Perseo sur la brakoj. Tra fendo en la kesto ŝi vidis nenion krom la ondantan maron kaj la ŝaŭmon sur la krestoj de la bluaj ondoj. La vespero krepuskiĝis kaj la kesto drivis ankoraŭ sur la senfina akvo, vorticoj kirlis ĝin, kaj la vento drivigis ĝin al fremda bordo. Post maltrankvila timplena nokto aperis je la horizonto insulo, ĝi kreskis kaj proksimiĝis. La vento pelis la keston rekte al ĝi.

Ĉe la bordo de la insulo fiŝistoj ĝuste pretigis siajn retojn por kaptado; jen ili ekvidis sur la ondoj strangan aĵon. Rapide ili saltis en siajn boatojn kaj tiris la keston sur sablan grundon. Scivolaj pri tio, kiun trezoron la kesto entenas, ili rapide deŝiris la kovrilon kaj rigidiĝis pro miro. El la kesto grimpis bela junulino kun dormanta knabo sur la brakoj. Pala kaj tremanta pro la longa suferado kaj la frido, ŝi dankis al siaj savantoj kaj raportis al ili, kiu sorto kondukis ŝin tien.

La kompatemaj fiŝistoj miris kaj donis al la junulino kaj al la infano ion por manĝi kaj trinki. Kiam la savitoj iom trankviliĝis kaj rekolektis fortojn, kondukis ilin la plej maljuna fiŝisto en la urbon al la reĝo de la insulo.

La reĝo ofertis al la reĝa filino kaj ties filo gastamikecon. Tiel vivis Danao kaj Perseo en la reĝa burgo kaj mankis nenio al ili. Post certa tempo la reĝo edzinigis ŝin kaj Perseo plenkreskis en la palaco kiel reĝa filo.

Ondo post ondo ruliĝis transmaren kaj jaro post jaro pasis en la insula regno. Jam delonge Perseo ne plu ludis en la herbejo de la ĝardeno, sed li ekzercis sin en vetkonkursoj kun aliaj junuloj, li rajdadis kaj ĵetadis lancojn. Maltrankvile la reĝo observis, kiel Perseo fariĝis pli kaj pli forta, li timis pri sia trono. Plej bone estus, li konsideris, se Perseo vagadus tra la mondo. Tial li al li rakontis pri drakoj kaj gigantoj kaj heroaj agoj. Perseo aŭskultis tion kun entuziasmo.

„Ekzistis multaj famaj herooj“, rakontis la reĝo, „sed neniu el ili ĝis nun kuraĝis preni kiel predon la kapon de Meduzo.“

„Kiu estas tiu Meduzo?“ demandis Perseo.

„Tre profunde en la okcidento“, diris la reĝo, „tie, kie la eterna nokto komenciĝas, vivas tri fratinoj, la Gorgonoj. Ili estas monstroj kun flugiloj, kiuj havas anstataŭ hararo serpentojn. Du el ili estas senmortaj kaj la tria mortideva. La mortideva Gorgono estas nomata Meduzo. Se iu rigardas al la rigida abomeninda vizaĝo de unu el la Gorgonoj, tiu fariĝas ŝtono. Se mi havus la kapon de Meduzo, mi nur devus montri ĝin al la malamikoj kaj tuj ili fariĝus ŝtonaj kaj mi gajnus ĉiun batalon.“

Ekde tiu interparolado Perseo pensis pri nenio alia plu ol pri la Gorgonoj. Logis lin entrepreni aventuron, kiun ankoraŭ neniu heroo kuraĝis entrepreni. La longa vojaĝo ne timigis lin. Kaj se Meduzo efektive estas mortideva, tiukaze li povus venki ŝin per akra glavo kaj fortaj brakoj. Perseo ne pensis pri la danĝero, sed nur pri sia venko.

„Mi vagos tra la mondo“, li diris al la patrino, post kiam li ĉion konsideris, „mi vagos tra la mondo kaj alportos la kapon de Meduzo.“

La patrino eklarmis. Ŝi timis, ke Perseo, ne revenos de la danĝera vojaĝo. Sed la reĝo laŭdis la decidon de Perseo kaj gloris ties forton kaj kuraĝon. Por si mem li ĝojis pri la adiaŭo de Perseo.

Perseo ne hezitis. Li pretigis sin por la vojaĝo kaj tuj survojiĝis, plena de avido pri la aventuro. La subiranta suno montris al li la vojon. Li veturis trans maron kaj vagis tra kontinento. Li batis al si vojon tra grandegaj arbaroj plenaj de bestoj kaj birdoj, li grimpis trans montarojn kaj transiris riverojn. Dum tre longa tempo li migris plu kaj plu ĉiam en la okcidenta direkto.

La diino Atena observis lin dum ties vojaĵo. Ŝi ĉiam protektis la kuraĝulojn, kaj la kuraĝo de Perseo plaĉis al ŝi. Ŝi aperis antaŭ Perseo kaj diris al li: „Vi estas kuraĝa, Perseo, sed nur kuraĝo ne helpos al vi. Vi devas scii, kiel vi devos konduti por reveni vivanta kaj sana. Mi donos al vi konsilon. Vi ne rajtas rigardi la Gorgonojn. Sed vi apenaŭ povus batali kun Meduzo, se vi ne rigardus ŝin. Tial mi donacas al vi protektŝildon el erco. Ĝi brilas kiel spegulo kaj vi bone vidos la Gorgonojn sur ĝi. Ties spegulbildo ne povus damaĝi al vi. Per kutima glavo vi ne povos detranĉi la kapon de Meduzo, tial prenu tiun ĉi ŝtalan serpon. Sed antaŭ ĉio alia vi devos gajni de la nimfoj ŝuojn kun flugiloj, sorĉan sakon kaj kaskon, kiu faras nevidebla. Venu, mi montros al vi la vojon al tri

maljunulinoj. Estas fratinoj de la Gorgonoj. Ili scias, kie la nimfoj loĝas."

Perseo dankis al la diino, li prenis la radiantan ŝildon kaj la serpon kaj iris tien, kien ŝi montris al li. En soleca roka regiono staris malpura kabano. Tie loĝis tri maljunulinoj, fratinoj de la Gorgonoj. Jam de malproksime Perseo ilin aŭdis kvereli. Ili havis kune nur unu denton kaj unu okulon. Neniam ili povis interkonsentiĝi, kiu el ili ĝuste rajtas preni la okulon kaj la denton. Apenaŭ iu el la maljunulinoj prenis la okulon kaj rigardis ĉirkaŭ si, jam la dua volis preni ĝin kaj ankaŭ volis rigardi. Sed tuj, kiam ĝi prenis la okulon, jam la tria forprenis ĝin de ŝi. Kaj pri la dento ili kverelis simile.

„Kiu estas tie?" vokis la maljunulinoj. Ili aŭdis la paŝojn de Perseo, sed ne vidis lin, ĉar ili ĝuste luktis pri la okulo kaj neniu povis havigi ĝin al si.

„Kiu ajn vi estas", kriis la unua, „venu pli proksimen kaj estu nia juĝisto!" – „Estu nia arbitracianto, por ke ricevu mi la okulon!" vokis la dua. – „Ne fidu al ŝi", kriĉe kriis la tria, „mi nun estas en la vico. Al mi nun apartenu la okulo!"

Perseo prenis la okulon kaj la denton kaj diris: „Kial mi ne estu via arbitracianto? Mi prenas la okulon kaj la denton kaj la kverelo estos finita."

La maljunulinoj komencis lamenti, ili palpadis per la manoj kaj volis kapti Perseon. Sed sen la okulo ili estis blindaj kaj kaptis nur la vakan aeron. Kiam ili rimarkis, ke ili ne povos kapti Perseon, ili komencis peti: „Redonu al ni la okulon. Ni plenumos deziron al vi, sed vi redonos la okulon kaj la denton."

„Diru al mi“, parolis Perseo, „kiel mi venu al la nimfoj, kiuj konservas la flugilajn ŝuojn, la sorĉosakon kaj la kaskon, kiu nevidebligas. Tuj kiam mi scios tion, mi redonos al vi la okulon kaj la denton.“

„Deziru al vi ion alian“, provis konvinki lin la maljunulinoj.

Sed Perseo ne volis scii ion pri tio, li ne cedis. La maljunulinoj ektimis, ke Perseo povus foriri kun la okulo kaj la dento. Kun lamentado kaj plendado ili sciigis al li la vojon al la nimfoj.

Perseo redonis la okulon kaj la denton al ili kaj forlasis la tristan regionon sur tiu vojo, kiun montris la maljunulinoj al li. Ju pli li malproksimiĝis de la maljunulinoj des pli bela fariĝis la regiono. Unue montriĝis nur tie kaj tie herbeja loketo, sed baldaŭ etendiĝis al ĉiuj flankoj verdaj herbejoj. La solecaj kriplaj arboj estis sekvataj de belegaj odorantaj boskoj kaj en la plej granda bosko plena de odorantaj kaj florantaj arbustoj dancis sur senarbejo nudapiedaj nimfoj. Perseo petis ilin pri la ŝuoj, la sako kaj la kasko, kaj la bonaj nimfoj bonvoleme alportis ĉion ĉi al li.

Perseo ligis la flugilajn ŝuojn al siaj piedoj, surmetis la kaskon, kiu senvidebligas kaj ĵetis la sorĉosakon sur ŝultron. Poste li depuŝiĝis de la tero kaj leviĝis en la aeron. Ĉiu el liaj paŝoj estis kiel flugilbato kaj portis lin rapide antaŭen. Nenio malhelpis lin dum la flugo. Li ŝvebis super arbokronoj kaj montopintoj. La odorantaj boskoj kaj freŝaj herbejoj ekmalaperis kaj Perseo denove flugis super neplaĉa kruda regiono. Morne leviĝis en ĝi malgrandaj kaj grandaj rokoblokoj kun strangaj formoj. Kelkaj similis bestojn, aliaj homojn. Ĉiuj ĉi rokoblokoj iam estis vivantaj estaĵoj. La rigardo de la Gorgonoj transformis ilin en ŝtonojn. Ankaŭ vojerarintaj birdoj falis teren antaŭ la Gorgonoj kaj rigidiĝis transformitaj en nigrajn pecojn el ŝtono.

Perseo deturniĝis de la malĝojiga ŝtonpejzaĝo kaj rigardis sur sian radiantan ŝildon. En ĝi li vidis la saman malĝojigan bildon kaj post certa tempo aperis ankaŭ la Gorgonoj. Ili dormis ĉe la rando de spegule glata lago. La teruraj kapoj de la Gorgonoj kun hararaj tufoj el serpentoj anstataŭ hararo disvastigis eĉ dum la dormo teruron.

„Ne hezitu“, parolis mallaŭte kaj kuraĝige la diino Atena al li, „la meza el la Gorgonoj estas Meduzo.“

Perseo flugis malsupren al la dormantaj monstroj. La serpentoj sur iliaj kapoj siblis. Ili flaris la enpenentrinton.

Perseo rigardis en la spegulon de sia ŝildo kaj celis Meduzon. Li levis la akran serpon kaj detranĉis la kapon de Meduzo per unu tranĉo. El la gorĝo de Meduzo saltis la flugila ĉevalo Pegazo, ĝi batis per la flugiloj kaj la vosto kaj malaperis antaŭ la suprizita Perseo en la nuboj.

Nun li devis forporti la kapon de Meduzo. La kapo estis tiel granda, ke Perseo dubis, ĉu ĝi trovos lokon en la sako, eĉ kvankam ĝi estis sako sorĉa. Sed la sako akceptis la ŝarĝon kvazaŭ ĝi estus ŝtoneto el siliko kaj ĝi restis tiom malpeza kvazaŭ ĝi estus plu malplena. Perseo leviĝis helpe de siaj flugilaj ŝuoj en la aeron kaj forflugis.

La susurado vekis la du aliajn Gorgonojn. Ili rigardis supren kaj ekvidis la mortan fratinon kaj ekkoleriĝis. Ili disetendis siajn drakoflugilojn, cirklis super la lago kaj serĉis la kulpinton. La serpentoj sur iliaj kapoj baraktiĝis kaj kliniĝis minace. Sed por Perseo ili restis nedanĝeraj. Li estis nevidebla, ĉar li surhavis la kaŝigan kaskon. Vane la koleraj senmortaj Gorgonoj rastis la aeron. Perseo fuĝis de ili.

Li flugis kaj jam ĝojis, kiel li surprizos la patrinon kaj la reĝon. Per siaj flugilaj ŝuoj li baldaŭ estos hejme. Jen leviĝis ŝtormvento, ekkaptis la flugantan Perseon kaj forportis lin en mala direkto. Perseo batalis kontraŭ la vento, sed tiu estis pli forta ol li. Ĝi blovis lin ĝis Afriko.

Lacigite Perseo sidiĝis sur herbejon. Liaj okuloj brulis de la vento, kaj la tuta korpo doloris. Volonte li ripozus.

„Kion vi faras ĉi tie?“ eksonis super li tondra voĉo. Ĉe la arbara rando staris la potenca giganto Atlaso kaj liaj piedoj fosiĝis profunde en la teron.

„Lasu min ĉi tie“, petis la lacigita Perseo, „mi volas iom ripozi kaj poste flugi plu.“

„Do, iru tien, de kie vi venis“, kriis Atlaso. Misfideme li observis Perseon. „Eble vi celas la orajn pomojn, kiu sciu? Rapide foriĝu!“

Perseo koleriĝis kaj vokis: „Tia kara gastamikeco meritas donacon! Li turniĝis flanken kaj tiris el la sako la kapon de Meduzo.

Apenaŭ ekvidis Atlaso la teruran kapon de Meduzo, li transformiĝis en rokan montaron. Liaj barbo kaj hararo kroĉiĝis al la montaj deklivoj kiel arbaroj kaj veproj. La monto kreskis pli kaj pli alten ĝis lia kresto tuŝis la ĉielon. Ankoraŭ hodiaŭ en Afriko troviĝas montaro, kiu havas la nomon Atlaso.

Perseo kaŝis la kapon de Meduzo en la sako, sternis sin herbeje kaj ekdormis. Li dormis la profundan dormon de la herooj, ĝis kiam la radiantaj briloj de la suno de Afriko vekis lin. Moviĝis apenaŭ spireto de aero kaj Perseo esperis revidi ankoraŭ je la sama tago sian patrinon. Li daŭrigis sian aervojaĝon. Dum li flugis super la lando, gutis el la kapo de Meduzo sangaj gutoj,

penetris tra la sako kaj falis teren. Apenaŭ ili tuŝis la teron, ili ŝanĝiĝis en venenajn serpentojn. De tiam en Afriko vivas tiom da danĝeraj serpentoj.

Li jam flugis longan distancon, kiam li vidis sub si homamason. Ĉiuj forkuris de la mara bordo, kvazaŭ ili fuĝus de tertremo. Perseo ŝvebis malsupren, miksiĝis en la hastantan amason de homoj kaj demandis, kial kaj kien ili kuras.

„Malfeliĉo trafis nian landon“, konfidis la plagataj homoj al Perseo. „Nia reĝino Kasiopejo fanfaronis esti pli bela ol ĉiuj nimfoj de la maroj. La kolerigita dio Pozidono punis la tutan regnon pro tio. Ĉiutage elgrimpas de la maro terura monstro. Ĝi neniigas niajn gregojn kaj voras homojn. Hodiaŭ oni oferu la reĝinan filinon Andromedo. Oni jam kondukis ŝin al roko ĉe la bordo. Ni akompanis ŝin, sed nun ni forkuras por ne devi rigardi ŝian pereon. La monstro estas tuj aperonta el la maro.“

Aŭdante tion, Perseo kuris al la bordo kaj leviĝis super la maron. Ĉe klifo Andromedo staris katenita. Kaj ĉe la fino de sablobenko staris ŝiaj reĝaj gepatroj. La reĝo kaj la reĝino ne povis disiĝi de sia amata filino.

Subite la maro ekŝaŭmis kaj komencis boli. Grandega monstro leviĝis de la mara grundo, disigis la ondojn kaj montris al Perseo sian skvaman glitigan korpon. Andromedo ekkriis, kaj la desperaj gepatroj komencis laŭte lamenti. La monstro ŝovis ŝaŭmondon antaŭ si antaŭen kaj naĝis al la klifo, kie Andromedo teruriĝite kovris siajn okulojn per blankaj manoj.

Perseo ŝvebis malsupren al la monstro kaj tiu provis kolere kapti ties ombron, kiu falis sur la akvon. Jen jam la glavo de Perseo estis puŝita en la korpon de la giganta marserpento. La monstro saltis el la akvo alte supren, sed Perseo evitis per siaj flugilaj ŝuoj

flanken. Denove kaj denove Perseo puŝis la glavon en ĝin, ĝis kiam la sango de la monstro kolorigis la maron ruĝa. La serpento baraktis kaj defendis sin. La glavobatoj de Perseo ŝajne ne povis damaĝi al ĝi, la sange subkonturitaj okuloj de la monstro persekutis ĉiun movadon de la heroo. Tiuj okuloj memoris Perseon pri Meduzo. Rapide li tiris la kapon de Meduzo el la sako kaj montris ĝin al la monstro.

Jen la giganta serpento transformiĝis en ŝtonon kaj la maro glutis ĝin. Vortico kruta kaj profunda montris la lokon, kie la monstro sinkis sur la grundon de la maro.

Andromedo forprenis la manojn de la vizaĝo. Kaj por Perseo estis, kvazaŭ ekbrilus la matena ruĝo post ŝtorma nokto.

Li metis la sakon kun la kapo de Meduzo, la protektoŝildon kaj la glavon sur la bordon kaj rapidis al la junulino por liberigi ŝin de la katenoj. Li ankoraŭ neniam vidis pli belan inon.

Jam proksimiĝis la reĝo kaj la reĝino kaj dankis al la kuraĝa Perseo: „Deziru al vi oron, arĝenton kaj juvelojn, tiom, kiom vi volas“, diris la reĝo. „Mi donos al vi ĉion, kion vi postulos, ankaŭ sklavojn kaj ĉevalojn de nobla deveno.“

„Pli prefera ol oro, arĝento kaj juveloj“, respondis Perseo, „estus al mi, reĝo, via filino Andromedo. Permesu al mi edzinigi ŝin, se ŝi deziras tion.“

Andromedo plaĉis la juna heroo kaj ŝi konsentis kun ĝojo.

„Mi ĝojas“, diris la reĝo, „ke tia kuraĝa viro volas edzinigi mian filinon. Kiel triopo kaj plenaj de malĝojo ni venis, sed kiel kvaropo kaj plena de ĝojo ni reiros en la burgon.“

Perseo levis siajn armilojn kaj la sakon kaj miris. La plantoj kaj branĉoj, sur kiuj kuŝis la sako kun la kapo de Meduzo, ŝanĝiĝis en ŝtonecajn koralojn. Kaj kelkaj, kiuj estis tuŝitaj de la meduza sango, koloriĝis ruĝaj. La koraloj komencis kreski kaj la maraj nimfoj demetis la miraklajn aĵojn sub la akvosurfaco.

En la maraj profundoj kreskis koralaj arbustaĵoj.

Perseo iris kun la reĝo, la reĝino kaj Andromedo en la burgon kaj tie oni festis pompan geedziĝon. La reĝo havigis al la popolo festmanĝon kaj tiu, kiu venis en la urbon, trovis plenan tablon kaj povis manĝi kaj trinki laŭplaĉe.

En la burgo bankedis la plej noblaj nobluloj kun la reĝo kaj la reĝino kaj en ilia mezo sidis la feliĉa Perseo kun Andromedo. Gaje tintiladis la arĝentaj pokaloj, la domo odoris laŭ incenso kaj floroj kaj la sonado de liroj plenigis la ĉambrojn. Sed meze de la gaja babilado, ridado kaj kantado subite miksiĝis el la direkto de la korto armila tintado, bruo kaj batalkrioj.

En la festhalon sturmis, sekvata de militistaro, la pli frua amiko de Andromedo, Fineo.

Li iam petis edzinigi Andromedon, sed kiam minacis ŝin la pereo, li ne protektis ŝin kontraŭ la monstro.

Nun li staris kun levita lanco antaŭ Perseo kaj kriis: „Mi venas por venĝi la rabon de Andromedo! Mi estas ŝia vera fianĉo!“

Per kiel eble plej granda forto li ĵetis la lancon, sed ne trafis Perseon, kaj la lanco boris sin en kusenon. Tio estis la signo por la batalkomenco. La militistoj de Fineo komencis kruelan sangoverŝiĝon, ili ĉirkaŭis Perseon kun sia supereca forto kaj urĝis lin al la muro. Kuraĝe Perseo defendis sin kontraŭ la malamikoj per

sia glavo, ĝis kiam la armilo ĉe lia mano fariĝis varmega. Kiam li vidis, ke minacas lin malvenko, li kriis: „Kiu estas mia amiko, tiu forturniĝu!“ Kaj poste li tiris la kapon de Meduzo el la sako. Li etendis ĝin al la malamikoj kaj mem forturnis la kapon. Per unu fojo la adeptoj de Fineo rigidiĝis.

Iliaj levitaj kaj forte armitaj brakoj fariĝis ŝtonaj, tiel, kiel ankaŭ la manoj kun la eltiritaj glavoj. Perseo paŝis tra la aro de la ŝtonigitaj militistoj kaj serĉis Fineon. La malkuraĝa iama fianĉo kaŝiĝis, forturnis la kapon kaj petis Perseon pri kompato.

„Vi estis sufiĉe kuraĝa disverŝi fremdan sangon kaj mortigi homojn pacemajn“, diris Perseo, „tia kuraĝo meritas monumenton.“ Li etendis al Fineo la kapon de Meduzo kaj Fineo silentiĝis kaj rigidiĝis.

Ankaŭ la ŝtona Fineo havis timeman vizaĝesprimon kaj kaŭris malkuraĝe en angulo.

Perseo ne restadis dum longa tempo en la fremda lando. Li esperis revidi sian patrinon. Tial li grimpis kun Andromedo sur ŝipon kaj velis al la insulo, kie li ekvagis por aventuroj.

La reĝo povis nur malfacile kaŝi sian ĉagrenon, kiam li vidis, ke Perseo revenis sana kaj havas junan edzinon ĉe sia flanko.

„Ĉu vi eble finfine ankaŭ kunportis la kapon de Meduzo?“ li demandis mokeme.

„Mi kunportis ĝin“, respondis Perseo ridete.

„Mi sciis, ke vi estas aŭdaca“, mokis la reĝo, „sed mi ne sciis, ke vi ankaŭ povas mensogi tiel aŭdace.“

„Ĉu vi, reĝo, volas vidi la kapon de Meduzo?“ demandis Perseo. „Mi ne konsilas tion al vi. Kiu vidas ĝin, fariĝas ŝtono.“

„Scias nur la dioj, de kiu vi detranĉis la kapon“, mokegis la reĝo, „eble de virŝafo aŭ de ŝafo.“

Perseo koleriĝis pri la vortoj de la reĝo. Li deturniĝis, malfermis la sakon kaj montris la kapon de Meduzo al la reĝo. Kaj tiumomente transformiĝis ankaŭ la malfidema reĝo en ŝtonon.

La patrino aŭdis de la servistoj, ke Perseo revenis kaj rapidis renkonte al li. Ĝojplene ŝi ĉirkaŭbrakis la filon kaj bonvenigis ankaŭ lian edzinon.

„Gardu vin kontraŭ la reĝo“, ŝi avertis Perseon kaj rakontis, ke la reĝo volas pereigi lin.

„Ne estas plu kaŭzo por zorgo“, diris Perseo kaj rakontis al la patrino, kio okazis.

Perseo fariĝis reĝo. Li vivis kun Andromedo kaj sia patrino sur la insulo. Sed de la malnova orakolo li ne povis fuĝi.

Amika reĝo invitis Perseon al festaj ludoj en sian urbon. Perseo partoprenis la konkursojn kaj ĵetis la diskon tiel mistrafe, ke ĝi falis en la spektantaron kaj frakasis la kranion de maljunulo. La maljunulo estis lia avo Akrisio, kiu multajn jarojn antaŭe ordonis ĵeti sian filinon kaj la nepon en kesto en la maron. Pro timo pri la orakolo la avo fuĝis el sia burgo kaj vagadis kamuflite tra la mondo.

Sed la sorto trovis lin. La orakolo plenumiĝis.

Profunde klinite Perseo enfosis sian malfeliĉan avon kaj reiris al sia regno.

Saĝe regis reĝo Perseo. La sorĉodonacojn li redonis al la diino Atena. Nur la sakon kun la kapo de Meduzo li ankoraŭ retenis dum certa tempo. Neniu malamiko kuraĝis ataki lian landon. La kapo de Meduzo protektis dolĉan pacon.

*Originalo: PERSEUS*

## DEDALO KAJ IKARO

Iam en tempoj treege malnovaj, ekzistis en Ateno, ja en la tuta Grekio neniu pli granda artisto ol Dedalo. Li estis konstrumajstro kaj skulptisto kaj kapablis mirinde prilabori ercojn kaj metalojn. Dum la rigardado de liaj konstruaĵoj oni ne sciis, ĉu ĝi estas la verko de homo aŭ la verko de senmorta dio. Pri liaj skulptaĵoj oni diris, ke ili estas kiel vivantaj homoj. Ofte oni povis vidi Dedalon inter la kolonoj de duonpretaj temploj, ĉirkaŭata de aro de meti-lernantoj el la plej noblaj familioj de Ateno. Sed la plej sagaca el liaj lernantoj havis neniujn noblajn kaj potencajn gepatrojn. Li estis Talos, la povra filo de lia fratino. Dum la ceteraj heredis siajn sonantajn kaj famajn nomojn de siaj patroj, Talos mem famigis sian nomon. Jam en la aĝo de dek du jaroj li eltrovis la diskan potfarilon. Li vidis la dentaran dorson de fiŝoj kaj laŭ tiu modelo faris la unuan segilon. Li sukcesis kunligi per ĉarniro du same longajn ferajn brakojn, kaj tiel li eltrovis la cirkelon.

Iam, kiam Dedalo rigardis la konstruaĵon de nova palaco, li aŭdis, kiel laboristoj post muro interparolas kune.

„Dedalo estas la plej granda artisto de la mondo, ĉu vi ne pensas tion?“ diris unu el ili.

„Atendu nur, Talos fariĝos eĉ pli granda artisto ol Dedalo“, parolis la dua.

Tio ĉagrenis Dedalon. Li kutimis, ke neniu dubis pri lia unua rango inter la artistoj. De tiam li ne plu ŝatis Taloson. La instruema junulo jam tiom kapablis, ke Dedalo antaŭvidis kun certo lian estontecan famon. En lia spirito li vidis jam paliĝi la stelon de sia famo. Taloso ne komprenis, kial la onklo ekmalicis al li kaj riproĉis lin. Tial li ĝojis, kiam Dedalo iuvespere invitis lin por promeno. Sed la onklo nur kaŝis sian malamon por povi realigi teruran intencon. Li logis Taloson sur la burgon de Ateno kaj puŝis lin en la malhelon de la burga remparo.

Poste li grimpis mem malsupren al la piedo de la remparo por enfosi la kadavron de Taloso kaj por forigi ĉiujn spurojn. Sed li serĉis vane. La diino Atena, kiu ekŝatis la knabon pro ties lerto kaj diligento, kaptis lin dum la falo kaj ŝanĝis lin en birdon, en vanelon. Ĝis nun la vanelo timas altojn, flugas malalte kaj havas sian neston surtere en herbejo kaj en malgrandaj fosaĵoj. Ĝi estas memgardema kaj avertas la birdojn ĉirkaŭe, se danĝero proksimiĝas.

La krimo de Dedalo ne restis kaŝita. Promenanto, kiu malfruiĝis, vidis tion, kio okazis kaj akuzis la krimfarinton. Dedalo sciis, ke minacas lin puno kaj fuĝis tial kun sia filo Ikaro sur la insulon Kreto.

La reĝo Minoo de Kreto akceptis la faman artiston plena de ĝojo en sia palaco. Li ĝuste serĉis konstrumajstron, kiu povos konstrui specialan prizonon por monstro, por Minotaŭro. Minotaŭro hav-

is la kapon de taŭro kaj la korpon de giganta homo. La kruela reĝo nutris lin per homoferoj.

Dedalo elpensis por Minotaŭro specialaĵon, kiu ankoraŭ ne ekzistis ĝis tiam, labirinton. Aroj de sklavoj derompis ŝtonojn, ĉarpentis trabojn kaj konstruis murojn. Ili laboris de frue matene ĝis nokte. En la grandega labirinto krucadis sin, kurbiĝis kaj disbranĉiĝis la irejoj kiel bulo el serpentoj. Enmeze de tiuj tenebraj, kurboplenaj interplektitaj irejoj la monstro estu enfermita. Dedalo iris kiel lasta en la pelmelan labirinton por forigi la signojn, laŭ kiuj oni povus trovi la elirejon el la labirinto. Preskaŭ li mem ne plu trovis la elirejon el sia mirakla konstruaĵo.

Reĝo Minoo aranĝis honore al la konstrumajstro grandan feston. Sed famo, honoro kaj donacoj ne povis veki en Dedalo la deziron resti sur la insulo. Ne plaĉis al li ĉe la kruela, fie mastra reĝo. Li sopiris hejmen. Ĉiuvespere li iris kun sia filo Ikaro al la bordo kaj rigardis trans la vastan maron al la horizonto, kie kuniĝis ĉielo kaj maro en la krepusko. Tie, ie malproksime, estis lia patrujo. Komence li esperis, ke venos ŝipo por konduki lin en la hejmlandon. Sed neniu ŝipestro kuraĝis forveturigi iun de la insulo, al kiu la reĝo ne permesis la forveturon. Anstataŭ la sopirataj veloj kunportantaj savon, vidis Dedalo ĉiam nur la saman bildon: la vastan maron, rokojn kaj birdosvarmojn super la akvo.

La fama konstrumajstro enviis la liberon de la birdoj. Ili konas nek limojn nek barojn, ili flugas trans montojn kaj marojn. Tage kaj nokte li pensis pri la birdoj kaj ne povis dormi. Li desegnis la flugilojn de birdoj, observis la flugadon de la birdoj kaj sekrete antaŭpreparis sian fuĝon. Li havigis al si plumojn de diversaj grandoj, kaj iunokte, kaŝita al ĉiuj rigardoj, li eklaboris. Per ŝnuraj fadenoj el lino li kunligis la plumojn de la plej mallongaj ĝis la plej longaj. Poste li kungluis ilin per vakso kaj donis al ili la

formon de flugiloj. Por si mem li konstruis du grandajn flugilojn, por Ikaro du malpli grandajn.

Kontentigite li rigardis la pretan laboron: „Al la reĝo apartenas la ŝipoj, sed al mi la aero.“

Je la sekva tago Dedalo vekis jam tre frue matene sian filon Ikaro. Unue li mem surmetis la flugilojn, poste li disetendis la flugilojn kaj leviĝis en la aeron. Li instruis Ikaron uzi la flugilojn tiel, kiel spertaj birdaj gepatroj instruas siajn idojn. Ikaro penis flugi same tiel kiel la patro kaj ridis plezurigite, kiam li sukcesis cirkli super altaj arboj kaj krutaj rokoj.

Sed Dedalo avertis sian filon: „Estu atentema, Ikaro, ne flugu tro alte, la suno fluigus la vakson sur la flugiloj kaj pro la ardo ekbruligus viajn flugilojn. Sed flugu ankaŭ ne tro malalte, por ke la maraj ondoj ne malsekigu la flugilojn, ili fariĝus tro pezaj kaj tirus vin en la profundon. Flugu nek alte nek malalte, sed tiel, kiel mi en la mezo, kaj ne perdu min el viaj okuloj.“

Dedalo kisis sian filon kaj ambaŭ leviĝis en la aeron. Antaŭe flugis Dedalo kaj ĉiam turniĝis malantaŭen al Ikaro. La filo flugis tiel, kiel la patro ordonis tion al li.

Profunde sub ili paŝtistoj tenis gardante manon super la okuloj, rigardis al la ĉielo kaj opiniis: „Ili certe estas dioj el la Olimpo, kiuj flugas teren por rigardi kiel vivas la homoj.“

Tremis la manoj de la fiŝistoj elĵetantaj siajn retojn ĉe la bordo, kiam ili ekvidis la flugantojn en la aero.

Poste disvastiĝis sub Dedalo kaj Ikaro la vasta maro.

Se ili renkontis ŝipon, la remistoj ĉesis remi. Mirigite ili rigardis al la homoj havantaj flugilojn.

La insulo Kreto troviĝis jam malproksime post ili, la tago estis klara kaj Dedalo, ĝojigite pri la bona sukcesa flugo, mergis sin en la memoron pri la hejmlando. Ĝoje Ikaro moviĝis en la varma aero per la svingado de la facilaj flugiloj. Volonte li flugus pli alte, sed tiom longe, kiom la patro turniĝadis malantaŭen al li, li ne kuraĝis ne obei.

Nun la patro, kun memoraj pensoj en sia kapo, forgesis rigardi malantaŭen al la filo kaj Ikaro utiligis tion por si.

Li flugis pli kaj pli alten kaj komencis kanti pro ĝojo. Li proksimiĝis tiom al la radianta ĉaro kun la jungitaj ĉevaloj de la sunodio, ke li povis admiri ties oran ĉaron. La suno ardis kaj bolis kaj ekfluigis la vakson sur la flugiloj. Grandaj flavaj gutoj de fluanta vakso falis malsupren, en la maron. La fadenoj komencis deiĝi kaj la plumoj, kiuj ne estis plu firme kuntenataj, tralasis aeron.

Ikaro ankoraŭfoje svingis nur la brakojn, kvazaŭ ili estus flugiloj, kaj ĵetiĝis kun ekkrio en la maron. La akvo silentigis lian buŝon kaj trembrilaj ondokrestoj kovriĝis per tavolo de blankaj plumoj.

Dedalo aŭdis la krion, turniĝis malantaŭen kaj vokis la filon. Neniu respondis.

La grandega aerospaco ĉirkaŭ li estis vaka kaj la soleca vasta maro sub li trista.

Dedalo fluge sinkis preskaŭ ĝis la ondoj kaj vokis kaj serĉis. Li trovis nur distritajn malsekajn plumojn.

La malesperiĝinta patro flugis ĝis la sekva insulo, deprenis la flugilojn kaj sidiĝis sur la bordo.

La tutan tagon li sidis funebrante kaj vespere, kiam la suno finis sian ĉiutagan migradon, la maro ĵetis la mortan filon sur la teron.

Sub la steloplena ĉielo Dedalo por Ikaro fosis tombon. Sur la freŝe starigita tombomonteto sidiĝis sola birdo. Ĝi estis vanelo, kiu per sia voko memoris Dedalon pri ties longe pasinta krimo.

Kiel ĉasate fuĝis Dedalo de la insulo kaj flugis longan distancon for de sia hejmlando ĝis Sicilio. Tie li starigis ankoraŭ multajn mirindajn konstruaĵojn, ankaŭ artefaritan lagon kaj firman reĝoburgon sur alta roko, sed ĝis sia morto li trovis nek feliĉon nek pacon.

La insulo, sur kiu li enfosis sian filon, memoras ĝis nun per sia nomo pri la sorto de Ikaro.

Ĝi nomiĝas Ikaria.

*Originalo: DAIDALOS A IKAROS*

## TEZEO

Egeo, filo de la reĝo de Ateno ekvagis antaŭ kelkaj jaroj en la mondo kaj ne revenis. Kiam Ateno estis minacata de milito, la maljuna reĝo elsendis heroldojn, por ke ili serĉu la filon.

Sekvante la spurojn de la heroaĵoj de Egeo, ili venis en fremdan reĝan regnon, kie la filo de la atena reĝo geedziĝis kun reĝa filino.

Al la juna paro naskiĝis post mallonga tempo filo, kiun ili nomis Tezeo.

Egeo regalis la heroldojn kaj post la manĝo li demandis ilin, kial ili venis.

„Egeo", ili diris, „via hejma urbo estas minacata de milito. Via patro estas jam maljuna kaj ne plu kapablas elteni la penojn de milito. Li petas vin reveni kaj konduki la atenanojn al la venko."

Egeo malgajiĝis, sed li ne povis rifuzi la deziron de la reĝo. Antaŭ ol li iris sur la ŝipon, li levis ĉe la bordo grandan ŝtonblokon kaj enfosis sub ĝi sian glavon kaj siajn ŝuojn. Poste li parolis al sia edzino: „Mi ne scias, kiom longtempe la milito en Ateno retenos min, kaj kiam ni revidos nin. Se mi ne revenos, antaŭ ol nia filo Tezeo estos plenkreskinta, tiukaze konduku lin al tiu ŝtono. Se li havos sufiĉe da forto por levi la ŝtonon kaj preni la glavon kaj la ŝuojn, li sekvu min al Ateno."

Egeo adiaŭis sin de la edzino kaj de la filo kaj baldaŭ la velo malaperis post la horizonto.

Pasis tagoj kaj jaroj. Tezeo plenkreskiĝis ĉe sia patrino en la reĝa palaco. Li ekzercis sian menson kaj siajn fortojn, kaj kiam li estis jam granda kaj forta, la patrino kondukis lin al tiu ŝtono, sub kiu troviĝis la glavo kaj ŝuoj de la patro.

„Se vi povos levi la ŝtonon", diris la patrino, „mi ĝojos havi tian fortan filon kaj malgajos, ĉar ni devos disiĝi."

Tezeo firme starigis sin sur la sablo kaj forŝovis la ŝtonon. Li surmetis la ŝuojn, kroĉis la glavon al sia zono kaj reiris kun sia afliktita patrino en la burgon por pretigi sin por la vojaĝo al la patro. La patrino insiste konsilis al li uzi la marvojon al Ateno, ĉar la

vojo trans la montojn estas tro danĝera kaj ĉar svarmas en la arbaro rabistoj kaj sovaĝaj bestoj. Sed Tezeo ne lasis konvinki sin.

„Kion mia patro dirus“, li obĵetis, „se li ekscius, ke mi elektis la pli facilan vojon!“

Li sopiris heroajn agojn en la maniero de Heraklo. Tial li survojiĝis perpiede kaj sola al Ateno. La vojo kondukis tra montoplena regiono, trans rokojn kaj tra densaj arbaroj. Je kurbiĝo de la arbara vojo embuskis en la vepro terura rabisto.

Li rabatakis la migrantojn per ferokovrita klabo. Ankaŭ sur Tezeon li ĵetiĝis el sia kaŝejo.

„Vi venas ĝustatempe“, vokis Tezeo, „via klabo plaĉas al mi. Mi purigos per ĝi la regionon de tiaj sentaŭguloj, kiaj vi.“

Li levis la glavon, evitis la baton de la rabisto kaj traboris lin. La klabon li prenis al si. En la vaste etendiĝantaj arbaroj kaj montaj solecejoj li renkontis ankoraŭ kelkajn aliajn rabistojn kaj mortbatis ĉiujn. Se la glavo ne sufiĉis al li, li prenis tiel, kiel Heraklo, la klabon, la homoj tie elspiris malŝarĝite. Ili denove povis vojaĝi sen molesto sen devi timi rabatakojn.

Sed la plej terura renkonto ankoraŭ atendis Tezeon. La lasta rabisto sur la vojo al Ateno estis la giganto Prokrusto.

Li ne ĵetiĝadis kriante kaj armite sur pacemajn migrantojn, sed invitadis ilin ĝentile en sian domon. Ankaŭ Tezeon li afable ridete invitis ripozi de la longa migrado. Li petis lin veni al la manĝotablo kaj regalis lin per manĝo kaj trinkaĵoj.

Post la manĝo diris Prokrusto: „Vi estas laca, migranto, sekvu min, la lito vin jam atendas.“

Li havis du litojn, malgrandan kaj grandan. Al la migranto li donis ĉiufoje tiun liton, kiu ne konvenis al la migranto. Al granduloj li asignis la malgrandan liton, al malgranduloj la grandan. De la granduloj li mallongigis per hakilo la membrojn, de la malgranduloj li etendis la membrojn per martelado. Tiel li turmentis ilin, ĝis kiam ili eligis sian lastan spiron.

La grandan Tezeon la giganto volis devigi sur la malgrandan liton. Sed Tezeo ekkonis, kiun sorton Prokrusto volas havigi al li, kaj agis pli rapide ol la giganto. Li ĵetis lin sur la malgrandan liton kaj detranĉis per unu bato de la glavo ties kapon.

Poste neniu danĝero plu minacis lin. Baldaŭ li paŝis tra la urba pordego de Ateno. Li promenis tra la stratoj kaj vizitis la pompajn konstruaĵojn. La homoj, kiuj renkontis lin, rigardis siaflanke lian polvokovritan figuron, lian sunbrunigitan vizaĝon kaj lian longan hararon. Ili miris pri lia grandega klabo, kaj masonistoj, kiuj laboris je la templo de Apolono, komencis moki lin. Tezeo ne respondis. Silente li eljungis la bovojn de ĉaro staranta antaŭ la templo kaj ĵetis ĝin sur la mokantojn ĉe la skafaldo. Ĉiuj, kiuj vidis tion, silentiĝis pro miro.

Antaŭ la reĝa palaco estis vigleco. Aroj de ekscititaj viroj grumble diskutis kontraŭ la reĝo Egeo. Estis denove veninta la tago, kiam la atenanoj sendu oferdone sep junulojn kaj sep virgulinojn al Kreto por la Minotaŭro. Tio estis la sanga tributo, kiun postulis la reĝo de Kreto.

Iam oni aranĝis en Ateno festajn ludojn kaj konkursojn. La reĝo de Kreto, Minoo, sendis tiam sian filon por tio. Tiu venkis ĉiujn atenanojn kaj kolerigis tiel la reĝon Egeo. Egeo inside murdigis la reĝan filon, kaj inter Kreto kaj Ateno ekfuriozis kruela milito. Minoo velis kun sia tuta floto al la atena bordo, dezertigis la landon kaj venkis la atenanojn. De tiam la atenanoj en ĉiu naŭa jaro

devis liveri sep junulojn kaj sep virgulinojn al Kreto. Minoo enfermigis ilin en la labirinton, kie la monstra Minotaŭro voris ilin. Tio estis la sanga tributo al la reĝo de Kreto.

La atenanoj indignis pro reĝo Egeo, ĉar li ne defendis sin kontraŭ tia terura tributo.

„Por kio li defendu sin“, incitis kelkaj viroj la maltrankvilon, „lin tio ja ne koncernas. Estas infanoj niaj, kiujn prenas Morto, ne liaj. Li ne havas infanojn, kaj tial li ankaŭ ne komprenas nian doloron.“

Ili indignis, sed lotumis samtempe, kiu estu sendita al Kreto. Tiuj, kiuj bonŝancis, ne plu miksiĝis en la kverelon. Sed la lotumitoj eklarmis.

Tezeo miksiĝis inter la bruantan amason kaj aŭskultis ĉion. Poste li anonciĝis ĉe la reĝo. Egeo akceptis sian filon kiel fremdulon kaj ne ekkonis lin.

„Fremdulo, vi venis en malgaja momento al ni“. Tiel li akceptis Tezeon. „Vi venas ŝajne el granda malproksimo kaj ne scias ion pri nia malfeliĉo. Alikaze vi certe prefere preterirus la urbon en granda distanco.“

„Mi venis, reĝo, efektive el granda malproksimo“, diris Tezeo, „mi scias pri via aflikto kaj volonte helpus al vi. Mi intencas iri kun la viktimoj, kiujn vi sendos al tiu Minotaŭro, kiel unu el ili. Promesu plenumi mian deziron, kio ajn okazos.“

Surprizite rigardis Egeo Tezeon: „Vi volas libervole iri kun la viktimoj, ĉu? Kiu vi estas, ke vi ne timas perdi vian vivon?“

„Perdos la vivon Minotaŭro, ne mi“, diris Tezeo aŭdace. „Promesu al mi plenumi la deziron kaj mi diros al vi, kiu mi estas.“

Kiel en sonĝo konsentis Egeo. Poste Tezeo montris al la reĝo la glavon kaj la ŝuojn. La okuloj de Egeo plenigis sin per larmoj kaj li disetendis la brakojn.

„Apenaŭ mi revidis mian filon“, li lamentis, „mi perdu lin denove, ĉu?“ Sed sian reĝan promeson li ne povis rompi.

Tuta Ateno kvazaŭ reeĥis de la novaĵo, kiel arbofolioj pro blovanta vento, ke en la palaco aperis neatendite la reĝofilo Tezeo, kiu intencas mortbati Minotaŭron. Oni interparolis plu pri nenio alia.

Homamaso akompanis la lotumitajn virgulinojn kaj junulojn al la haveno.

Damoj kisis la armilojn de Tezeo kaj la viroj jubilis entuziasme al li. Egeo disiĝis nur tre malvolonte de Tezeo.

Li parolis al li: „Mi estas jam maljuna kaj maljunuloj estas senpaciencaj kiel infanoj. Tial mi ordonis kunporti ankaŭ blankan velon sur la ŝipon. Vi veturos kiel ĉiam kun nigra velo, sed se vi sukcesos mortigi Minotaŭron, hisu la blankan velon. Mi tiam jam de malproksime vidos, ĉu mi povas ĝoji pri la venko.“

La ŝipo ekveturis kaj la popolo kun la reĝo reiris en la urbon. En ĉiuj kreskis la espero kaj malpliiĝis la disiga doloro.

En Kreto atendis jam reĝo Minoo kun sia sekvantaro la ŝipon el Ateno. La ŝipo kun la nigra velo enveturis en la havenon kaj sep junulinoj kaj sep junuloj, inter ili Tezeo, elgrimpis teren. La juna

heroo de la aliaj atenanoj diferencis per sia alta kresko kaj sia fiera rigardo. Eĉ Minoo vidis lin kun plaĉo.

Tezeo rigardis rekte al lia vizaĝo kaj parolis: „Ne pensu, reĝo, ke mi venis por servi al Minotaŭro kiel voraĵo. Mi venis por mortigi la monstron kaj por liberigi la hejmlandon de la terura tributo.“

La reĝo subigis sian ridadon: „Se vi estos tiel kuraĝa, kiel laŭ viaj vortoj, vi eble povos sukcesi pri tio. Se vi mortigos Minotaŭron, mi donacos al vi kaj al viaj gekunuloj la liberon kaj rezignos pri la tributo de Ateno.“

La reĝidino, Ariadno, staris en la akompanantaro kaj aŭskultis ensorĉite. Ŝi ne povis lasi la okulojn de la alte kreskinta heroo. Li jam delonge estis foririnta kaj malaperinta el ŝia rigardo, sed lia bildo ne forlasis ŝin. Ŝi bedaŭris lin kaj sciis, ke li devos iri sen ŝia helpo kun certo rekte al Morto.

La deziro savi Tezeon forpelis Ariadnon nokte el la lito. Ŝi ŝteliris tra la kvieta palaco al la karcero, en kiu la heroo kun siaj kunuloj atendis la matenon. Ĉiuj kuŝis en maltrankvila dormo, nur Tezeo ne dormis. Ariadno malfermis sekretan pordon kaj vokis mallaŭte la heroon, kiu estis absorbita en pensojn. Tezeo esperis helpon de dio, sed anstataŭ dio venis juna bela junulino al li por helpo.

„Mi scias, ke vi volas mortigi Minotaŭron“, haste flustris Ariadno, „sed sola vi apenaŭ sukcesos. Mi kunprenis por vi fadenbulon. Se vi paŝos en la labirinton, ligu la finaĵon de la fadenbulo al kolono kaj disvolvu dum la irado la fadenon. Minotaŭron vi ne povos mortigi per kutima feraĵo. Tial mi kunprenis sorĉoglavon al vi. Se vi venkos sukcese en la batalo, vi trovos la vojon reen laŭ la disvolvita fadeno.“

Tezeo volis danki al Ariadno, sed la reĝidino malaperis en la tenebro de la nokto. Se li ne tenus la glavon kaj la bulon ĉemane, li pensus, ke ĉio estis sonĝo.

Sekvamatene la gardistoj malfermis la prizonpordon kaj elpelis la junajn atenanojn eksteren al la labirinto. La junuloj pendigis la kapojn, la junulinoj ploris. Nur Tezeo paŝis kun alte levita kapo kaj kuraĝigis la aliajn per siaj vortoj. Sub la vesto li kaŝis la sorĉoglavon kaj la fadenbulon de Ariadno.

Li paŝis en la labirinton plenan de kruciĝantaj irejoj, tenebraj kavernoj kaj kaose interplektitaj haloj. Tezeo ordonis, ke liaj samlandanoj restadu proksime de la elirejo kaj survojiĝis mem al Minotaŭro. Je la unua kolono li fiksis la fadenon kaj disvolvis dum la irado la bulon. La etendita konstruaĵo de Dedalo estis kvieta kiel tombo. Tezeo palpe paŝis tra malhelaj irejoj, kie ekterurigitaj vespertoj batadis per siaj flugiloj lian kapon. Li trapaŝis halojn, kies muroj ardius en plena suno, kaj li iris en malsekajn kavernojn, el kiuj penetris la odoro de ŝimo kaj putraĵo. Ĉie estis kvieto, nur musoj ĉeokaze preterhastis survoje kaj rampante kaŝis sin en siaj truoj kontraŭ la heroo, araneoj fuĝis el siaj disŝiritaj retoj. Tezeo viŝis la ŝviton de la frunto kaj paŝis en longan irejon. La suno radiis sur lin kaj prilumis makulojn de sekigita sango sur la muroj. Subite disŝiris tondra muĝado la kvieton.

Tezeo prenis la sorĉoglavon kaj iris renkonte al la muĝado. La muĝado plifortiĝis, ĝi similis la muĝadon de ŝtorme vipata maro kaj longe etenditan tondradon. La kolonoj en la irejoj tremis kiel en ŝtormo.

Post kurbiĝo de la irejo Tezeo ekvidis Minotaŭron. Li staris super monto de paligitaj ostoj kaj skuadis sian gigantan taŭrokapon.

Ĝia korpo estis homa, sed grandega. El ĝiaj nazotruoj ĵetiĝis flavaj kaj verdaj flamoj kaj el lia buŝego venena spiro. Ĝi etendis siajn gigantajn vilajn brakojn al Tezeo por frakasi lin. Tezeo saltis flanken kaj la monstro turniĝis plumpe al li. Fulmrapide la heroo puŝis la sorĉoglavon en ĝin kaj trafis Minotaŭron rekte en la koron.

La tero tondris, kiam la monstro renversiĝis kaj fosiĝis en la argilan grundon. La eĥo de la falo aŭdiĝis en ĉiuj irejoj, kavernoj kaj haloj. Ankaŭ la virgulinoj kaj junuloj, kiuj venis kun Tezeo en la labirinton, aŭdis ĝin. „Nun Minotaŭro atakis Tezeon kaj mortigis lin“, ili diris timoplene. Malgaje ili atendis sian propran finon.

Intertempe palpis sin Tezeo tra la malhelaj ireoj reen al la elirejo. Atente li iris laŭ la fadeno de Ariadno kaj sekure atingis la kunulojn. Ili ĉirkaŭbrakis lin kaj ĝojigite kisis lian vizaĝon kaj liajn manojn. Jen aperis antaŭ ili Ariadno kvazaŭ kreskinta el la tero.

„Rapide, sekvu min“, ŝi vokis, „mia patro eksciis, ke mi helpis al vi, li koleras kaj ne volas plenumi sian promeson. Antaŭ ol li elsendos siajn sbirojn al vi, ni fuĝu al la bordo kaj grimpu sur vian ŝipon.“

Ili postkuris Ariadnon. Ŝi kondukis ilin el la labirinto eksteren sur vojo, kiun konis nur ŝi. La vojo kondukis al la mara bordo kaj al la ŝipo de la atenanoj. Antaŭ ol reĝo Minoo ekkonis, kio okazis, la ŝipo de Tezeo jam tiom malproksimis, ke sukcesa persekuto eĉ ne plu penseblis.

Ili interrompis sian veturon nur ĉe la insulo Nakso. Tie ili eliris, prenis trinkakvon, manĝis kaj ripozis. Ariadno endormiĝis kaj

havis viglan sonĝon. Aperis al ŝi la dio Dionizo kaj ordonis al ŝi resti sur la insulo. La sorto elektis ŝin lia edzino.
Ariadno obeis la dion Dionizo, kaj kiam la atenanoj denove iris sur sian ŝipon, ŝi rifuzis veturi kun ili. Tezeo ne kuraĝis kontraŭstari la volon de la dio kaj postlasis Ariadnon sur Nakso. Li kaj la aliaj malĝojis, ke Ariadno ne veturis kun ili al Ateno kaj pro sia malgajo ili forgesis la deziron de la reĝo Egeo. Ili ne ŝanĝis la nigran velon kontraŭ la blankan.

Senpacience atendis Egeo la alvenon de la ŝipo kaj la haveno estis plena de ekscititaj homoj. Fine ĉe la horizonto aperis la ŝipo, proksimiĝis kaj jam oni povis vidi la velon. Kiam Egeo ekvidis la funebran koloron ĉe la masto, li malesperiĝinte ĵetiĝis de la alta bordo en la maron kaj la ondoj super li kunfermiĝis.

Tezeo, la venkinto, redonis la savitajn junulojn kaj la virgulinojn al ties gepatroj, sed sian patron li ne revidis. Kiam la maro portis la mortan reĝon al la bordo, Tezeo solene entombigis lin kaj fondis je lia memoro feston, kiu la posteulojn memorigu pri la malĝoje ĝoja okazaĵo de la heroa veturo de Tezeo. La maro, en kiu la reĝo trovis la morton de tiam estas nomata laŭ li: Egea Maro.

La tuta popolo ĝojis, kiam Tezeo sidiĝis sur la malplenan tronon kaj fariĝis la reĝo de Ateno. Li regis ne nur per la glavo, sed ankaŭ per prudento. La legendo rakontas, ke li unuigis la komunumon kaj donis novajn leĝojn al sia hejmlando. Oni asertas, ke li limigis sian reĝan potencon kaj interkonsiliĝis kun konsilio el la plej saĝaj kaj plej noblaj viroj de la lando.

Tiel la heroo Tezeo liberigis sian hejmlandon kaj metis liberon kaj juron sur firman bazon.

*Originalo: THÉSEUS*

## SISIFO

En malnovaj tempoj la homoj timis la diojn. Kaj tiu, kiu ne timis la diojn, timis almenaŭ Morton. Sed la ruza reĝo Sisifo timis nek la diojn nek Morton.

Li fondis la riĉan urbon Korinto kaj konstruis la korintan burgon. Sur la burgo ne ekzistis fonto kaj Sisifo pripensis, kiel li povus instigi la diojn, ke ili donacu fonton al la burgo. Ĉe tio helpis lin bonŝanca hazardo.

La sorto, kiu regas homojn kaj diojn, kaŭzis, ke la rivera dio Asopo ekkverelis kun diopatro Zeŭso. Li serĉis Zeŭson, sed ne povis trovi ties kaŝejon. Sisifo aŭdis pri tio kaj eltrovis per ruzaĵo, kie vivas Zeŭso.

Tuj li rapidis al Asopo kaj diris: „Mi scias, en kiu angulo kaŝiĝas la diopatro. Kaj volonte mi diros tion al vi, se ankaŭ vi helpos min el embaraso. Mi konstruis burgon, en kiu ne estas akvo. La servistoj devas alporti ĝin de malproksima puto. Helpu min, kaj mi helpos al vi.“

Asopo konsentis. Li venis en la burgon kaj tuŝis rokon en la burga korto. Tuj fontis el la roko strio de klara frida akvo. Dankema por tiu servo Sisifo sciigis la kaŝejon de Zeŭso.

Plena de fervoro Asopo komencis persekuti Zeŭson. Li forgesis, ke Zeŭso estis la reganto de la dioj kaj de la homoj kaj havas la komandan forton pri la fulmo.

Plena de kolero observis Zeŭso la alproksimiĝon de Asopo. Li ĵetis sian fulmon al li, kaj Asopo komencis bruli. La brulvundita dio

ĵetiĝis en la riveron kaj tiu kondukis de tiam karbopecetojn en sia fluo.

Post kiam Zeŭso punis Asopon, lia kolero direktiĝis al Sisifo.

„Ekiru“, li ordonis al Morto, „forkonduku Sisifon en la regnon de la ombroj, tie li ne plu povos malkaŝi sekretojn.“

Morto ekiris.

Reĝo Sisifo staris sur remparo de sia burgo kaj rigardis malsupren al la regiono prilumata per la suno. En la tagmeza ardo flaviĝis la herboj kaj je la lacigitaj arboj ne moviĝis eĉ folio. La regiono estis malplena de homoj. Ĉiuj ripozis en la ombro de siaj domoj. Nur la reĝo ne serĉis ombron. Li divenis, ke la puno de Zeŭso proksimiĝas. Subite li vidis kiel Morto sur la polva strato paŝas al la burgo.

Sisifo rapidis en la burgon, prenis du fortajn ŝnuregojn kaj starigis sin al la pordo. Nenion divenante, Morto paŝis en la halon. Sisifo ĵetis ŝnuregon sur Morton kaj fermtiris la maŝon, kun la alia ŝnurego li katenis Morton kaj enfermis ĝin en ĉambreton. Poste li elspiris faciligite. Nun Morto ne plu povis damaĝi al li.

Sisifo ne mortis. Kaj ankaŭ neniu alia en la mondo. Morto kuŝis katenita en la burgo. Doloroj kaj epidemioj plu plagis la homojn kiel ĉiam, sed ili ne finiĝis.

La homoj fariĝis pli kaj pli oldaj kaj ne povis morti. Ankaŭ birdoj trafitaj de sago flugis plu, kaj la ĉasbestoj fuĝis kun la lanco en la dorso en la profundojn de la arbaro.

La brutoj maljuniĝis kaj neniu povis preni iliajn vivojn.

Kun morna vizaĝo Zeŭso vokis la militan dion Areso. „Sisifo inversigis la mondan ordon“, diris la diopatro, „kiu krom vi, militdio, povus liberigi Morton kaj sendi al la homoj?“

Dio Areso grimpis teren, disrompis la pordon de la kamero, en kiu Sisifo retenis Morton kiel kaptiton kaj liberigis sian amikon. Apenaŭ Morto liberis, li kaptis Sisifon kaj trenis lin en la submondon.

De tiam Morto denove vizitadas la loĝejojn de la homoj, veturas kun la maristoj sur ties ŝipoj, akompanas la ĉasistojn en la arbarojn kaj la soldatojn en la militojn.

La ruza Sisifo sciis, ke Morto venkos, kaj tial li jam ĝustatempe antaŭpreparis sin.

Li ordonis al sia edzino, ke post lia morto ŝi ne oferu ion en la funebraj solenaĵoj.

En la submondo poste li lamentis pri sia edzino.

„Ŝi forgesis min“, li diris, „ŝi ne okupiĝas pri la sanktaj ritoj.“

Ĉiuj en la ombra regno bedaŭris lin, kaj la regantino de tiu morna regiono, Persefono mem, permesis al li reiri al la vivantoj kaj memorigi la edzinon pri ŝia devo.

Sisifo revenis el la regno de la eterna tenebro en la tagan lumon kaj la hipokrita zorgo malaperis el lia vizaĝo. Ĝoje li rapidis al sia burgo.

Por festi sian revenon kun la homoj li aranĝis ĝojan festenon. Pri la reiro al la ombroj li ne pensis. Li laŭdis sian edzinon, ke ŝi plenumis lian blasfemian komision.

Jam odoris en la  festhalo la rostitaj femuraĵoj de bovoj, kaj la pokalojn oni jam plenigis per dolĉa vino. La halo zumadis de la babilado kaj antaŭ la fajrejo sidis blinda kantisto kun sia liro. Sisifo levis la pokalon por festena tosto.

Sed la vino jam ne plu malsekigis liajn lipojn. Morto, kiu staris post li, ŝiris la pokalon de lia buŝo kaj kondukis lin je dua fojo en la mortulan regnon.

Kruele punas la dioj mortidevulojn, kiuj ne respektas diojn kaj ties leĝojn.

Ankaŭ Sisifo ricevis malican punon. Li devas ruligi en la submondo gigantan marmorblokon sur monteton, kaj kiam li finfine troviĝas supre, forglitas la ŝtono de li kaj ruliĝas denove malsupren.

Ĉiam denove Sisifo devas ripeti sian vanan laboron, ĉiam renovigas sin lia turmento, kiu finiĝas neniam.

*Originalo: SISYFOS*

## BELEROFONO

Malfeliĉa estis la gento de Sisifo. Lian filon disŝiris ĉevaloj, kaj lia nepo Belerofono devis fuĝi el la hejmlando. Oni suspektis lin pri murdo. Dum la fuĝo Belerofono venis al reĝo Preto, kiu afable akceptis lin kaj ofertis gastamikecon al li. La gasto estis juna kaj belaspekta kaj liaj gestoj, paroloj kaj pensoj pruvis, ke li estas de nobla deveno. Ankaŭ al la juna reĝino li plaĉis, kaj ŝi preferis lin kompare al ĉiuj hejmlandaj nobeloj. Ĉar li ne atentis tion, ŝi

fariĝis malica kaj pripensis, kiel ŝi povas kalumnii lin ĉe la reĝo Preto.

„Belerofono estas orgojla“, ŝi diris al la reĝo, „li eĉ ne atentas, se oni honoras lin, certe li estas ankaŭ malbona.“

„Tiu, kiu ne atentas honorigojn, eble estas modesta“, respondis la reĝo. Kaj li traktis Belerofonon plu kiel amikon. La reĝino ne rezignis pri sia malica intenco. Je la sekva tago ŝi subaĉetis serviston kaj vizitis la reĝon.

„Belerofono alianciĝis kun viaj malamikoj“, ŝi mensogis, „li volas havigi vian tronon al si. Se vi ne senigos vin de li baldaŭ, li mortigos vin. Servisto subaŭskultis lin kaj povas tion atesti.“

Kaj la reĝino alvokis la subaĉetitan serviston. Dum longa tempo la reĝo ne povis imagi tion, sed kiam fine la servisto kaj la edzino kune konvinkis lin, li akceptis. Sed li ne kuraĝis levi manon kontraŭ la gasto. Li skribis sur tabuleton sekretajn signojn kaj sendis Belerofonon kun ĝi al sia kuzo, reĝo Jobato. Al tiu Belerofono transdonu la tabuleton. La naiva junulo ne divenis, ke la signoj sur la tabulo signifas por la transdoninto la morton. Helpoprete li survojiĝis kun la komisio al Jobato.

Jobato estis maljuna bonkora reĝo. Li afable akceptis Belerofonon, li eĉ ne demandis, de kie li venas kaj regalis lin dum naŭ tagoj. La nobla konduto de la junulo sufiĉis al la reĝo por ekkoni je li noblan gaston de alta deveno. Dum naŭ tagoj li aranĝis honore al li festenon kaj festludojn, kaj nur je la deka tago li demandis la junulon pri ties deveno kaj pri la celo de lia vojaĝo.

Belerofono rakontis al li, de kie li venis, kaj transdonis al li la tabuleton. Jobato legis la signojn kaj ektimis. Li ekkonis la signon de l‘ morto. La gasto plaĉis al li tiom, ke li suferigus lin nur tre

nevolonte. Li pripensis, kiel li povus liberigi sin de la kruela servo, kiun lia kuzo postulas de li. Estos plej bone, li decidis, se mi sendos la junulon al danĝera vojaĝo. Se Belerofono estos kuraĝa, li revenos senvundita.

Tiam vivis en la lando stranga monstro, ĝi nomiĝis Ĥimero. De antaŭe ĝi aspektis kiel leono kaj de malantaŭe kiel drako, kaj en la mezo ĝi aspektis kiel sovaĝa kapro. Ĝi havis tri kapojn, leonan, kapran kaj drakan, kiuj elspiris sufokan fumon.

„Belerofono“, diris Jobato, „vi estas juna kaj forta kaj ankoraŭ ne plenumis heroan agon. Ekiru, mortigu Ĥimeron kaj revenu kiel glorriĉa heroo.“

Oni ne devis peti la kuraĝan junulon Belerofono. Li prenis glavon, lancon, sagojn kaj pafarkon kaj turnis siajn paŝojn tien, kie fumkolono grimpis en la ĉielon. La fumo signis la ravinon, en kiu loĝis la monstro. Survoje Belerofono pripensis: „Ĥimero estas forta kaj vigla, se mi defendiĝos kontraŭ unu el la kapoj, ĝi atakos min per la du aliaj. Se mi evitos la fajron, kiun ili kraĉos, sufokos min la fumo.“

Tamen li ne haltis, sed iris rekte al la ravino. Subite li kvazaŭ rigidiĝis pro miro. Ĉe fonto piede de roko staris la flugila ĉevalo Pegazo. Ĝi estis la ĉevalo, kiu fuĝis el la faŭko de la mortbatita Meduzo. Pegazo klinis la kapon al la fonto kaj trinkis. „Se mi havus tiun ĉevalon kun la flugiloj“, pensis Belerofono, „mi povus ataki Ĥimeron de supre kaj estus pli vigla ol ĝi.“ Mallaŭte, kaŝita post arbusto, li ŝteliris al Pegazo. Li estis nur kelkajn paŝojn malproksime de ĝi, kiam Pegazo ekflaris la fremdulon, tial ĝi levis la flugilojn kaj forflugis.

Ĉagrenite Belerofono sternis sin sur la herbejo kaj ekdormis. En sonĝo aperis al li diino Atena, transdonis al li belegan ore ornamitan bridon kaj parolis: „Vekiĝu, Belerofono, kaj oferu al la dio Pozidono taŭron. Per la brido, kiun mi donacas al vi, vi bridos facile la flugilan ĉevalon.“

Belerofono vekiĝis, li kaptis dormeme la oran bridon – kaj efektive, la brido, pri kiu li ŝajne nur sonĝis, kuŝis apud li sur la herbejo. Firme li tenis ĝin permane. Ĝojigite pri la favoro de la dioj, li rapidis por plenumi tion, kio Atena konsilis al li. Li buĉis taŭron, oferis ĝin al Pozidono. Kaj al diino Atena li konsekris dankeme novan altaron.

Vespere li revenis al la fonto kaj atendis Pegazon. Baldaŭ susuris la flugiloj en la vespera aero kaj Pegazo moviĝis malsupren al la fonto por trinki. Belerofono proksimiĝis kun la ora bridaĵo. Ĉifoje la flugila ĉevalo ne defendis sin kaj trankvile permesis sian seladon. Belerofono svingiĝis sur la ĉevalon kaj diris, kien ĝi flugu. Pegazo movis siajn flugilojn kaj jam ili leviĝis super herbejojn kaj arbarojn. Super la ravino ili cirklis ĉirkaŭ nubo el malhela fumo, kiun la monstro elspiradis. Belerofono prenis sagon el la sagujo kaj kliniĝis kun Pegazo al la muĝanta bestaĉo. Li streĉis la tendenon de la arko kaj trafis la monstron de supre. Ĉiuj tri kapoj provis kapti lin, sed sur lia flugila ĉevalo li fuĝis de ili. Sago post sago trafis la monstron ĝis kiam finiĝis ties tri vivoj. Ĝi elblovis lastan nubon el fumo kaj fajro kaj falis renversigite sur la grundon de la ravino.

Belerofono detiris de la morta Ĥimero la haŭton, sidigis sin sur Pegazon kaj revenis al Jobato. La reĝo miris pri la flugila ĉevalo kaj la haŭto de la monstro. Nun li estis konvinkita, ke lia gasto troviĝas sub la protekto de la dioj kaj ne estas krimulo. Li edzigis lin kun sia filino kaj Belerofono fariĝis reĝo.

Sed ankaŭ Belerofono pli kaj pli supozis, ke li estas samranga al la dioj. Ne senkaŭze li estis la nepo de la ruza Sisifo. „Mi ja havas la flugilan ĉevalon“, li pensis, „kiu do povus malhelpi min viziti la restadejon Olimpo de la senmortaj dioj?“ Li grimpis sur Pegazon kaj pelis ĝin pli kaj pli en altojn super la nuboj. Sed Pegazo rifuzis tion enpense. Ĝi ne obeis. Ĝi baŭmis kaj ĵetis la arogantan rajdiston de sia dorso. Belerofono flugis tra la aero kaj falis en marĉon. Sian vivon li ja savis per tio, sed inter la homoj li ne plu montriĝis. Li hontis antaŭ la dioj kaj la homoj, li vagadis en la dezerto kaj trovis tie ankaŭ Morton.

La flugila ĉevalo flugis sola ĝis la restadejo Olimpo de la grekaj dioj kaj komencis tie sian servon ĉe diopatro Zeŭso.

*Originalo: BELLEROFONTES*

## MELEAGRO

La edzino de reĝo Oineo reganta Kalidonion, naskis filon kun tre stranga destino.

Iutage Altaia falis en maltrankvilan dormon. Ŝi sonĝis, ke en tiu ĉambro, en kiu ŝi dormas, eksonas paŝoj kaj voĉoj. Ŝi malfermis la okulojn kaj vidis kvazaŭ en sonĝo, ke tri figuroj kliniĝis sur la liteton de la malgranda Meleagro. Estis la moiroj, la sortodiinoj. Unu el ili surgenuiĝis antaŭ la forno kaj metis ŝtipon en la flamojn. La fajro ekflagris hele.

„Via vivo estas ligita kun la vivo de la ligno en la fajro“, profetis la moiroj al la infano. „Vi vivos tiom longe, kiom la flamoj ne voros la ŝtipon, kiu tiel hele brulas kaj lumas.“

Post tiuj vortoj malaperis la moiroj. Terurigite saltis la patrino el la lito, tiris rapide la brulantan ŝtipon el la fajro kaj verŝis akvon sur ĝin. Poste ŝi metis la ekbruligitan sortolignon en keston kaj kaŝis ĝin.

La filo ricevis la nomon Meleagro, li plenkreskiĝis kun siaj fratinoj en la reĝopalaco, fariĝis forta kaj kiam li atingis la aĝon, dum kiu komparas la junuloj siajn fortojn, neniu superis lin, se temis pri forto kaj lerteco. La patro de Meleagro posedis vaste etenditajn vitejojn, kampojn kaj ĝardenojn. Post la rikolto li dankadis al la dioj per ampleksaj oferoj. Al diino Demetro li oferis kampofruktojn, al la gaja dio Dionizo vinon, al diino Atena olivan oleon. Al ĉiu dio li oferis parton de la rikolto, nur diinon Artemiso li forgesis.

Ankaŭ la ĉieluloj sentas koleron, kaj la kolero de la dioj estas pli potenca ol tiu de la homoj. Artemiso sendis al la lando de reĝo Oineo plagon: En la kalidoniajn arbarojn ŝi pelis gigantan apron. La apro estis pli granda ol la plej potenca taŭro. Ĝiaj okuloj flamadis sange fajraj, ĝiaj hirtaj haregoj similis al lancoj kaj la akraj dentegoj, kiuj elstaris de ĝia ŝaŭmanta buŝego, havis la longecon de elefantaj dentegoj. Kien ĝi ĵetiĝis, tie ĝia spiro bruligis la verdan foliaron de la herboj kaj arboj. La maturiĝantan grenon ĝi stamfis surteren, ĝi elŝiris la vinarbustojn kaj frakasis ilin per siaj teruraj hufoj, ĝi dezertigis la ĝardenojn, elradikigis la arbojn kaj disrompis la branĉojn pezajn de fruktoj. Ĝi atakis la gregojn kaj frakasis hundojn kaj paŝtistojn. La dispelita bruto vagadis sen paŝtistoj sur la montaj deklivoj.

La homoj fuĝis de la kamparo, la timo pelis ilin malantaŭ la urbomurojn de Kalidonio. Tiu, kiu forlasis la urbon, ne povis esti certa, ke li revenos sana. Malĝojo falis sur la tutan landon, ĉiujn minacis malsato kaj morto.

Kiam Meleagro vidis, kia katastrofo trafis liajn samlandanojn, li ordonis pretigi armilojn kaj invitis la heroojn el tuta Grekio por ĉasi la apron.

Venis multaj, inter ili ankaŭ Jazono, la fama heroo de la veturo por la ora felo; ankaŭ Tezeo, kiu venkis Minotaŭron, kaj Admeto, la edzo de la fidela Alkesto. Venis la plej kuraĝaj viroj de Grekio kaj kun ili la frato de la patrino de Meleagro. Al la grekaj herooj aliĝis ankaŭ la kuraĝa ĉasistino Atalanta.

La patro de Atalanta deziris filon. Kiam naskiĝis filino al li, li ordonis demeti ŝin en la montaron, kiel predon por sovaĝaj bestoj. Sed ursino adoptis la infanon kaj portis ĝin hejmen en sian kavernon. Tial Atalanta plenkreskiĝis en la sovaĝa naturo inter la bestoj kaj fariĝis ĉasistino sen timo. Ofte ŝi pruvis jam sian kuraĝon kaj sian forton. Nun ŝi denove miksiĝis inter kuraĝajn ĉasistojn, kun sagujo el eburo surdorse kaj kun pafarko enmane.

Meleagro vidis ŝin en la aro de la ĉasistoj kaj ŝajnis al li, kvazaŭ li vidus la ĉasdiion Artemiso. Li ne povis deturni siajn okulojn de ŝia bela vizaĝo.

Sed la ĉasistoj urĝis ĉiujn survojiĝi. La popolo de Kalidonio kolektiĝis ĉe la urba pordego. Ĝi adiaŭis sin de la herooj kun espero kaj timo en la koroj. Kaj Morto jam elserĉis siajn viktimojn inter la ĉasistoj.

La herooj, inter ili Meleagro kaj Atalanta, marŝis al la densaj arbaroj ĉe la deklivoj de la montoj. Ilia vojo kondukis preter disstamfitaj kampoj kaj detruitaj vitejoj. Alveninte la arbaran randon, ili deŝnurigis la hundojn. La hundoj, ĉiu kun la nazo sur la tero, penetris en la vepron, kuris sur la monta deklivo supren kaj de tie en la valon, ĝis kiam ili alvenis en ravinon ellavitan de printempa pluvo. Tiu ravino dum la tuta jaro ne elsekiĝis. Salika

arbusto, fragmito kaj altaj herboj kovris la marĉan grundon. La hundoj malaperis en ĝi kun bojado. Subite disiĝis la arbusto kaj el la marĉo paŝis snufegante giganta apro. Kolere ĝi ĵetiĝis sur la ĉasistojn.

La unua ĉasisto ĵetis sian lancon kaj mistrafis la celon. Jazono ĵetegis la lancon kun tiom da forto, ke la armilo flugis super la beston kaj profunde boriĝis en ŝlimon. La tria ĉasisto trafis la apron, sed ne vundis ĝin. Artemiso kaptis la lancon dum ties flugo kaj derompis ties metalan pinton.

La atako ekscitis la apron ĝis kolerego. El ĝiaj okuloj kvazaŭ ŝprucis fajro kaj el ĝia buŝego fulmis flamoj. Ĝi avancis kiel pafita ŝtono de katapulto, ĝi puŝis teren du neatentemajn ĉasistojn kaj tuj disŝiris ilin. Alian ĝi surpikis per siaj dentegoj. Kaj alia ne estus eskapinta Morton, se li ne estus savinta sin per grimpado sur arbon. La kolera apro poste ĵetiĝis en la densejon.

En tiu ĉi momento Atalanta streĉis la tendenon de la arko kaj postsendis sagon al la apro. La sago vundis la bestaĵon malantaŭ orelo kaj aperis tie iom da sango.

Meleagro ĝojis pri la trafo fare de Atalanta pli ol ŝi mem. Sed la ĉasistoj sentis sin hontigitaj de la junulino. Por kaŝi sian honton, ke ili ne sukcesis tiel, ili levis kriadon kaj ĵetis vetkonkure siajn lancojn. Diino Artemiso gardis sian beston ankaŭ ĉifoje. La lancoj en la aero reciproke kunpuŝiĝis kaj falis teren sen eĉ tuŝi la gigantan apron.

„Kaj eĉ, se Artemiso vin protektas“, vokis iu el la ĉasistoj, „vi mortos tamen per unu el miaj manoj!“

Li svingis la hakilon kaj supozis povi venki la sorton per la akra armilo. Sed la apro estis pli rapida, ĵetegis lin per dentegoj teren kaj la sango de la ĉasisto ruĝigis la herbojn.

Ĉiu lanco finis sian flugon sur ŝelo de arbo, kelkaj ŝanĝis la direkton kaj traboris hundojn. Nur unu lanco firme pikiĝis en la dorson de la apro. Estis la lanco de Meleagro. La monstro kovriĝis per sango kaj falis teren, trafita de dua lanco de Meleagro tiel, ke la deklivoj ektremis kaj eksusuris la arbaro.

La ĉasistoj ĉirkaŭis la venkintan Meleagron kaj premis liajn manojn. Meleagro ŝajne tute forgesis ilin, li vidis nur Atalantan.

„Prenu la haŭton de la apro kiel donacon“, li diris al la kuraĝulino, „kaj ankaŭ lian kapon kaj la dentegojn.“

La ĉasistoj ankoraŭ neniam vidis tian grandegan aprohaŭton kaj tiom longajn dentegojn kaj enviis Atalantan pri la donaco.

„Lasu tion, kio ne apartenas al vi“, ili vokis al Atalanta, „kaj ne miksu ĉasistan famon kun la belo de belulino!“

Pri la morta apro kaj la predo komenciĝis akra kverelo. Diino Artemiso, kolerigita pri tio, ke Meleagro mortigis ŝian apron, incitis la kverelon, la kriadon kaj la fikonduton. Meleagro silentiĝis pro kolero kaj levis la lancon. „Se vortoj ne sufiĉas, oni uzu perforton.“ Li levis la lancon kaj traboris sian plej afekciitan kontraŭulon. La ĉasisto renversiĝis morta. Li estis la frato de Altaia, la patrino de Meleagro.

La sciigo pri la venko de Meleagro kontraŭ la kalidonia apro avancis la ĉasistojn hejmirantajn. Ankaŭ Altaia iris al la templo por festi la venkon de sia filo per ofero al la dioj. Sed ŝi ne atingis la templon. Survoje ŝi ekvidis virojn, kiuj portis sur portilo ŝian

mortan fraton. Kiam ŝi ekkonis la fraton, ŝi laŭte komencis plorsingulti kaj kiam ŝi eksciis, kiu kulpis lian morton, okupis avido pri venĝo ŝian koron.

Ŝi iris hejmen kaj serĉis, kvazaŭ obtuzigite, la kaŝitan keston kun la sortoligno. Ĝin kovris multjara polvotavolo, sed la sorto destinita de la moiroj vivis, plenvalidis kaj neeviteblis.

Altaia ordonis, ke oni bruligu fajron per peĉaj lignoj, ŝi prenis la ŝtipon, kiu signifas vivon, deturnis la vizaĝon de la fajro kaj ĵetis kun kontraŭdiraj doloroj kaj venĝavido la lignaĵon en la flamojn.

Estis kvazaŭ ĝemis la ŝtipo en la fajro per homa voĉo kaj kvazaŭ la flamoj retroevitis antaŭ ol ili enfermis ĝin kvazaŭ per ardantaj fingroj. En tiu momento atakis la hejmirantan Meleagron brulefekta doloro, kiu des pli kreskis kaj kreskis ju pli voris la fajro la lignaĵon. Meleagro heroe eltenis la doloron, li bedaŭris nur, ke Morto ne trafis lin dum ĉaso aŭ dum batalo.

La kaŝita arda doloro torturis lin. Kun la fajro kreskis ankaŭ la turmento, kaj kiam la fajro fariĝis pli malforta, ankaŭ malpliiĝis la fortoj de Meleagro.

Fine de la ŝtipo restis nur peceto, kiun la ardo iom post iom estingis, ĝis kiam ĝi nigriĝis kaj griziĝis. Tiumomente elspiris Meleagro lastan fojon.

La patrino de Meleagro prenis per la mano, kiu transdonis sian filon al Morto, la glavon kaj mortigis sin mem.

La palaco de la kalidonia reĝo Oineo reeĥis de vekrie saturitaj plendoj. Larmante ĉirkaŭbrakis la fratinoj de Meleagro la fridan korpon de la frato kaj provis varmigi lin per sia spirado. Sed ili ne povis revivigi lin.

La funebra malĝojego de la fratinoj de Meleagro kortuŝis ankaŭ la diinon Artemiso. Ŝia kolero finiĝis kaj ŝi havis kompaton kun la malfeliĉaj fratinoj. Ŝi kovris ilin per plumoj, kiuj prenis de ili la surteran pezon. Iliaj brakoj ŝanĝiĝis en flugilojn, kiuj levis ilin en la aeron. El la kalidonia palaco forflugis du numidoj. Ankaŭ la tria fratino de Meleagro, Dejanero, ne evitis kruelan sorton. Ŝi kulpis la morton de sia edzo Heraklo kaj mem finis sian vivon.

Tiel malbonŝance finiĝis la idoj de la kalidonia reĝa gento.

*Originalo: MELEAGROS*

## EDIPO KAJ ANTIGONA

En Tebo iam regis reĝo Laio kaj reĝino Jokasta. Ili ne havis infanojn. Ili deziris sopire havi filon, kiu transprenu iam la potencon, sed ili sopiris vane.

Tial la reĝo sendis heroldon al Delfo por pridemandi la faman orakolon, kiel oni povus mildigi la koleron de la dioj. La heroldo revenis kun terura profetaĵo, kiu prenis la spiron de la reĝo: „Vi ricevos filon, sed kun li eniros sub vian tegmenton la malfeliĉo. Vi mortos per mano de via filo!“

Ŝokite raportis la reĝo al sia edzino la orakolan diron. La reĝino ploris dum kelkaj noktoj, turmentate de malicaj divenoj. Post certa tempo naskis Jokasta filon. En la palaco regis teruriĝo anstataŭ ĝojo. Reĝo Laio eĉ ne volis vidi la infanon. Li vokis al si maljunan paŝtiston, kiu portu la bebon en la sovaĝajn montojn kaj tie demetu ĝin, por ke la rabobestoj voru ĝin. Sed la paŝtisto kompatis la senkulpan infanon. Li ne demetis ĝin en la montoj, sed portis ĝin al longjara konato, al alia paŝtisto, kiu paŝtadis la

gregojn de la reĝo de Korintio. Poste li revenis al Tebo kaj kondutis, kvazaŭ li laŭorde estus plenuminta la ordonon de la reĝo Laio.

Laio trankviliĝis kaj post kelkaj monatoj sekiĝis ankaŭ la larmoj de la reĝino; ŝi forgesis la teruran orakolon kaj sian kompatindan filon. La reĝa paro kutimiĝis pri tio, ke ĝi ne havos heredanton de la trono.

La paŝtisto de la korinta reĝo nomis la knabeton Edipo kaj prenis lin kun si al Korinto. Ankaŭ la reĝo de tiu lando estis sen infanoj. La infano sur la brakoj de la paŝtisto plaĉis al li. Li prenis ĝin al si kaj edukis ĝin kvazaŭ ĝi estus la propra. Edipo fariĝis granda kaj forta kaj ne sciis, kiuj estas liaj efektivaj gepatroj. Ĉiuj kaŝis al li, ke alportis lin paŝtisto el la montoj.

Post kiam Edipo plenkreskis, aranĝis lia nutropatro grandan festenon en la palaco. La bona vino varmigis la vangojn kaj la pensojn de la gajaj bankeduloj. Oni rakontis pri tio, kio okazis kaj kio ne okazis, kaj la tre sangvinaj gastoj ekkverelis. Ankaŭ Edipo estis temperamentoplena ulo kaj miksiĝis en la disputon. Kverelema gasto volis ofendi Edipon kaj vokis: „Naŭzas min kvereli kun vi. La dioj scias, kies filo vi estas, certe ne la filo de nia reĝo!“

Edipo bridis sian koleron kaj silentis. Stranga penso prenis de li la trankvilon. Je la sekva mateno li vizitis la reĝan paron kaj demandis ilin, ĉu tio estas vera, kion li aŭdis. Ili trankviligis lin kaj insultis la ebrian babilaĉulon. Edipo ridetis nur malgaje kaj ne fidis iliajn vortojn. La suspekto ne lasis pacon al li. Sen la scio de sia nutropatro li survojiĝis al Delfo. Li esperis, ke la orakolo diros la veron al li. Sed li foiris el Delfo pli konfuzita ol li iris tien. La orakolo profetis teruran estontecon al li: „Fuĝu de la patro! Se vi lin renkontos, rapide trafos lin la morto viamane. kaj vi edzigos la propran patrinon.“

Edipo decidis eviti la urbon, en kiu vivas liaj nutrogepatroj, kiujn li konsideris siaj veraj gepatroj. Li turniĝis al la mala direkto, tramigris nekonatajn landojn kaj direktiĝis laŭ la steloj por ne esti subite kondukita en la hejman regionon. Li timis, ke en Korinto la orakolo povus plenumiĝi.

Iutage li renkontis sur malvasta vojo ĉaron, sur kiu veturis iu maljunulo kaj du servistoj. Ili volis rapide preterveturi lin kaj vokis al Edipo: „For el nia vojo!“

Edipo ne moviĝis flanken kaj komencis kolere kvereli kun la veturigisto. En la kverelo li puŝis la veturigiston de la ĉaro. La maljunulo sur la ĉaro furioziĝis kaj batis Edipon per sia bastono sur la kapon. Kolerigite Edipo mortbatis la maljunulon kaj ankaŭ la servistojn. Tiel li mildigis sian koleron kaj migris plu.

Baldaŭ li staris antaŭ la muroj de Tebo. Laca li sidiĝis sur ŝtonon kaj ripozis. Tiumomente montriĝis ĉe vojkurbiĝo migranto, kiu forkuris el Tebo. Antaŭ Edipo li haltis kaj vokis: „Kiu vi estas, ke vi tiel kviete sidas? Eĉ ne al mia malamiko mi konsilus ripozi en tiu regiono.“

Edipo rigardis la migranton mirigite.

„Unu ripozas kaj alia kure furiozas, kvazaŭ li estus farinta ion malbonan“, diris Edipo. „Vi forkuras de Tebo kaj mi celas tien.“

„Al Tebo, ĉu?!“ vokis la migranto teruririgite. „Ĉu vi ne scias, ke sur roko de Tebo sidas Sfinkso?“

„Mi venas el Delfo“, diris Edipo, „kaj survoje mi parolis kun neniu.“

„Aŭskultu do“, flustris timeme la migranto, „Sfinkso estas estaĵo kun ina kapo kaj la korpo de leono. Surdorse ĝi havas flugilojn. Ĉiutage devas iri ano de Tebo al la roko kaj Sfinkso diras al li enigmon, kiun li devas solvi. Se li ne trovas la solvon, ĝi ĵetas la urbanon en la abismon. Neniu povas solvi la enigmon, estas ŝajne fia sorĉo. Mi ja eĉ bonŝancas, ĉar mi ne estas ano de Tebo. Kiam mi venis en la urbon kaj aŭdis pri tiu plago, mi tuj forkuris. Ankaŭ vi ne estas tebano, ne iru en la urbon, iru kun mi, ni forkuru ambaŭ.“

„Kuru“, diris Edipo, „la vivo por vi ŝajne havas grandan valoron, ke vi volas konservi ĝin tiel gardeme kontraŭ ĉio, kio povus endanĝerigi ĝin. Sed male, se perdos la vivon mi, mi evitos nur la plenumon de malica orakolo.“

Edipo leviĝis kaj paŝis lante kaj pripenseme renkonte al Tebo. La migranto skuis pro li la kapon: „Li ne estas ano de Tebo kaj tamen miksiĝas en aferojn de Tebo. La dioj favoru lin.“ Kaj li forkuris por kiel eble plej rapide lasi la urbon malantaŭ si.

Edipo iris en Tebo rekte al la reĝa palaco. Tie li trovis la reĝinon Jokasta kaj ŝian fraton Kreono.

Reĝo Laio vojaĝis al Delfo por pridemandi la orakolon, kiel la urbo povas liberigi sin de Sfinkso. Sed li ne revenis. Oni diris, ke survoje rabistoj atakis kaj mortbatis lin. Anstataŭ la morta reĝo ekregis Kreono. Edipo paŝis antaŭ la reganton.

„Mi scias pri la plago, kiu la urbon suferigas“, li diris, „mi volas iri al Sfinkso kaj provi solvi ĝian enigmon.“

Kreono kaj Jokasta admiris la kuraĝon de Edipo. Malgaje diris Kreono: „La dioj helpas al la kuraĝuloj. Sfinkso mortigis mian fi-

lon kaj mortigos ĉiun el ni, se ne venos iu, kiu solvos ĝian enigmon. Kaj mi volonte translasos la regadon al tiu, kiu sukcesos venki Sfinkson.“

Jokasta vidis plena de admiro la agopretajn vizaĝtrajtojn de Edipo kaj ne sciis, ke ŝi rigardas sian propran filon.

La loĝantoj de Tebo akompanis Edipon al unu el la sep pordegoj de la urbo. Sed plu iri ili ne kuraĝis.

Edipo grimpis sur la kruta pado supren sur la rokon, sur kiu sidas Sfinkso. Ĝi atendis jam sian sekvan viktimon. Ĝi kunpinĉis la okulojn kaj observis Edipon kun malestima rigardo. „Aŭskultu bone“, sonis el la homa gorĝo nehome dura voĉo:
„Ĝi havas kapon,
kvar gambojn matene,
tagmeze nur du
kaj tri gambojn vespere.
Ju pli da gamboj ĝi uzas,
des malpli da forto havas ĝi.“

Edipo ridetis. Li estis prudenta kaj la enigmo ŝajnis facila por li. „Jen la homo“, li diris, „matene de la vivo la homo rampas kvazaŭ li estus kvarpieda. Tagmeze de sia vivo la homo paŝas rekte sur du gamboj kaj kiam la vespero de l‘ vivo venas, li prenas lambastonon kiel helpilon. Jen la tria gambo.“

„Vi solvis la enigmon!“ kriaĉis Sfinkso kaj ĵetis sin de la roko en la abismon.

Kiam la anoj de Tebo de la urba remparo subite vidis, ke Edipo revenas vivanta kaj sana, ili ekjubilis. Ili festis sian liberiganton, kaj Kreono transdonis al li la tronon. Tiel Edipo fariĝis reganto de Tebo kaj edzinigis la reĝinon Jokasta.

Dum longa tempo Edipo en sia regno regis juste kaj feliĉe. La reĝino naskis du filojn al li, Eteoklon kaj Polinikon kaj du filinojn, Antigona kaj Ismena. Neniu sciis, ke la infanoj de Edipo samtempe estas liaj gefratoj.

Kelkaj jaroj pasis, la knaboj fariĝis viroj kaj la knabinoj damoj. Ĝis finfine venis la jaro de la malfeliĉo, en kiu la pesto disvastiĝis en la reĝolando Tebo. La pestmorto furiozis en la loĝejoj de Tebo, ĝi neniigis tutajn familiojn kaj senlima timo okupis tiujn, kiuj ankoraŭ povis esperi transvivon. Ankaŭ la gregojn sur la paŝtejoj preskaŭ neniigis la pestatako. La paŝtistoj mortis kaj la gregoj preskaŭ formortis. Sur la paŝtejoj, kie iam resonis la muĝado de la brutaroj, estis nun silento kaj morto.

La timskuataj civitanoj iris al Edipo kaj petis lin, ke li forprenu la pereon de iliaj sojloj kaj gregoj. Ili estis konvinkitaj, ke la venkinto kontraŭ Sfinkso troviĝas sub la protekto de la senmortaj dioj.

Edipo konsolis ilin: „Iru senafliktite en viajn loĝejojn. Ankoraŭ hodiaŭ revenos bofrato Kreono el Delfo kun la diro de la orakolo. Ni aŭskultos la ordonojn de la dioj kaj forpelos la peston el nia lando.“

Antaŭ ol la tago pasis, haltis antaŭ la palaco ĉaro kun ŝaŭmkovritaj ĉevaloj. Kreono elsaltis kaj rapidis kun la orakola diro al Edipo. „La orakolo ne promesas rapidan kaj facilan helpon al ni“, li sciigis al la reĝo, ke la murdisto de reĝo Laio laŭdire ankoraŭ vivas en nia urbo, ke la pesto retiriĝos nur tiukaze, se la kulpanto estos punita.

Edipo tuj en la tuta regno sciigis, ke ĉiu, kiu scias ion pri la murdo de reĝo Laio, tuj venu en la reĝan palacon kaj atestu tion. Li vokigis ankaŭ la blindan Tiresion, al kiu la dioj donis la kapablon de la divenado. Tiresion li devis vokigi plurfoje. La profeto rifuzis

veni. Fine knabo kondukis lin al la palaco. Sed Tiresio paŝis tien nur heziteme kaj haltis antaŭ la palaco.

Edipo kuris renkonte al li: „Kunvenu en la palacon, li urĝis in, „ni atendas vian saĝan konsilon.“

„Permesu al mi foriri, reĝo“, petis Tiresio, „se mi ne nomos la kulpanton al vi, tio estos por ni ambaŭ pli bona. Kelkfoje estas pli bone ne scii ion ol scii.“

„Parolu do“, instigis lin Edipo, „estas neniu inter ni, kiu ne volus savi Tebon de la pereo. Vi ne rajtas elturniĝi. Rigardu, la tuta popolo deziras, ke vi parolu.“

„Ne devigu min, reĝo. Prefere permesu al mi silenti“, respondis Tiresio, „terura plago trafis nian patrion, sed pli granda malbono trafus vin, se mi parolus.“

„Bone“, obĵetis Edipo, „ estas jam klare al mi, kial vi ne volas paroli. Ĉu vi eble estas eĉ kunulo de tiuj rabistoj, kiuj murdis la reĝon? Vi estas perfidulo de la lando, kaj se vi ne estus blinda, mi dirus, ke vi mem estas la murdisto!“

Post tiu insulto Tiresio ne pli longe silentis kaj perfidis tion, kion li sciis jam delonge: „Vi volas scii la veron, ĉu? Mi diros ĝin al vi. Ne serĉu la murdiston, ĉar vi mem estas la murdisto. Vi murdis reĝon Laio kaj edzinigis la propran patrinon!“

Edipo ekteruriĝis. Li rememoris pri la malnova profetaĵo. Sed la kolero forpelis la maltrankviligan memoron.

„Kiu elpensis tion?“ li kriis, „ĉu vi, ĉu Kreono? Ĉu vi volas ŝtelire akiri mian tronon per ruzo kaj trompo? Ĉu vi estas freneza?“

„Por vi mi ŝajne estas freneza“, respondis Tiresio, „sed viaj gepatroj rigardis min kiel saĝulon. La tempo montros, kiu pravis, kaj kiu ne volis kompreni.“

Post tiuj vortoj la blinda oldulo forlasis la palacon.

Reĝino Jokasta konsolis la kolerigitan Edipon: „Kial gravu, kion diras Tiresio, ne afliktiĝu pri tio. Mi volas diri al vi ekzemplon, kiel la orakolo povas erari. Ankaŭ mia unua edzo, Laio, iam pridemandis la orakolon kaj ricevis kiel respondon, ke li mortos fare de mano de sia filo. Kaj poste mortis nia ununura filo en la montara soleco kaj Laion murdis rabistoj malproksime de la vojkruco sur la strato al Delfo.“

„Proksime de la vojkruco, ĉu?“ demandis Edipo ekscitite. „Diru al mi rapide, kiel aspektis Laio?“

„Li estis altstatura“, respondis Jokasta, „je la tempioj li estis jam griza kaj liaj trajtoj similis al viaj.“

„Tiresio pravis!“ kriis Edipo terurigite kaj demandis kaj demandis kaj ju pli li eksciis, des pli kaptis lin despero kaj gorĝopremis lin. La onidiro, laŭ kiu rabistoj murdis Laion, solviĝis en nebulon kiel vaporo kaj restis la terura supozo, ke Edipo mem estis la rabisto.

En tiuj tagoj venis al Tebo heroldo el Korinto kun la mesaĝo, ke mortis la reĝo de Korintio. Edipo anstataŭu lin sur la trono. Jokasta demandis la heroldon kiel mortis la reĝo de Korintio. Ŝi eksciis, ke li mortis tre maljuna en paco sur la lito. Aŭkultinte tion, ŝi kuris al Edipo kaj raportis al li ridete, kion ŝi eksciis. „Nu, pripensu“, ŝi diris, „vi turmentas vin kaj intertempe via patro en Korinto mortis pace.“

Edipon maltrankviligis la mesaĝo. Li devis pensi pri la ebria babilaĉulo.

„Tamen mi ne reiros al Korintio“, li anoncis al la heroldo, „tie ankoraŭ vivas mia patrino.“

„Se vi timas, sinjoro, ke via patrino vivas tie“, diris la heroldo, „mi povas trankviligi vin. La reĝo kaj la reĝino de Korintio ne estis viaj gepatroj. Mi mem portis vin iam, kiam vi ankoraŭ estis infaneto, al Korinto.“

„Kaj de kie vi portis min tien?“ mirigite demandis Edipo.

„Maljuna paŝtisto, kiu paŝtis la gregojn de la reĝo de Tebo, transdonis vin al mi en la montoj.“

Kun krio de frenezulo Edipo kuris haste el la palaco. Neniu dubo eblis, la orakolo terure plenumiĝis. Li kuris tra la urbo kaj petis la civitanojn, ke ili mortigu lin por liberigi la urbon de la plago. Sed la tebanoj bedaŭris sian reĝon, ili ne malamis lin. Edipo retrokuris en la palacon; li decidis puni sin per propra mano. En la kastelo li trovis plorantajn servistinojn. Plenaj de teruriĝo kondukis la junulinoj Edipon en la ĉambron de la reĝino. Jokasta pendumis sin. Edipo ĵetis sin sur la mortulinon, tiris el ŝia vesto oran pinglon kaj per pikado blindigis siajn okulojn.

Jam blinda li vokis Kreonon: „Prenu la tronon kaj punu min per ekziligo!“

Kreono provis reteni la malfeliĉan Edipon en Tebo. La pesto jam malfortiĝis kaj trankvilo kaj bonfarto komencis reveni en la urbon. Edipo ne lasis konvinki sin. Kun migrobastono li foriris el Tebo. Nur lia plej maljuna filino Antigona akompanis lin. Nur ŝi ne volis forlasi sian patron dum ties malfeliĉo.

Baldaŭ konis tuta Grekio la du strangajn migrantojn. La blindan maljunulon Edipo kaj la junan belulinon Antigona, kiu kondukis lin. Ŝi almozpetis pri pano por sia patro kaj zorgis pri li. Tiel ili migris kune kaj serĉis la boskon de la venĝodiinoj, de la Erinioj. En la bosko de la Erinioj Edipo laŭ la orakolo trovos pacon.

Intertempe la filoj de Edipo, Eteoklo kaj Poliniko, plenkreskiĝis kaj ambaŭ aspiris la tronon de Tebo. Ilia konkurado ne estis prosperiga por la lando. Plena de zorgo observis Kreono la kverelon en la reĝa gento kaj konsilis al la du junuloj regadi alterne. La fratoj konsentis tion. Dum unu jaro regu Poliniko kaj dum la sekva jaro Eteoklo. Sed Eteoklo sukcesis dum sia regado tiom fortigi sian potencon, ke lia frato devis fuĝi de li.

Eteoklo fariĝis reĝo en Tebo kaj Poliniko komencis eksterlande kolekti grandan armeon por konkeri la tronon per perforto.

Ambaŭ fratoj estis tiom sangvinaj kaj nealireblaj kiel ilia patro. Komenciĝis milito inter ili. Ambaŭ volonte havus Edipon je sia flanko. Orakolo antaŭdiris, ke venkos tiu, kun kiu Edipo sin aliancos. Tial ili komencis serĉi la patron kaj je la unua fojo dum longa tempo ili interesiĝis pri tio, kie li migradas.

Edipo je tiu tempo estis proksima de Ateno. Li sentis la proksimiĝon de la momento, kiam li trovos pacon. Li sidiĝis kun Antigona je la rando de bosko kaj ripozis. En tiu momento eksonis survoje la klakado de ĉevalaj hufoj kaj aperis grupo de ĉasistoj kun Tezeo, la reĝo de Ateno, en la fronto. Ili revenis de la ĉasado en la urbon. Tezeo tuj ekkonis Edipon, saltis de la ĉevalo kaj salutis lin.

„Kompatinda Edipo, li diris, „mi konas vian sorton kaj volonte helpus al vi. Venu kun ni al Ateno. Tie vi povos pasigi en paco

vian maljunecon. Baldaŭ komenciĝos la frida nokto kaj vi ne povos tranokti ĉi tie en la bosko de la Erinioj."

Aŭdinte, ke li troviĝas en la bosko de la Erinioj, ĝojis Edipo. Li estis je la celo de sia vojaĝo. Tial li respondis trankvile kaj mallaŭte: „Mi dankas al vi, reĝo, sed mi estas je la celo. Baldaŭ mi iros en la ombran regnon. Se vi volas helpi al mi per lasta servo, tiukaze ordonu al servisto, ke li portu novan veston al mi, por ke mi ne devu saluti la solenan momenton en la polvokovrita trivita vesto."

Tezeo sendis serviston al Ateno, por ke li alportu novajn vestojn kaj sidiĝis apud Edipo. Apenaŭ la servisto estis malaperinta inter la arboj, eksonis denove la klakado de hufoj kaj antaŭ Edipo saltis lia filo Poliniko de la ĉevalo. Lastfine li trovis la patron. Li surgenuiĝis antaŭ li, akuzis sian fraton Eteoklo, kiu forpelis lin de la trono kaj petis Edipon, ke li militiru kun li kontraŭ Tebo.

„Dum jaroj vi ne pensis pri mi", respondis Edipo la plendojn de la filo, „sed pro potencavido mi helpu al vi je la fratmurdiga batalo. Aŭskultu la patron, kiu staras antaŭ la pordego de la submondo. Se vi militmarŝos kun armeo kontraŭ Tebo, trafos vin tio, kion vi deziras al via frato. Iru for de ĉi tie, ankaŭ miaj blindaj okuloj vidas la sangon de via frato sur via glavo."

Malice Poliniko saltis sur la ĉevalon kaj galopis sen saluto kun sia akompanantaro reen al la armeo.

Eteoklo elsendis Kreonon al sia patro por konvinki lin reveni al Tebo. Kreono alvenis Atenon en la sama momento, kiam Poliniko kolere forlasis plengaplope la patron. Poliniko preterrajdis Kreonon sen rekoni lin. La vidaĵo de Poliniko esperigis Kreonon, ke li gajnos Edipon por Eteoklo. Li iris al la bosko de la Erinioj kaj sciigis al Edipo la peton de Eteoklo.

Sed Edipo nur deturnis sin. En la lastaj momentoj de sia vivo li divenis la terurajn sekvojn de la teba milito kaj ne plu volis enmiksiĝi en mondajn aferojn.

Tial ankaŭ Kreono foriris sen atingi la celon.

Kiam la servisto revenis el Ateno, Edipo surmetis la festan veston. Li adiaŭis sin de ĉiu kaj petis Tezeon ebligi la hejmiron de Antigona al Tebo. Poste estis kvazaŭ liaj blindaj okuloj denove vidus, rekte kaj per firmaj paŝoj li iris sola, sen kondukanto, en la boskon de la Erinioj. Profunde en la densejo malfermiĝis antaŭ li eniro en la submondon. Edipo malaperis, kaj malantaŭ li fermiĝis mallaŭte la tero.

Lian kadavron oni trovis neniam.

Antigona revenis al Tebo. La armeo de Poliniko jam proksimiĝis al la urbo. Ses kuraĝaj armeestroj eksieĝis ses pordegojn de Tebo, la sepan eksieĝis Poliniko mem.

Eteoklo timis longe daŭrantan sieĝon, tial li grimpis sur la remparon kaj vokis: „Por kio, Poliniko, mortu militistoj sur ambaŭ flankoj por batalo, kiun ni ambaŭ povus entrepreni mem? Mezuru viajn fortojn en batalo kontraŭ mi! Se vi falos en la batalo, foriru ankaŭ via armeo. Se falos mi, vi fariĝos sen milito reĝo de Tebo kaj Tebo malfermos la pordegojn por vi.“

Poliniko akceptis la proponon de la frato. Ambaŭ armeoj decidis militpaŭzon kaj kolektiĝis antaŭ la remparoj. Ekscitite kverelis la militistoj, kiu venkos. La armitaj Eteoklo kaj Poliniko renkonte iris unu al la alia kaj sur la batalkampo komenciĝis, rigardate de la armeoj, la fratmurda batalo.

Fajfante flugis la lancoj kaj depuŝiĝis de la antaŭtenataj protektoŝildoj. Dentgrincige kaj instigite de siaj militistoj, la fratoj jetiĝis reciproke unu kontraŭ la alia. Sed la ŝildoj kaptis ĉiujn batojn. Kiel unua Eteoklo ne sufiĉe atentis kaj lasis kruron neprotektata. Tuj Poliniko trafis lin per bone celita lanca puŝo sur la tibion. La armeo de Poliniko jubilis. La vundita Eteoklo subigis sian doloron kaj prenis la glavon. Ankaŭ Poliniko eltiris sian glavon kaj la batalo estis daŭrigata. Fine Eteoklo sukcesis malkovri nudan flankon de la frato; li puŝis kaj trafis lin mortige. Poliniko renversiĝis antaŭ la frato.

Eteoklo kliniĝis super la mortantan Polinikon. Tiu ankoraŭfoje malfermis la okulojn, kolektis siajn lastajn fortojn, levis la glavon kaj trapikis la fraton. Ambaŭ fratoj eligis kune siajn animojn.

Ambaŭ fratoj estis mortaj, sed inter la armeoj eksplodis kverelego. La armeo de Tebo rigardis Eteoklon kiel senduban venkinton, sed la alia armeo estis konvinkita, ke Poliniko venkis. La tebanoj kunportis siajn armilojn. Sed la armeo de Poliniko neglekteme venis sen armiloj. Kiam la batalo komenciĝis, la tebanoj havis avantaĝon. Ili turnis siajn lancojn kaj glavojn kontraŭ la malamiko kaj al la armeo de Poliniko restis nur senorda retiriĝo, kiu baldaŭ ŝanĝiĝis en sovaĝan fuĝon. La militistoj de Tebo revenis kiel venkintoj kaj kun granda predo en sian liberigitan urbon.

Kreono denove ekregis. Eteoklo falis por la patrio. Tial Kreono entombigis lin kun reĝaj honorigoj. Sed Poliniko, kiu militiris kun armila perforto kontraŭ Tebo laŭ la ordono de Kreono restu sen tombo, li kuŝis ĉe la remparoj kiel voraĵo por vulturoj kaj vagantaj hundoj. Sed tiu, kiu tamen kuraĝus entombigi lin, estu punita per mortigo. Ĉe la kadavro de Poliniko Kreono postenigis gardistojn, por ke neniu povu agi kontraŭ la ordono.

Antigona ribelis kontraŭ la malhumana verdikto de Kreono. Kiel la animo de Poliniko trovu pacon, se la korpo ne estos entombigita?

„Fratino“, diris Antigona al Ismena, „nia frato kuŝas morta antaŭ la urbomuroj. Venu kun mi, ni entombigu lin antaŭ ol la vulturoj voros lin.“

„Ĉu vi ne scias, ke tio rezultigos mortopunon?“ Ismena demandis teruriĝite.

„La morto por ago, kiu plaĉas al la dioj kaj al la homoj, estas bela morto“, respondis Antigona.

„Ni ne povas fari ĉiam nur tion, kion ni pensas bona“, rifuzis timeme Ismena. „Kreono estas potenca, vi ne povus eskapi de li.“

„Mi de li jam eskapis“, diris Antigona, „li povas mortigi min, ĉar mi obeis la humanecon kaj la amon de fratino. Sed la humanecon kaj la amon li ne povas mortigi. Se vi ne volas iri kun mi, mi iros sola.“

Antigona ne povis konvinki la fratinon. En senstela nokto ŝi ŝteliris sola el la palaco kaj antaŭ la urbon. Malsupre ĉe la remparo kuŝis la kadavro de Poliniko kaj apud ĝi ekdormis la gardisto. Mallaŭte trenis Antigona la fraton al la rivero, lin lavis kaj kovris per tero. Ankoraŭ antaŭ la matena krespusko ŝi reiris al Tebo.

La frideto de la mateno vekis la gardiston el lia dormo. La loko, kie kuŝis la mortigito, estis malplena. La gardistaro sciis, ke minacos ilin la kolero de Kreono. Tial ili traserĉis fervore la ĉirkaŭon, ĝis kiam ili trovis la spuron, kie Antigona trenis la fraton. Ili sekvis la spuron al la rivero kaj ekvidis la novan tombon, kiu ankoraŭ ne estis preta. Rapide ili balais la teron de la

kadavro kaj kaŝiĝis malantaŭ proksima monteto. Ili atendis la revenon de la deliktinto, kiu finos sian verkon.

Ili atendis dum la tuta tago, kaj kiam krepuskiĝis, ili rimarkis mornan figuron. Sentime Antigona revenis al la tombo de sia frato. Ŝi konsterniĝis, kiam ŝi vidis, ke la kadavro ree kuŝas nuda, sed ŝi ne hezitis. Per nudaj manoj ŝi kolektis teron kaj denove komencis kovri la fraton. Jen subite saltis la gardistoj el sia kaŝejo, kaptis Antigonan kaj kondukis ŝin al Kreono. Ŝi ne defendis sin kaj ankaŭ ne kontestis sian agon.

„Kiel vi povis havi la kuraĝon misatenti mian ordonon?“ vokis ekscitite Kreono.

„La ordonon ne donis Zeŭso, sed reĝo“, respondis Antigona elkore. „Ĝi tial ne validas pli ol amo kaj humaneco. Ekzistas leĝoj, kiuj ne eliras de la reĝoj, sed estas pli gravaj kaj pli daŭraj.“

„Tion pensas nur vi!“ kriis Kreono.

„Ne“, diris Antigona, „tion pensas ankaŭ la popolo de Tebo, sed antaŭ vi ĝi silentas.“

„Kaj ĉu vi ne hontas agi alie ol la aliaj ĉi tie?“

„Mi ne hontas, ke mi honoras la mortan fraton. La morto donas al venkitoj kaj venkintoj la saman rajton. Kaj pli ol la vivon vi ne povas preni de mi.“

„Vi parolas kuraĝe, via kuraĝo sur la vojo al la submondo ne forlasu vin! Gardistoj al mi!“

Armitoj alkuris, kaj Kreono ordonis al ili konduki Antigonan en senhoman regionon kaj tie enmasoni ŝin vivanta en rokan kavernon. La sbiroj kun Antigona jam estis survoje, kiam Hajmono, la filo de Kreono, eksciis tion. Antigona estis lia fianĉino, sed pri tio la senkompata Kreono ne okupiĝis. Hajmono rapidis el la palaco por malhelpi je la punloko la verdikton de la patro.

Ankaŭ la blinda profeto Tiresio venis en la palacon kaj avertis la reĝon pro ties kruela decido. Antaŭsignoj anoncis al la maljunulo, ke la reĝan genton minacas aĉa sorto. Tiresio foriris kaj Kreono pripensis la aferon. Subite li ektimis la punon de la dioj. Li ordonis rapide enjungi la ĉevalojn kaj saltis mem sur la ĉaron kaj veturigis ĝin rapide kiel la vento al la kaverno. Sed jam survoje li eksciis la teruran mesaĝon: Antigona pendumis sin en la kaverno per sia vualo, kaj lia filo antaŭ la morta fianĉino traboris sin per glavo. Kiam la edzino de Kreono eksciis tion, ŝi decidis morti suicide.

Kiom volonte Kreono ĉion rebonigus kaj revekigus la mortintojn en la vivon! Sed tia estas la sorto de tiranaj reĝoj. Per ununura decido ili povas neniigi feliĉon kaj vivon de siaj subigitoj, sed per neniu decido ili povas redoni la detruitan feliĉon kaj revivigi la mortintojn. Malgaje vivis Kreono ĝis Morto kondukis ankaŭ lin en la submondon.

*Originalo: OIDIPUS A ANTIGONA*

# FILEMONO KAJ BAŬCIS

En la malnovaj tempoj Zeŭso ŝanĝiĝis en teran loĝanton, li grimpis de Olimpo malsupren kaj esploris, ĉu la homoj estas bonaj aŭ malbonaj. Survoje akompanis lin Hermeso, la heroldo de la dioj.

Dum sia pilgrimado la dioparo haltis iam en freŝa valo. Je la flankoj lumis blankaj kortegoj kaj riĉaj bienoj kaj el la paŝtejoj eksonis muĝado kaj blekado de grasaj gregoj. La suno jam retiriĝis malantaŭ la nubojn, kaj tial diris Hermeso: „En tia prospera valo ni eble povus tranokti. Ni iru al iu bieno kaj petu pri tranokteblo."

Zeŭso kapklinis jesige kaj Hermeso iris al la sekva bieno. Post certa tempo li revenis.

„Ili forpelis min", li lamentis. „Por vagabondoj ni ne havas tranoktejon", ili diris.

„Ni iros do al alia", parolis paceme Zeŭso. „Riĉaj bienoj ekzistas sufiĉe. Eblas, ke ili havas pli da kompato al lacaj migrantoj."

Hermeso tial iris al aliaj kaj atingis nur la saman. Apenaŭ li diris, kion li volas, oni diris, ke li malaperu de la korto kaj pelis la hundojn al li. Diversloke oni eĉ ne malfermis la pordon. En la tuta vilaĝo Hermeso ne trovis eĉ domon, kie oni akceptus lin sub la tegmento.

Li revenis al Zeŭso kaj rakontis al li, kio okazis: „Gvidanto de la dioj, loĝas ĉi tie nur malbonaj homoj. Ili ne havas kompaton kun vojaĝantoj kaj ne konas gastamikecon. Ĉie ili elpelis min kaj ferme riglis la pordon antaŭ mi.

„Kaj ĉu vi vere estis ĉie?“ ridete diris Zeŭso.

„Ĉie, nur ne en la kabano de povruloj tie ĉe la arbaro. Ĝi estas kovrata nur per pajlo kaj fragmito. Tie loĝas certe la plej povraj homoj el la tuta vilaĝo. Al tiuj mi ja ne iru, tio estus same vana.“
„Iru ankaŭ tien“, diris Zeŭso, „iru kaj provu peti pri tranokteblo.“

En la kabano vivis la geolduloj Filemono kaj Baŭcis. Ili vivis tie jam ekde la juneco kaj oldiĝis tie en unueco kaj amo.

Hermeso ekvidis la maljunulon sur la korto. Li disrompis sekajn branĉojn en pecojn. Kiam li eksciis, ke kompatindaj vojaĝantoj serĉas tranokteblon, li diris: „Tio, kion ni havas, ni donos volonte ankaŭ al vi. Sed multon ni ne havas, ĉar ni estas povraj. Mi ne scias, mi vere ne scias, ĉu nia gastamikeco plaĉos al vi ĉu ne.“

Hermeso dankis al la maljunulo kaj alkondukis Zeŭson. Ili iris kun klinitaj kapoj tra la malalta pordo en la kabanon. Filemono salutis ilin sincere kaj tuj starigis zorgeme benkon por ili. La oldulino Baŭcis metis puran kovrilon sur la benkon kaj poste rekuris al la fajrejo kaj incitis blovante per milda spiro la bruletantan ardon kaj pendigis super la flamo malgrandan kaldronon kun akvo. Filemono intertempe detranĉis en ilia ĝardeno brasikon kaj portis ĝin al la oldulino. Per dudenta forko li prenis de nigriĝinta trabo lardopecon kaj Baŭcis pretigis la manĝon.

La tablo estis trivita kaj kliniĝis al flanko. Unu el la tablokruroj estis pli mallonga. Baŭcis metis sub ĝin rompitaĵon de poto kaj ŝovis al la tablo simplan kuŝilon. Ŝi kovris ĝin per tuko, kiun ili uzis nur je festtagoj kaj ŝi invitis manĝi la gastojn. Baŭcis viŝadis per odora mento la tablon. Antaŭ la gastoj vaporis en argilaj pelvoj la manĝo. Ekodoris fumaĵita viando kaj acida brasiko, kreno kaj kremfromaĝo. Krome Baŭcis aldonis ankaŭ ovojn kuiritajn en

varmega cindro kaj cikorian salaton. Filemono plezurigis la vojaĝantojn dum interparolado kaj cerbumis pri tio, kion li ankoraŭ povus doni al ili. Li foriĝis post certa tempo el la loĝoĉambro kaj reaperis kun pomoj, nuksoj kaj kun vinberoj, kiuj maturiĝis ĉe la kabano kaj kun korbeto kun figoj. En la mezon de la tablo ili metis dolĉan mieloĉelaron.

Zeŭso kaj Hermeso manĝis kun apetito kaj ĝojis pri la bonkoraj geolduloj. Filemono miksis en pura argila kruĉo vinon kun akvo kaj verŝis la trinkaĵon en pokaletojn el faga ligno.

„Ne estas eksterordinaraĵo“, senkulpigis sin Filemono, „ne tia, kian oni kutime manĝas en la bienoj kaj en la urboj.“

„Ne senkulpigu vin, Filemono“, diris Zeŭso, „la vino estas dolĉa, se la gastigantoj estas afablaj.“ Filemono enverŝis duan kaj trian fojon en la pokaletojn kaj akvon en la mikskruĉon kaj miris, ke la vino en la kruĉo ne malpliiĝis. Pro tiu miraklo li alvokis la oldulinon Baŭcis.

„Dioj estas en nia kabaneto“, kun timo flustris Baŭcis.

Kaj Filemono kaj Baŭcis kliniĝis antaŭ la raraj gastoj kaj petis pri graco.

„Dioj, pardonu al ni la magran regaladon“, ili flustris kun tremantaj lipoj.

Ili elkuris en la korton, kie ĉirkaŭkuradis ilia ununura ansero. Ili volis kapti ĝin kaj rosti por la dioj. Sed la ansero divenis, kio atendas ĝin kaj fuĝis de ili de angulo al angulo ĝis kiam ĝi forkuris de la senspiraj geolduloj tra la malfermita pordo en la kabaneton al la dioj, kvazaŭ ĝi esperus savon de ili.

Zeŭso per mansigno haltigis Filemonon kaj postulis de li, ke li ne mortbatu la anseron.

„Ni estas dioj, ni iris malsupren sur la teron kaj neniu akceptis nin sub sia tegmento. Vi, oldulĉjo Filemono kaj vi, oldulinjo Baŭcis, bonvenigis kaj gastigis nin. Nun lasu ĉion kaj grimpu kun ni sur la deklivon de la monteto.“

Filemono kaj Baŭcis obeis la diojn kaj postlamis helpe de lambastonoj supren sur la deklivon super la valo. Ili grimpis longe distancan vojon sur ŝtona pado kaj rigardis malantaŭ sin. La herbejaj deklivoj, kortegoj kaj bienoj malaperis sub akvo kaj la vento batis la ondojn al la bordo de nova lago. El marĉo de malprofundaj sablobenkoj rapide kreskis fragmito kaj ĉirkaŭe limigis la akvan surfacon. La lago memorigis per nenio plu la homajn loĝejojn, kiujn ĝi voris.

La geoldulaj okuloj plenigis sin per larmoj. Ili memoris siajn konatojn. Ĉiujn inundis la ondoj. Nur la kabaneto de Filemono kaj Baŭcis staris ĉe la lago kiel kabaneto de fiŝistoj. La maljunuloj rigardis kortuŝite la pajlotegmenton kaj la konatajn murojn. Sed subite disfaldiĝis la tegmento kiel florkaliko kaj kreskis el ĝi sveltaj marmoraj kolonoj kaj kreskis kaj kreskis alten. La ligno ŝanĝiĝis en marmoron kaj la pajlofaskoj ekbrilis ore. Anstataŭ la aĉa ligna pordo ekbrilis en la vespera krepusko cizelita kaj ornamita pordo kaj antaŭ la pordaj duonoj svinge leviĝis el la tero blanka ŝtuparo, el herbejo la strio de ŝaŭma fontano, kiu estas ŝtonigita. Ĉe la lago jam ne plu kaŭris aĉa kabaneto, sed tie staris pompa templo.

„Bravaj Filemono kaj Baŭcis“, Zeŭso alparolis ilin ambaŭ, „mi volonte plenumos al vi deziron por via bonkoreco kaj gastamikeco. Deziru al vi tion, kio plaĉas al vi.“

Filemono kaj Baŭcis ne bezonis longan tempon por interkonsiliĝi. Ili komprenis sin eĉ sen vortoj.

„Dioj“, diris Filemono, „permesu al ni iĝi la gardistoj kaj servistoj de tiu belega templo, kaj kiam venos la tempo, ni volonte mortus je la sama tempo, ĉar la tutan vivon ni jam vivis en konkordo kaj fidelaj unu al la alia, por ke nek mi vidu la tombon de mia edzino nek ŝi devu entombigi min.“

La dioj plenumis la deziron de la geolduloj. Filemono kaj Baŭcis fariĝis gardistoj de la templo, kaj prizorgis ĝin ĝis la alveno de la tago, kiam ili devis adiaŭ sin de la vivo. Ili staris kune antaŭ la templo en suna loko kaj rememoris tion, kion ili travivis. Jen Filemono vidis, kiel kreskas folio el Baŭcis. Kaj Baŭcis rimarkis, ke Filemo perdiĝas en vualo de verdaj folioj. Eliris de ili branĉo post branĉo kaj ŝanĝiĝis en kronon de arbo, plena de branĉoj kun verdaj folioj. La brakoj de Filemono ŝanĝiĝis en branĉojn kaj lia korpo fariĝis trunko de arbo kaj la disetenditaj branĉoj plenigis sin per branĉetoj.

„Adiaŭ“, vokis Filemono.

„Adiaŭ“, diris Baŭcis kaj el iliaj buŝoj elkreskis samtempe branĉetoj.

Tiel ŝanĝiĝis Filemono en kverkon kaj Baŭcis en tilion. Ankaŭ post la morto ili estis proksimaj unu al la alia, kaj kiam blovis vento, kareseme tuŝis la branĉoj unu la alian.

*Originalo: FILEMON A BAUCIS*

## EROSO KAJ PSIKO

Antaŭ multegaj jaroj vivis reĝo kaj reĝino. Ili havis tri infanojn. La plej maljuna estis bela, la pli juna estis eĉ pli bela, sed la plej bela, super ĉiuj mezuroj bela, estis la plej juna filino Psiĥo.

El malproksimaj landoj venis homoj, ili velis trans marojn kaj transpaŝis neĝokovritajn montarojn por vidi la belan Psiĥon.

Ili admiris ŝin, kiam ŝi venis el la palaco, ili surgenuiĝis antaŭ ŝi kaj flustris: „La diino de la belo kaj amo, Afrodito mem, forlasis la Olimpon kaj venis al ni. Tiel bela ne povas esti filino de homaj gepatroj."

„Aĥ, tio ne estas la diino Afrodito", diris aliaj, „naskiĝis nova diino, pli bela kaj pli potenca ol Afrodito."

Kaj ili surgenuis antaŭ ŝi kaj adoris ŝin kaj alportis oferojn al ŝi. Kiam Psiĥo iris sur la straton, vigliĝis la stratoj per homoj kiel ĉe festo. La homoj kunkuris kaj disĵetis florojn sur ŝian vojon.

En la forlasita templo de la diino Afrodito plektis araneoj siajn retojn, la cindro sur la oferaj altaroj jam delonge fridiĝis kaj neniu alportadis novajn oferojn. La ŝtupoj de la temploj estis prikreskataj per herboj kaj fiherboj. Ĉiuj honoris la reĝan filinon Psiĥo kaj ne plu pensis pri la diino Afrodito.

La kolera Afrodito observis kiel ŝia famo paliĝas kaj la homoj komencis konsekri novajn templojn al homa filino.

Tiun hontigon ŝi ne povis toleri kaj tial ŝi vokis sian filon Eroso, kiu helpu al ŝi puni la arogantan princinon. La filo de la diino, kiu

havis orajn flugilojn, tuj disetendis ilin kaj flugis sen hezito al sia patrino.

Enmane li tenis pafarkon kaj lia sagujo estis plena de sagoj.

La sagoj estis nevideblaj por homaj okuloj, sed se ili trafis iun, tiun kvazaŭ flamigis amo.

La amo alportis al kelkaj ĝojon kaj al aliaj zorgojn kaj doloron.

„Malsupre surtere vivas la reĝa filino Psiĥo“, diris Afrodito al Eroso, „ŝi estas tiel aroganta, ke ŝi permesas, ke oni adoru ŝin kiel diinon. Helpu al mi puni ŝin. Streĉu vian arkan tendenon kaj trafu ŝin per sago en la koron. Sed via sago ne alportu ĝojon al ŝi, sed nur suferon. Ŝi prenu la plej aĉan viron, kiun portas la tero, kiel edzon. Dum ŝiaj turmentoj kaj ŝia humiligo neniu adoros ŝin kaj sur miaj altaroj denove ekbrulos la fajro kaj la odoro de la oferoj grimpos denove en la ĉielon.“

Obeeme Eroso kapjesis kaj forflugis por plenumi tion, kion la patrino ordonis al li.

Li kaŝis sin en arbokrono antaŭ la reĝa palaco kaj tiris sagon el la sagujo.

Ĉirkaŭ la palaco ĉie staris aroj de migrantoj, kiuj atendis la elvenon de la bela Psiĥo.

Ne daŭris longan tempon kaj ŝia beleco ekbrilis enmeze de la atendantoj kiel sunobrilo. Eroso lasis sinki la manon kun la pafarko kaj rigardis kiel paralizito al Psiĥo. Poste li remetis la sagon en la sagujon kaj forflugis. Je la unua fojo li ne obeis sian patrinon Afrodito.

Kvankam Psiĥon ĉiuj honoris kaj admiris, ŝi ne estis feliĉa. Ŝiaj malpli belaj fratinoj jam geedziĝis kaj transloĝiĝis al siaj edzoj. Sed Psiĥon neniu petis pri geedziĝo, ĉiuj nur adoris ŝin. La reĝo divenis, ke la dioj verŝajne estas koleraj pri lia filino kaj ordonis pridemandi la orakolon kion fari.

La orakolo diris: „Vestu Psiĥon per mortula vesto, tio estos ŝia fianĉa robo. Konduku ŝin sur la pinton de la roko malantaŭ la palaco. Tie ŝia fianĉo venos al ŝi. Li ne estas homdevena kaj kapablas fari kruelaĵojn."

La reĝo aŭdis la orakolan diron kaj ekploris. Lia plej ŝatata kaj plej bela filino ne estis naskita por homa amo, sed monstro ŝin forkondukos de la dezerta roko.

Tamen li ne kuraĝis spiti la rekomendon de la dioj.

Li ordonis pretigi funebran manĝon, li kunvokis muzikantojn kaj ordonis al ili ludi la plej malgajajn kantojn.
La filinon li vestigis kvazaŭ por la tombo.

Kiam la torĉoj estingiĝis kaj silentiĝis la kantadoj, Psiĥo je lasta foĵo paŝis el la palaco.

La reĝo, la reĝino kaj la tuta popolo akompanis ŝin kun larmoj kaj veplenaj lamentoj al la roko malantaŭ la palaco.

Sur la rokan pinton ŝi grimpis sola. Ŝi sidiĝis, larmoj pro timo fluis trans ŝiajn vangojn kaj ĉirkaŭ ŝi ŝvebis mornaj grizaj nuboj. Jen subite forpelis la softa vento Zefiro la nubojn, ĉirkaŭbrakis Psiĥon delikate kaj forportis ŝin de la altaj rokoj en valon plenan de odorantaj floroj kaj freŝaj herboj. Ĝi sekigis ŝiajn larmojn kaj Psiĥo ĉirkaŭrigardis.

Antaŭ ŝi susuris flustre bosko kaj en la ombro de la arboj briletis kristalklara fonto. Proksime de fonto staris pompa palaco, la muroj estis el martelita arĝento, la tegmento el oro kaj eburo. Timeme Psiĥo proksimiĝis al la palaco. La pordoj estis malfermitaj, bunta luma brilo iris el ili. La plankoj de la palaco estis ornamitaj per juveloj kaj ludadis ĉiukolore. „Sed kiu loĝas en tiu majesta palaco?“ pripensis Psiĥo. Ŝi grimpis sur la unuan ŝtupon de la ŝtuparo, poste sur la duan kaj la trian, ŝi kuris supren sur la ŝtuparo kaj rigardis observeme en la halon, ŝi ĉirkaŭrigardis kaj enpaŝis. Ŝi iris tra malplenaj ĉambroj kaj trovis neniun. Kiam ŝi rigardis valoregajn vazojn kaj marmorstatuojn, eksonis la voĉo de nevidebla estaĵo: „Estu bonvena, Psiĥo, en mia palaco. Ĉio, kion vi vidas ĉirkaŭe, apartenas al vi. Se vi havas deziron, simple diru ĝin. Miaj servistoj plenumos ĝin al vi.“

Psiĥo deziris bani. Apenaŭ ŝi elparolis la deziron, preparis nevideblaj manoj jam banejon al ŝi. Post la banado ŝi trovis tablon kovritan per la plej delikataj manĝoj kaj trinkaĵoj. Dum ŝi manĝis, surprizis ŝin nevidebla kantisto per kantoj kaj nevideblaj muzikistoj per muziko. Ŝi aŭskultis la ĉarman muzikon kaj la kantadon ĝis superfortis ŝin laceco. En la apuda ĉambro ŝi trovis liton kun jam refaldita litaĵo.

Laca ŝi sternis sin, sed ne povis endormiĝi. Ŝi cerbumis pri la sorĉopalaco kaj la edzo, kiun la orakolo anoncis al ŝi. Kaj poste ŝi denove pensis pri la gepatroj, kiujn turmentas duboj.

Krepuskiĝis kaj la krepusko ŝanĝiĝis en tenebron. En la malhelo Psiĥo perceptis brueton. Iu, kiun ŝi ne povis vidi en la tenebro, venis al ŝia lito kaj parolis tute proksime ĉe ŝi: „Mi estas via edzo, Psiĥo“, li diris, „sed ne timu min. Nenio mankos al vi, pri tio miaj nevideblaj servistoj zorgos. Sed mian aspekton vi rajtos rigardi neniam. Tial mi venos nur nokte al vi, kaj nur en la tenebro vi povos paroli kun mi.“

La voĉo de la stranga edzo estis kara kaj klara, kaj Psiĥo ĉesis timi. Ŝi promesis, ke ŝi neniam provos rigardi la aspekton de la nekonato, kaj ke ŝi restos ĉe li.

Dum la tagoj vidis Psiĥo en la pompa palaco eĉ ne unu homon, kaj ŝia ununura konsolo estis, ke ŝi vespere renkontos sian edzon.

La reĝo kaj la reĝino estus feliĉaj, se ili scius, kio okazis al ŝia filino. Ili pensis pri la orakolo kaj imagis, ke Psiĥon disŝiris malica drako. Ankaŭ la fratinoj aŭdis pri la sorto de la plej juna princino, kaj ili iris en la reĝan palacon por konsoli siajn malgajajn gepatrojn.

En tiu nokto diris la nekonata edzo al Psiĥo: „Kara Psiĥo, minacas vin proksima danĝero. Morgaŭ viaj fratinoj grimpos sur la altan rokon, ili vokos vin kun larmoj kaj lamentoj. Eble vi aŭskultos iliajn veplenajn lamentojn, sed vi ne rajtos respondi al ili.“

Antaŭ la okuloj de Psiĥo aperis la bildo de ŝia malproksima hejmo, ŝi komencis plori kaj petis kaj petegis sian edzon, ke li permesu al ŝi inviti la fratinojn, ke ŝi sciigos al ili, ke ŝi bonfartas, kaj ke poste ŝiajn gepatrojn ne plu turmentos afliktoj pro la perdita filino. Ŝi petis kaj petegis, ĝis ŝia edzo ne plu kontraŭdiris ion. Li permesis inviti kaj pridonaci la fratinojn, sed li malpermesis, ke ŝi diru la veron pri sia edzo. Psiĥo dankis al li kaj promesis ĉion. Ŝi ĝojis post tiom longa tempo revidi la fratinojn.

Je la sekva tago la fratinoj grimpis sur la pinton de la roko. Tie ili lamentis kaj vokis Psiĥon laŭ ties nomo. Psiĥo aŭskultis ilin kaj ordonis al la softa vento Zefiro porti ilin al la palaco. Zefiro etendis siajn travideblajn flugilojn kaj forportis la du fratinojn de la roko. Psiĥo ĉirkaŭbrakis kaj eldemandis ilin, ŝi rakontis kaj feliĉe ridis. Ankaŭ la fratinoj ridis, sed ĉe la ekvido de la pompa palaco

ili nur ridetis plu. Kiam Psiĥo kondukis ilin tra la ĉambroj, kaj kiam ili paŝis trans oron kaj juvelojn, ankaŭ la rideto foriĝis de iliaj vizaĝoj. Psiĥo ordonis al la nevideblaj manoj, ke ili pretigu banejon kaj regale kovru la tablon.

La fratinoj banis, manĝis manĝaĵojn, kiujn ili gustumis ankoraŭ neniam kaj trinkis trinkaĵojn de nekonata delikateco, kiujn ili trinkis ankoraŭ neniam. Palaj pro envio ili demandis: „Kaj kiam vi montros al ni vian edzon?"

Psiĥo memoris pri la konsilo de sia edzo kaj ne respondis. La fratinoj urĝis ŝin, mokis kaj ne ĉesis demandi. Psiĥo volis liberigi sin de la neagrablaj demandoj kaj tial ŝi diris tion, kio ĝuste venis en ŝian kapon: „Mia edzo ankoraŭ estas juna. Li ĉasas bestojn dum la tuta tago, tial vi ne povas vidi lin."

Haste ŝi pridonacis la fratinojn per oro kaj juveloj, alvokis Zefiron, kaj tiu reportis ilin.

La fratinoj akceptis la donacojn de Psiĥo, sed ili ne ĝojis pri ili. Turmentis ilin la envio. La plej maljuna fratino diris: „Kiun meriton Psiĥo havas, ke ŝi vivas en tiom da superfluo kaj havas nevideblajn servistojn kiel diino? Ja kion havas mi? Avaran edzon. Ĉiun etan moneron li dekfoje turnas antaŭ ol li elspezas ĝin, kaj la tegmentajn trabojn li,nur pro avaro, plej prefere lasus putri."

„Kaj kia estas edzo mia?" diris la dua fratino. „Li estas maljuna kaj malsana. Li neniam eliras ĉasi. La tuta domo odoras je medicino kaj herbaj trinkaĵoj. Kaj ĉe Psiĥo ĉio odoregas laŭ multekostaj oleoj. Ĉu ni ne estas pli aĝaj ol Psiĥo? Kial ŝi havas ĉion kaj ni nenion? Ni prefere ne diru al la gepatroj, kion ni vidis. Kial ni eltrombonu la bonfarton de Psiĥo?"

La fratinoj kuris lamentante al la gepatroj kaj asertis, ke ili ne trovis la kompatindan Psiĥon. Sekrete ili pensis nur pri tio, kiel ili povos damaĝi al la pli juna fratino.

Psiĥo ĝojis, ke ŝi sukcesis konservi la sekreton. Vespere, kiam ĉio estis vualita en tenebro, aŭdis Psiĥo denove la voĉon de sia edzo. Li laŭdis ŝin pro tio, ke ŝi protektis sin kontraŭ la demandoj de la fratinoj, sed li aldonis malgaje: „Mi esperas nur, ke vi ne perfidos min je la sekva fojo, Psiho! La fratinoj envias vin kaj certe revenos. Ne parolu kun ili pri via edzo kaj ne provu ekscii, kiu mi estas. Eĉ, se vi vidos mian vizaĝon nur unufoje, vi perdos min ĉiam kaj ni renkontiĝos neniam plu.“

Psiĥo promesis obei kaj perfidi nenion. La fratinoj ne longan tempon lasis atendi sin. Post kelkaj tagoj ili revenis denove. Ili ne atendis, ĝis kiam Psiĥo sendos Zefiron. Senpacience ili desaltis de la roko kaj Zefiro kaptis ilin dum ties falado kaj demetis ilin sur la herbejon antaŭ la palaco.

Psiĥo bonvenigis ilin, regalis kaj pridonacis ilin. Unue la fratinoj raportis, kio okazis surtere.

„Vi estus devinta vidi la gepatrojn“, ili mensogis, „kiom ili ĝojis pri via feliĉo. ‚Kaj kiu estas ŝia edzo?‘ ili demandis nin. ‚Ni ne vidis lin‘, ni respondis. ‚Psiĥo montros lin je la sekva fojo al ni.‘ “

Sed Psiĥo forgesis, kion ŝi menciis je la lasta vizito de la fratinoj kaj diris: „Mia edzo ne estas hejme. Li estas jam maljuna kaj forvojaĝis pro negocoj.“

Tuj ŝi vokis Zefiron kaj lasis reporti la fratinojn al la roko.

La fratinoj revenis hejmen kaj la plej maljuna rapide komencis paroli: „Tio estas stranga, je la pasinta fojo ŝi diris, ke ŝia edzo estas juna kaj nun ŝi diras, ke li estas maljuna komercisto.“

„Aŭ“, diris la alia fratino, „ŝi ankoraŭ eĉ ne vidis sian edzon aŭ ŝi mensogas. Ni devos iri plian fojon al ŝi kaj trovi la veron.“

La fratinoj tranoktis en la palaco de la gepatroj kaj apenaŭ povis atendi la matenon. Tre frue ili kuris al la roko, lasis porti sin de Zefiro malsupren kaj rapidis al la plej juna fratino.

„Aĥ, fratinjo, kompatinda Psiĥo“, ili vokis kaj premis hipokrite larmojn el siaj okuloj, „vi ja eĉ ne divenas, kio atendas vin! Ĉu vi scias, kiu estas via edzo? La orakolo diris la veron, li ne estas homo kiel ni, sed hida drako.“

La ektimigita vizaĝo de Psiĥo perfidis, ke ŝi ankoraŭ neniam vidis sian edzon. La knabinoj rimarkis ŝian ektimon kaj mensogis eĉ pli: „Paŝtistoj vidis cirkuli la monstron ĉirkaŭ la roko“, asertis unu el ili. „Ĝi estas terura, jam ĝia aspekto kaŭzas malsanojn“, mensogis la dua el ili.

„Kiam ĝi estos grasiginta vin, ĝi vin voros“, diris ambaŭ.

„Kion mi faru?“ demandis Psiĥo plena de timo la fratinojn.

„Ne timu, ni konsilos al vi“, konsolis ŝin hipokrite la fratinoj. „Metu sub vian liton oleolampon. Kovru la flamon per ujo, por ke la drako ne vidu la lumon. Enlite tenu preta akran tranĉilon. Kiam la monstro endormiĝos, mallaŭte prenu la lumon al vi kaj per unu tranĉo senkapigu ĝin. Tiel vi liberigos vin el ĝia perforto kaj ni ja zorgos pri vi. Ni estas ja viaj fratinoj.“

Psiĥo dankis al la fratinoj kaj Zefiro reportis ilin al la roko. Ekscitite Psiĥo pretigis lumon kaj tranĉilon kaj atendis la vesperon.

Laste la suno finis en la maro sian migradon kaj la palaco vualiĝis en tenebron. Kun la komenciĝinta nokto venis ankaŭ la edzo de Psiĥo. Tiutage li estis eksterordinare laca kaj baldaŭ ekdormis. Tuj kiam Psiĥo aŭdis, ke li spiras trankvile, ŝi malkaŝis la lumon kaj manprenis la tranĉilon. Sed kiam ŝi prilumis la liton de sia edzo, ŝi moviĝis ektimigite malantaŭen. Antaŭ ŝi kuŝis la filo de la diino Afrodito mem, liaj oraj flugiloj briltremis ĉe la lumo de la oleolampo. Li estis tiel bela, ke Psiĥo ĝemis. Ŝia mano kun la lumo ektremis kaj guto de la varmega oleo falis de la lampo sur ŝultron de la juna dio. Tuj vekiĝis Eroso, vekite pro la doloro. Li vidis Psiĥon, kiu kliniĝis super lin. Senvorte li leviĝis de la lito kaj forflugis en la tenebron.

Vane la malfeliĉa Psiĥo postvokis lin kaj vane ŝi petis lin reveni. Ĉirkaŭe estis nur silentema nokto, neniu respondis al ŝi. Despere ŝi kuris eksteren en la tenebron, stumbladis pro radikoj kaj ŝtonoj, vundis siajn manojn kaj piedojn je dornaj arbustoj kaj serĉis la edzon, ŝi vokis lin kaj aŭskultadis, ĉu ŝi aŭdas tamen la susuradon de la flugiloj. La nokto estis kvazaŭ silenta. Intertempe flugis Eroso al sia patrino Afrodito kaj konfesis al ŝi, kio al li okazis.

„Estas bone, ke tio okazis al vi“, ĉagrenigite diris la diino, „se vi estus obeinta min, Psiĥo ne estus brulvundinta vin. Ĉar vi ne sukcesis puni ŝin, faros tion mi.“

Eroso sternis sin ĉe la patrino kaj la brulvundoj kaŭzis aĉan febron. Psiĥo vagadis tra la mondo, serĉis la edzon kaj sopiro je li kaj konsciencriproĉoj turmentis ŝin. Ŝi demandis la homojn en la urboj, la paŝtistojn sur la paŝtejoj kaj la fiŝistojn ĉe la bordo de la

maro, ĉu ili vidis Eroson, ŝian edzon. Kelkaj kapskuis kompateme, aliaj mokis ŝin, sed ĉiuj supozis, ke Psiĥo freneziĝis.

Neniu homo iam vidis Eroson, kvankam ĉiun trafis iam aŭ sago de la ĝojo aŭ sago de la sufero.

Post longa erarvoja vagado kaj serĉado venis Psiĥo al sia pli maljuna fratino kaj rakontis al ŝi sian malgajan sorton. La fratino ŝajnigis sin tiel, kvazaŭ ŝi bedaŭrus Psiĥon.

Sed apenaŭ Psiĥo estis foririnta, ŝi kuris al la alta roko, grimpis supren kaj vokis: „Portu min, Zefiro, al via mastro! Mi volas esti pli bona edzino al li ol Psiĥo!“ Kun tiuj vortoj ŝi saltis en la profundon. Sed Zefiro ne atentis ŝian komandon, kaj la fia fratino mortis pro la falo en la abismon.

Ankaŭ al la dua fratino iris Psiĥo kaj lamentis pri sia malfeliĉo. La fratino hipokrite kompatis kaj konsolis ŝin. Tamen ŝi pensis nur pri tio, kiel ŝi mem povos anstataŭi la edzinon al Eroso. Apenaŭ Psiĥo estis foririnta, kuris ankaŭ la dua fratino al la roko, surgrimpis ĝin kaj vokis: „Eroso, akceptu vian veran edzinon kaj vi, Zefiro, portu min malsupren!“ Ŝi vokis kaj saltis en la abismon. Sed ankaŭ al la duan fratinon Zefiro ne obeis. Per la salto de la roko ŝi mortis.

Fine renkontis Psiĥo kun koro kuntirita de zorgoj kaj de sopiro, la servistojn de Afrodito, kiuj serĉis ŝin.

„Jen vi ja estas!“ ili kriis. „Ni tuj devas konduki vin al nia mastrino, al diino Afrodito.“

Psiĥo ne defendis sin. Ŝi esperis renkonti ĉe Afrodito sian edzon. Tial ŝi sekvis la servistojn al la monto, kie la diino alte super la nuboj havis sian palacon.

Afrodito observis Psiĥon per malica rigardo kaj diris: „Ĉu oni ne plu festas vin kiel diinon? Kie estas la homoj, kiuj portis donacojn kaj oferojn al vi? Mia filo Eroso estas ĉe mi, mi bone enfermis lin, ne esperu, ke vi vidos lin. Pro via impertinenta malobeemo li malsaniĝis je febro.“

Kaj la diino ordonis al la servistinoj, ke ili miksu tritikon, hordeon, milion, papavon, pizojn, lentojn kaj fabojn. Poste ŝi kondukis Psiĥon antaŭ grandan amason de miksitaj semeroj kaj ordonis al ŝi: „Ĉi tie bridu vian fieron! Ĝisvespere vi devos dispecigi ĉiujn semerojn kaj bele ordigi laŭ specoj. Nokte mi revenos, kaj se vi ĝis tiam ne estos pretiginta la laboron, mi severe punos vin!“

La diino foriris kaj Psiĥo sidiĝis al la semamaso. Ŝi eĉ ne provis dividi la grenojn laŭ specoj. Kiu surtere povus sukcese fini tian laboron? Malgaje ŝi observis kiel la ombroj longiĝas kaj atendis senpotence la punon, kiu ĉiun momenton proksimiĝis.

Jen alkuris malgranda diligenta formiko kaj havis kompaton kun la bela Psiĥo. Ŝi saltis al siaj kamaradoj kaj komune kun ili dividis la laboron. Parto de la formikoj portis flanken la tritikon, alia parto la hordeon kaj la tria la milion. Tiom da formikoj venis, ke la semamaso rapide foriĝis. Ili metis grenon post greno sur sep malgrandajn montetojn. Ĝisvespere ili ĉion ordigis laŭ specoj.

Vespere venis Afrodito, kronita per rozoj, de la olimpa bankedo kaj preskaŭ alkriis Psiĥon: „Ne supozu, ke vi gajnis! Sola vi certe ne faris tion. Iu kompatis vin kaj helpis al vi. Des pli malbone por vi!“

Li ĵetis antaŭ la princinon pecon de nigra pano kaj firme enfermis ŝin por la nokto.

Matene Afrodito revenis kaj ordonis, sen rigardi Psiĥon: „Ĉu vi vidas ĉe la rivero la boskon? Tie paŝtas sin ŝafoj, kies lano ore briletas. Kuru en la boskon kaj portu al mi korbon de tiu lano.“
Psiĥo volonte kuris al la bosko. La tiutaga tasko ŝajnis al ŝi multe pli facila. Kiam ŝi kuris laŭ la rivero, la fragmito kompatis ŝin kaj flustris al ŝi: „Psiĥo, ne rapidu tiom. Je mateno la ŝafoj en la bosko estas sovaĝaj. Ili mortbatus vin per siaj hufoj. Prefere atendu ĝis kiam la tagmeza suno komencos malfortiĝi. La ŝafoj dormos tiam, kaj vi facile kunkolektos bulon da lano, kiu postrestis en la arbustaĵo.“

Psiĥo obeis la voĉon de la kompatema fragmito kaj kaŝis sin post arbo. Posttagmeze la ŝafoj ekdormis. Psiĥo kolektis la oran lanon kaj rapidis al Afrodito.

La okuloj de la diino fulmis.

„Ne supozu, ke vi gajnis. Certe iu kompatis vin kaj helpis al vi. Ni ekscios, kiel vi plenumos la trian taskon. Jen, prenu la kristalan pelvon. Kuru kaj portu al mi akvon el la nigra fonto. Ĝi fontas sub tiu montopinto.“

Psiĥo rapidis por plenumi la deziron de la diino. Ŝi grimpis super akraj glitigaj ŝtonoj sur la montopinton, sub kiu elŝprucis la nigra fonto. La sopiro pri la edzo helpis al ŝi iri trans la danĝerajn lokojn. Ĉe krutaj abismoj la espero povi vidi la edzon ankoraŭ almenaŭ unufoje, se ŝi plenumos la ordonon de la diino, donis al ŝi forton.

Ŝi tiom proksimiĝis al la fonto, ke ŝi aŭdis la akvon, kiu ĵetiĝis en la abismon kaj ŝi kvazaŭ rigidiĝis pro teruriĝo. Ŝi ne plu povis devigi sin levi piedon. El kavernoj ĉirkaŭ la fonto drakomonstroj etendis siajn multdentajn faŭkojn kaj fikse rigardis al Psiĥo kun

mokaj okuloj. Kaj la bruanta akvo vokis subite per homa voĉo: „Foriru! Atentu! Vi pereos! Fuĝu!“

El la okuloj de Psiĥo ekfluis larmoj. Ŝi estis je la celo kaj ne kuraĝis plenigi la pelvon per akvo. Ŝia sufero kaj turmento vekis la kompaton de fiera aglo. Ĝi flugis el la nuboj malsupren kaj parolis al ŝi: „Psiĥo, kiel vi povis pensi, ke tian malfacilan taskon vi povus plenumi aŭ eĉ sola? La akvo de la nigra fonto ĵetiĝas rekte en la submondon, en la mortulan regnon, kaj neniu mortemulo povas kapti eĉ nur guton de ĝi. Sed donu la pelvon al mi, mi helpos al vi.“

Psiĥo donis al la aglo la pelvon, tiu prenis ĝin per la beko, ĝi manovris kuraĝe per la flugiloj, meze inter la makzeloj de la teruraj drakoj, ĝi prenis akvon kaj reflugis al Psiĥo.

Psiĥo dankis al ĝi plena de ĝojo kaj kuris kun la akvo al Afrodito. Survoje ŝi bone atentis, ke eĉ ne guto perdiĝu.

Afrodito ridis malice: „Vere, ŝajnas, ke vi estas potenca sorĉistino. Sed mi havas por vi ankoraŭ plian taskon. Prenu tiun ĉi skatolon kaj iru kun ĝi rekte en la submondon, en la ombran regnon. Donu la skatolon al Persefono kaj petu ŝin doni al vi iom de kuraciga ungvento por mia filo. Vi brulvundis lin, tial almenaŭ alportu kuracilon al li – kaj ne revenu sen la ungvento!“

Kun peza koro Psiĥo iris el la palaco de la diino Afrodito. „Nur mortintoj povas viziti la mortintojn“, ŝi diris al si. Kiu iam grimpas malsupren en ilian regnon, ne revenos al la vivantoj. Tamen ŝi volonte portus la ungventon el la submondo al Eroso. Certe brulas kaj doloras lia vundo. Eble li lamente ĝemas, pensis Psiĥo terurigite. Rapide, rapide – bruis la sango en ŝiaj tempioj. Konfuzite ŝi serĉis la plej mallongan vojon en la submondon. Senspire ŝi rapidis al alta turo. „Mi saltos de la turo kaj Morto tuj

kondukos min en la mortulan regnon“, ŝi pensis. Kun certeco ŝi iris renkonte al la ŝtuparo, kiu kondukis supren.

Tio vekis eĉ la kompaton de la frida ŝtona turo kaj ĝi parolis per homa voĉo: „Haltu, kompatinda Psiĥo. Kial vi volas mortigi vin? Se vi mortus kaj via ombro irus en la submondon, vi neniam denove povus reveni surteren. Iru ĉiam okcidenten, ĝis vi venos al kaverno sub nigraj rokoj. Eniru tie kaj sekvu la malhelan irejon. Ĝi kondukos vin en la submondon. Sed ne survojiĝu kun malplenaj manoj. Kunprenu du mielokukojn kaj metu du monerojn en la buŝon. Survoje parolu al neniu. Al la trikapa hundo Cerbero, al la gardisto de la submondo, ĵetu kukon kaj ĝi preterlasos vin. Kiam vi venos al la rivero de l‘ morto, la pramisto Karono mem prenos moneron el via buŝo. En la rivero mem naĝos morta maljunulo, tiu etendos siajn elsekigitajn brakojn al vi kaj petos vin, ke vi tiru lin sur la pramon. Sed ne atentu lin. Helpu al neniu survoje en la submondon, vi povus perdi la kukon, sen ĝi vi neniam revidus la taglumon. Kiam Persefono estos pleniginta al vi la skatolon per ungvento, ne malfermu ĝin, sed reportu ĝin fermita al Afrodito.

Sur la vojo reen donu al la pramisto Karono pere de la lango la duan moneron kaj ĵetu al la trikapa hundo la duan kukon. Se vi faros ĉion tion, vi sukcesos.“

Psiĥo dankis kaj iris ĉiam okcidenten. Ĉe la vojo ŝi petis ĉe bonaj homoj pri du mielokukoj kaj du moneroj. Tiel ŝi venis al la nigra roko kaj grimpis en la kavernon, de kie kondukas la vojo en la submondon. Ŝi sukcesis, kaj kun ĝojo ŝi revenis el la tenebro kaj el la eterna silento en la taglumon, kie birdokantado salutis ŝin. Ĝoje ŝi ekiris sur la vojo reen. Sed ŝia scivolo ne lasis pensi ŝin pri io alia ol pri la mirakle saniga ungvento en la skatolo.

„Se mi rigardos ĝin rapide nur unufoje kaj tuj refermos la skatolon, povos okazi nenio malbona“, ŝi pripensis.

Kaj tuj ŝi efektive provis. Sed en la skatolo ne estis kuraciga ungvento, sed mortodormo de la submondo. Apenaŭ Psiĥo levis la kovrilon, eliris la mortodormo, kaj ŝi falis morta surteren.

Intertempe la vundo de Eroso estis kuracita, kaj li eksopiris sian karan edzinon. Li ĉirkaŭrigardis, ĉu li vidos ŝin ie surtere. Jen li ekvidis ŝin kuŝi surtere kiel morta. La dio etendis siajn orajn flugilojn kaj flugis al ŝi. Zorgeme li forviŝis de ŝi la mortodormon kaj remetis ĝin en la etan skatolon. Poste li vekis Psiĥon per delikata piko de unu el siaj sagoj kaj reflugis al Afrodito. Li volis esti antaŭ Psiĥo en la palaco. Kaj ankaŭ Psiĥo haste kuris kun sia skatolo al Afrodito.

Eroso petegis sian patrinon pri indulgo je Psiĥo, sed Afrodito tute ne estis alirebla por peto. Nur kiam ankaŭ la diopatro Zeŭso parolis por ŝi, Afrodito komencis graci ŝin.
Zeŭso sendis la dion Hermeso por konduki Psiĥon al Olimpo.

Li mem transdonis al ŝi pokalon plenan de dia nektaro kaj faris ŝin tiel senmorta.

En la Olimpo oni poste festis pompan nupton. Ĉiuj dioj partoprenis je ĝi. Ili manĝis dian ambrozion, trinkis nektaron kaj la Muzoj ĉe la festeno ĉarme kantis por ili.

*Originalo: ERÓS A PSÝCHÉ*

# GYGES KAJ LA RINGO

Vivis iam en Lidio la paŝtisto Gyges. De mateno ĝis vespero li gardis la gregon de sia reĝo Kandaŭlo kaj je la vesperoj li varmigis sin ĉe bivakfajro kiel la aliaj paŝtistoj. Neniam venis en lian kapon la penso, ke iam povus okazi al li io eksterordinara, kio ŝanĝos lian vivon. La suno ĉiam leviĝis je la sama loko sur la kresto de certa monto kaj same subiris en la profundoj de la arbaro.

Iutage je sufokiga tago la ĉielo kovriĝis per pezaj nuboj kaj komenciĝis malica fulmotondro. Zeŭso ĵetis fulmojn surteren, unu post la alian, kaj la tondroj tondris en la regiono senĉese, kvazaŭ la monto ruliĝus en la valon. La timigita Gyges fuĝis en la arbaron por tie kaŝi sin. En la pluvego oni povis vidi ion eĉ ne je paŝa distanco kaj la sovaĝaj rojoj ĵetiĝis rapide kiel sagoj malsupren kaj disŝiris la bordojn kiel la lupo la ŝafojn.

Iom post iom la ŝtormo ĉesis kaj la ĉielo rigardis sur la teron per blua okulo. Gyges elspiris, falis sur la teron kaj dankis al la senmortaj dioj, ke ili lasis la vivon al li. Poste li ekstaris, ĉirkaŭrigardis kaj vidis, ke li vojeraris en la ŝtormo. Longan tempon li baraktis tra la densejo de la arbaro antaŭ ol li venis al loko, kie la vento elŝiris multajn arbojn. La faligitaj trunkoj malĝoje leviĝis ĉielen kun la radikoj anstataŭ la arbokronoj. Gyges saltis trans kavetojn plenajn de akvo, argilo kaj sablo kaj subite li haltis. Tie, kie la kirlovento disrompis potencan kverkon, li ekvidis en kaveto plena de derompitaj radikoj strangan nigran truon. Gyges lasis gliti sin en la kaveton kaj scivoleme rigardis la truon. En tiu momento la suno aperis inter la nuboj kaj kelkaj radioj falis en la tenebran truon. La mirigita paŝtisto ekkonis, ke li staras antaŭ la enirejo de kaverno. En la krepusko li ekkonis la briltreman statuon de bronza ĉevalo kun pordeto je la flanko. La pordo estis malfermita

kaj Gyges, al kiu la suna lumo donis aŭdacon, paŝis en la kavernon kaj palpis permane en la flankon de la grandega ĉevalo kaj ektuŝis perfingre la fridan manon de mortinta homo. Li ektimis kaj retrosaltis. Sed tiam li diris al si: „Por kio taŭgu ringo al mortinto? Certe li estis riĉulo en la vivo kaj uzis la ringon sufiĉe ofte. Mi konatiĝis ĝis nun kun nenio pli bona ol kun nigraj flanoj kaj ŝafa fromaĝo. Kial ne havu ankaŭ povrulo ringon?“ Dum li tiel konsideris la aferon, li tiris de la mortinto la oran ringon de fingro kaj rampis el la kaverno.

La ringo efektive estis eksterordinara. El la muntaĵita nigra ŝtono de la ora ringo elstaris nigra okulo. Li surmetis la ringon kaj angore rigardis la ornamitan fingron.

Pro la blekado inter la arboj li aŭdis, ke la grego estas proksima. Gyges kunpelis la ŝafojn kaj revenis kun ili al la ĉirkaŭbaraĵo. La vespero estis komenciĝonta kaj la aliaj paŝtistoj staris jam antaŭ la ĉirkaŭbaraĵo kaj atendis Gygeson. Gyges aŭdis, kiel ili miras kaj montris al lia grego: „Rigardu nur, kiajn ekzercitajn ŝafojn Gyges havas. Ili iras mem hejmen kaj li ie satdormas.“

„Se ni ĉiuj havus tiajn ŝafojn“, ridante diris alia paŝtisto, „ni povus trankvile lasi ilin ĉi tie kaj iri en la urbon kaj pigri kiel la skribisto de la reĝo. La ŝafoj gardus sin mem kaj eble eĉ mem detondus la lanon de si.“

Ĉiuj komencis ridi. Gyges staris proksime de ili, li malfermis la buŝon kaj volis voki: „Ĉu vi estas blindaj, ke vi ne vidas min?“ Sed jam post momento li ekpensis, ke li ne faru tion. Li rememoris pri la ringo. En la ringo do certe estas sorĉo. Tial de ĝi elstaras homa okulo. Atenteme li komencis turni la ringon, kaj nun la paŝtistoj vidis lin.

„De kie vi subite aperis? Ĉu vi alflugis per flugiloj?“ Li neis kapskue.

Gyges silentis ruze kaj diris al ili nenion pri la ringo. Li retenis la sekreton por si mem.

Ekde tiu tago li ne plu mallongigis la tempon al si per kantoludado je paŝtista fluto. Kiam ajn li turnis la fingroringon kun la ŝtono je la manplato, li fariĝis nevidebla. Nevidebla li povis iri kaj aŭskulti de la paŝtistoj sur la deklivoj, kion ili rakontas al si reciproke. Vespere ĉe la bivakfajro li ridante rediris al ili, pri kio ili parolis.

La paŝtistoj vaste malfermis pro miro la okulojn kaj buŝojn kaj pensis, ke Gyges estas ĉiosciulo.

„Ŝajnas“, diris maljuna paŝtisto, „ke vi vere konas potencan sorĉon. Sed, se vi scias ĉion tion, diru do, kiu ŝteladas el mia grego ŝafojn. Ĉiunokte gardas la du plej junaj paŝtistoj ilin kaj tamen perdiĝas la ŝafoj.“

„Tion mi facile ekscios, kiu estas la fripono“, diris Gyges.

En la nokto Gyges turnis la ringon kaj nevidebla li ekiris al la ĉirkaŭbaraĵo. Tie sidis la du junaj paŝtistoj kaj gardis la ŝafojn. Ili flustris: „Ĉu vi pensas, ke Gyges ekkonos la friponojn?“

„Tion mi tute ne pensas. Gyges estas fanfaronulo.“

„Ĉu ni do prenu la ŝafojn?“

„Ni prenu ilin.“

La junaj paŝtistoj leviĝis, prenis el la grego la plej grasajn ŝafojn kaj pelis ilin en proksiman kavan vojon. Sur la kava vojo atendis ilin kunaĉetisto, kiu ĉiufoje nokte forkondukis ilin.

Gyges ekkoleris pri la malhonestaj paŝtistoj. Li tiris ilin je la hararo kaj komencis trakti ilin per pugnoj. Kaj tiel, kiel li traktis ilin, li traktis ankaŭ la kunaĉetiston.

„Helpon!“ kriis la ektimigitaj ŝtelistoj de la ŝafoj. Ili sentis la batojn, sed ne vidis, kiu disdonas ilin. Ili imagis, ke ili falis en la manojn de malica spirito. Ili lasis la ŝafojn kaj forkuris ĉiudirekte. Gyges pelis la ŝafojn en la ĉirkaŭbaraĵon, sed ambaŭ junaj ŝafistoj revenis palaj kaj ne povis dormi ĝis sunleviĝo.

La maljuna paŝtisto nombris la ŝafojn kaj je la unua fojo post longa tempo ne mankis iu al li. Li ĝojis kaj tuj iris al Gyges por sciigi tion al li.

„Sed tio ja ne estas ĉio“, diris Gyges, „hodiaŭ nokte mi forpelis de la ĉirkaŭbaraĵo lupon tiel grandan kiel ĉevalo.“

Ambaŭ paŝtistoj timis, ke Gyges perfidos ilin. Ili kvazaŭ tremis pro timo kaj kapjesis pri ĉio, kion li rakontis.

La ŝafoj ne plu perdiĝis kaj la famo de Gyges komencis kreski.

„Li scias ĉion“, interpretis lin la paŝtistoj.

„Li estas forta kiel taŭro“, ili gloris Gygeson, „li forpelis gigantan lupon.“

La onidiroj pri la mirindaj agoj de la paŝtisto Gyges disvastiĝis ĝis la reĝo Kandaŭlo. Li vokis lin en la ĉefurbon, por ke li konvinku lin pri ties kapabloj.

Gyges derompis branĉon, kiu uzeblis kiel bastono, kunprenis pecon de fromaĝo sur la vojon kaj foriris. Je la vespero li ekvidis malproksime la turojn kaj remparojn de la reĝa urbo. „Hodiaŭ mi jam ne plu iros tien“, li pensis kaj ĉirkaŭrigardis kie dormi. Li kunportis al densa arbustaĵo foliojn kaj herbojn, sternis sin kaj ekdormis.

En la nokto vekis lin voĉoj. Li malfermis la okulojn kaj vidis inter branĉoj kaj folioj lumon. Kelkaj viroj pretigis ne tre malproksime bivakfajron kaj kverelis pri io. Gyges turnis la ringon, paŝis el la arbustaĵo kaj sidiĝis al la viroj. Ili ne vidis lin, sed li povis vidi kaj aŭdi ilin.

„Plej volonte mi farus tion ankoraŭ hodiaŭ“, diris iu el ili.

„Hodiaŭ estas en la reĝa burgo bankedo, ĉie estos amaso da homoj. Morgaŭ en la nokto ili ĉiuj estos lacaj kaj dormos profunde. Ni ne povus deziri al ni ion pli bonan.“

„Nur, se la reĝa trezorejo estas tiel granda, kiel oni diras“, dube diris alia.

Gyges aŭskultis ilin kaj eksciis, kun kiuj gardistoj la rabistoj interkonsentiĝis, kie ili povus sukcese enpenetri en la palacon kaj kiam. Ili kverelis pri tio, kiun predoparton ĉiu ricevu el la predo. Nur je la matena krepusko ili sternis sin por dormi.

Gyges reiris al la arbustoj kaj satdormis. Matene li vekiĝis kaj la rabistoj estis jam for. Nur la ardetanta bivakfajro montris al Gyges, ke la nokta okazaĵo ne estis sonĝo. Li turnis la ringon, fariĝis videbla kaj ekiris al la reĝa urbo.

„Mi imagis vin pli granda“, diris la reĝo, ekvidante Gygeson, „kaj pli forta.“

„Kiun valoron tio havus por vi, reĝo, se mi estus grandega kaj fortega kaj tamen ne scius, kio okazos hodiaŭ nokte“ respondis Gyges.

„Ĉu vi rolas kiel ĉiosciulo?“ mokis reĝo Kandaŭlo.

„Hodiaŭ en la nokto ekiris rabistoj por elrabi vian trezorejon“, diris Gyges.

La reĝo misfideme observis Gygeson. Tamen li ektimis pri siaj trezoroj. Tial li aŭskultis ties konsilojn.

Je noktomezo venis la rabistoj kun sakoj en la palacon kaj la reĝa gvardio kaptis ilin.
Nun la reĝo ne plu mokis Gygeson. Li nomumis Gygeson plej altranga noblulo de la lando kaj reĝa konsilisto kaj ne plu lasis lin foriri el la palaco.

Gyges sciigis al la reĝo informojn pri la plej sekretaj interparoladoj, li punis trompojn kaj malkaŝadis mensogojn. Sufiĉis, se li turnis la ringon, kaj jen li nevidebla povis penetri tien, kien li volis. Baldaŭ li sciis ĉion, kio okazas en la palaco kaj en la urbo kaj li helpis reordigi al la reĝo misojn. La honestuloj ŝatis Gygeson kaj la malhonestuloj vole nevole orientiĝis je la vojo de la honestuloj, ĉar Gyges povus malkaŝi ilian malsincerecon. Falsaj profetoj kaj nur ŝajne homafablaj hipokrituloj forlasis la reĝolandon. Subuloj ankoraŭ neniam travivis tian justan registaron, kian en tiu tempo, kiam Gyges konsilis al la reĝo.

Iunokte Gyges havis viglan sonĝon. Ŝajnis al li, ke paŝas al lia lito figuro en blanka vesto, la spirito de la mortinto, al kiu apartenis la sorĉoringo.

La spirito parolis al Gyges: „Mi ĝojas, Gyges, ke la ringo transiris en bonajn manojn. Mi observis vian konduton kaj neniam vi misuzis la ringon. Tial mi venas por averti vin. Faru vin nevidebla kaj iru al la ĉambro de la reĝo.“

Post tiuj vortoj la spirito malaperis kaj Gyges vekiĝis. Li obeis la mortinton kaj turnis la ringon kaj rapidis al la reĝo. La pordoj de la reĝa ĉambro estis vastege malfermitaj kaj super la morta reĝo kliniĝis la komandanto de la gvardio kun sanga glavo. Li ĵus traboris la reĝon. Ĉirkaŭ la komandanto staris kelkaj el ties amikoj. Ili ĉiuj malamis la reĝon kaj eĉ pli Gygeson.

„Hodiaŭ ni liberigis nin de la reĝo“, diris la komandanto, „kaj morgaŭ ni liberigos nin de Gyges. Ni rakontos al la reĝino, ke Gyges mortigis la reĝon.“

Liaj amikoj konsentis kun la komandanto. Ili enviis la postenon de Gyges kaj esperis, ke ili anstataŭos lin, se la reĝino ĵetos lin en la prizonan turon.

La komandanto purigis la glavon kaj volis remeti ĝin en la ingon. Ĉe tio li rimarkis, ke la pinto de la glavo derompiĝis, ke peco de la fero restis en la vundo. Li ignoris tion nur per malŝata mansvingo.

Gyges silentis kaj ne videbla reiris al sia lito.

Matene disvastiĝis en la tuta palaco timokrio kaj de buŝo al buŝo flugis la sciiigo: „Gyges hodiaŭ nokte murdis la reĝon. Li volas propriigi la tronon al si.“

La reĝino lasis alvoki Gygeson.

„Vi estas kulpigata pri krimo“, ŝi diris, „ĉu vi povas senkulpigi vin?“

„Reĝino“, respondis Gyges trankvile, „la reĝon oni murdis per glavo kaj nun la glavo perfidos la murdiston. Ĉiuj viroj en la palaco demetu la glavon antaŭ vi kaj mi pridemandos la fridajn ferojn, ĉu ili scias ion pri la morto de la reĝo. Vi vidos, ke almenaŭ unu glavo parolos.“

Ĉiuj skuis la kapojn pri la parolo de Gyges. Gyges freneziĝis, ili pensis. Kiu jam iam aŭdis, ke glavo parolas?

Sed la reĝino obeis Gygeson. Gyges rigardis ĉiun glavon atenteme. La nobluloj ridetis, ili pensis, ke li nun aŭskultos, kiam glavo komencos paroli. Gyges ekkonis inter la glavoj la glavon de la komandanto kun la derompita pinto. Li montris ĝin al la reĝino, kaj la reĝino ordonis rigardi la vundon. La kuracisto trovis en la vundo pecon de fero, kiu precize adaptiĝis al la glavo de la komandanto de la gvardio. La murdiston tuj kaptis la armita eskorto kaj kondukis lin en la karceron. La famo de Gyges nun eĉ pli kreskis.

Post certa tempo la reĝino edzigis lin kaj li fariĝis reĝo. Li regis saĝe kaj juste. La ringo helpis al li.

Kiam li mortis, ili entombigis lin kun la ringo. Estas domaĝe, ke ni ne scias, kie troviĝas lia tombo.

*Originalo: GÝGES A PRSTEN*

## MILITO DE TROJO

En Malgranda Azio en pejzaĝo proksime de Helesponto staris en malnova tempo la urbo Trojo. Malantaŭ potencaj urbomuroj regis reĝo Priamo kun sia reĝino Hekabo. Iunokte la reĝino havis strangan sonĝon. Ŝi sonĝis, ke ŝi naskis bebon. Kiam ŝi volis preni ĝin per siaj brakoj, ĝi ŝanĝiĝis en brulantan torĉon. La fajro de la torĉo transsaltis sur la reĝan burgon, de la burgo al la ĉirkaŭaj domoj kaj baldaŭ la tuta urbo brulis per helaj flamoj.

Ektimigite vekiĝis la reĝino kaj rakontis sian sonĝon al la reĝo. La reĝo kunvokigis ankoraŭ je la griza mateno la profetojn por interpreti, kion signifas la sonĝo de la reĝino. Malvolonte la profetoj klarigis al la reĝo la malican mesaĝon, kiun la malfeliĉiga sonĝo kaŝas en si. La reĝino laŭdire naskos filon, kiu pereigos la tutan urbon. Se la reĝo volas savi sia propran vivon, la vivon de sia edzino kaj de la infanoj kaj la vivon de la civitanoj, kaj se li volas konservi la urbon Trojo, li ordonu demeti la novnaskitan bebon en soleca montaro. Laŭ ili estos pli bone, ke la infano mortu ol tiom da senkulpaj honestaj homoj.

Kelkan tempon poste la reĝino naskis filon. Larmante ŝi adiaŭis la infanon kaj la malgaja reĝo Priamo ordonis al siaj servistoj, ke ili portu la bebon en la montaron. La servistoj kompatis la lindan knabeton, sed ili timis misatenti la ordonon de la reĝo, ĉar ili konis la profetaĵon. Ili demetis la infanon en la montaro kaj rapide rekuris en la urbon. Ili ne volis aŭdi, kiel ploras kaj krias la infano.

La forlasita infano ne ploris dum longa tempo. Ursino trovis ĝin, priflaris ĝin kaj ĝin lekadis, ĝi prenis atenteme la kovrilon, en kiun la infano estis volvita, inter la dentojn kaj portis ĝin en la kavernon al siaj idoj. Tie la knabo kreskis inter la ursoj, la ursino nutradis lin kaj la ursidoj ludadis kun li. La knabo fortiĝis, lernis

kuri kaj grimpi sur arbojn. Nur la homan paroladon li ne povis lerni de la ursoj.

Iutage serĉis en tiu regiono paŝtisto forkurintan ŝafon kaj rimarkis en latbarilejo la forlasitan ludantan knabon Li kunprenis lin en sian kabanon kaj de tiam la knabo vivis kun la paŝtistoj. Li helpis al ili gardi la gregojn kaj fine lernis ankaŭ paroli. Li kreskis plu kaj fariĝis forta granda junulo, ili alparolis lin per la nomo Pariso. Li konis neniun timon. Li gardis la gregojn kontraŭ sovaĝaj bestoj kaj rabistoj kaj ĉiuj paŝtistoj ŝatis lin.

Pariso sidis enmeze de sia grego, blovis fluton kaj atentis, ke neniu ŝafo erare vagadu en la arbaron. Foje li ĝuste levis la fluton al la buŝo, kiam antaŭ li subite aperis tri belaj diinoj. Hera, la edzino de la diopatro Zeŭso, Atena, la diino pri saĝo kaj protektantino de la fortuloj kaj sagaculoj kaj Afrodito, la diino pri belo kaj amo. Ĉe la ekvido de la diinoj rigidiĝis Pariso pro miro.

Diino Hera transdonis oran pomon al li kaj parolis: „Pariso, juĝu kvazaŭ arbitracie nian kverelon. Ni kverelas pri la ora pomo. La plej bela el ni havu ĝin. Rigardu nin bone kaj diru, kiu el ni meritas la pomon. Se vi donos ĝin al mi, vi fariĝos la reganto de tuta Azio, la plej forta reĝo de la tuta mondo.“

Atena ridetis kaj diris: „Se ricevos mi la pomon, mi faros vin la plej fama militestro el ĉiuj tempoj. Vi gajnos ĉiun militon kaj malamikaj urbanoj malfermos al vi siajn pordegojn, tuj, kiam vi proksimiĝos kun via armeo.“

Afrodito parolis per dolĉa voĉo. „Se vi donos la pomon al mi, mi promesas al vi edzinon tian belan, kian la mondo ankoraŭ ne vidis.“

Pariso konsideris la aferon dum momento kaj transdonis poste la pomon al la diino Afrodito. Per tio li kolerigis la diinojn Hera kaj Atena kaj tiel decidis pri sia sorto kaj tiun de la urbo Trojo.

En la urbo oni ĝuste preparis feston kaj grandajn konkursojn. La paŝtistoj sendis Parison en la urbon por transporti taŭron al la festo. Pariso en sia vivo vidis tian potencan urbon je la unua fojo. Kiel obtuzigito li iris tra la stratoj kaj miris pri la altaj ŝtonaj temploj kaj domoj. Plej multe plaĉis al li la konkursejo. Kaj ĉar li estis juna, forta kaj kuraĝa, ankaŭ li anonciĝis por konkurso. Li agis tiel lerte, ke li venkis en bataloj ankaŭ kontraŭ siaj fratoj, eĉ kontraŭ la plej kuraĝa el ili, Hektoro.

Reĝo Priamo vokigis la venkinton al si kaj demandis lin pri ties deveno. Pariso rakontis al la reĝo sian sorton kaj la reĝo ekkonis, ke la fremda junulo estas lia propra filo. Kortuŝite ĉirkaŭbrakis Priamo Parison kaj akceptis lin, ne atentante la profetaĵon, en sian burgon. La retrovita filo revenis al la patrino kaj al la gefratoj.

La diino Afrodito ne forgesis Parison. Ŝi aperis baldaŭ al li kaj parolis: „Mi venas, Pariso, por plenumi mian promeson. Vi elektis kiel rekompencon la plej belan el ĉiuj damoj kaj mi volas zorgi pri tio, ke vi ricevu ŝin. La plej bela el ĉiuj estas Helena, la edzino de la reĝo de Sparto, Menelao. Ŝia patro, Zeŭso, donis al ŝi superhoman belon. Ne hezitu kaj komencu konstrui ŝipon. Mi ne perfidos vin.“

Pariso obeis la konsilon de la diino kaj komencis konstrui ŝipon. Li pretigis sin por vojaĝo al Sparto. Malgaje patro Priamo observis la antaŭpreparojn de Pariso por longtempa vojaĝo. La profetoj ekteruriĝis kaj vidis je la vojaĝo de Pariso la komencon de la pereo, kiu trafos ĉiujn. Vane reĝo kaj reĝino, gefratoj kaj profetoj provis konvinki Parison, ke li rezignu pri sia vojaĝo. Sen

interrompo li konstruadis sian ŝipon kaj nur la diino Afrodito helpis lin pri tio.

Lastfine la kilo de la ŝipo tuŝis la ondojn kaj la ruĝa pruo tratranĉis la ondojn. Spite al ĉiuj avertoj kaj profetaĵoj Pariso ekveturis kun siaj ŝipanoj.

Afrodito zorgis pri favora vento kaj la ŝipo flugis per ŝvelintaj veloj kiel sur flugiloj antaŭen.

Menelao, la reĝo de Sparto, afable akceptis la gaston el la malproksima Trojo kaj regalis lin. Li ne divenis, ke Pariso venis en la palacon por semi malpacon, kies rikolton Morto falĉos sur malproksima batalkampo. Afrodito renkontigis al Pariso la edzinon Helena de Menelao kaj vekis amon en ŝia koro. Pariso plaĉis al ŝi kaj ŝi plaĉis al Pariso. Li misatentis la leĝojn de la gastamikeco, kiuj estas sanktaj ankaŭ ĉe la dioj, kaj forkondukis Helenan nokte sur sian ŝipon.

La koroj de la ŝipanoj batis pli forte, kiam ili ekvidis ŝin. Ili havis la impreson kvazaŭ la arĝenta luno grimpus de la ĉielo malsupren sur ilian ŝipon kaj veturas kun ili al la matena bordo de la nokto, tiom hela brilis ŝia blanka belo. La ŝipo sulkigis la noktan tenebron kaj la diino Afrodito kondukis la ŝipon al la bordo de Trojo.

Tuj kiam reĝo Menelao malkovris la krimon de Pariso, li iris rapide al Mikeno. Tie regis lia frato reĝo Agamemno. Menelao kaj Agamemno interkonsiliĝis kiel puni la malnoblan gaston. Ankoraŭ je la sama tago heroldoj rapidis en ĉiujn direktojn por alvoki la heroojn de Grekio por militiro kontraŭ Trojo.

La tuta lando reeĥis de la bruado de la armiloj, oni kontrolis la akrecon de la glavoj, streĉis la tendenojn de la pafarkoj kaj sur-

metis la kaskojn. En la havenoj hakis la hakiloj en odorantajn lignojn, oni konstruis novajn ŝipojn aŭ prihakis rudrojn kaj streĉis la velojn. La grekoj forlasis siajn hejmojn, edzinojn kaj infanojn, la gepatrojn, kaj iris al Aŭlido, kie kolektiĝis la armeo kaj la floto.

Nur la reĝo de Itako, Odiseo, ne volis disiĝi de sia edzino Penelopo kaj de sia filo Telemako. Li ne estis potenca reĝo, sed ĉie respektata pro siaj kuraĝo, saĝo kaj ruzo. Tial la heroldoj ne volis foriri sen li. Ili serĉis lin en la palaco kaj en la ĝardeno, sed ne trovis lin. Ili renkontis lin sur kampo, kie li ŝajnigis frenezecon. Li jungis ĉevalon kun bovo antaŭ plugon kaj plugis per ili kaj anstataŭ grejnoj li semis salon. Konfuzite staris la heroldoj antaŭ la prudenta reĝo, kiu rigardis ilin kun ĉiam sama rideto kaj respondis iliajn demandojn per konfuzaj respondoj. Preskaŭ ili forirus sen atingi sian celon, se iu el ili ne estus uzinta ankoraŭ ruzaĵon. Li metis la malgrandan Telemakon antaŭ la plugon de Odiseo. Odiseo haltigis la plugon kaj forkondukis sian filĉjon. Per tio li perfidis, ke li ne perdis la menson kaj devis marŝi kun la aliaj en la militon.

En la militon marŝis ankaŭ Aĥilo, la plej kuraĝa heroo de la tuta armeo. Oni diradis pri li, ke li estas nevundebla. Kiam li naskiĝis, demandis lia patrino, la marnikso Tetiso, kiun sorton havos la filo. La sortodiinoj diris al ŝi, ke li fariĝos fama heroo, sed ke li mortos juna kiel militisto. Por gardi lin kontraŭ la sagoj kaj glavoj de la malamikoj trempis lin Tetiso en la sorĉan akvon de la submonda rivero Stikso. La mirakla akvo faris Aĥilon je la tuta korpo nevundebla, nur ne je la kalkano, kie la patrino tenis lin. Ankaŭ Aĥilon instruis kaj edukis, kiel konsiderindan kvanton de aliaj herooj, saĝa kaj forta kentaŭro. En majesta kiraso, simila al juna dio, iris la kuraĝa Aĥilo en la militon. Akompanis lin lia plej intima amiko, la fidela Patroklo.

En Aŭlido kolektiĝis ducent dek grekaj ŝipoj. Ĉefkomandanto de la floto fariĝis reĝo Agamemno. Antaŭ la ekveturo la herooj kolektiĝis ĉe granda platano kaj donis oferon al la senmortaj dioj. Jen sendis Zeŭso signon al ili. Granda serpento rampis al la arbo, volviĝis sur la trunko supren kaj sufokis en la nesto sur branĉo ok birdidojn kaj ties patrinon; kaj poste la serpento fariĝis ŝtono. La profetoj interpretis la okazaĵon tiel, ke la milito daŭros naŭ jarojn, kaj ke Trojo en la deka jaro pereos.

La floto estis preta kaj la grekoj atendis nur favoran venton. La veloj pendis malstreĉite malsupren, neniu arbofolio moviĝis. La diino Artemiso estis kolera pri la reĝo Agamemno, ĉar li mortigis dum ĉaso ŝian plej karan cervinon kaj tial ŝi retenis la armeon en la haveno. Kiam la senventeco ne volis finiĝi, konsilis la profetoj al Agamemno, ke li pacigu la koleron de la diino per ofero. „Oferu vian filinon Ifigenio“, ili postulis.

Agamemno hezitis plenumi tiun kruelan postulon, sed por ne fiaskigi la militiron, li decidis sin tamen por la malfacile farebla ofero. Li sendis leteron hejmen, en kiu li petis Ifigenion al si en la kampadejon. Apenaŭ li sendis la leteron, hirtiĝis lia haŭto kaj li skribis tuj duan leteron, ke Ifigenio ne veturu al li. Reĝo Menelao vidis, kiel plia heroldo elkuris el la la tendo de Agamemno kaj li supozis, ke la ĉefkomandanto eble ŝanĝis sian decidon. Pro timo, ke Agamemno povus adiaŭi sin de la militiro, Menelao persekutis rapide la heroldon kaj forprenis la skribaĵon de li. Tial Ifigenio ricevis nur la unuan leteron kaj vojaĝis obeeme al sia patro. La despera Agamemno salutis ŝin en la kampadejo kaj la pastroj pretigis ĉion por la ofero. Jam ili venis al Ifigenio kaj kondukis ŝin al la altaro, dum Agamemno kaŝis sian vizaĝon. Sed ĉimomente vualiĝis la altaro en nebulon kaj ventopuŝo de tie forkondukis Ifigenion malproksimen al Taŭrido. Tie ŝi fariĝis pastrino de Artemiso. La pacigita diino metis sur la altaron anstataŭ la ulino cervinon.

Favora vento leviĝis, ĝi ondigis la maron kaj ŝveligis la velojn. La ŝipoj veturis el la haveno.

Venis la tago, kiam la gardistoj de Trojo sur la urbomuro ekvidis la mastojn kaj velojn de malamika floto. La militistoj de Trojo prenis siajn armilojn kaj kuregis el la urbo por defendi la bordon. Ilia gvidanto estis Hektoro, la plej aĝa filo de la reĝo Priamo.

La grekoj sciis, ke tiu el ili, kiu kiel la unua paŝos sur la teron de Trojo, devos morti – orakolo antaŭdiris tion. Apenaŭ la unua ŝipo atingis la bordon, juna greka heroo saltis surborden kaj elektis libervole la morton. Nur poste la tuta greka armeo sekvis lin kaj Hektoro retiriĝis kun siaj trojanoj. Aĥilo saltis tiel bruske de la ŝipo, ke sub ties kalkanoj la tero rompiĝis kaj elŝprucis fonto. La nevundebla heroo ĵetiĝis tiel fervore en la batalon, ke la trojanoj ekteruriĝite fuĝis for de liaj batoj kaj de lia brila kiraso malantaŭ la urbomuron. La grekoj tiris siajn militŝipojn sur la bordon, starigis kampadejon kaj ĉirkaŭis ĝin per remparo. Aĥilo konstruigis ĉirkaŭ sia tendo protektbarilon el fortaj palisoj batitaj en la teron. La pordego en la protektbarilo estis riglita per giganta trabo, kiun povis movi kun peno nur triopo de fortaj viroj. Nur Aĥilo mem kapablis levi ĝin sola kaj malfermi la pordegon.

Ĉiutage la grekoj militvagadis en la regiono de Trojo kaj revenadis kun riĉa predo en la kampadejon. Sed la urbo Trojo spitis al ĉiuj grekaj atakoj.

Naŭ militjarojn la milita sukceso ŝanĝis la flankojn inter grekoj kaj trojanoj, naŭ jarojn larmis en Trojo la vidvinoj pri siaj falintoj kaj la tero de Azio trinkis abunde grekan sangon. En la deka jaro inter Aĥilo kaj Agamemno eksplodis furioza kverelo pri militpredo. Agamemno uzis sian postenon kiel ĉefkomandanto por gajni la kverelon. Li devigis Aĥilon transdoni parton de ties predo. La gale amarigita heroo rifuzis batali plu. Li iris al la mara

bordo kaj plendis al sia patrino, al la marniksino, pri la maljusteco, kiu okazis al li. La patrino sciis jam pri tio, ŝi elvenis de la susurantaj ondoj kaj konsolis la filon. Aĥilo petis la patrinon ĉe diopatro Zeŭso zorgi pri malvenko de la armeo de Agamemno. La amanta patrino ne povis rifuzi ion al sia filo. Ŝi turnis sin al Zeŭso kaj la grekoj komencis malvenki. Aĥilo sidis sen agado en la tendo. Lia glavo kaj lia lanco ekrustis. Sed la trojanoj fariĝis pli kaj pli aŭdacaj. Iutage ili invadis la kampadejon de la grekoj kaj komencis ekbruligi ties ŝipojn. Sed eĉ la fiodoro de la brulanta ligno ne logis Aĥilon el la tendo.

En la momento de la plej granda danĝero kuris lia amiko Patroklo al li. Li petis kaj priĵuris lin, ke tiukaze, se li tamen ne volas batali, li almenaŭ pruntedonu al li sian kirason, ĉar la trojanoj pensos, ke la kuraĝa Aĥilo proksimiĝas kaj certe ili fuĝos en la urbon. Aĥilo koncedis kaj pruntedonis al sia amiko la grandiozan kirason. Dum tio li konsilis al li: „Ne lasu tiri vin en la batalkirladon, amiko mia, kaj ne persekutu la trojanajn militistojn. Nur montru vin al ili, tio sufiĉos. Tuj kiam la trojanoj retiriĝos el la kampadejo, revenu. La batalon antaŭ Trojo translasu al la aliaj. Mi pruntedonas al vi la kirason nur, por ke ili ne bruligu niajn ŝipojn.“

Rapide Patroklo surmetis la brilan kirason de Aĥilo, li surmetis la kaskon kun la ĉevalvosto kaj elektis du lancojn. La lancon de Aĥilo li lasis stari, tiun neniu krom Aĥilo mem povus svingi. Fine li prenis ŝildon kaj avancis je la pinto de la militistoj de Aĥilo kontraŭ la trojanoj. Ili ektremis ĉe la vidaĵo de Patroklo kiel herboj en la vento. Ili vidis la kirason de Aĥilo kaj pensis, ke Aĥilo interkonsentiĝis kun Agamemno kaj nun rejetiĝas en la batalon. La vicoj de la trojanoj maldensiĝis, la militistoj turnis sin por fuĝi kaj ŝiris la tutan armeon kun si. La grekoj gvidataj de Patroklo persekutis ilin, ŝildon apud ŝildo, kaskon apud kasko. Kiel avancanta muro ili persekutis la malamikon antaŭ si. Pelate de la sukceso Patroklo liberigis por si kuraĝe la vojon al la troja armeestro

Hektoro. Li ne pensis pri la konsilo de Aĥilo kaj kuraĝis moviĝi mezen de la malamikaj aroj sur la libera kampo antaŭ la urbo. Jen subite trafis lin malamika lanco. Hektoro vidis, ke Patroklo estas vundita, li trabatis al si vojon ĝis Patroklo kaj trafis lin per mortiga bato. Pri la kadavro de Patroklo komenciĝis batalo. La grekoj fine venkis kaj portis Patroklon reen en la kampadejon; Hektoro prenis kiel predon la kirason de Aĥilo.

Kiam Aĥilo en sia tendo eksciis pri la morto de sia fidela amiko, li profunde funebris. Li disĵetis polvon sur sian kapon kaj lia lamentado disvastiĝis laŭlonge de la mara bordo. Ankaŭ la patrinon de Aĥilo atingis liaj veplenaj plendoj. Ŝi forlasis sian malsekan loĝejon kaj vizitis sian malfeliĉan filon. Ŝi trovis Aĥilon flamigita de la sopiro venĝi la morton de la amiko.

Malgaje ŝi rigardis lin kaj diris: „Se vi mortigos Hektoron ankaŭ vin baldaŭ Morto forkondukos.“

„Prefere mi volas morti“, vokis Aĥilo, „ol lasi vivi la murdiston de mia amiko!“

La patrino portis al li novan, eĉ pli belan kirason de Hefesto, kiel anstataŭaĵon por la perdita. Aĥilo repaciĝis kun Agamemno kaj ĵetis sin en sia nova kiraso kiel leono sur la trojanojn. Li neniigis ĉiujn malamikojn ĉirkaŭ si kaj serĉis inter la malamikaj militistoj Hektoron.

Li ekvidis lin, kiam tiu ĵus svingis la glavon, kaj li ĵetiĝis al li. La kuraĝa Hektoro ĉe la ekrigardo de Aĥilo kaj de ties elĉiela kiraso, ektimis. Li turniĝis kaj fuĝis. Li divenis, ke atendos lin Morto. Aĥilo persekutis Hektoron trifoje ĉirkaŭ la urbomuron kaj traboris lin fine per lanco. Plena de kolero li ligis la kadavron de Hektoro al sia ĉaro kaj trenis lin malhontige ĉirkaŭ la urbon antaŭ la okuloj de la trojanoj, kiuj staris sur la muro.

En la nokto venis la maljuna reĝo Priamo en la grekan kampadejon al Aĥilo kaj petis, ke li transdonu la kadavron de Hektoro. La petegado de la maljuna patro kortuŝis Aĥilon, li pensis pri sia hejmlando kaj translasis la kadavron de Hektoro al la reĝo de Trojo por ke li povu enfosigi sian filon kun ĉiuj honoroj.

Baldaŭ post la morto de Hektoro mortis ankaŭ Aĥilo en batalo. Pariso trafis lin per sago je la vundebla kalkano, je la ununura loko, kie Aĥilo ne estis nevundebla. Granda malgajo disvastiĝis en la greka kampadejo kaj eĉ la maraj profundoj susuris pro doloro. La marnimfoj grimpis el la akvo kaj prilarmis la faman heroon. La muzoj kantis tombokantojn por li. Dek sep tagojn daŭris la larmado kaj lamentado. Je la dekoka tago la militistoj ekbrulis por Aĥilo ŝtiparon kaj la flamoj nutrataj per noblaj ungventoj kaj oferbestoj dum tuta semajno leviĝis en la ĉielon.

Pri la kiraso de Aĥilo petis du herooj, Odiseo kaj Ajakso. Laŭrajte Ajakso ricevus la kirason, sed Agamemno kaj Menelao diris, ke ĝi apartenu al Odiseo. Ajakso la nejustan decidon apenaŭ povis elteni kaj kolere li decidis murdi la grekajn gvidantojn kaj Odiseon. Meze de la nokto li iris el la tendo, kun glavo ĉemane kaj serĉis siajn malamikojn. Sed la diino Atena protektis la grekojn. Ŝi sendis frenezon al la heroo. Blindigite de freneza kolero, Ajakso rigardis ŝafgregon kiel siajn malamikojn kaj komencis batali kontraŭ ili kiel kontraŭ armeo. Li eĉ kaptis kelkajn ŝafojn kaj ŝnurligis ilin. En la matena krepusko li vidis, kion li faris kaj rekonsciiĝis. Sed pro la honto pri sia ago li mortigis sin. Kun Ajakso la grekoj perdis plian faman heroon.

Odiseo sukcesis kapti profeton el Trojo. Li devigis lin antaŭdiri al li, kiel la grekoj povus konkeri Trojon. Jen li aŭdis, ke necesas alvoki ankoraŭ du aliajn grekajn heroojn: Neoptolemo kaj la famulon Filokteto, al kiu Heraklo heredigis sian pafarkon kaj siajn mortigajn sagojn.

Odiseo elsendis ŝipon, kiu veturigis la heroojn antaŭ Trojon. Filokteto mortigis Parison, sed Trojo ne kapitulaciis.

Kiam la fortoj kaj armiloj de la herooj rezultigis neniun frukton, Odiseo uzis ruzaĵon. Li transvestis sin kiel almozpetulo, ŝteliris en la urbon kaj spionis ĝin detale. Li renkontis ankaŭ Helenan, la edzinon de Menelao, kiu plej sopire deziris reiri en la hejmlandon. Denove estante en la greka kampadejo, Odiseo ordonis konstrui gigantan lignan ĉevalon. En la vaka ventro de la ĉevalo kaŝis sin Odiseo kun la plej grandaj grekaj herooj. La aliaj bruligis teren la kampadejon, grimpis sur la ŝipojn kaj forvelis, kvazaŭ ili estus finintaj la sieĝon. Sed ili ne veturis malproksimen. Ili kaŝis sin sur proksima insulo.

Kun ĝojo la trojanoj observis la retiriĝon de la greka armeo. De buŝo al buŝo flugis la ĝoja mesaĝo pri la fino de la longatempa milito. La pordegoj de Trojo malfermiĝis kaj la loĝantoj kuris eksteren al la bordo. Mirante ili staris ĉirkaŭ la giganta ligna ĉevalo. En la bordaj rokoj ili malkovris grekon, kiun la ruza Odiseo tie postlasis.

La greko falis sur la genuojn kaj vokis: „Ne mortigu min, bonaj homoj! Nur pro granda bonŝanco mi iel sukcesis fuĝi de la grekoj. Ili volis oferi min kiel Ifigenion, por sekure reveni en la hejmlandon. La lignan ĉevalon ili starigis laŭ la ordono de la dioj ĉi tie, kiel donacon por la urbo Trojo.“

La trojanoj akceptis tion, kion diris la greko. Nur la troja pastro Laokoonto divenis, ke la ĉevalo portos en la urbon la pereon kaj li avertis: „Ne fidu tion, kion diris la greko, ne konfidu al la danaidoj! Ĵetu la donacon de la danaidoj en la maron, konstruu ŝtiparon kaj bruligu ĝin! Ne tiru la ĉevalon en la urbon!“

Dum lia krio aperis el la maro du monstre grandegaj serpentoj kaj rampis al li. Per siaj glite glataj korpoj ili volviĝis ĉirkaŭ la pastro kaj liaj du filoj kaj sufokis ilin. La sorto destinis al la urbo la pereon. La trojanoj rigardis la morton de Laokoonto kiel dian donacon kaj tiris sen hezito la ĉevalon en la urbon. Festeno kaj festoj finis la tagon kaj baldaŭ troviĝis la urbo en paca dormo. En la kvieto de la nokto Helena grimpis sur la urbomuron kaj donis al la grekoj surmare per brulanta torĉo la interkonsentitan signon por la reveno. El la ventro de la ligna ĉevalo grimpis la herooj kaj malfermis la urbajn pordegojn al la armeo, kiu jam ĵetis denove la ankrojn ĉe la bordo de Trojo.

Tintado de armiloj, kriado kaj flamoj vekis la dormantajn trojanojn. Ankoraŭ dormeme ili kaptis la armilojn. La batalantoj paŝis en la urbon kaj vizitis ĉiun domon. La urbo brulis en ĉiuj flankoj kaj en la hela lumo de la bruloj la trojanoj batalis lastan fojon. Mortis ankaŭ reĝo Priamo kaj preskaŭ ĉiuj el la reĝa gento. Helenan kondukis Menelao sur la ŝipon. Sur la urbon sinkis cindro kaj la cindro miksiĝis kun la sango de trojanoj kaj grekoj.

Tiel finiĝis la milito de Trojo kaj rezultigis por neniu ion bonan. La trojanoj kuŝis mortaj sub siaj domruinoj kaj iliajn edzinojn kaj infanojn la venkintoj sklavigis. Sed tro frue jubilis la grekoj pri la falo de Trojo. Nur kelkaj el tiuj, kiuj eskapis la morton, atingis sian malproksiman patrolandon. La ŝtormaj ondoj voris la militan predon, oron kaj arĝenton, kun ŝipoj kaj ŝipanoj. Tiu, kiu post longa erarveturo atingis la hejmlandon, trovis anstataŭ siaj amataj ofte nur tombon. Kiel fremduloj la herooj revenis hejmen. La filoj ne plu rekonis la vizaĝon de la revenintaj patroj kaj la edzinoj serĉis vane en la vizaĝoj de la maljunuloj la karajn trajtojn de siaj edzoj. La milito finiĝis, sed la malbono, kiun ĝi estigis, efikis plu.

*Originalo: TROJSKÁ VÁLKA*

# ORESTO

Triste elstaris la nigriĝintaj ruinoj de la konkerita Trojo al la ĉielo, kaj enmeze de la ruinfragmentoj estis nenio aŭdebla krom la grakado de rabobiroj serĉantaj predon. Sed surborde la vivo estis vigla. La grekoj ŝarĝis siajn ŝipojn per kestoj plenaj de multekostaj or- kaj arĝentotrezoroj kaj valorplenaj vestoj kaj ŝtofoj. Sur la ŝipoplankoj kunpuŝiĝis aroj de sklavoj. Ŝipo post ŝipo tratranĉis la ŝaŭmantajn ondojn kaj forlasis la fremdan bordon.

Ankaŭ la armeestro Agamemno, la reĝo el la genro de Tantalo, velis kun siaj ŝipoj hejmen. Dek jarojn li sieĝis kun la grekaj militistoj Trojon kaj dum ĉiuj ĉi jaroj li ne vidis sian hejmlandon kaj la reĝan palacon en Mikeno. Li proksimiĝis al Grekio sen diveni, ke tie embuskas lin Morto. La kuzo de Agamemno, Egisto, jam delonge sopiris la tronon de Mikeno kaj atendis favoran okazon. Li ne partoprenis en la Milito de Trojo, sed restis en Mikeno. La malĉeesto de la reĝo, tiel li pensis, malfermos al li eblon por akiri la potencon. Per konsiloj kaj flataĵoj li ŝtelire gajnis la favoron de la reĝino Klitemnestro, ĝis kiam tiu cedis kaj promesis sian helpon al li. Ŝi ne povis pardoni al sia edzo Agamemno, ke li oferis ilian filinon Ifigenio.

La ruza Egisto starigis ĉe la bordo gardistojn kaj ordonis al ili: „Rigardu tre observeme la horizonton de la maro. Se vi vidos malproksime la mastojn kaj velojn de la floto de Agamemno, ekbruligu fajron. La fumo montros al mi en Mikeno, ke la reĝo revenas.“

Baldaŭ ekflamiĝis la fajroj de la gardistoj kaj sendis fumon al la ĉielo. Egisto en Mikeno ekkonis, ke la decida momento proksimiĝas. Ĝustatempe avertite, Klitemnestro ornamis la palacon por

solena akcepto kaj ordonis al la servistinoj kovri la vojon al la palaco per ruĝaj tapiŝoj. Sur ili la venkoriĉa Agamemno paŝu en sian rezidejon. La sciigo pri la hejmreveno de la reĝo disvastiĝis rapide tra la urbo. La homoj kunkuris antaŭ la palacon por vidi la faman gloratan armeestron.

Agamemno elŝipiĝis kaj kisis la hejman teron. Ĉe la albordiĝejo jam atendis ĉaro. De granda homamaso entuziasme salutate, la reĝo estis veturigata antaŭ la palacon de Mikeno. La reĝino Klitemnestro ridetante iris renkonte al li kaj bonvenigis lin kun hipokrita ĝojo. Ŝi postulis de li, ke li solene paŝu sur la tapiŝo sub la tegmenton de sia palaco. Agamemno agrable surprizite de la honorigoj, kiuj estis dediĉitaj al li, paŝis en la domon.

„Certe vi estas laca de la streĉa vojaĝo“, parolis Klitemnestro, „mi jam pretigis banadon por vi.“

Agamemno ĝojis pri la prizorgado de la edzino, sekvis ŝin kaj iris en la banejon. Sed apenaŭ li demetis kun siaj vestoj sian kirason, Egisto kaj Klitemnestro ĵetiĝis sur lin kaj lin mortigis.

La mortokrio de la reĝo estis aŭdebla ankaŭ antaŭ la palaco. La homamaso tie kolektiĝinta konfuziĝis. La konsideremuloj interkonsiliĝis, ke oni alvoku la tutan urbon por helpi, la koleremuloj eltiris la glavojn kaj volis senhezite ĵetiĝi en la palacon.

„La reĝo estas murdita!“ ili superkriis sin reciproke.
„Egisto volas okupi la regadon!“ ili kriis kaj sturmis, kun la armiloj ĉemane al la palaca enirejo.

Sed Egisto antaŭdivenis la ribelon kaj bone preparis sin por la okazo. Por liaj militistoj estis facile peli la malbone armitan aron el la palaca korto kaj sekurigi tiel al sia mastro la regadon. Perforte Egisto konkeris la tronon kaj perforte li konservis la potenc-

on. Li okupis la lokon de la morta Agamemno kaj geedziĝis kun Klitemnestro.

Agamemno postlasis filon kaj du filinojn. La pli aĝa fratino Elektra timis pri la vivo de sia malgranda frato Oresto kaj sendis lin tial sekrete al parenca reĝo, kiu edukadis lin. La pli juna fratino estis pli pacema laŭ karaktero ol Elektra kaj obeis la patrinon sen kontraŭdiro. Sed Elektran memorigis en la palaco ĉiu angulo pri la murdo ekzercita je la patro, kaj ŝi vidis kun teruro Egiston en la vestoj de Agamemno. Ŝi ne fariĝis laca pri tio riproĉi la patrinon pro la fiago. Kaj la patrino traktis ŝin kiel sklavinon. Neniu estus supozinta, ke la magra povrule vestita ulino estas la filino. Ŝi servis en la palaco kiel servistino.

Sep jarojn regis Egisto kun Klitemnestro. Sep jarojn suferis Elektra. Dum la sufero kaj aflikto nur la penso pri ŝia frato donis forton al ŝi. Ŝi pensis, ke Oresto iutage venĝos la morton de la patro. Kaj tiel pasis tagoj, monatoj kaj jaroj kaj Elektra pli kaj pli perdis sian esperon.

Sed ĝuste tiam, kiam ŝi dubis plej multe pri la reveno de sia frato, eniris tra la urbopordego de Mikeno maljuna viro, kiun oni vidis ankoraŭ neniam en la urbo. Kaj kun li venis al la urbo du nekonataj junuloj. Kvankam la polvo de la longa vojaĝo kovris iliajn sandalojn, ili ne serĉis ie ripozon, sed iris rekte al la reĝopalaco. Antaŭ la palaco ili haltis.

La maljunulo turnis sin al unu el la junuloj kaj parolis: „Aŭskultu bone, Oresto, kion mi, via nutropatro, diras al vi. Vi ne plu konas la urbon de via patro kaj via patra urbo ne plu konas vin. Kaj tamen vi staras antaŭ la domo de via fama patro, de reĝo Agamemno. Nun sidas en ĝi la impertinenta Egisto, malkuraĝulo kun sangomakulitaj manoj. La momento de la venĝo proksimiĝas. Iru kun Pilado por honori honore ĉe la tombo vian patron, kaj mi iros

en la palacon. Mi volas pretigi al vi la vojon al la reĝino, tiel kiel ni priparolis tion.“

Oresto kaj Pilado, ties fidela amiko ekde infaneco, obeis la nutropatron kaj iris unue al la tombo de Agamemno.

La maljuna nutropatro renkontis en la palaco Klitemnestron. Ŝi ĝuste riproĉis Elektran, sed kiam la fremdulo aperis, ŝi silentiĝis.

„Mi serĉas la reganton“, diris la nutropatro al la reĝino, „mi kunhavas bonan sciigon por li.“

„Reĝo Egisto ne estas en la burgo“, respondis Klitemnestro, „sed, se vi portas bonan sciigon por li, tiukaze estos ankaŭ por mi bona sciigo. Mi estas lia edzino.“

„Mi ne scius informon pli agrablan por vi“, ridete diris la nutropatro, „Oresto estas morta.“

Aŭdinte tion, Elektra elpuŝis desperan krion kaj komencis plori. Tiom da jaroj ŝi atendis la fraton kaj devis nun ekscii, ke li estas morta. Kiu do venĝu la patron?

Klitemnestro apenaŭ povis subigi malŝarĝigitan elspiron. Sep jarojn la timo premis ŝin, ke Oresto povus venĝi la murdon je sia patro. Ankaŭ en la lasta nokto ŝi sonĝis, ke ŝi estas punita por la malnobla fiago. Pro timo ŝi vekiĝis kun ŝvitkovrita frunto. Sed senkaŭze ŝi timis. Oresto estas morta.

„Rakontu, rakontu“ ŝi urĝis la vizitanton avide, „kiel mortis la kompatinda Oresto, la ununura filo de nia genro?“

„Tiom ofte li estis venkinto en vetkonkursoj kaj festaj ludoj. La lasta vetkonkuro alportis la pereon al li. Dekomence ni pensis, ke

li venkos ankaŭ ĉifoje. Oresto estis ja majstro pri la kondukado de duradaj ĉaroj. La ĉaroj brue moviĝis sur la kurejo, la radoj kirle levadis la polvon kaj la snufantajn ĉevalojn kovris ŝaŭmo. Tiel, kiel la ceteraj vetkonkonkuraj partoprenantoj, ĉirkaŭveturis ankaŭ Oresto la celkolonon kaj veturigis la ĉaron rapidege reen. Tiumomente baŭmis la ĉevaloj de alia vetkonkuranto kaj kunpuŝiĝis kun la postsekvanta ĉaro kaj kun ties jungitaj ĉevaloj. La postsekvantoj ne plu povis haltigi la ĉarojn kaj tial kelkaj ĉaroj kun ties tirĉevaloj kunpuŝiĝis kun plena forto, ĝis kiam formiĝis sur la vetkonkurejo terura kaj nedisigebla bulo el ĉaroj, ĉarfragmentoj, veturigistoj kaj bestoj. Nur Oresto povis eviti la ĉarojn kaj pervipe pelis siajn ĉevalojn por ĉirkaŭveturi je lasta fojo la celkolonon. La ĉevaloj rapidaj kiel sagoj kvazaŭ flugis antaŭen, sed la ĉaro tuŝis la kolonon, la radakso disrompiĝis kaj Oresto estis ĵetita de la ĉaro. Dum la falo li kaptiĝis en la rimenoj kaj la ĉevaloj kun la rapidega ĉaro trenis lin laŭ la kurejo, ĝis kiam ĉevalzorgantaj servistoj liberigis Oreston el la rimenoj.Tiel finiĝis lia vivo. Li kuŝis en sia sango, de la propraj bestoj trenita ĝismorte.“

Post tiuj vortoj Elektra kuris el la halo por ie povi larmi en soleco.

Klitemnestro radiis pro ĝojo. Ŝi invitis la bonan heroldon al bankedo kaj ordonis, ke la servistoj portu manĝon kaj trinkaĵojn al li. La nutropatro akceptis la inviton: „Volonte mi atendos la reĝon kaj ripetos antaŭ li la raporton. Ne daŭros longan tempon, ĝis kiam du junaj viroj alportos la urnon kun la cindro de Oresto.“

La reĝino instigis la gaston, ke li prenu manĝon de la plenaj pelvoj kaj insiste demandadis lin. Kun ĉiu vorto de la fremdulo kreskis ŝia sento pri sekureco kaj trankvilo.

Intertempe konsideris Elektra en kaŝita angulo de la palaco, ĉu ankaŭ ŝi mortu, ĉar nun la frato mortas. Eble ŝi mem povus plenumi la venĝon, se ŝiaj malfortaj manoj povus levi la glavon. Dum tiuj malgajaj konsideroj ŝia pli juna fratino surprizis ŝin. Ŝi venis al ŝi ridanta kiel feliĉa sunradio.

„Elektra“, ŝi vokis; „mi estis ĉe la tombo de nia patro, kaj imagu – iu metis florkronojn sur ĝin! Kaj sur la tombo kuŝis detranĉita hararbuklo. Ĝi havis la saman koloron kiel via hararo. Certe neniu alia krom Oresto metis ĝin tie. Kiu alia tie oferus buklon? Mi tiom ĝojas, fratinjo. Certe ni ankoraŭ hodiaŭ revidos la fraton kaj via sufero finiĝos.“

Konfuzate aŭskultis Elektra la vortojn de la fratino. Al kiu ŝi fidu? Al ŝi aŭ al la fremdulo? Kaj kial aperis la buklo sur la tombo de la patro? Nova espero donis forton al ŝi. Se Oresto estas en la urbo, tiukaze proksimiĝas la momento de la venĝo. Tial Elektra ne volis timigi la fratinon per la sciigo pri la fremda heroldo. Ekscitite ŝi kuris el la palaco por ĉirkaŭrigardi pro Oresto.

Kaj ĝuste en tiu momento iris Oresto kun Pilado renkonte ŝin al la patra domo. Elektra vidis la du junajn virojn, sed pro la longtempa disigiteco ŝi ne rekonis la fraton.

Ankaŭ Oresto ne rekonis la fratinon en la ĉifonitaj vestoj kaj parolis al ŝi kvazaŭ al servistino: „Iru kaj konduku nin al la reĝino. Sciigu al ŝi, ke ni portas la urnon kun la cindro de Oresto al ŝi.“

Nur tiumomente ŝi rimarkis la ujon, kiun Oresto tenis surmane, kaj ŝiaj okuloj plenigis sin per larmoj. Kareseme ŝi ĉirkaŭbrakis la urnon, kvazaŭ ĝi estus ŝia vivanta frato, kaj ŝi komencis lamenti: „Jen do la vero. La frato revenis, sed li estas muta, li ŝanĝiĝis en cindron. Kial ne mortis mi anstataŭ li? La forta Oresto estas morta kaj la malforta Elektra vivas. Kiom da ĝojo estos en

la palaco! La murdistoj povas trankvile dormi, dum min sufokas la suferoj.“

Tiumomente Oresto ekkonis la fratinon kaj pro ŝia doloro li ne pli longe povis ŝajnigi sin aliulo. De kunsento superite, li flustris al ŝi: „Ne ĉirkaŭbraku la urnon, en ĝi ne estas la cindro de Oresto.“

„Ĉu ne?“ demandis Elektra, surprizite suprenrigardante al Oresto. „Kaj ie li do estas entombigita?“

„Nenie, ĉar la vivantojn oni kutime ne entombigas.“

„Oresto vivas, ĉu?“ Neakcepteme Elektra observis la fremdulon.

Kaj Oresto montris al ŝi la manon kun la ringo, kiun li ricevis de ŝi, kiam ŝi sekrete forkondukis lin el la palaco. Atenteme Elektra detale rigardis lian vizaĝon kaj rekonis, ke antaŭ ŝi staras la frato. Superite de sovaĝa ĝojo, ŝi ekkriis laŭte: „Oresto vivas, li vivas!“

La memgardema nutropatro aŭdis en la palaco la krion kaj elkuris. La krio de Elektra plirapidigis la plenumon de la plano. „Rapidu, Oresto, via venĝotempo estas veninta!“ li vokis. Tiu eltiris la glavon kaj kuregis en la palacon. Elektra sekvis lin senprokraste.

Klitemnestro staris en la palaco kvazaŭ skulptita el marmoro. Ŝi aŭdis la krion, kaj kiam Oresto aperis kun la glavo kaj post ŝi Elektra, ŝi ekkomprenis, ke la filo venis por venĝi la patron.

Antaŭ la patrino Oresto hezitis dum momento. Sed la nutropatro kaj Elektra denove ekflamigis lian krudan malamon kaj la deziron venĝi la patron. Oresto levis la glavon kaj mortigis Klitemnestron.

Oresto ankoraŭ staris kun la glavo ĉemane kiel obtuzigito pro la terura ago, kiam Egisto kvazaŭ jetiĝis en la halon. Li aŭdis ekstere de la servistoj la ĝojan sciigon, ke Oresto estas morta kaj li rapidis por aŭdi la konfirmigon el la buŝo de la heroldo. Anstataŭ la morta Oresto li vidis la mortan Klitemnestron kaj jam momenton pli poste li renversiĝis traborita de la glavo de Oresto apud ŝi planken.

Apenaŭ la popolo de Mikeno eksciis, ke Oresto revenis kaj venĝis la morton de Agamemno, ĝi torentis svarmope antaŭ la palacon. La homoj volis saluti la filon de la heroa reĝo.

El la pordego de la palaco ŝanceliĝe moviĝis viro. Li ne perceptis la homamason en la korto, li svingadis la brakojn kaj defendis sin kontraŭ nevideblaj teruraj bildoj. La ŝanceliĝanto estis Oresto. Apenaŭ li plenumis la venĝan agon, jam atakis lin la erinioj, la venĝodiinoj, kiuj persekutas ĉiun sangokrimulon. La flugilhavaj erinioj en ondantaj nigraj vestoj kaj kun viperoj en la hararo cirkulis ĉirkaŭ lia kapo, ili kantis al li teruran kanton pri la patrinmurdo kaj el iliaj okuloj gutis sango.

Ĉe la ekvido de la malfeliĉa Oresto silentiĝis la popolo pro teruro. La erinioj pelis lin el la palaco kaj persekutis lin de loko al loko. Li fuĝis el Mikeno kaj vagadis en la lando kaj poste en la mondo. Ĉie akompanis lin la terura kanto de la erinioj kaj plenigis lin per despero.
Lia fidela amiko Pilado akompanis lin sur la sufera vojo. Kune ili iris al Delfo. Ili demandis la orakolon pri konsilo kiel plifaciligi la turmentojn de Oresto, kiel forpeli la kruelajn eriniojn.

Kaj la orakolo parolis: „Iru al Taŭrido kaj de tie kunportu la statuon de Artemiso, kiu falis de la ĉielo.“

Oresto obeis la orakolon kaj ekvojaĝis kun Pilado al la malproksima lando. En Taŭrido regis malica reĝo. Ĉiujn fremdulojn, kiujn oni kaptis en lia lando, li oferis al la diino Artemiso. Oresto kaj Pilado sciis, kia sorto atendus ilin, tial ili kaŝiĝis dum la helaj tagoj kaj tramigris la fremdan reĝolandon nur dumnokte. En la protekto de la nokta tenebro ili volis forporti la statuon. Bonŝance ili ŝteliris ĝis la templo, sed pro neatentema brua sono, ili vekis la proksimajn gardistojn. Oni kaptis kaj enturigis ilin kaj je la sekva mateno oni kondukis ilin al la reĝo. Senkompate la reĝo ordonis, ke oni oferu la enpenetrintojn al la diino Artemiso.

Tuj oni kondukis la katenitajn virojn al la oferaltaro. Oni devigis ilin surgenuiĝi kaj nudigi la nukon, kaj la pastrino de Artemiso alpaŝis kun akra glavo. En tiu momento Oresto rememoris pri sia fratino Ifigenio, kiu simile iam estis oferita al Artemiso. Li adiaŭis sin de la vivo kun ŝia nomo sur la lipoj: „Ifigenio.“

La pastrino aŭdis la nomon kaj mallevis la glavon. Ŝi turnis sin al la reĝo: „Reĝo, malica signo ordonas al mi prokrasti la oferon. La gardistoj intertempe konduku la fremdulojn en la turokarceron. Morgaŭ Artemiso la oferojn certe akceptos.“

Malvolonte la reĝo cedis, sed tamen li ne volis kontraŭstari al la diino Artemiso, kiu parolis al li el la buŝo de la pastrino.

Oresto kaj Pilado leviĝis de la altaro. La pastrino de Artemiso paŝis al ili kaj demandis Oreston mallaŭte: „De kie vi konas tiun nomon?“

„Ifigenio estas mia fratino“, diris Oresto, „ŝi mortis tiel, kiel ni mortos morgaŭ.“

La pastrino subigis la deziron ĉirkaŭbraki Oreston kaj flustris ekscitite: „Mi estas via fratino Ifigenio. La diino min tiam en nubo

forprenis de la altaro ĉi tien. Kaj de tiam mi servas al ŝi kiel pastrino. Timu nenion, frato, mi savos vin ambaŭ.“

En la sekva nokto lumis la steloj por tri survojaj fuĝantoj. Oresto, Pilado kaj Ifigenio fuĝis el Taŭrido kaj portis la statuon de Artemiso kun si, por ke la animo de Oresto trovu pacon.

Sed ankoraŭ dum longa tempo sonadis la malgaja kanto de la erinioj en la oreloj de Oresto, ankoraŭ dum longa tempo ili kantis malgaje al li pro lia ago. Ĝis fine Atena ekhavis kompaton kun la malfeliĉa Oresto kaj mem decidis fini la punon. La erinioj forflugis kaj Oresto ekregis sur la trono de Mikeno.

La kanto de la erinioj ne plu eksonis, sed kiu el tiuj, kiuj iam ajn aŭdis ĝin, povas ĝin forgesi tute?

*Originalo: ORESTES*

# ODISEADO

Kiam Trojon jam voris flamoj kaj ĝi estis ruinaro, forvelis ankaŭ Odiseo, reĝo de Itako, borde de Trojo, akompanata de dek unu pliaj propraj ŝipoj. Li sopiris kiel eble plej rapide revidi la fumon de la hejmlanda Itako, sed la sorto devigis lin al la plej stranga marveturado, kiun travivis iam ajn marveturinto.

Eĉ la plej fortaj brakoj de la remistoj ne helpis. La vento estis pli forta kaj pelis la ŝipojn al fremda bordo, al Ismara, al la urbo de la kikonoj. La grekoj surbordiĝis kaj sukcese konkeris en bataloj la urbon. La predo estis ampleksa. Vane Odiseo konsilis tuj veturi plu. Liaj akompantantoj ne volis obei lin. Ili eksuĉis vinajn hosojn, bruligis bivakfajron kaj rostis viandon. Intertempe la

kikonoj alvokis siajn najbarojn el la interno de la lando por helpi. Ili venis tiom multnombre, kiel la folioj ĉe la junaj branĉoj printempe, kaj dum matenkrepusko ili atakis la grekojn, kiuj estis lacaj de la manĝoj kaj trinkaĵoj. En la kruta batalo mortis ses grekoj el la ŝipoj kaj la aliaj povis savi sin nur per fuĝo. Haste ili saltis sur la ŝipojn kaj veturigis ilin surmaren tiel rapide, kiel ili kapablis.

Ili ne veturis longan tempon, ĝis kiam la ĉielo kaj la maro fariĝis tenebraj kaj malica ŝtormo vipadis muĝante la ondojn. Kolereca vento traskuis la velojn. La grekoj per siaj tutaj fortoj remis kaj atingis nur kun granda peno firman teron kaj ankrumis tie. Du tagojn kaj du noktojn ili restadis ĉe la bordo. Ili ripozis, riparis la velojn kaj restarigis mastojn. Poste ili veturis plu, kun la espero proksimiĝi al la hejmlando, sed sovaĝa vento pelis ilin ankoraŭfoje al nekonata bordo.

Ili surteriĝis, prenis freŝan trinkavon kaj Odiseo elsendis tri virojn por esplori, kiaj homoj vivas tie. Dum longa tempo la maristoj ne revenis. Tial li ekiris mem por serĉi ilin. Li timis, ke eble io malbona okazis al ili. Baldaŭ li eksciis, kial ili ne revenis.

La lando, antaŭ kiu ankrumis la grekoj la ŝipojn, estis la regno de la lotofagoj. Ili afable akceptis ĉiun fremdulon kaj ofertis al ili sian nutraĵon, la dolĉajn semojn de la lotuso. Kiu iam manĝis semojn de tiu superba bongustaĵo, ne plu volis foriri kaj deziris restadi ĝis la morto en la lando de la lotofagoj. La kompatindaj maristoj, elsenditaj de Odiseo, manĝis la semojn kaj ne volis foriri. La aliaj devis forporti ilin perforte kaj sterni ilin ŝnurligitaj sur la fundo de ŝipo. Odiseo liberigis ilin de la ŝnuroj nur tiam, kiam la lando de la lotofagoj malaperis jam el la horizonto.

Post kelkaj tagoj de trankvila veturado la ŝipoj de Odiseo atingis malgrandan insulon. Sur deklivoj kovrataj de herbejoj vagadis

gregoj de sovaĝaj kaproj kaj ekscitis la ĉasinstinkton de la grekoj. Baldaŭ la grekoj revenis kun grasa ĉaspredo de la montetoj. Ĉe la bordo ili ekbruligis bivakfajron kaj baldaŭ disvastiĝis agrabla odoro de rostaĵoj. Dum la vespera manĝo ili trinkis de la malnova vino, kiun ili kunprenis kiel predo ĉe la kikonoj.

Odiseo observis scivoleme la malproksiman kontinentan strion situantan transe de la insulo. Li ne sciis, ke ĝi estas la lando de la ciklopoj. La ciklopoj estis gigantoj, kiuj nek plugis nek semis, sed tamen havis ĉion abunde.

Je la sekva mateno, kiam la nokto ankoraŭ ne retiris la maten-krepuskajn rozajn fingrojn, Odiseo direktiĝis per unu el la ŝipoj al la transa bordo. La aliajn ŝipojn li postlasis bone kaŝite en la loko, kie albordiĝis la ŝipanoj. Ju pli proksimiĝis la ŝipo al la ne-konata regiono des pli granda estis la miro de Odiseo. Kvankam la lando ne estis kultivata, maturiĝis sur la ebenoj abunda greno por rikolto kaj sur la montaj deklivoj kreskis sovaĝaj vinberujoj plenaj de grapoloj kun bluaj sukaj vinberoj.

Odiseo ordonis al la ŝipanoj ankrumi en sekura golfeto, kaj li mem surbordiĝis kun dekduo el la plej kuraĝaj herooj. Ili liberigis vojon tra abunda vepro inter arboj, kies branĉoj kliniĝis sub la ŝarĝo de la fruktoj ĝis la tero, kaj serĉis spurojn de vivestaĵoj. Fine ili haltis ĉe la komenco de roka monto antaŭ la nigra enirejo de kaverno prikreskata je duono per laŭro. Ĉirkaŭ la kaverno etend-iĝis muro el krudaj ne prilaboritaj ŝtonblokoj, inter kiuj alte el-staris piceaj kaj kverkaj trunkoj batitaj teren per giganta forto. Malantaŭ la muro blekadis kaj mekadis grandega grego de ŝafidoj kaj kapridoj.

La grekoj grimpis trans la muron kaj paŝis en la kavernon. Sur pladoj grandaj tiaj, kiaj flosoj, kuŝis fromaĝaj buloj, kaj surtere staris ujoj kun lakto kaj malplenaj melkokruĉoj. Ankaŭ la fro-

maĝobuloj kaj ujoj estis tiom grandegaj, ke la grekoj provis konvinki Odiseon prefere reiri sur la ŝipon. Sed Odiseo almenaŭ volis atendi, ĝis kiam revenos la giganto. Li volonte ekscius, kiel afable la giganto akceptos ilin. Tial li retenis siajn kunulojn ĝis la vespero en la kaverno.

Kiam krepuskiĝis, ili ekaŭdis ekstere tondrajn pezajn paŝojn tiajn, ke la sablo kvazaŭ pluvetis de la kaverna plafono. Tiam giganto Polifemo paŝis en la kavernon kun neimageble granda ŝarĝo el seka ligno. Antaŭ si li pelis ŝafojn kaj kaprojn de la paŝtejo. Li ĵetis la lignon surteren, ruligis grandegan rokan blokon antaŭ la enirejon de la kaverno kaj ekbruligis fajron. El la granda lignostako la flamoj saltis alten kaj prilumis la vizaĝon de la giganto. La grekoj vidis, ke li havas nur unu okulon sur la mezo de la frunto. Per tiu okulo la giganto fikse rigardis la grekojn.

„Kiuj vi estas, fremduloj?“ demandis Polifemo per raŭka voĉo, „kion vi serĉas ĉi tie?“

„Ni estas grekoj“, respondis Odiseo, kuraĝe paŝante antaŭen, „ni troviĝas sur hejmveturo ekde Trojo, kiun ni konkeris, kaj ni petas vin pri gastamikeco. Vi scias tiel bone kiel ni, ke la dioj ordonas honori gastojn.“

Polifemo ridis tiel, ke ĉiuj anguloj de la kaverno tondre reeĥis: „La dioj ordonas! Ĉu? Mi ne interesiĝas pri viaj dioj. Ni, la ciklopoj, estas pli fortaj ol dioj, kaj mi estas la plej forta el ĉiuj ciklopoj. Ni faras nur tion, kio plaĉas al ni, ĉu komprenite? Kaj kie troviĝas via ŝipo, parolu!“

La ruza Odiseo ekkonis, ke estos pli bone, se la impertinenta Polifemo ne ekscios, kie ankrumas iliaj ŝipoj. Tial li diris: „Ni ne havas ŝipon. Pozidono, la reganto de la maro, frakasis nian ŝipon

per rifo. Nur mi mem saviĝis kun dek du viroj. La aliaj trovis la morton en la ondoj.“

La giganto ne respondis tion. Li etendis nur manon kaj kaptis du grekojn el grupo. Tiujn li preparis por manĝo kaj manĝis ilin vespere, krome li trinkis kaprinan lakton kaj poste kuŝiĝis meze de la ŝafoj por dormi.

La grekoj fariĝis kvazaŭ rigidaj pro teruro. La terura manĝo ne permesis dormi al ili. Pasie ili petegis Zeŭson, ke li helpu al ili. Odiseo konsideris, ĉu li traboru la dormantan giganton per sia glavo. Sed, se li provus trabori la kanibalon, ili ĉiuj estus mortkondamnitaj. Ĉiuj eĉ kune ne kapablus forruli la rokoblokon, per kiu Polifemo baris la elirejon de la kaverno.

Matene la ciklopo denove ekflamigis la bivakfajron kaj melkis kaprinojn kaj ŝafinojn. Poste li denove prenis du grekojn kaj preparis ilin por manĝo. Post kiam li manĝis, li forŝovis la rokoblokon tiel facilmane, kvazaŭ ĝi estus ŝtono el siliko, li elpelis ls ŝafojn kaj kaprojn kaj ekstere atenteme fermis per la rokobloko denove la kavernon, por ke neniu el la grekoj povu eskapi de li.

Malĝoje la grekoj sidis en la tenebra kaverno prilumata nur iomete de la lumo de la estingiĝanta bivakfajro. Plena de timo ili atendis la revenon de la giganto. La saĝa Odiseo pripensis seninterrompe, kiel li kaj liaj amikoj povus liberigi sin. Penso post penso enkapiĝis al li, sed li malaprobis ĉiun, neniu el ili ŝajnis sufiĉe sukcespromesa. Kiam li traserĉis la kavernon por eltrovi, ĉu ili povus fuĝi en alia direkto, li trovis ĉe la roka vando la klabon de la giganto. Ĝi similis al la masto de kargoŝipo kun dek du remiloj. Ĉe la rigardado de la klabo Odiseo ekhavis ruzan ideon. Li tranĉis de la klabo lignopecon kaj postulis de la kamaradoj, ke ili glatigu kaj pintigu ĝin, li mem pribruligis la pinton per ardantaj karbopecoj. Poste li klarigis al la amikoj sian planon. La grekoj

per lotado elektis kvar virojn, kiuj helpu Odiseon. La lignon ili kaŝis bone ĉe la sidejo de la giganto. Vespere la ciklopo Polifemo revenis kun la grego kaj refermis la kavernon per la roka bloko. Li sidiĝis, melkis kaprinojn kaj ŝafinojn kaj serĉis el la malpliiĝinta aro de la grekoj du novajn viktimojn. Li manĝis ilin kaj sternis sin por dormi. En tiu momento Odiseo paŝis al li kun kruĉo plena de forta kikona vino prenita el felhoso, kiun la grekoj kunportis.

„Trinku, ciklopo“, diris Odiseo, „trinku, eble pokaleto kun bona vino moligos vian kruelan koron.“

Polifemo malplenigis la pokaleton per unu fojo kaj la vino bongustis al li.

„Enverŝu ankoraŭ plian al mi“, li postulis.

Odiseo plenigis la pokaleton al li je dua fojo kaj la giganto diris kun plaĉo: „Vinon tian mi ankoraŭ ne trinkis. La dioj ne povas havi pli bonan. Mi ne estas maldankemulo, diru al mi vian nomon, ankaŭ mi volas ĝojigi vin kaj doni donacon al vi.“

Odiseo enverŝis je tria fojo vinon por la giganto kaj diris ruze: „Mi volas diri mian nomon al vi, sed ne forgesu la donacon, kiun vi promesis. Mi nomiĝas Neniu. Neniu nomas min la homoj, mia familio kaj amikoj.“

La giganto respondis pene, per lango, kiu fariĝis peza de la vino: „Aŭskultu bone, vi plaĉas al mi. Vin, Neniu, mi voros kiel lastan, post ĉiuj aliaj. Tio estas mia donaco por vi.“

Apenaŭ li diris tion, li lasis fali sin, superita de ebrio. Odiseo, tiel, kiel ili priparolis tion, prenis kun siaj kunuloj la pintigitan palison kaj tenis ĝin en la ardantan cindron. Poste la grekoj puŝis la

bruletantan lignon kun sia tuta forto en la ununuran okulon de la giganto. Tiu vekiĝis kaj kriegis tiom, ke la kaverno kaj la tuta monto ektremis. Terurigite la grekoj fuĝis de li. Polifemo ŝiris la palison el la okulo kaj palpis permane, kvazaŭ frenezigite de kolero, tien kaj tien. Li estis blindigita kaj tial la grekoj povis kaŝi sin antaŭ li post rokaj elstaraĵoj. La giganto kaptis per la fingroj de la manoj nur ŝtonojn kaj teron.

La kriado kaj lamentado de Polifemo penetris ĝis la oreloj de la aliaj ciklopoj. Ili rapidis el siaj kavernoj de la ĉirkaŭaj montetoj, kuris al la kaverno de Polifemo kaj demandis lin, kio okazis, kaj kial li vekis ilin meze de la nokto, ĉu eble iu provas murdi lin.

Tute ekstere de si pro doloro, ripetis Polifemo ĉiam la saman: „Kiu murdas min? Aĥ, Neniu, amikoj, Neniu!“

La ciklopoj skuis dubeme la kapojn kaj vokis: „Ĉu neniu? Kial vi do lamentas? Ĉu Zeŭso sendis malsanon al vi? Preĝu al Pozidono, al via patro, ke li helpu al vi.“

Kaj la ciklopoj reiris en siajn kavernojn.

Matene la giganto malfermis ĝemante la kavernon por ellasi la ŝafojn kaj kaprojn. Li sidiĝis al la elirejo kaj pripalpis zorgeme la dorson de ĉiu besto, ĉu iu el la grekoj sidas sur ĝi.

Sed la ruza Odiseo kunligis po tri virŝafoj per bastonoj kaj sub la mezan li fiksigis unuope ĉiun el siaj ankoraŭ restintaj kamaradoj. Li mem firmtenis sin je la ventra lano de la plej granda virŝafo kaj lasis porti sin de ĝi el la kaverno. La giganto pripalpis nur la dorsojn de la bestoj kaj tial la grekoj bonŝance povis fuĝi de li.

Ekstere ili liberigis la bestojn kaj rapidis tiel rapide, kiel ili povis, al la ŝipo ankrumanta en la golfeto. La ŝipanaro salutis ilin ĝoje,

sed la ĝojo estis limigita pro la aflikto pri la kamaradoj, kiuj ne revenis el la kaverno de a giganto. Ses heroojn Polifemo mortigis. Sed por funebro ne estis tempo. Odiseo komandis peli tiom da ŝafoj de la ciklopo sur la ŝipon, kiom la ŝipo povas ŝarĝi, por ke ili ankoraŭ rapide povu forveturigi la ŝipon. Jam sur la vasta maro Odiseo turniĝis al la bordo de la giganto kaj vokis: „Polifemo, ĉu vi aŭskultas min? Tio estas la venĝo por viaj fiaj blasfemaj agoj! Vi levis sen heziti viajn krimulajn manojn kontraŭ viaj gastoj. Tial Zeŭso kaj ĉiuj aliaj dioj punis vin!“

La giganto aŭdis Odiseon kaj kuris kolere el la kaverno. Li deŝiris la pinton de granda monto kaj ĵetis ĝin en tiu direkto, el kiu venis la voĉo. La roko falis proksime de la ŝipo en la maron. Ne mankis multe da distanco, kaj ĝi estus frakasinta la ŝipon. La maro ekŝaŭmis, granda torento de ondegoj leviĝis kaj reportis la ŝipon al la bordo de la ciklopoj. Nur kun granda peno la remistoj veturigis la ŝipon denove for de la bordo.

Kiam ili estis jam dufoje pli malproksime de la bordo ol antaŭe, Odiseo kriis ankoraŭfoje: „Se vin iu demandos, kiu blindigis vin, jen diru, ke tion faris Odiseo de Itako!“

„Fia sorto trafis min“, plorsingulte lamentis la giganto, „malnova profetaĵo plenumiĝis. Iam oni orakolis, ke certa Odiseo blindigos min. Mi pensis, ke li estas viro tia granda kaj tia forta, kia mi, kaj ke li batalos kontraŭ mi. Kaj nun venis tia malgranda hometo kaj ruze rabis mian vidkapablon! Sed atendu nur, Odiseo, mia patro Pozidono zorgos, ke vi alvenu hejme nur tre malfrue kaj eĉ sola kaj mizera, sen amikoj kaj sur fremda ŝipo!“

Post tiuj vortoj li ĵetegis duan ankoraŭ pli grandan rokon al la ŝipo kun Odiseo kaj preskaŭ frakasis la rudron. La grekoj remis kun ĉiuj siaj fortoj kaj rezistis kontraŭ la potenca torento de la ondegoj. Ili eskapis la giganton je dua fojo kaj baldaŭ revenis al

la aliaj ŝipoj, kiuj ankrumis ĉe la tielnomata Insulo de l' kaproj. Ili disdonis la predon kaj Odiseo oferis al Zeŭso la virŝafon, sub kies ventro li fuĝis el la kaverno de la ciklopo. Sed Zeŭso ne akceptis la oferon. Pozidono estis aŭdinta la peton de sia filo kaj petis Zeŭson pri ties helpo. Zeŭso por Odiseo kaj ties amikoj tenis preta novajn suferojn.

Je la sekva tago en la matena krepusko la grekoj sidiĝis ĉe la remiloj kaj ekkursis al la malproksima Itako. Kelkajn tagojn ili tiel veturigis la ŝipojn sur la vasta maro kaj neniu ŝtormo retropelis ilin. Poste ili venis al insulo, kiu estis ĉirkaŭata de remparo el erco. Pli da feliĉo Odiseo ne povis havi. Sur la insulo loĝis la reĝa dio Eolo, la mastro de la ventoj. Afable akceptis la bonkora reĝo Odiseon kaj ties grekojn en la pompa burgo. Li demandis ilin pri la milito de Trojo kaj pri la vojaĝo de Odiseo al la hejmlando. Abunde li regalis ĉiujn dum tuta monato.

Post kiam la monato pasis, Odiseo petis lin povi adiaŭi sin de li. Eolo mem kontrolis la preparojn por la ekveturo kaj donacis al Odiseo nekutimaĵon. Li metis ĉiujn malfavorajn sovaĝajn ventojn en grandan hoson el bova haŭto kaj kunligis ĝin firme per arĝenta fadeno. La hoson li donis al Odiseo kaj ordonis al favora zefiro plenblovigi la velojn kaj peli la grekajn ŝipojn al la bordo de Itako.

Naŭ tagojn kaj naŭ noktojn plenblovigis la favora vento la velojn de la ŝipoj de Odiseo kaj je la deka tago de la grandioza veturo la grekoj ekvidis Itakon. Ili proksimiĝis al la insulo tiom, ke ili jam povis vidi paŝtistojn ĉe la bivakfajro. Tiumomente Odiseo ne pli longe malpermesis al si dormi. Dum la tuta veturo li stiris la ŝipon kaj ne fermis eĉ okulon. Sed nun, antaŭ la celo, li ekdormis.

„Rigardu“, diris la ŝipanoj, „Odiseo ekdormis. Nun ni fine povos ekscii, kiun donacon li kunportas en la hoso de la reĝo Eolo. Li

diris nenion al ni pri tio, verŝajne li ne volas dispartigi la oron kaj arĝenton inter si kaj ni.“

La ŝipanoj prenis la hoson kaj malligis la arĝentan fadenon. Hurlante kaj siblante fuĝis la sovaĝaj ventoj el la hoso kaj pelis la ŝipojn malproksime sur la maron, for de la hejmlanda bordo. Odiseo vekiĝis kaj ekkonis, kio okazis. Li malesperiĝis tiom, ke estis miraklo, ke li ne ĵetis sin en la ŝtormvipatajn ondegojn. La ŝtormvento retropelis la ŝipon al la insulo de Eolo.

Odiseo rapidis tuj en la palacon, kie la reĝo de la ventoj kun edzino kaj infanoj sidis ĉe la manĝotablo. Eolo tre miris, kiam li revidis Odiseon; sed kiam li eksciis la kaŭzon, li eksaltis kolerigite kaj vokis: „Forlasu la palacon kaj mian insulon! Vi falis en malfavoron ĉe la dioj. Tian homon, kian vi, mi ne plu povas protekti.“

Malĝoje Odiseo reiris al siaj amikoj ĉe la bordo. Nun ili ne plu povis fidi al favoraj ventoj. La ŝipanoj pene baraktis tra la ondegoj kaj la ŝvito fluis de la remistaj fruntoj.

Lacaj ili atingis nekonatan rokan bordon. Ili trovis taŭgan ankrejon por la ŝipoj, sed nur Odiseo fiksigis sian ŝipon per ŝnuregoj je klifo antaŭ la haveno kaj grimpis sur rokon por elrigardi. Antaŭ li troviĝis ebeno sen homoj kaj sen bestoj. Malproksime leviĝis fumo en la ĉielon – eble post la horizonto troviĝas urbo. Odiseo reiris al la haveno kaj sendis tri elesploristojn en la internon de la lando. La grekoj transiris la ebenon, liberigis vojon tra profunda arbaro kaj alvenis antaŭ urbon kun altaj muroj. La unua homo, kiun ili renkontis, estis knabino, kiu portis akvon de puto. Ŝi ne aspektis kiel kutima knabino, sed estis grandega kiel turo, sed ŝi klarigis afable kaj bonvole al la grekoj ĉion, kion ili volis scii. Tiel ili eksciis, ke ili troviĝas en la lando de la lestrigonoj, kaj ke la urbo nomiĝas Telepilo, ke la patro de la knabino laŭdire estas tie la reĝo. La knabino kondukis ilin al la reĝa palaco kaj la grekoj

kvazaŭ rigidiĝis. Ili staris antaŭ reĝino, kiu estis granda kiel monto. Apenaŭ ekvidante la grekojn, ŝi vokis sian edzon. Ŝia voĉo tondris kiel falanta roko sur monta deklivo, kiu ŝiras rokpecojn, arbojn kaj arbustaĵojn kun si en valon. La reĝo de la lestrigonoj, monstre granda, alkuris, kaptis iun el la grekoj kaj ordonis, ke oni pretigu lin kiel manĝon. La du aliaj fuĝis kaj revenis kun sia malbonŝanca mesaĝo al la kamaradoj.

La reĝo de gigantoj blovigis alarmon. La gigantaj lestrigonoj svarme rapidis trans la ebenon kaj kuris al la bordo. Ili derompis rokoblokojn, ĵetis ilin al la ŝipoj kaj frakasis ilin. La mastoj disrompiĝis, la akvo penetris tra la frakasitaj ŝipvandoj en la internon kaj la veturiloj sinkis kun la grekoj. Neniu el la ŝipoj, kiuj ankrumis en la haveno, eskapis. Nur Odiseo povis savi sin kun kelkaj kunuloj. En la lasta momento li tratranĉis la ŝnuregon, per kiu lia ŝipo estis firmligita je la klifo kaj forlasis rapide la malamikecan regionon.

Per ununura ŝipo kaj la postrestintaj amikoj Odiseo traplugis la maron kaj pensis pri la mortaj kunuloj neniam plu revideblaj. Preskaŭ ĝismorte lacigitaj de la streĉega remado kaj elĉerpitaj de la travivintaj teroroj, la grekoj grimpis sur la bordon de insulo, sternis sin kaj kuŝis tiel du tagojn kaj du noktojn. Je la tria mateno, kiam la matena ruĝo apenaŭ komencis kombi la oran hararon de la nova tago, Odiseo prenis glavon kaj lancon kaj penetris en la internon de la insulo. Li trovis vojon kaj ekvidis fumon super arbokronoj. Sur la vojo reen li renkontis grandstaturan cervon. Odiseo mortigis ĝin per la lanco kaj revenis al la malsataj marveturistoj kun la ĉaspredo. Ili manĝis ĝin rostita kun bona apetito dum ripozo kaj la nutraĵo donis al ili novajn fortojn. Post la manĝo Odiseo dividis la grekojn en du grupojn. La unuan li kondukis mem, la duan kondukis la stiristo Eŭriloko. Poste ili lotis, kiu grupo iru en la internon de la lando. La sorto lotumis Eŭri-

lokon kaj ties grupon. Afliktite li ekiris kun siaj kunuloj en la arbaron. La grekoj havis antaŭ la okuloj ĉion tion, kion ili travivis ĉe lestrigonoj kaj ciklopoj, kaj tial ili iris nur lante kaj atenteme antaŭen.

En arbara valo ili ekvidis belan pompan domon. Ĉirkaŭ la domon ŝteliris montaj lupoj kaj leonoj, sed ili ne atakis la alvenintojn. Ili karese tuŝis la marvojaĝantojn tiel, kiel hundoj tuŝas hejmirantan mastron. El la domo eksonis dolĉa kantado. La dolĉe kantanta voĉo apartenis al la sorĉistino Kirko, kiu loĝis en la domo. Ŝi mem malfermis al la grekoj la pordon kaj petis ilin ridetante enveni. La grekoj ne povis rezisti kaj eniris. Nur la stiristo Eŭriloko ne fidis al la sorĉistino kaj prefere restis ekstere. Kirko kondukis la ŝipanojn en belegan halon, ofertis al ili oportunajn dorsapogajn seĝojn por sidado kaj pretigis al ili bongustegan manĝon el mielo, fromaĝo, faruno kaj forta vino. En la manĝon ŝi verŝis sorĉosukon. La grekoj manĝis kun bona apetito, sed subite ili komencis transformiĝi. El ilia haŭto kreskis haregoj, la kapoj etendiĝis al porkaj buŝoj, kaj gruntante ili falis sur kvar krurojn. La sorĉistino pelis ilin per vipo el la halo en la porkostalon kaj ĵetis teren antaŭ ili glanojn kaj fagonuksojn.

Eŭriloko atendis vane siajn kunulojn. Tial li reiris al la ŝipo kaj raportis al Odiseo, kion li vidis kaj travivis. „Ni forveturu tuj, kiam ni ankoraŭ povas“, konsilis Eŭriloko, „nur la dioj scias, kia danĝero embuskas nin ĉi tie.“

„Ni ne povas forveturi kaj postlasi la amikojn al ilia sorto“, diris Odiseo. Li petis detale klarigi la vojon, poste li armis sin kaj komencis serĉi la perditajn virojn.

Survoje li renkontis alte kreskintan junan viron, li ekkonis, ke li estas la dio Hermeso. Hermeso mansalutis lin kaj diris: „Kien vi kuras? Ĉu vi pensas, ke sen la helpo de la dioj vi povus helpi al

viaj kunuloj, kiuj antaŭ ne longe estis transformitaj de Kirko en porkojn? Mi volas helpi al vi.“ Hermeso kliniĝis kaj elfosis de la tero herbon kun blanka floro kaj nigra radiko. „Tiu herbo“, li diris, „nomiĝas Moli. Per ĝi vi rezistos al ĉiuj sorĉartifikaĵoj. Prenu ĝin. Se Kirko tuŝos vin per la sorĉa bastono, eltiru vian glavon, ĵetu vin sur ŝin, kvazaŭ vi volus mortigi ŝin. Tiel vi facile instigos ŝin ĵuri, ke ŝi ne suferigos vin. Vin tiam ne plu minacos malbono kaj vi revidos viajn kamaradojn.“

Hermeso parolis kaj poste malaperis. Pripenseme Odiseo iris al la domo de la sorĉistino. Kirko akceptis lin ĉe la pordego, invitis lin afable kaj donis al li ridetante sorĉtrinkaĵon. Ŝi apenaŭ kapablis atendi, ĝis kiam li estos eltrinkinta la oran pokalon. Tuj kiam Odiseo eltrinkis, ŝi vipis lin kaj vokis: „Ek, en la porkostalon, al viaj amikoj!“

Sed la sorĉo je Odiseo ne funkciis. La herbo Moli gardis lin. Li eltiris sian glavon kaj atakis la sorĉistinon kvazaŭ li volus trapiki ŝin. Mirigite kaj ektimigite Kirko surgenuiĝis kaj tuŝis genuon de Odiseo.

„Ho ve“, ŝi kriis, „ĉu vi eble estas Odiseo, kiun la orakolo anoncis al mi? Se vi estas Odiseo, eningigu vian glavon kaj permesu, ke ni estu geamikoj.“

„Ĵuru“, Odiseo diris kun levita glavo, „ĵuru, ke vi suferigos min neniel.“

Kirko ĵuris. Nur poste li eningigis la glavon kaj akceptis ŝian gastamikecon. Servantaj nimfoj pretigis manĝon. Unu el ili kovris la tablon kaj ĵetis purpurajn tegojn sur la fotelojn, alia miksis en arĝentan kruĉon dolĉan medon kun akvo, tria pretigis por Odiseo banadon. Baninte kaj vestinte la novan veston, kiun Kirko

donacis al li, Odiseo sidiĝis kun ŝi al la tablo. Sed li ne manĝis kaj rigardis malĝoje.

„Kial vi ne manĝas?“ demandis Kirko, „ĉu vi eble kutimas pli luksajn bongustaĵojn?“

„Kiel mi povas manĝi kaj ĝoji, se mankas al mi miaj kamaradoj?“ respondis Odiseo. „Liberigu ilin de la sorĉo kaj vi liberigos ankaŭ min de la aflikto.“

Kirko ne rifuzis la peton. Ŝi iris en la korton, malfermis la stalan pordon kaj elpelis la porkojn. Ŝi viŝetis ĉiun per sorĉosuko, kaj tuj defalis iliaj haregoj, iliaj korpoj rektiĝis kaj anstataŭ porkoj staris la grekoj ĉirkaŭ Kirko. Ili rapidis al Odiseo kaj dankis kortuŝite al li por la savo. Kirko petis Odiseon alkonduki ankaŭ la aliajn marveturistojn. Ili tiris la ŝipon sur la sekan teron kaj kolektiĝis ĉiuj ĉe Kirko. La sorĉistino kaj la nimfoj agrabligis la vivon al ili kaj la pelvoj kaj kruĉoj estis plenigitaj dum tuta jaro. Rapide pasis la tempo dum plaĉa vivo kaj festoj. Post jaro Odiseo petis Kirkon, ke ŝi permesu adiaŭi lin kaj la ceterajn grekajn heroojn.

„Mi ne volas reteni vin kontraŭ via volo“, diris la sorĉistino. „Sed, se vi volas eviti longajn erarveturojn, vi devos iri en la submondon. Tie pridemandu la ombron de la blinda profeto Tiresio pri orakolo.“

Odiseo afliktiĝis pri la nova danĝero. Kirko rimarkis tion kaj konsolis lin: „Ne ĉagreniĝu, Odiseo, starigu nur la maston kaj metu la velojn. La vento helpos al vi alveni tien. Se vi estos transirinta la oceanon, vi ekvidos platan bordon kun salika bosko kaj sveltaj nigraj poploj. Tio estas la bosko de la diino Persefono kaj la enirejo al la submondo. Iru sola, sen akompananto, je sola loko fosu fosaĵon kaj oferu al la mortintoj nigran virkapron kaj nigran ŝafon. La odoro de la sango allogos la ombrojn de la mortintoj kaj

ili provos trinki de la sango. Tion rifuzu al ili per la glavo kaj ne lasu proksimiĝi ilin, ĝis kiam vi estos demandinta Tiresion pri la orakolo, ĝi konsilos al vi kiel reveni hejmen."

Kirko elektis el sia grego nigran ŝafon kaj nigran virŝafon, ŝi donacis la bestojn al Odiseo kaj adiaŭis sin de li kaj de la marveturistoj.

Blovis favora vento, kaj la ŝipo flugis kiel birdo trans la ondojn. Ne daŭris longan tempon, ĝis kiam aperis antaŭ ili plata bordo kun nigraj poploj kaj salikoj. Odiseo sekvis la konsilon de la sorĉistino Kirko kaj iris sola al la trista bordo, kie li fosis fosaĵon.

Apenaŭ li preĝis kaj lasis flui la sangon de la oferbestoj en la fosaĵon, aperis el la submondo la animoj de la mortintoj. Junuloj kaj maljunuloj, ulinoj kaj infanoj, viroj mortigitaj en milito, ĉiuj grimpis kun ĝemoj el la ombra regno supren kaj urĝis sin al la oferoj. Odiseo eltiris la glavon kaj detenis al la ĉirkaŭflugantaj ombroj trinki de la sango de la buĉitaj bestoj. Inter la animoj de la mortintoj li malkovris ankaŭ la ombron de sia patrino, kiu ankoraŭ vivis, kiam li ekiris en la militon. Vidante ŝin, li ploris pro kompato, sed ankaŭ al ŝi li ne permesis tuŝi la bestojn per la lipoj. Fine proksimiĝis la ombro de la profeto Tiresio kaj vokis al Odiseo, ke li eningigu la glavon. La profeto trinkis kaj parolis: „Vi, Odiseo, grave kolerigis la dion Pozidono, kiam vi blindigis lian filon Polifemo. Li faros la reveturon malfacila al vi. Tamen vi povos reveni hejmen, se vi sekvos miajn konsilojn. Vi baldaŭ albordiĝos ĉe la insulo Trinakio. Sur la sukaj herbejoj de la insulo paŝtas sin grasaj ŝaf- kaj bovogregoj. Ili apartenas al la sunodio Helios. Ne tuŝu liajn bestojn.

Se vi mortigos kelkajn el ili, via ŝipoj kaj viaj kunuloj estos perditaj. Tiukaze vi mem atingus la hejmlandon nur sur fremda ŝipo. Sed ankaŭ tie atendos vin nenio bona. Vi trovos vian palacon

plena de impertinentaj svatiĝantoj, kiuj svatiĝas pri via edzino Penelopo. Se vi revenos, vi punu ilin. Poste oferu al Pozidono kaj vi travivos trankvilan maljunulan vivon.“

Odiseo dankis por la profetaĵo kaj demandis: „Tie mi vidas la ombron de mia mortinta patrino, ŝi silentas kaj ne rigardas min. Kion mi faru por povi paroli kun ŝi?“

Teresio sciis konsilon: „Ĉiu, kiun vi permesos iri ĉi tie al la sango, parolos kun vi kaj diros al vi la veron.“ Tiam li forturniĝis kaj paŝis lante reen en la ombran regnon.

Odiseo lasis trinki sian patrinon, jen ŝi rekonis lin kaj parolis: „Kiel vi venis ĉi tien, infano mia? Ĉu vi ankoraŭ nun erarvagadas en la mondo, ekde la falo de Trojo? Ĉu vi ankoraŭ ne reiris al Itako, al la edzino kaj la filo?“

Odiseo raportis al la patrino sian malgajan sorton kaj demandis ŝin, kio okazas en Itako.

La patrino diris: „Via fidela edzino Penelopo atendas vin seninterrompe kaj ploras pri vi. Via filo Telemako vivas trankvile sur viaj bienoj. Via maljuna patro sopiras vidi vin ankoraŭ vivanta. Li retiriĝis en la kamparon kaj ne plu volas iri en la urbon. Li kampare vivas kun sia servistaro kaj laboras kiel kamparano. Min entombigis la granda sopiro al vi kaj la aflikto pri via forestado.“

Ŝi finis paroli kaj Odiseo tremis pro hejmsopiro. Li etendis la brakojn, sed la ombro de la patrino solviĝis antaŭ liaj okuloj kiel nebulo en vento. Nun la ombro de Agamemno paŝis al la ofersango, ĝi trinkis kaj ekkonis Odiseon. Larmante ĝi rakontis al li, kiel la propra edzino Klitemnestro mortigis lin, kiam li revenis el la Milito de Trojo. Ĝi avertis Odiseon, ke li estu memgardema ĉe la re-

veno hejmen al Itako, ke li surbordiĝu sekrete. Estus eble, ke ankaŭ lin iu provos murdi. Antaŭ Odiseo aperis la ombroj de mortaj militistoj, kiuj batalis en Trojo. La ombro de Aĥilo rekonis je li sian kuraĝan militkamaradon kaj Odiseo gloris Aĥilon, ke li estas ankaŭ en la submondo granda reganto inter la mortuloj.

La ombro de Aĥilo respondis nur melankolie: „Prefere mi estus surtere kamparano kaj servus ĉe povruloj en fremda lando ol esti en la submondo reganto inter la mortuloj.“ Li demandis Odiseon, kiel lia filo kondutis antaŭ Trojo kaj aŭdis kun ĝojo, ke tiu montriĝis kiel heroo.

Silente Ajakso preteriris Odiseon. Eĉ en la morto li ankoraŭ koleris pri Odiseo pro la kverelo pri la kiraso de Aĥilo.

En longaj vicoj venis la ombroj de la mortintoj al la ofero de Odiseo. Li rekonis multajn, kaj multaj rekonis lin. Sed estis tiom da ili, ke li teruriĝis kaj deturnis sin kaj retrorapidis al la ŝipo. La ŝipanoj remis per siaj tutaj fortoj kaj la ŝipo forveturis de la malgastema pejzaĝo de l' morto eksteren sur la vastan de ondoj movatan maron.

Odiseo sciis, ke li nun devos transvivi du danĝerojn, pri kiuj jam Kirko avertis lin.

Unue li devos eskapi de la kaptiloj, kiujn metos ĉarmaj marniksinoj, la sirenoj, al la malfeliĉaj marvojaĝantoj. Per dolĉa kantado ili logas la senspertajn ŝipanojn al sia insulo, kaj se ŝipo sekvas iliajn voĉojn, ĝi frakasiĝos je la akraj subakve kaŝitaj rifoj. Apenaŭ montriĝis la perfidema insulo al iliaj rigardoj, Odiseo ŝtopis la orelojn de la ŝipanoj per vakso, tiel ke ili ne povu aŭdi la dolĉan kantadon. Sin mem li ordonis firmligi al la masto. Kvankam li aŭdis la kantadon de la sirenoj, la katenoj malhelpis lin ĵeti sin en la maron kaj naĝi al la insulo.

Tiel ili eskapis de la sirenoj, sed post mallonga veturado ili aŭdis teruran hurladon kaj muĝadon. Ili proksimiĝis al la dua danĝero. Tio, kio tie muĝis en kaverno sub giganta roko, estis la monstro Skilo. Seninterrompe ĝi hurlis per siaj ses hundaj kapoj, kiuj kliniĝis super la akvo. Transe de la kaverno elstaris pli malalta roko de la akvo. Sub tiu sidis Karibdo, filino de Pozidono, kiu ĉiutage trifoje ensuĉis la akvon kaj ĉiam poste elkraĉis ĝin. La akvo ĉe la roko ŝaŭmis pro vortico, la roko bruis malfeliĉon anoncante, kaj la ondoj estis malhelaj de tero kaj sablo kaj blankaj de kirlita ŝaŭmo. La ŝipanoj, kiuj eskapis Skilon, kutime fariĝis viktimoj de la transa terura kirlo de Karibdo kaj tamen ne evitis sian pereon. Pro teruriĝo glitis la manoj de la viroj de Odiseo de la remiloj. Li kuraĝigis ilin kaj konsilis, ke ili preteriru la pli grandan rokon. Tio rekomendis la sorĉistino Kirko al li. Ili remis per siaj tutaj fortoj, sed Skilon ili ne eskapis. Ties ses kapoj aperis el la ondegoj, ili kaptis ses de la kamaradoj de Odiseo kaj tiris ilin malsupren en la maran kavernon, kie ili voris ilin. Sed la aliaj ŝipanoj eskapis de Karibdo, kiu estus frakasinta la tutan ŝipon.

Lacigite de la streĉa veturado, ili ekvidis la verdajn bordojn de la insulo Trinakio. Sur herbejoj plenaj de odorantaj herboj paŝtis sin la gregoj de la dio Helios. Odiseo ne volis ankrumi la ŝipon ĉe la insulo. Li timis, ke kelkaj el liaj kunuloj povus suferigi la gregojn de Helios, kaj ke tiel plenumiĝos la profetaĵo de Tiresio.

„Almenaŭ permesu, ke ni ripozu de la penplena veturo“, petis la stiristo Eŭriloko, „ni nur ripozos kaj poste veturos plu. La gregojn ni eĉ ne rigardos.“

Odiseo rifuzis tion, sed kiam ĉiuj ŝipanoj ĵuris, ke ili eĉ ne tuŝos la sanktajn gregojn, kaj ke ili estas kontentaj pri la kunprenitaj nutraj provizaĵoj, li cedis. Ili ankrumis la ŝipon kaj la grekoj sternis sin agrable oportune sur softa herbejo.

Sed en la nokto Zeŭso sendis ŝtormon kaj de tiam vipadis la ventoj seninterrompe la maron, kaj la altaj ondoj malebligis forlasi la insulon al la ŝipanoj. La grekoj sekurigis sian ŝipon kaj restadis sur la firma tero. Tiom longe, kiom sufiĉis iliaj provizaĵoj ili ne suferis mizere. Sed la tago sekvis la nokton, kaj la nokto la tagon, kaj la ŝtormo ne trankviliĝis. Jam tutan monaton la ŝtorma maro retenis la grekojn sur la insulo. La nutraĵoj elĉerpiĝis kaj la ŝipanoj suferis pro malsato. Kaj eĉ tiam ili ankoraŭ ne povis ekveturigi la ŝipon sur la maron.

En tiu malfeliĉa tempo Odiseo decidis migri laŭ la bordo kaj ĉirkaŭrigardi. Dum lia malĉeesto Eŭriloko diris al la ŝipanoj: „Ĉu vi volas morti pro malsato, dum ĉirkaŭ ni paŝtas sin la plej grasaj brutaroj, kiujn mi iam ajn vidis? Ek do, ni buĉu kelkajn bovinojn kaj ni oferu la plej bonajn viandopecojn al la dioj, por ke ili pardonu al ni. La restaĵon ni dividu inter ni.“

La malsataj ŝipanoj kun ĝojo konsentis kaj ĵuris, ke ili konstruos por Helios en Itako mirinde belan templon, se ili restos vivaj. Tiam ili kunpelis kelkajn bovojn, buĉis ilin kaj oferis la plej sukajn pecojn al la dioj. Por si mem ili rostis la restaĵojn. Odiseo revenis tro malfrue por malhelpi tiun fiagon. Laŭte plendante li riproĉis la kunulojn, ke ili ne plenumis sian ĵuron.

La kolero de la dioj montriĝis baldaŭ. La fortiritaj haŭtoj de la bovoj rampis mem trans la herbejon kaj la kruda viando muĝis je la kradrostaĵo. Ekde sia sunĉaro Helios vidis la fiagon de la ŝipanoj kaj plendis pri tio ĉe Zeŭso kaj ĉe la aliaj ĉieluloj. Li postulis por la kunuloj de Odiseo laŭajn punojn kaj minacis grimpi en la ombran regnon kaj prilumi la mortintojn, se ili ne estos punitaj.

Ses tagojn la ŝipanoj nutris sin de la viando de la sankta grego. Je la sepa mateno trankviliĝis la maro kaj ili povis veturi sur la maron. Trinakio malaperis malantaŭ iliaj dorsoj kaj laŭ ĉiuj flankoj

etendiĝis la soleca maro. Zeŭso ne pli longe prokrastis la punon. Li sendis nigran nubon trans la bluan ĉielon, senkatenigis ŝtormon kaj ĵetegis sian fulmon al la ŝipo. La ŝipo renversiĝis sur la ŝtormaj ondoj kaj la ŝipanoj falis en la maron. Nur Odiseo, kiu ne manĝis de la bovoj de Helios, restis viva.

Post la ŝiprevenverso li drivis sur la fragmentoj de la ŝipo dek noktojn ĝis la insulo Ogygie. Tie loĝis enmeze de la florantaj boskoj en ombroplena groto la nimfo Kalipso. Ŝi akceptis Odiseon en sia vitoornamita volbita loĝejo, ŝi regalis lin kaj penis forgesigi la ĉirkaŭan mondon al li. Sep jarojn Kalipso retenis Odiseon sur la insulo kaj ne lasis lin forveturi.

Fine ekkompatis la diino Atena la malfeliĉan kaptiton kaj defendis lin ĉe la diopatro Zeŭso. Tiu sendis la dioheroldon Hermeso al la nimfo kun la ordono, ke ŝi lasu foriri Odiseon.

Odiseo sidis kiel kutime sur la mara plaĝo, rigardis trans la maltrankvilan maron al la horizonto kaj ploris pro hejmsopiro. Tiumomente li aŭdis post si voĉon.

„Malvolonte, Odiseo, mi lasas vin foriri“, parolis Kalipso, „se vi restus ĉiam en mia kaptiteco, mi povus donaci al vi eternan junecon kaj senmortecon. Sed la ordonon de Zeŭso mi ne povas ignori. Konstruu floson kaj ekveturu hejmen.“

Odiseo apenaŭ povis kompreni, ke la nimfo liberigis lin. Kiam li retrankviliĝis de la surprizo, li prenis kun ĝojo hakilon kaj komencis renversigi arbojn. Baldaŭ la floso estis preta. La nimfo havigis al la heroo manĝojn kaj trinkaĵojn.

Denove Odiseo veturis movate de ondoj sur la maro. Blovis favora vento kaj la vojaĝo estis sen ĝenoj. Post kelkaj tagoj li ekvidis firman teron. Sur la klara ĉielo konturiĝis la montara fajaka

lando. Sed Odiseo ne atingis sen akcidento la bordon. Dio Pozidono rimarkis la floson de Odiseo kaj kirlis kolere per la tridento la maron. Li vualis la ĉielon, la firman teron kaj la maron en nubojn kaj pelis la plej terurajn ventojn kaj ŝtormojn al Odiseo. La kompatindan heroon balais ondego en la maron kaj li, kroĉinte sin al trabo de sia frakasita floso, ŝanceliĝis dum du tagoj kaj du noktoj inter vivo kaj morto.

Matene de la tria tago li rimarkis arbaran bordon. Alta ondo portis lin sur la firman teron, sed dua reprenis lin en la maron. Per sia lasta forto li reatingis la bordon ĝuste tie, kie rivereto fluas en la maron. Sur seka tero li tuj sinkis teren. Vekis lin nur la nokta frido, ĉar li perdis en la ŝtormo siajn vestojn. Li serĉis tial olivan arbustaĵon, sternis sin sur falintaj folioj kaj kovris sin per foliaro. Apenaŭ li kuŝis, li jam endormiĝis. Li ne sciis, ke li dormas en la fajaka lando.

Dum li dormis, la diino Atena zorgis pri lia hejmreveno. Ŝi rapidis en la kastelon de la fajaka reĝo Alkinoo kaj vizitis ties filinon. La bela Naŭsikaa dormis sur sia lito kaj similis tiel al diino. Atena kliniĝis sur ŝin kaj enspiris sonĝon al ŝi. En la sonĝo ŝi ordonis al la reĝa filino tuj matene veturi per ĉaro kaj kun servistinoj al la rivero kaj lavi siajn luksajn vestojn.

La radioj de la matena ruĝo forpelis la sonĝon. Naŭsikaa leviĝis kaj iris al la patro por postuli ĉaron de li. Komune kun la servistinoj ŝi portis siajn vestojn sur la ĉaron kaj veturigis ĝin mem ĝis la rivero, kiel ŝia nokta sonĝo ordonis tion. Kaj la servistinoj postkuris la ĉaron.

Ili lavis la vestaĵojn en la rivero kaj dum ili sekiĝis, ili banis sin kaj manĝis. Poste Naŭsikaa kaj la knabinoj plezuriĝis per pilkludado. Naŭsikaa ĵetis la pilkon al servistino, kiu staris proksime de

la rivero, kaj Atena kondukis ĝin tiel, ke ĝi falis mezen de la fluo. La knabinoj ekkriis kaj de tio vekiĝis Odiseo.

Unue li ektimis, ĉar li supozis denove esti veninta en landon de rabistaj gigantoj, sed baldaŭ li ekkonis la voĉojn de la damoj. Li derompis branĉon por kaŝi sian nudecon kaj venis el la arbustaĵo. Ekvidinte lin, la ulinoj kriis eĉ pli laŭte ol antaŭe kaj forkuris laŭborde. Ne estis miraklo. Odiseo estis plena de koto kaj maroŝlimo, kaj kun la antaŭen tenita branĉo li pli similis al fantomo ol al homo el karno kaj ostoj. Nur Naŭsikaa postrestis kaj ne forkuris. Atena plenigis ŝian koron per kuraĝo. Odiseo haltis kaj petis de malproksime, por ne fortimigi Naŭsikaaon: „Egale, ĉu vi estas diino ĉu mortemulino, mi petas vin, ne forkuru kaj helpu al mi. La ŝtormo pelis min post ŝippereo al tiu ĉi lando, mi konas ĉi tie neniun kaj eĉ ne scias, kie mi troviĝas. Kompatu min, donu al mi iun veston kaj montru al mi la vojon tien, kie loĝas homoj. La dioj rekompencos tion al vi kaj donos al vi tion, kion vi deziras!“

Naŭsikaa respondis sen timo: „Fremdulo, vi ŝajne ne estas malbona homo. Mi volas helpi al vi. Mi estas la filino de la fajaka reĝo Alkinoo kaj montros al vi la vojon al la urbo. Vi turnis vin kun peto al mi kaj mi ne rifuzas la peton.“

Kaj la reĝa filino kunvokis la timemajn servistinojn kaj ordonis al ili, ke ili alportu vestojn por Odiseo. Odiseo banis sin en la rivero kaj vestis sin. Lia protektmastrino, la diino Atena, donis al li belecon, tiel, ke li similis al la ĉieluloj. Mirante Naŭsikaa kaj la servistinoj vidis lian transformiĝon. Ili donis manĝojn kaj trinkaĵojn al li kaj Odiseo kvietigis siajn malsaton kaj soifon.

Poste la servistinoj metis la sekigitajn vestojn kaj tolaĵojn sur la ĉaron kaj Naŭsikaa surgrimpis. Odiseo iris piede kun la servistinoj.

Antaŭ la urbo diris Naŭsikaa al Odiseo: „Ne estu kolera, fremdulo, sed ne iru kun ni en la urbon. Atendu ĉi tie en la tremola bosko kaj eniru la urbon nur tiam, kiam ni estos perdiĝintaj el viaj okuloj. Se la fajakoj vidus, ke mi venas kun fremdulo en la urbon, ili dirus, ke mi kondukas fremdan fianĉon en la urbon. Vi trovos la reĝan palacon facile sola. Serĉu tie mian patrinon kaj petu ŝin pri helpo. Se ŝi favoros vin, vi certe revenos en vian hejmlandon."

La reĝa filino foriĝis kun sia sekvantaro post la urbomuroj. Odiseo elvenis de la tremola bosko kaj iris rekte en la urbon. Diino Atena vualis lin en nebulon por ke la fajakoj ne vidu kaj retenu lin. Ŝi mem transformiĝis en junan knabinon kaj kondukis lin en la palacon de la reĝo Alkinoo.

Mirigite Odiseo rigardis la brilan reĝan burgon. Ties muroj estis kovritaj per bronzo kaj la pordoj ornamitaj per oro. Je ambaŭ flankoj de la enirejo staris hundoj el oro kaj arĝento. Ĉirkaŭ la palaco etendiĝis majesta ĝardeno plena de sukaj piroj, figoj, pomoj kaj grapoloj. La fruktoj de tiuj arboj neniam fariĝis nemanĝeblaj kaj la branĉoj portis fruktojn dum la tuta jaro.

En la festena halo de la palaco sidis ĝuste la plej noblaj el la fajakoj kun la reĝo ĉe festena manĝo. Odiseo atingis nevidite la reĝan paron. Tie Atena deprenis la nebulan veston de li kaj Odiseo falis sur la genuojn antaŭ la reĝino.

„Reĝino", li vokis, „mi petegas vin kaj vian edzon pri helpo. Helpu al mi reveni en mian hejmlandon! La dioj donacu feliĉon al vi!" Parolinte li sidiĝis antaŭ la fajrujo de kameno en la polvon.

Ĉiuj silentiĝis kaj ekestis kvieto. Fine iu el la fajakaj herooj ekparolis: „Reĝo Alkinoo, ne estas ĝentila lasi sidi gaston sur la tero en la polvo antaŭ la kameno. Li sidiĝu ĉe ni antaŭ la tablo. Lasu

miksi vinon en kruĉo kaj ordonu al la kastelana mastro porti manĝon al la gasto.“

Al la reĝo plaĉis tiu parolo, permane li kondukis Odiseon al pompa fotelo je sia flanko kaj regalis lin. Li promesis zorgi, ke la gasto povu reveni en sian hejmlandon.

Kiam la manĝado estis finita kaj Odiseo restis sola kun la reĝa paro, la reĝino ne pli longe bridis sian scivolemon kaj demandis, de kie la gasto havas la belan vestaĵon. Ŝi rekonis sian propran laboron, ĉar ŝi mem kun siaj servistinoj teksis la tukon. Odiseo raportis al la reĝo kaj al la reĝino konfideme sian lastan aventuron kun la nimfo Kalipso, li rakontis pri sia ŝippereo kaj ankaŭ ne prisilentigis, ke li renkontis ĉe la mara bordo ilian reĝan filinon. Nur sian nomon li ne diris.

La reĝo aŭskultis atenteme. Tian heroon li dezirus al si kiel edzon por sia filino. Tamen li ripetis sian promeson helpi al la fremdulo iri hejmen. Poste ili adiaŭis la itakan heroon kaj enlitiĝis. Ankaŭ Odiseo sternis sin sur softa lito kaj la dormo baldaŭ forpelis ĉiujn zorgojn de li.

Matene reĝo Alkinoo ordonis, ke kvindek du elektitaj maristoj pretigu novan nigran ŝipon por la veturo. Kiam la tempo estos veninta, ili venu en la palacon. En la reĝa burgo estis vigla vivo. La reĝo invitis honore al la fremdulo multajn fajakajn nobelulojn al la festeno kaj la gastoj plenigis ĉiujn halojn. Venis tien ankaŭ la fama kantisto Demodoko, kiu estis blinda, sed li tiel vivaŭtentike povis kanti pri heroaĵoj kaj bataloj, kvazaŭ li vidus ilin antaŭ si.

Post la bankedo la reĝo postulis, ke Demodoko kantu antaŭ ili. La blinda kantisto tuŝis la kordojn de la liuto kaj kantis pri Trojo. Lia

kanto rakontis pri la kverelo de du famaj herooj, pri Aĥilo kaj Odiseo.

Odiseon kortuŝis la kantado de Demodoko. Ĉe la sono de lia nomo li eklarmis. La reĝo rimarkis la tuŝitecon de la heroo kaj interrompis la kantadon. Li volis forpeli la malgajon de la fremdulo kaj tial rekomendis al la junaj fajakoj ludi kaj vetkonkursi.

La batalejo plenigis sin per fajakoj, kiuj montris siajn kapablojn. Ili vetkonkursis pri kurado, saltado kaj diskĵetado. Odiseo nur observis ilin. La fajakoj volonte estus vidintaj, ke ankaŭ Odiseo pruvas sian forton kaj rapidecon. Sed li estis en pensoj jam sur la alta maro kaj atendis senpacience la momenton, kiam la reĝo donos la signon por la ekveturo. Tial li rigardis la vetkonkursojn distrite kaj kun malĉeesta menso.

„Eble nia gasto estas komercisto, kiu vagadas sur la maro“, flustris la fajakoj, „komercistoj ne havas intereson pri batalludoj kaj pensas nur pri sia gajno.“ Tiel ili flustris kaj rikanis. La filo de Alkinoo, incitita pro la paroloj de siaj amikoj, postulis de Odiseo, ke li montru siajn kapablojn. Odiseo decide kontraŭis tion, sed per tio li nur plifortigis la mokojn de la fajakoj. Tiumomente li fariĝis kolera kaj prenis la plej grandan diskon, kiu troveblis ĉe la batalejo. La disko fajfante flugis tra la aero, tiel, ke la fajakoj timigite kliniĝis teren. Ĝi flugis trans ĉiujn iliajn kapojn, tiom granddistance, kiom ĵetis ankoraŭ neniu el la fajakaj junuloj. Nun neniu kuraĝis plu moki Odiseon.

Post la vetkonkursoj, ludoj kaj dancoj la fajakoj iris kun Odiseo al la palaco kaj daŭrigis la interrompitan bankedon. Ĉifoje Odiseo mem postulis, ke Demodoko kantu por li. Tiu komencis kanton pri la konkero de Trojo. Aŭdante pri siaj sortobatoj kaj la ligna ĉevalo, Odiseo denove kortuŝite verŝis larmojn. Nur Alkinoo rimarkis la kortuŝitecon de Odiseo kaj ordonis fini la kantadon kaj

turnis sin al la fajakoj. „Kiel mi vidas, la kantado de Demodoko ne ĝojigas ĉiujn. Demodoko kantas kaj nia gasto fariĝas malĝoja. Al ĉiu el ni la gasto devas esti tiom proksima kaj kara kiel la propra frato. Diru do, fremdulo, kiel vi nomiĝas, kiu estas viaj gepatroj kaj de kie vi venas. Tion vi devos diri al ni ankaŭ tial, por ke ni povu veturigi vin tien.“

Odiseo iom embarasiĝis, kiel komenci sian rakonton kaj tial li diris sian nomon kaj tiun de sia patrio. Ĝoja ekscitiĝo kaj miro ekposedis la kolektiĝintajn fajakojn. Kun retenita spiro ili aŭskultis la rakonton de Odiseo.

Post kiam li finis la rakonton, dum longa tempo neniu plu moviĝis en la halo, eĉ ne tintis pokalo. Kiel unua leviĝis reĝo Alkinoo. El la tuta koro li deziris al la nobla heroo rapidan kaj sekuran hejmveturon, kiu ĝis tiam estis rifuzita al li.

Je la sekva tago la fajakoj portis la donacojn sur la ŝipon, kiujn Odiseo ricevis de la reĝo kaj de la nobeluloj. Kestegoj plenaj de valorplenaj vestoj kaj ujoj kaj arte ornamitaj armiloj. Alkinoo ordonis buĉi bovinon kaj oferis la plej bonan viandon al la dioj. Post la festena adiaŭa manĝo ordonis la reĝo pobe de la ŝipo sterni tapiŝon kaj fajnan tolaĵon, por ke Odiseo dum la veturo povu dormi sen ĝeno.

Sur la sojlo de la palaco Odiseo adiaŭis sin de la bona reĝo de la fajakoj. Nun nenio plu malhelpis la heroon veturi hejmen. Li iris sur la ŝipon kaj la remistoj eklaboris. En la horizonto malaperis la gastema bordo de la fajakoj kaj antaŭ ili troviĝis Itako.

Kiam la steloj paliĝis kaj la nokto retiriĝis pro la hela tago, la fajakoj atingis la hejmlandon de Odiseo. La heroo profunde dormis. Al la maristoj do ne restis alia eblo ol porti la dormantan

Odiseon kun ties donacoj sur la firman teron. Poste ili turnis la ŝipon hejmen.

Kiam Pozidono eksciis, ke la fajakoj helpis Odiseson, obsedis lin kruela kolero. Li petis de la dia patro Zeŭso la permeson puni la fajakojn. La fajaka ŝipo proksimiĝis jam al la haveno kaj al la bordo, kaj la homoj kolektiĝintaj tie, povis vidi la ŝipon tute precize. Tiumomente subite leviĝis Pozidono el la ondoj kaj batis permane la ŝipon. La bato transformis la ŝipon kun ĉio, kio estis sur ĝi en ŝtonon kaj la ŝtono kunkreskis firme kun la mara grundo kaj firme ankrumis en ĝi.

Ĉe la bordo staris ankaŭ reĝo Alkinoo kaj lamentis laŭte. Li konis malnovan malican profetaĵon. Iutage, jen la diro, Pozidono transformos hejmvenantan fajakan ŝipon en ŝtonon kaj ĉirkaŭfermos la urbon per granda roka montaro. Tuj la reĝo alvokis la fajakojn por granda ofero, por ke Pozidono ekhavu kompaton kaj ne enfermu la urbon per la montaro. La fajakoj ektimis kaj pretigis la oferon.

Intertempe Odiseo vekiĝis sur la plaĝo de la insulo Itako, leviĝis kaj ĉirkaŭrigardis malgaje. Post ĉiuj ĉi jaroj li ne rekonis sian patrujon, tie, kie iam estis kalva deklivo, kreskis nun vepraj arboj kaj tie, kie pli frue verdis densa arbustaĵo, blanke brilis nun ŝtono en la matena suno. Despere Odiseo komencis voki kaj lamenti. Li pensis, ke la fajakoj trompis lin kaj demetis lin en nova fremda lando. Sed de la donacoj de l' fajakoj mankis nenio. Tripiedoj, kaldronoj, juveloj kaj belegaj vestoj en kestegoj, ĉio ĉi kuŝis sentuŝita sur la plaĝo.

De monta deklivo grimpis juna paŝtisto malsupren. Diino Atena transformiĝis en la figuron de paŝtisto kaj iris al li por konsoli la malfeliĉan heroon.

Odiseo ĝojis, ke li trovis je la soleca bordo homon. La juna paŝtisto estis vestita kiel filo de mastro, li portis ornamitajn sandalojn surpiede kaj ĉemane lancon. Li ne aspektis malamike. Odiseo iris renkonte al li kaj pridemandis lin: „Vi certe venas el granda foro“, diris la alivestita diino, „ĉar vi ne konas la nomon de tiu ĉi lando. La plaĝo, sur kiu ni staras estas la plaĝo de la insulo Itako.“

Odiseo subigis sian ĝojon kaj ankaŭ memgardeme prisilentis sian nomon. Li rakontis al la paŝtisto eltrovitan rakonton, kiel li venis kun siaj posedaĵoj sur la insulon.

La diino ridetis. Ŝi retroŝanĝiĝis en ĉielan belulinon kaj diris: „Kia homo tiu devus esti, kiu povus superi vin je ruzeco. Vi eĉ superruzus la diojn. Eĉ en via lando vi ne demetas vian aliŝajnigon. Sed mi venis por helpi al vi. Mi estas Atena.“

La diino helpis al la heroo kaŝi la valorplenajn trezorojn en proksima kaverno, poste ŝi sidiĝis kun li ĉe olivarbo, kuraĝigis lin kaj konsilis al li: „Ne timu, mi ne perfidos vin. Unue mi zorgos, ke neniu en Itako ekkonos vin antaŭ ol tio estos necesa. Mi sulkigos vian glatan haŭton, mi elfaligos vian hararon kaj vualos vin en ĉifonvestojn. Mi obtuzigos la brilon de viaj okuloj kaj faros vin maljuna kaj malforta, por ke vi aspektos malbela ne nur al la svatiĝantoj, kiuj volas edzinigi vian edzinon Penelopo, sed ankaŭ al ŝi mem kaj al via filo. En la figuro de maljuna almozpetisto vi vizitu la porkopaŝtiston Eumaeos. Li estas honesta kaj restis fidela al vi. Ĉe li vi ekscios, kio okazas en via palaco. Intertempe mi alvokos vian filon Telemako, kiu veturis al Sparto. Li esploras ĉe reĝo Menelao vian sorton.“

„Ankaŭ mia filo erarvagadu tra la maroj?“ demandis Odiseo terurigite.

La diino trankviligis lin. „Vi ne devas afliktiĝi pro via filo. Li ne suferas pro iu manko. Mi mem akompanis lin kaj ankaŭ rekondukos lin en la hejmlandon.“

Kaj la diino tuŝis Odiseon per sia sorĉobastoneto. Tuj ŝrumpis la haŭto de la heroo, lia vizaĝo kovriĝis per sulkoj kaj la vestaĵo sur liaj oldulaj membroj disfalis en vestoĉifonojn. Ŝi enmanigis al li bastonon kaj ĵetis sur unu el liaj ŝultroj malbelan trivitan sakon kaj malaperis.

Tiel transformite, Odiseo iris al la paŝtisto Eumaeus, kiel la diino ordonis al li.

La maljuna paŝtisto sidis en sia ĉirkaŭbaraĵo kaj kudris novajn sandalojn por si. La aliaj pli junaj paŝtistoj estis kun la grego ie sur paŝtejo. Apenaŭ la hundoj flaris, ke proksimiĝas al la ĉirkaŭbaraĵo fremdulo, ili ĵetiĝis kun kolera bojado eksteren. Ili estus malice disŝirintaj Odiseon, se Eumaeus per ĵetitaj ŝtonoj kaj krioj ne estus forpelinta ilin. Li afable akceptis la fremdan oldulon, sternis por li en sia somera dometo sekajn branĉetojn kaj ĵetis molan pelton sur ilin, por ke la oldulo povu sidi oportune. Honore al la gasto li buĉis du porkidojn, distranĉis ilin kaj komencis rosti ilin sur la rostkrado. Dum tio li parolis al la fremdulo: „Mi povas oferti al vi nur junajn porkojn. La grasigitajn porkojn mi devas liveri en la palacon, kie la svatiĝantoj tage kaj nokte drinkas kaj voras manĝon. Ili diboĉas kaj la gregoj malpliiĝas, la keloj kaj manĝoprovizejoj malpleniĝas. Se mia kompatinda mastro estus ĉi tie, li certe reordigus ĉion, sed nur la dioj scias, kie li estas entombigita. Antaŭ multaj jaroj li foriris en la militon de Trojo. Se li ankoraŭ vivus, li estus jam reveninta. Trojo ja jam delonge estas venkita.“ La paŝtisto metis antaŭ Odiseon rostaĵon kaj miksis vinon en lignokruĉo.

Sin fortiginte, diris Odiseo al la paŝtisto: „Dum longa tempo mi vojaĝis tra maroj kaj landoj. Diru al mi,.kiel nomiĝas via mastro? Eble mi renkontis lin kaj povas raporti ion pri li.“

„Mia malfeliĉa mastro“, respondis la paŝtisto, „nomiĝis Odiseo. Li estis bona kaj justa. Tian mastron mi neniam retrovos, tiom longe, kiom mi vivos.“

„Se Odiseo estas via mastro“, diris la kamuflita heroo, „mi povas ĵuri al vi, ke li ankoraŭ ĉijare revenos. La rekompencon por tiu sciigo mi elektos al mi mem ĉe vi, tuj kiam Odiseo denove aperos en la reĝopalaco.“

„Ŝparu al vi viajn ĵurojn“, malŝate mangestis la nefidema paŝtisto. „Rekompencon vi ne ricevos, ĉar Odiseo ne revenos al sia palaco. Sed nun mi timas pri lia filo Telemako. Li vojaĝis al reĝo Menelao. Kaj oni diras, ke la svatiĝantoj sendis ŝipon al li por ataki kaj murdi lin en la reveturo. Kaj nun diru al mi, kara gasto, kion vi travivis kaj de kie vi venas?“

Odiseo rakontis al la paŝtisto eltrovitan rakonton. Li rakontis, ke li venis de la insulo Kreto kaj travivis multajn aventurojn, ke li estis ankaŭ en la milito de Trojo kaj konatiĝis al Odiseo, ke antaŭ ne longa tempo li denove renkontis lin, kiam Odiseo troviĝis sur la vojaĝo hejmen.

La paŝtisto aŭskultis atenteme, li fidis al li, li nur ne akceptis, ke Odiseo revenos. Li pensis, ke la fremdulo per tiu bona sciigo nur volas gajni lian favoron.

Krepuskiĝis, kaj la aliaj paŝtistoj revenis al la dometo. Ili fermis la bestojn en la stalojn kaj sidiĝis por vespermanĝi. Ekstere vualis nuboj la lunon kaj en la malhelo susuris brue la pluvo. Malseke frida vento blovis tra la fendoj en la vandoj kaj Odiseo frostotre-

mis. Li pripensis, kiel li povus varmigi sin kaj decidis testi la fidelecon de la paŝtistoj.

„Aŭskultu“, li diris, „mi volas rakonti al vi, kio okazis al mi dum la sieĝo de Trojo. Iam mi kuŝis kun reĝo Menelao, Odiseo kaj aliaj militistoj, en densejo de vepro ĉe la muroj de Trojo. Ni embuskis kaj nokte devis atendi ekstere. En la nokto leviĝis neĝblovado. La frida vento blovis la neĝon sur niajn vizaĝojn kaj baldaŭ ni frostis tiom, ke ni rigidiĝis. La aliaj militistoj havis varmajn mantelojn, kaj do ne ĝenis ilin, ke sur iliaj ŝildoj kroĉiĝis glacio. Sed mi postlasis mian mantelon en la kampadejo. Mi supozis, ke ne fariĝos fride. Je mateno mi ne plu povis elteni la fridon kaj diris al Odiseo: 'Amiko, ankoraŭ iom da tempo kaj mi elspiros mian animon. Mi ne havas mantelon , mi mortas pro frido'. – 'Silentu', diris Odiseo, 'iu povus aŭdi vin.' Li ekstaris kaj diris al la dormemaj militistoj: 'Iu dio ĵus sendis al mi sonĝon. Ni tro vaste malproksimiĝis de la ŝipoj kaj bezonas plifortigon. Iu iru kun la komisio al la armeestro Agamemno'. – Tuj leviĝis militisto, demetis sian mantelon kaj kuris al la ŝipoj. Sed mi vualis min en la mantelon kaj dormis ĝis la mateno. Se mi nur estus tiom juna kaj forta kiel tiam, certe iu pruntedonus mantelon al mi por protekti min kontraŭ la nokta frido.“

„Efektive, grandioza rakonto“, diris ridante Eumaeus, „ankaŭ mi, oldulo, volas do pruntedoni mantelon al vi. Se Telemako, la filo de Odiseo revenos, mi donos al vi la mantelon kaj kondukos vin tien, kien vi volas.“

Kaj la paŝtisto pretigis al li softan dormejon el ŝaf- kaj kaprofeloj. Kiam Odiseo sternis sin, la paŝtisto kovris lin per sia propra vila mantelo. Li mem ne sternis sin por dormi, sed prenis glavon kaj lancon kaj eliris por gardi la gregon. Odiseo ankoraŭ ne dormis, kaj kiam li vidis, kien iras Eumaeus, li ĝojis, ke la paŝtisto okupiĝas tiel atenteme pri la brutaro konfidata al li.

En tiu nokto Telemako en Sparto turniĝadis maltrankvile sur sia dormejo en la palaco de la reĝo Menelao. Ĉiam denove li vekiĝis, la zorgoj pri la patro ne lasis lin dormi. Subite retiriĝis la nokta malhelo kaj antaŭ Telemako aperis la diino Atena.

„Tuj sen prokrasto veturu hejmen“, ŝi ordonis al la junulo, „sed estu memgardema dum la vojaĝo. La svatiĝantoj intencas neniigi vin. Ili embuskas vin sur ŝipo en la markolo por kapti vin. Tial evitu la markolon kaj velu per via ŝipo nur nokte. Alveninte en Itako, sendu nur viajn kunulojn en la urbon, sed mem iru al fidela paŝtisto Eumaeus .“

Atena leviĝis flugante al la Olimpo kaj Telemako obeis ŝian konsilon. Ŝarĝite per donacoj, li forlasis reĝon Menelao kaj ties edzinon Helena kaj veturis sur la maron. Li evitis la markolon, kie embuskis lin la ŝipo kun la svatiĝantoj kaj li atingis per favora vento bonŝance la bordon de Itako.

Pli frue ol siaj kamaradoj li forlasis la ŝipon kaj iris al la paŝtisto Eumaeus.

Odiseo sidis kun la paŝtisto en la dometo, kiam ekstere eksonis ĝoja bojado de hundoj. La paŝtisto ekstaris por rigardi, kio okazas ekstere kaj ekvidis la filon de Odiseo. Pro surprizo glitis el liaj fingroj la vinpokalo. Per tremantaj manoj li ĉirkaŭbrakis Telemakon kaj kisis lin larmante. Poste rigardis Odiseo fiere kaj kortuŝite sian filon. Li forlasis Telemakon, kiam li ankoraŭ estis knabeto kaj tiumomente vidis lin denove kiel alte kreskintan junan viron. Sed li kaŝis sian kortuŝitecon kaj ofertis al la filo sian lokon sur la pelto.

„Restu sur via sidloko, fremdulo“, diris Telemako. „Mi sidiĝos aliloke, sufiĉe da loko ja estas ĉi tie.“

Li sidiĝis apud la paŝtiston kaj Odiseon kaj la paŝisto, radiante pro ĝojo, alportis rostaĵon kaj vinon. Telemako manĝis kaj demandis, de kie venas la fremda gasto. Eumaeus ripetis la eltrovitan rakonton, kiun Odiseo rakontis al li.

„Li venis al mi“, finis la paŝtisto sian rakonton, „kaj petis min pri tranokteblo. Nu, ĉar vi revenis, mi povas transdoni lin al vi. Li venis al ni kiel almozpetisto.“

„Li prefere restadu ĉe vi“, konsiderante diris Telemako, „mi sendos al li bonan veston, glavon kaj manĝon, sed en la palacon mi ne povus konduki lin. La svatiĝantoj de mia patrino, kiuj tie diboĉe manĝas kaj trinkas, estas impertinentaj kaj nefidindaj, ili povus moki lin kaj lin iel suferigi. Ili estas tro multaj, tiel, ke mi ne povus protekti la gaston kontraŭ ili.“

Odiseo miris, ke Telemako toleras la fian agadon en la domo de sia patro kaj Telemako rakontis, kiel kuntorentis la nobeluloj de la ĉirkaŭaj insuloj kaj ankaŭ de Itako, kiam Odiseo ankoraŭ ne revenis post longa tempo. Ili svatiĝis pri la reĝino Penelopo, kaj tiu ne kuraĝis rifuzi ilin. Ŝi regalis ilin kaj prokrastis la tempon, kiam ŝi estos devigita decidi sin. Intertempe la svatiĝantoj festenis kaj la posedo de Odiseo malpliiĝis, la gregoj pli malgrandiĝis kaj la provizejoj malplenigis sin. Telemako mem estis tro juna por povi kontraŭi tian superpovon.

Poste la filo de Odiseo turnis sin al la paŝtisto kaj sendis lin en la urbon al la reĝino kun la sciigo, ke la filo revenis sana kaj vivanta el Sparto. Eumaeus prenis sian bastonon kaj ekmigris. Odiseo kaj Telemako postrestis solaj. Jen aperis al Odiseo Atena kaj kapsignis al li. Odiseo sekvis ŝin el la dometo kaj Atena parolis al li. „Vi, Odiseo, antaŭ via filo ne plu devas ŝajnigi vin aliulo. Diru al li, kiu vi estas, kaj iru kun li en la urbon por puni la impertinentajn svatiĝantojn. Mi helpos al vi.“ Ŝi parolis tion kaj tuŝis la heroon per

sorĉbastono. Tiumomente okazis miraklo. Odiseo fariĝis denove juna, la ĉifonoj transformiĝis en belajn vestojn, la blanka barbo fariĝis nigra, kaj la rompiĝema paŝmaniero firma kaj sekura.

Transformiĝinte, li reiris en la dometon kaj Telemako ektimis. Li pensis, ke iu dio staras antaŭ li.

„Mi ne estas dio“, diris Odiseo, „mi estas via patro, kiun vi jam priploris kiel mortinton.“

Li ĉirkaŭbrakumis Telemakon, sed la filo ne fidis al li. Kiel mortinto tiel rapide povas ŝanĝi sian aspekton? Momenton antaŭe li ankoraŭ estis oldulo.

„Atena subtenas nin“, konfidis Odiseo al li, „kaj la dioj povas ŝanĝi la aspekton de la mortidevuloj. Nun mi transvestiĝos je lasta fojo en almozpetiston kaj morgaŭ mi iros en la reĝopalacon. Rakontu al neniu pri nia renkontiĝo, nek al Eumaeus nek al la patrino. Mi mem volas vidi, kiu restis fidela al mi, kaj kiu prenis la partion de la svatiĝantoj.“

Intertempe la ŝipo de Telemako venis en la havenon kaj baldaŭ poste ankaŭ la ŝipo de la svatiĝantoj, kies ŝipanoj vane embuskis la filon de Odiseo. La svatiĝantoj rapide kuris el la palaco en la havenon. Neniu el ili povis klarigi, kiel la ŝipanoj kun la ŝipo de Telemako povis eskapi.

„Sur la ŝipo li eskapis nin, tio estas ĝusta“, diris Antonio, la plej fia el ĉiuj svatiĝantoj, „sed sur la firma tero li ne eskapos nin. Ni mortigos lin en la urbo.“

Servisto, fidela al la reĝino, aŭdis la vortojn de Antonio kaj sciigis ilin al sia mastrino. Penelopo, kolerigita pri la malica intenco de

Antonio, iris tuj en la halon, kie restadis la svatiĝantoj kaj ŝi riproĉis ilin, ke ili intencas murdi la filon. La svatiĝantoj ektimis kaj hipokrite diris, ke ili, tiom longe, kiom ili vivos ne kurbigos eĉ hareton de Telemako. Dum tio ili ridetis por trankviligi la reĝinon. Sed sekrete ili pensis pri la mortigo de Telemako.

Vespere Eumaeus revenis en la paŝtistan dometon kaj alportis la sciigon pri la du ŝipoj kaj pri la okazaĵoj en la palaco. Telemako kondutis al sia patro kiel al fremdulo kaj diris al Eumaeus: „Mi morgaŭ iros en la palacon por viziti mian patrinon. Vi sekvos min kun la fremdulo, por ke li povu almozpeti en la urbo."

Je la sekva mateno Penelopo akceptis Telemakon kun malfermitaj brakoj. Li devis raporti al ŝi, kion li eksciis pri la patro, kiam li vojaĝis. Kaj Telemako rakontis pri la nimfo Kalipso, kiu retenis Odiseon sur sia insulo, sed li ne perfidis, ke la patro revenis.

Kiam la suno post frosta nokto varmigis la aeron, ankaŭ Eumaeus kaj la kamuflita Odiseo ekiris en la urbon. Odiseo tenis sian trivitan sakon sub la brako kaj apogis sin pene sur la almozpetistan bastonon. En la urbo ili iris al la reĝa palaco. Bruo, la odoro de manĝoj kaj la sonoj de liutoj perfidis al Odiseo, ke en la palaco drinkas kaj manĝas granda aro de homoj. Eumaeus konsilis al li atendi en la korto. Li volis unue sola iri en la burgon.

Dum ili interparolis, levis maljuna malsana hundo, kiu kuŝis sur sterkejo, la kapon. Odiseo lin iam plenkreskigis antaŭ ol li iris en la militon de Trojo. Nun la hundo flaris sian mastron, turniĝadis la voston, sed ĝi estis tro malforta por leviĝi. Odiseo observis la hundon kaj viŝis al si sekrete ploron el unu el la okuloj.

„Strange, ke tia hundo kuŝas sur la sterkejo", li diris al Eumaeus, „ oni vidas ankoraŭ nun, ke ĝi estas el bona bredo."

„Kompreneble“, diris Eumaeus, „ĝi estis ja la plej preferata hundo de mia mastro. Odiseo ĉiam kunprenis ĝin, kiam li ĉasis. Neniam mi vidis pli rapidan kaj pli kuraĝan beston. Sed nun, ĉar mankas la kontrolo de la mastro, la neglektemaj servistinoj ne plu zorgas pri ĝi.“

Eumaeus iris en la domon kaj Odiseo longe rigardis sian plej ŝatatan hundon. Kvazaŭ li estus atendinta dum dudek jaroj je tiu momento, la hundo klinis la kapon kaj eligis la lastan spiron.

En la palaco sidis Telemako kun la svatiĝantoj ĉe manĝotablo. Rimarkinte Eumaeuson, li vokis lin al si. La paŝtisto sidiĝis apud sia mastro, kiu regalis lin per manĝoj de la abunde kovrita tablo. Post iom da tempo ankaŭ Odiseo, paŝante malfirme kiel oldulo, venis en la halon kaj sidiĝis sur la sojlon de la pordo. Tuj, kiam Telemako ekvidis lin, li prenis panon kaj viandon kaj donis ĝin al Eumaeus, por ke li portu ĝin al Odiseo. La fremdulo manĝu, poste li almozpetu. Odiseo manĝis kaj poste komencis almozpeti inter la svatiĝantoj kvazaŭ li neniam estus farinta ion alian dum sia tuta vivo.

Ĉiuj donis al li almozojn kaj pridemandis lin pri lia deveno. Odiseo rakontis al ili sian elpensitan rakonton. Nur Antonio volis doni nenion al li, kvankam eĉ ne unu el la svatiĝantoj donacis ion de si mem, ili donis al la almozpetisto manĝon de la tablo.

„Se ĉiu donus al la kota almozepetisto tiom, kiom mi, li certe neniam plu montriĝus ĉi tie“, vokis Antonio, li levis de la planko tabureton, sur kiun li apogis siajn piedojn dum la manĝo kaj ĵetis ĝin al Odiseo. Li trafis lin dorse. Sed Odiseo ne moviĝis, sed staris kiel roko.

Reĝino Penelopo aŭdis en sia ĉambro la kriadon. Dolorigis ŝin, ke la fiera Antonio en ŝia domo ofendis povran fremdulon. Ŝi vokigis Eumaeuson kaj demandis lin, kiu estas la fremda almozpetisto. La paŝtisto rakontis al ŝi tion, kion li sciis. Kiam la reĝino ekscis, ke la fremdulo konas Odiseon kaj nur antaŭ ne longa tempo interparolis kun li, ŝi tuj mem sopiris pridemandi lin pri sia edzo. Ŝi sendis Eumaeuson por alkonduki la almozpetiston. Sed Odiseo evitis la renkonton, dirante, ke nur vespere li volas renkonti ŝin, ke nun li ne volas inciti la svatiĝantojn.

Post la manĝo la paŝtisto ekstaris kaj reiris al sia grego. Li promesis, ke li revenos je la sekva mateno kun la plej bonaj porkoj.

La svatiĝantoj plezurigis sin per dancado kaj kantado kaj la tago kliniĝis iom post iom al la fino.

Jen aperis en la pordo de la halo plia almozpetisto. Li estis nomata Iros kaj estis konata en la tuta urbo. Kvankam li ne estis forta, li estis nekutime granda. Apenaŭ li ekvidis Odiseon sur la sojlo, li minacis lin kaj provis lin forpeli.

Odiseo respondis milde: „Sur la sojlo estas sufiĉe da loko por ni ambaŭ. Ni ambaŭ estas almozpetistoj kaj mi ne vidas kaŭzon, kial ni kverelu.“

Iros ĵetis sin al Odiseo kaj kvazaŭ inundis Odiseon per torento de insultoj kaj ne ĉesis minaci lin. La svatiĝantoj aŭskultis ridante la kverelon de ambaŭ kaj Antonio diris: „Amikoj, tio fariĝos amuza spektaklo, kiam ili komencos pugnobatali. Mi proponas, ke ni donu al la venkonto la plej grandan sangokolbason havigeblan. Kaj ni ankoraŭ povus rekompenci lin per tio, ke li ĉiam rajtos drinki kaj manĝi kun ni, kaj ke ni ne plu enlasos alian almozpetiston en la halon.“

Kun plezuro la svatiĝantoj akceptis la proponon de Antonio. Odiseo kondutis kvazaŭ li hezitus. Li volis logi el la svatiĝantoj la promeson ne enmiksiĝi en la batalon kaj ne helpi al Iros. La svatiĝantoj akceptis tion kaj ankaŭ Telemako kiel gastiganto promesis tion al Odiseo.

Odiseo senigis sin de la ĉifonvestaĉoj, kiuj vualis liajn gambojn kaj montris muskolecajn surojn kaj fortajn femurojn. Krome sian larĝan bruston. Surprizite la svatiĝantoj rekonis la muskolojn de Odiseo kaj divenis jam la malvenkon de Iros. Iros ektimis, sed li ne plu povis retiriĝi. Pro timo tremis liaj genuoj. Odiseo pripensis dum momento, ĉu li trafu la almozpetiston forte aŭ nur malforte kaj decidis trafi lin nur per malforta bato. Ili levis la pugnojn kaj Iros batis kiel la unua. Sen precipe streĉi la fortojn rebatis Odiseo, kaj tuj Iros kuŝis surplanke, kriante kaj sangante el la buŝo. Odiseo manprenis la venkiton kaj trenis lin eksteren sur la korton.

„Ĉi tie restu kaj forpelu per via bastono porkojn kaj hundojn“, li diris al Iros, „kaj ne provu plu arogi al vi esti la mastro pri fremduloj kaj almozpetistoj.“

Bruante la svatiĝantoj salutis Odiseon, kiam li revenis en la halon, kaj Antonio transdonis al li la plej grasan sangokolbason, kiu troviĝis.

La svatiĝantoj plezurigis sin ĝis profunde nokte, kaj post kiam ĉiu manĝis kaj trinkis laŭplaĉe, ili iris hejmen por dormi.

En la malplena halo postrestis nur Telemako kaj Odiseo.

Odiseo pensis pri venĝo. Tial li diris: „Telemako, ni devos forporti la armilojn el la halo.“

La memgardema Telemako vokis sian maljunan nutristinon Eŭrykleia kaj konvinkis ŝin, ke la fumo en la halo damaĝas al la armiloj, ke tial oni devos porti ilin en la armilejon, ke Eŭrykleia detenu intertempe la scivolemajn servistinojn, ĉar estus pli bone, se ili ekscius nenion pri tio.

„Sed mastro“, obĵetis Eŭrykleia, „kiu ĵetos lumon al vi, se la servistinoj ne rajtas eliri?“

„La gasto ĵetos lumon por mi“, diris Telemako, „li manĝas mian panon, tial li helpu al mi.“

La patro kaj la filo portis ĉiujn kaskojn, ŝildojn kaj lancojn el la halo. La diino Atena prilumis la irejon por ili per ora torĉo.

Post kiam ili sekurigis la armilojn, Odiseo ordonis, ke Telemako foriru por dormi kaj atendis Penelopon. Li ne devis atendi dum longa tempo. Penelopo venis el sia ĉambro, scivolega aŭdi ion pri sia edzo kaj sidiĝis sur apogseĝon ornamitan per arĝento kaj eburo. En la lumo de fajro apud kiu staris la apogseĝo, Odiseo vidis je la unua fojo post dudek jaroj denove la vizaĝon de sia amata edzino. Nek zorgoj nek sopiro damaĝis ŝian belecon. Sed Penelopo ne ekkonis Odiseon en ties kamuflaĵo. Ŝi avidis nur ekscii, kion li rakontos al ŝi. Tial ŝi ne atentemis pri la fremdulo mem.

Odiseo rakontis ankaŭ al sia edzino sian elpensitan vivhistorion. Li finis la rakonton, kaj la elpensita rakonto sonis tiel aŭtentike, ke Penelopo komencis plori. Dum longa tempo ŝi ne povis trankviliĝi. Fine sekiĝis ŝiaj larmoj kaj ŝi diris: „Mi ankoraŭ volas kontroli, kara fremdulo, ĉu vi parolas la veron. Diru al mi, kiel Odiseo estis vestita, kiel li aspektis, kiam vi renkontis lin kaj rakontu al mi pri liaj kunuloj.“

„Post tiom longa tempo mi povas memori nur malfacile“, respondis Odiseo, „ekde mia unua renkonto kun Odiseo pasis preskaŭ dudek jaroj. Sed, kiel mi memoras, Odiseo portis lanan purpurmantelon kun ora agrafo. La agrafo estis majstroverko, sur ĝi estis montrata cervino, kiu baraktas en la ungegoj de ĉashundo. Odiseon akompanis ĝibulo.“

Denove Penelopo komencis plori, ĉar ĉio pravis. Odiseo konsolis ŝin kaj certigis al ŝi, ke ŝia edzo baldaŭ revenos. Sed Penelopo ne fidis lin, ŝi estis konvinkita, ke ŝi neniam revidos la edzon. Kun ankoraŭ malsekaj okuloj ŝi vokis la maljunan nutristinon Eŭrykleia, por ke ŝi lavu la piedojn de la gasto.

Eŭrykleia pretigis banejon por Odiseo. Ŝi metis antaŭ lin pelvon kun akvo, rigardis atenteme al lia vizaĝo kaj diris mirigite kapskuante: „Multaj fremduloj venis al ni, sed ankoraŭ neniu aspektis tiel simila al Odiseo kiel vi.“

Odiseo respondis rapide: „Tion diris ĉiuj, kiuj vidis Odiseon kaj min unu apud la alia.“

Dum tiuj vortoj li sidiĝis pli malproksime de la fajrilo kaj turnis sian vizaĝon malhelen. Li rememoris, ke li havas ĉe piedo cikatron. Sovaĝa apro lin iam vundis per siaj dentegoj. La maljunulino lavis lin kaj ekkonis en la duonlumo la cikatron. Pro ĝojo kaj ekscitiĝo ŝi lasis fali la piedon de Odiseo sur la pelvon tiel, ke la akvo ekŝprucis.

„Vi estas Odiseo“, ŝi diris, „kiel ne ekkoni la cikatron de mia mastro.“

Odiseo fermis rapide ŝian buŝon kaj flustris al ŝi: „Ĉu vi volas neniigi min? Mi estas Odiseo, sed momente ankoraŭ neniu eksciu tion.“

„Mi silentos“, kapjese promesis, radiante pro ĝojo, Eŭrykleia, „vi ja scias, ke mi estas firma kaj dura kiel ŝtono, kiel fero.“

Ŝi lavis la piedojn de Odiseo kaj frotis oleon sur ilin. Odiseo tiris la seĝon denove al la fajrilo por varmigi sin. La cikatron sur la piedo li vualigis zorgeme per vestĉifono.

Mediteme parolis Penelopo al Odiseo, kvazaŭ ŝi volus demandi lin pri konsilo: „Kara gasto, proksimiĝas la tago, kiam mia sorto decidiĝos. Morgaŭ mi postulos, ke la svatiĝantoj vetkonkursu pri mi, Tiun, kiu gajnos la vetkonkurson, mi sekvu. Mi starigos en la halo dek du hakilojn, tiel, kiel mia edzo Odiseo faris tion. Poste li pafis siajn sagojn tra la truoj de ĉiuj dek du hakiloj, kaj eĉ el granda distanco. La svatiĝantoj provu streĉi la tendenon de la arko de Odiseo kaj pafu tra la truoj de la hakiloj, ili do vetkonkursu.“

Odiseo konsentis al Penelopo ne plu prokrasti la vetkonkurson. „Pli frue Odiseo revenos“, li diris, „ol sukcesos iu el la svatiĝantoj streĉi la arkotendenon kaj pafi la sagon tra la dek du hakiloj.“ Maltrankvile mediteme Penelopo iris en sian dormoĉambron. Odiseo sternis sin en la antaŭhalo.

Je la sekva mateno la svatiĝantoj denove kolektiĝis en la festena halo. Ili demetis siajn mantelojn sur la apogseĝojn kaj foriris por buĉi grasajn ŝafojn, grasigitajn porkojn kaj bovidojn. Ili rostis viandon, miksis vinon, manĝis kaj trinkis kaj festenis. Ankaŭ la porkopaŝtisto Eumaeus denove ĉeestis kaj helpis pretigi la festenan manĝon. Telemako ordonis al Odiseo starigi ĉe la sojlo malgrandan tablon kaj malnovan seĝon. Tien li ordonis porti manĝon kaj trinkaĵon kaj diris al Odiseo: „Tie manĝu trankvile, kaj mi konsilas al neniu ofendi vin. Hodiaŭ mi protektos vin, kaj eĉ, se estus kontraŭ ĉiuj svatiĝantoj.“

La svatiĝantoj miris pri la impertinenteco de Telemako kaj silentis kun kuntenitaj dentoj.

Sed unu el ili turnis sin mokeme al Odiseo kaj vokis: „Gasto, vi ricevis de ĉiuj manĝoj vian parton, tiel kiel decas. Ankaŭ mi havas donacon por vi.“

Dum tiuj vortoj li kaptis kruron de bovo kaj ĵetis ĝin al Odiseo, tiu moviĝis flanken kaj la kruro trafis muron.

„Vi bonŝancas, ke vi ne trafis la gaston“, vokis Telemako, „mi estus traborinta vin por tio per la lanco. Prefere mi volus morti ol rigardi, kiel oni tiranas miajn gastojn.“

„Telemako pravas“, diris alia svatiĝanto, „sed se li volas havi pacon por si kaj siaj gastoj, li ne hezitu paroli al via patrino, ke Penelopo elektu iun el nia mezo, kiu al ŝi plaĉas kaj foriru kun li.“

„Ĉe la senmortaj dioj“, respondis Telemako, „mi jam delonge provas konvinki mian patrinon, ke ŝi decidiĝu, sed mi ja ne povas forpeli ŝin per perforto el la palaco.“

Dum la svatiĝantoj diboĉis kaj kverelis, Penelopo preparis la vetkonkurson. Kun siaj servistinoj ŝi portis el la armilejo la pafarkon de Odiseo, sagujon kun sagoj kaj dek du hakilojn. Kortuŝite ŝi prenis la intimajn aĵojn sur la manojn. Atena enspirigis kuraĝon al ŝi kaj Penelopo paŝis en la halon. Ekvidante ŝin ĉe ŝia apero, la svatiĝantoj eksilentis kaj Penelopo parolis al ili: „Mi decidiĝis foriri el tiu ĉi palaco, sed mi iros nur kun tiu, kiu kapablos streĉi la arkotendenon de Odiseo kaj pafi la sagon tra la truoj de la dek du hakiloj, kiel mia edzo iam faris tion.“

Poste ŝi ordonis al la porkopaŝtisto Eumaeus doni al la svatiĝantoj la pafarkon kaj sagon. Telemako faris sulkon en la tero kaj

starigis la hakilojn en vico. Ĉiuj admiris kiel precize li faris tion. Li mem provis streĉi la tendenon de la arko, kaj li eble estus sukcesinta, sed la patro mansignis lasi tion. Telemako apogis la pafarkon ĉe la pordo kaj reiris al sia loko.

Nun leviĝis Antonio kaj vokis: „Ek, amikoj, ni provu laŭvice nian bonŝancon. Ni komencu tie, kie oni kutime komencas per la enverŝado de vino.“

La svatiĝantoj konsentis kaj la unua el ili prenis la arkon. Per sia tuta forto li provis streĉi la arkotendenon. Sed vane.

„Alportu sebon“, ordonis Antonio.

La servistinoj alportis grandan sebopecon. La svatiĝantoj varmigis la arkon super la fajro kaj priŝmiris ĝin per sebo por fari la arkotendenon pli elasta. Poste ili denove provis sian bonŝancon, sed vane. Unu post la alia estis sensukcesa.
Odiseo lasis konkursi la svatiĝantojn kaj sekvis la amikon Eumaeus kaj ties amikojn sur la korton kaj demandis ilin: „Imagu foje, ke iu dio nun kondukus hejmen Odiseon, kiun vi defendus, lin aŭ la svatiĝantojn?“

„Se Odiseo revenus“, diris la paŝtistoj konkorde, „tiukaze la svatiĝantoj unue povus rimarki, kion ni kapablas kontraŭ ili. Se li nur revenus!“

Tiel ili pruvis siajn verajn pensojn kaj Odiseo malkaŝis sian veran identecon kaj montris al ili ankaŭ la cikatron sur la piedo. La paŝtistoj ĉirkaŭbrakis lin kaj pro ĝojo ne povis paroli. Ankaŭ Odiseo kisis ilin kortuŝite.

„Kiam ni revenos en la festenan halon“, li diris al Eumaeus, „vi donu ankaŭ al mi la pafarkon.“ „Kaj vi“, li diris al la paŝtistoj, „ordonu al la servistinoj, ke ili firme fermu la pordojn de sia ĉambro kaj ne elvenu, eĉ se ili aŭdus el la halo bruon kaj ĝemadon. Firme riglu ankaŭ la pordegon de la korto kaj sekurigu ĝin per ŝnuregoj.“

Ili revenis en la halon, kiam ĝuste Antonio kiel lasta estis en la vico. Sed Antonio ne volis konfesi sian malvenkon kiel liaj antaŭuloj kaj preferis eviti la vetkonkurson. Venis en lian kapon, ke je tiu tago estas festo de sanktulo, dum kiu ne decas streĉi la arkotendenon. Morgaŭ oni havos sufiĉe da tempo provi ĝin ankoraŭfoje. Intertempe oni donu viktimojn al la dioj, kaj tiukaze la vetkonkurso certe finiĝos bonŝance.

„Vi pravas pri via decido prokrasti la vetkonkurson“, diris Odiseo al la svatiĝantoj, „sed permesu ankaŭ al mi elprovi miajn fortojn.“

Pri la peto Antonio ekkoleris, kaj li malice ekscitiĝis pri ĝi. Penelopo trankviligis lin: „Ĉu vi eble pensas, Antonio, ke la fremda almozpetisto povus sukcese streĉi la arkotendenon kaj min forkonduki kiel edzinon?“

„Tion ni ne timas“, defendis sin la svatiĝantoj, „sed ni timas nur la klaĉon, se la almozpetisto sukcesus. La homoj ridus pri ni.“

„Pri tio, kiu rajtas preni permane la pafarkon, decidas nur mi“, enmiksiĝis Telemako en la kverelon. „Armiloj estas afero de viroj. Foriru, patrino, en vian ĉambron kaj restadu tie.“

Mirigite Penelopo rigardis sian filon, sed ŝi obeis kaj iris el la halo. Eumaeus prenis la arkon kaj la sagojn kaj portis ilin al Odiseo. La svatiĝantoj tuj ekkriis kaj provis reteni lin.

„Nu, foriru, Eumaeus, mi komandas tion al vi“, diris Telemako kuraĝige, „se mi nur povus komandi la svatiĝantojn tiel, kiel mi povas komandi vin.“

Pri tio la svatiĝantoj ridis kaj Eumaeus donis al Odiseo la arkon. Odiseo rigardis la pafarkon de ĉiuj flankoj kaj streĉis ĝian tendenon poste facile. Li elprovis la tendenon kaj ĝi ĉirpis kiel hirundo. Jen eksonis el la ĉielo forta tondrobato. Zeŭso mem donis signon al Odiseo. La heroo levis la pafarkon, streĉis la tendenon kaj trapafis ĉiujn dek du hakilojn. Okupis la svatiĝantojn malica antaŭsento, kiu rigidigis kaj paligis ilin.

Telemako kroĉis la glavon al sia zono, prenis lancon kaj starigis sin apud sia patro. Odiseo deĵetis la almozpetistajn vestojn, ŝutis la sagojn antaŭ sin kaj vokis per terura voĉo: „La unua vetkonkurso finiĝis. Nun mi elektos celon, kiun trafis ankoraŭ neniu!“

Dum tiuj vortoj li streĉis la arkotendenon denove kaj pafis. Antonio volis ĝuste meti vinplenigitan dutenilan oran pokalon al la buŝo. Sed en tiu momento trafis lin la sago de Odiseo kaj li renversiĝis. La sago traboris lian gorĝon. Konfuzite la svatiĝantoj serĉis siajn armilojn, sed ili ne povis trovi ilin. Odiseo kaj Telemako vespere antaŭe ĝustatempe forportis ilin.

„Antaŭ vi staras Odiseo!“, vokis la heroo al la ĉirkaŭkurantaj svatiĝantoj. „Mi venis por puni viajn fiajn agojn. Vi timis nek diojn nek homojn kaj nun venis la momento de la venĝo!“

Li streĉis la tendenon, pafis sagon post sago kaj ĉiu pafo trafis celon. Unu svatiĝanto post la alia renversiĝis mortigite planken. Telemako kuris en la armilejon kaj alportis armilojn kaj kirasojn ankaŭ por la du fidelaj paŝtistoj. Sed pro la hasta agado, li forgesis refermi la armilejan pordon. Unu el la perfidemaj servistoj enŝteliĝis kaj alportis tra flankpordo armilojn en la halon.

Sed je dua fojo li ne plu revenis en la halon kun armiloj. La paŝtistoj kaptis lin en la armilejo kaj firmligis lin.

Ekvidante tiom da armiloj inter la svatiĝantoj kaj kioma superforto trudiĝas al ili, Odiseo malkuraĝiĝis. Dum la plej granda bezono Atena helpis kaj kaŭzis, ke la lancoj de la svatiĝantoj preterpafis la celon. Unu el la lancoj trafis la pordon, alia muron. Nur Odiseon kaj ties kunulojn trafis neniu lanco.

La batalbruo kaj la ĝemado de la mortantoj plenigis la halon. Pro la insista peto de Telemako Odiseo indulgis nur la kantiston kaj serviston. Iom post iom ĉesis la tintado de la armiloj kaj la lasta svatiĝanto sinkis morta planken. Odiseo ĉirkaŭrigardis en la halo, ĉu ankoraŭ ie kaŝiĝas malamiko. Neniu el la svatiĝantoj plu vivis, ĉiuj kuŝis tie kiel fiŝoj elŝutitaj el la reto de fiŝisto. La heroo ordonis alvoki la nutristinon Eŭrykleia. Ŝi alvenis tien kaj vidis lin stari super la faligitoj kvazaŭ venkinta leono. Ŝi volis laŭte ekjubili, sed Odiseo malpermesis tion al ŝi.

„Ne decas“, li diris, „ke vivantoj jubilu pri mortigitoj. Tial bridu vian ĝojon kaj sendu al mi la malfidelajn servistinojn, kiuj perfidis min kaj prenis la partion de la svatiĝantoj.“

La malfidelaj servistinoj devis elporti la mortajn svatiĝantojn kaj purigi la halon. Fine ĉiujn trafis hontiga morto.

Odiseo fumigaciis la halon kaj la tutan palacon per sulfuro. Kiam ĉie denove estis pureco kaj ordo, li sendis la nutristinon Eŭrykleia al sia edzino Penelopo. Eŭrykleia jam senpacience atendis tiun momenton kaj kuris tiel rapide, kiel ŝiaj maljunaj gamboj portis ŝin, por sciigi al la mastrino la ĝojigan novaĵon.

Penelopo dormis tiel profunde, ke ŝi aŭdis nek la kriadon nek la batalbruon. La nutristino vekis ŝin kaj rakontis al ŝi, kio okazis.

Ke Odiseo revenis, ke ŝi jam ekkonis lin dum la piedlavado, sed ke Odiseo ordonis silenti al ŝi. Kaj ŝi raportis pri la glora venko kontraŭ la impertinentaj svatiĝantoj.

Penelopo ne fidis al ŝiaj vortoj, kaj sen konfido iris post ŝi en la halon, sed nur kun eta espero, ke la viro kiu atendas ŝin, estas Odiseo, ŝia edzo.

Kune ili transpaŝis la sojlon kaj Penelopo sidiĝis silente fronte al Odiseo. Parte ŝajnis al ŝi, ke li estas ŝia edzo kaj ŝi ekkonis liajn vizaĝtrajtojn, parte li ŝajnis fremda al ŝi kaj ŝi ne plu rekonis lin. Ŝi timis, ke la fremdulo povus esti trompisto. Ŝi deziris de Odiseo aŭskulti ion, kion povas scii nur ŝi kaj ŝia edzo, por havi pruvon, ke li efektive estas Odiseo. Li memorigis ŝin pri tio, kiel li konstruis la dormoĉambron en la palaco. Li konstruis la ĉambron ĉirkaŭ olivarbo, ĝin mem prihakis kaj uzis la trunkon kiel kolonon. Li priskribis ankaŭ la or- kaj arĝentornamaĵojn kaj skulptaĵojn, per kiuj li mem ornamis la liton.

Penelopo ekkonis, ke la viro efektive estas Odiseo, ŝia pliplorita edzo. Ŝi ĉirkaŭbrakis lin kaj bonvenigis lin kun ĝojoploroj. La pridemandado kaj rakontado poste preskaŭ senfinis.

Por malhelpi, ke la subita kvieto levos suspekton de la preterirantoj, Odiseo uzis ruzaĵon. Li ordonis al la kantisto ludi gajajn kantojn per liuto, kaj pretigi feston por la servistaro. Tiu, kiu preteriris je tiu tempo la palacon, supozis, ke la diboĉado de la svatiĝantoj estas daŭrigata. Tiel Odiseo prokrastis la momenton, kiam la terura mesaĝo pri la pereo de la svatiĝantoj disvastiĝos en la tuta urbo.

Frumatene Odiseo adiaŭis Penelopon kaj konsilis al ŝi ne eliri de sia ĉambro. Kun sia filo Telemako li iris kamparen al sia maljuna

patro Laerto. Ambaŭ fidelaj paŝtistoj kuniris. Ili paŝis tra la urbo en la matena krepusko, kiam la stratoj estis ankoraŭ senhomaj.

Sur la bieno de Laerto ili renkontis neniun. Ĉiuj estis ekstere ĉe la laboro sur kampo. Odiseo postlasis Telemakon kaj la paŝtistojn sur la korto kaj iris sola serĉi la patron. Li trovis lin en la ĝardeno. Laerto surhavis flikitan veston kaj ĵus transplantigis arbuston. Lia vizaĝo estis kovrata de sulkoj kaj konturita de la doloro pri la perdita filo. La koro de Odiseo batis afliktite pro kompato. Li ne ekkonigis sin al la patro kaj diris, ke li serĉas Odiseon, al kiu li laŭdire konatiĝis antaŭ kvin jaroj. Kiam la oldulo aŭdis la nomon Odiseo, plenigis sin ties okuloj per larmoj kaj lia voĉo ektremis. Jen Odiseo ne plu povis daŭrigi sian kamufladon. Li konfesis, ke li estas mem Odiseo. Li montris al la patro la cikatron je la piedo kaj nomis al li la arbojn, kiujn li iam ricevis donace de la patro. Kiam la patro rekonis, ke vere revenis lia longe perdita filo, li senkonsciiĝis pro ĝojo. Sed la ĝojo, kiu prenis en la unua momento preskaŭ la spirkapablon al li, tuj vivigis lin denove. Kvazaŭ plijunigite, li rapidis kun Odiseo en la domon. Tie lavis sin Laerto, lasis unkti sin per oleo kaj surmetis belan lanmantelon. Poste li sidiĝis transformita kaj freŝa kun la gastoj kaj la servistoj al tablo, babilis, ŝercis kaj ridis.

Dum ili manĝis kaj festis la revidon en la bieno, disvastiĝis en la urbo la mesaĝo pri la morto de la svatiĝantoj. Ekscitite kaj incitite de la parencoj de la svatiĝantoj, kolektiĝis la popolo sur la konsilista placo. Sed oni ne povis interkonsentiĝi. Kelkaj rigardis la morton de la svatiĝantoj justa puno sendita de la dioj. Aliaj kriis, ke necesas venĝo kaj kondamnis Odiseon per minacoj. Je la pinto de la venĝaviduloj troviĝis la patro de Antonio. Ili armis sin per lancoj, arkoj kaj sagoj kaj marŝis tute batalavide al la korto de Laerto, kie Odiseo restadis.

Odiseo ekaŭdis la kriadon de la aro kaj la tintadon de la armiloj, kaj tuj armis sin kaj iris kun areto de fideluloj renkonte al la militista aro. Kiel unua ĵetis Laerto lancon kaj trafis la patron de Antonio. La trafito falis morta sur la polvon de la strato. Komenciĝis batalo kaj terura sangoverŝado. Odiseo kaj liaj amikoj certe estus mortbatintaj la tutan aron de batalantoj, se ne ektondrus la voĉo de la diino Atena: „Mallevu la armilojn, homoj de Itako, finu la sensencan masakron!“

Pro ektimo glitis el la manoj de la batalantoj la armiloj, kaj tiuj, kiuj venis el la urbo, fuĝis malantaŭ la urbomurojn. En Itako ekregis paco.

Dum longa tempo kaj fidele la edzino atendis la edzon, kaj li revenis. Dum longa tempo kaj kuraĝe Odiseo serĉis la patrolandon kaj retrovis ĝin. La tempo pasis kaj la hararo de ambaŭ griziĝis en la milda sunlumo de trankvila maljuneco.

*Originalo: ODYSSEOVI CESTY*

# LASTA RAKONTO SEN FINO

La bluego de la ĉielo super la greka montara pejzaĝo estas brila kaj memoras la vastan spegulon de la proksima maro. Tiam, antaŭ pli ol dudek kvin jarcentoj, la ĉielo volbiĝinta super tiu pejzaĝo, havis similan koloron kiel nun, sed sub tiu ĉielo vivis aliaj homoj kun aliaj zorgoj kaj aliaj ĝojoj. En la antikva tempo estis tie lokoj, kie herooj kaj dioj fariĝis vivantaj figuroj, jen la malnovgreka teatro.

Ni vizitu kune dum iom da tempo tian malnovgrekan teatron.

Oni skribas la kvinan jarcenton antaŭ Kristo. Estas suneca tago, kvazaŭ kreita por vizito de teatro. Sed ni devas rapidi, ĉar jam de la mateno atendoplena homamaso torentas al la teatro. Dek sep mil homoj povas viziti ĝin. Ankaŭ monon ni devos kunpreni, ĉar la eniro kostas du obolojn – du malnovajn grekajn monerojn. Sed, se ni estus povraj kaj ne povus pagi tion, ni rajtus eniri ankaŭ sen pago. La ŝtatkaso tiukaze pagus por ni.

Ni miksiĝas en la torenton de la hastanta amaso kaj paŝas tra la ŝtona pordego en la teatron. Vere, ĝi ne aspektas kiel nuntempaj teatrokonstruaĵoj. Ĝi aspektas pli kiel subĉiela sportstadiono. La spektantejo estas integrita al deklivo de roka monto.

Tra la pordego ni atingas cirkle rondan placon, kiun la malnovaj grekoj nomis *„orkestro“*. Tie ĉe la prezentado kolektiĝas la teatra ĥoro. En duoncirklo ĉirkaŭ la *„orkestro“* etendiĝas, skulptitaj en la rokan deklivon, ŝtonaj benkoj – kiel ŝtupoj de giganta ŝtuparo. La benkoj estas larĝaj kaj sen dorsaj apogiloj. Nur en la unua vico, kiu estas rezervita por la pastroj, pli altrangaj oficistoj kaj honoraj gastoj, havas la sidlokoj ŝtonajn apogilojn. La unua vico ankoraŭ estas malplena. Sed la sidlokoj por damoj kaj junuloj estas jam

ĉiuj okupitaj. La suno ĵetas akrajn nigrajn ombrojn. Multaj spektantoj portas kiel sunprotektilon larĝan ĉapelon. Kiel mara ondofrapado zumas babilado tra la teatro.

Kien ni sidiĝu? Ĉu apud la grekan maljunan barbulon en la sesa vico? Li surhavas tolan tunikon kun manikoj. Ĝi aspektas kiel longa ĉemizo, kiu falas faldite kunfiksite ĝis la maleoloj. La oldulo rigardas silente al la unua vico. Ni demandas lin, kion oni prezentos. Kaj li miras, kiel eblas, ke ni ne scias tion, ke oni ludos hodiaŭ ja la tetraĵon Reĝo Edipo, kiun verkis Sofoklo. La barbohava oldulo konas la teatraĵon, li jam spektis ĝin kaj ĝojas pri denova prezentado.

Lante plenigas sin ankaŭ la plej foraj sidlokoj. Ĉiuj spektantovicoj estas plenigitaj. Ankaŭ jam tiuj de la sklavoj. Ŝajnas, ke la prezento baldaŭ okazos.

Ankaŭ la scenejo, kiu leviĝas malantaŭ la *„orkestro“* fronte al la spektantoj, apenaŭ memoras pri nia nuna teatro. Ĝi estas tre longa, sed kompare al niaj scenejoj evidente ne tre profunda ŝtonkonstruaĵo kun supra etaĝo, mallongaj flankaj partoj kaj fono. El tiu sceneja domo kondukas tri pordoj sur la ludejon. La malantaŭon kovras tola dekoracio, kiu prezentas palacon, tiel, kiel postulas tion la sekva teatraĵo. .El la meza pordo tuj eliros la ĉefrolonto. El la du ceteraj pordoj venos poste la dua kaj tria aktoroj. Je ambaŭ flankoj la scenejo estis limigita per altaj turneblaj prismecaj kulisoj. Ĉio ĉi bone videblas, ĉar antaŭ la scenejo ne pendas kurteno.

Ni parolis pri tri pordoj kaj tri aktoroj. Nu, ĉu ne kunludas pliaj aktoroj? Ne, nur tri. Tri aktoroj alternas sin kaj ludas ĉiun ulinan kaj viran rolojn. Kiam ili prezentas sin en diversaj roloj, ili devas rapide transvestiĝi malantaŭ la scenejo. Komprenble ni vidas an-

koraŭ pliajn figurojn sur la scenejo, sed ili ne parolas. Bonŝance la transvestado ne estas tiel komplika kiel en nia teatro. La malnovgrekaj aktoroj ne devis ŝminki sin, ĉar ili surhavas maskojn kaj ili devis ŝanĝi nur ilin kaj surmeti alian vestaĵon. Por la maskoj, kiuj kovras la vizaĝon, ekzistas precizaj preskriboj. Por ludoj kun heroa temo, tielnomataj tragedioj, aŭ por komedioj kun gaja enhavo, estis preskribitaj aliaj maskoj.

En tiu ĉi momento ĉiuj aktoroj jam preparitaj staras malantaŭ siaj pordoj al la scenejo. Ĉirkaŭ la enirejo al la *„orkestro“* kolektiĝas la ĥoro kaŝita al la rigardoj de la spektantoj. La kantoj de la ĥoro malkaŝas al ni ĉion tion, kion povas diri neniu el la tri aktoroj.

Sofoklo, la verkisto de la tragedio „Reĝo Edipo“ skribis tutan vicon de monde famaj tragedioj. Kune kun sia antaŭiranto Eŝilo kaj lia posteulo Eŭripido li apartenas al la tri plej famaj antikvaj grekaj tragediaj verkistoj. En la teatraĵoj de tiu triopo ni retrovas preskaŭ ĉiujn tiujn figurojn, kiujn ni renkontis en tiu ĉi libro.

Sed jam longan tempon antaŭ ol la legendoj kaj mitoj reviviĝis en la teatro, rakontis ilin homoj ĉe bivakfajroj kaj sur paŝtejoj. Dum festenoj blindaj kantistoj kantis ilin, longe antaŭ ol oni verkis ilin. Parto el ili konserviĝis al ni en la verkaro de la plej granda greka poeto Homero. Homero verkis du longajn poemojn, la epopeon pri la erarvojaĝo Odiseado kaj la epopeon pri la milito de Trojo, nomata Iliado.

Dum ni interparolis, komenciĝis la teatraĵo. Sur la scenejon paŝis reĝo Edipo kun sia sekvantaro kaj pastro de Zeŭso. Ĉar la malnovgreka scenejo ne havas tiom profundan spacon kiel niaj nunaj scenejoj, la aktoroj ne staras grupe kune, sed laŭvice. La sceneja aranĝo kun scenejo kaj aktoroj similas scenojn sur malnovaj vazoj.

Edipo atendas kun sia sekvantaro Kreonon, kiun li sendis al la orakolo en Delfo. La sorto, pri kiu la malnovaj grekoj supozis, ke ĝi estas la verko de la dioj, komenciĝas plenumi. La spektantoj eksilentas. Hodiaŭ ili ne stamfados kaj siblos, kiel ili faras tion, se teatraĵo ne plaĉas al ili. La ludo estas serioza kaj tragika, ĝi senkaŝas mornajn, sekretoplenajn fortojn, kiuj gvidas la vivon de la homoj. Kaj tiaj mornaj potencoj – kiel tiam ŝajnis al la homoj – estis multaj.

En tiuj antikvaj tempoj homoj ne povis klarigi al si multajn aferojn kaj okazaĵojn. Kaj tio, kion ili ne povis klarigi al si, ili rigardis kiel la verkon de iuj sekretoplenaj estaĵoj. Ĉiam, kiam homoj renkontis ion nekompreneblan, ili elpensis sekretoplenajn potencojn, enigmajn estaĵojn, monstrojn, nimfojn aŭ diojn. Sed la monstroj similis al bestoj, kiujn la homoj konis bone. Kaj la feoj, nimfoj kaj dioj havis tute homajn ecojn. Ankaŭ la dioj koleris, ridis, ŝatis bonajn manĝojn kaj trinkaĵojn, havis infanojn kaj batalis reciproke.

Ĉiu dio regis ion. Tial oferis la malnovaj grekoj ĉiam al tiu dio, kies helpon ili bezonis. Se ili sopiris rigardi en la estontecon, ili oferis al Apolono, al la dio de la profetaĵoj. Pri granda rikolto ili petis Demetran, la diinon pri la agrokulturo.

Laŭ la raportoj de la legendoj multaj dioj rezidis sur pinto de montaro Olimpo. Kaj estis multaj.

Mi mencios almenaŭ la plej gravajn. La romianoj havis similajn diojn, kaj ties nomoj eble estas iom pli konataj al vi ol la grekaj dioj. ni do mencios ankaŭ ties nomojn. Kelkajn diojn vi jam renkontis, aliajn vi ankoraŭ renkontos.

La plej potenca dio, al kiu ni jam konatiĝis, estis Zeŭso. Li estis la mastro pri ĉielo kaj tero, li regis tempestojn, tondrojn kaj

fulmojn. De Zeŭso eliris feliĉo kaj malfeliĉo, famo kaj riĉo. Ankaŭ la romianoj havis plej altan dion: Jupitero.

La edzino de Zeŭso estis diino Hera. Ŝi estis la plej potenca diino, la reĝino de Olimpo. Ankaŭ Jupitero havis edzinon, kiu nomiĝis Junono.

Atena estis la filino de Zeŭso. Ŝi estis la diino pri saĝeco kaj la protektantino de saĝaj kaj kuraĝaj viroj. Ŝia simbolo laŭ la grekoj estis la strigo. La romianoj havis similan diinon: Minervo.

La filo de Zeŭso estis Hefesto, la dio pri la fajro kaj pri la forĝisto-laboro. Li havis laŭdire sian forĝejon sub surteraj fumantaj vulkanoj. Li estis malbela kriplulo, sed granda artisto. La romianoj nomis lin Vulkano.

Apolono estis la dio pri la lumo, pri la profetado kaj pri la poeta arto. Tial li estis ankaŭ la gvidanto por la naŭ muzoj, kiuj estis la protektaj diinoj pri la naŭ artoj. La romianoj nomis lin *„Apollo“*. Artemiso – la diino pri ĉasado – estis lia ĝemela fratino de Apolono. Ĉe la romianoj nomata Diano.

La sangavida dio de la milito estis ĉe la grekoj Areso. Ĉe la romianoj li estis Marso.

Ankaŭ la bela Afrodito – ĉe la romianoj Venuso – , en la ĉeĥa lingvo *Venuŝe,* estis filino de Zeŭso. Ŝi estis la diino pri belo kaj amo kaj ŝia filo estis Eroso – romane nomata Amoro.

Hermeso – ĉe la romianoj Merkuro – estis la heroldo de la dioj. Danke al ties flugilhavaj ŝuoj, laŭdire ili portis lin dum mallonga momento ien ajn, li rapide povis plenumi la ordonojn de Zeŭso. Li estis la protekta dio por vojaĝantoj kaj komercistoj.

La gaja dio por la vino nomiĝis ĉe la grekoj Dionizo aŭ Bakĥo, ĉe la romianoj Bakĥo aŭ Bakko.

Hestia estis la diino pri la hejma fajro. La romianoj nomis ŝin Vesta.

La diino pri la agrokulturo kaj pri la terkulturaj produktaĵoj estis Demetra, ĉe la romianoj nomata *Ceres*.

Pozidono estis la mastro pri la marakvo. Per sia tridento li povis kirligi kaj trankviligi ĝin. Li estis frato de Zeŭso. La romianoj nomis lin Neptuno.

En la regno de la mortintoj, en la submondo, regis dio Hadeso – ĉe la romianoj Plutono. Ankaŭ Hadeso estis frato de Zeŭso. Lia edzino nomiĝis Persefono – romane nomata Prosperina.
Sed tio ne estas ĉiuj grekaj dioj. Ni menciis nur la plej gravajn diojn. La grekoj kredis ankoraŭ pri multaj aliaj, malpli altrangaj dioj. Al ili apartenas Eolo, la mastro kaj gardisto de la ventoj kaj Eoso – ĉe la romianoj Aŭroro – , la diino pri la matena ruĝo. La venĝodiinoj, la erinioj – romane furioj – enkorpigis la malbonan konscion, krome estis la nimfoj, kiuj priloĝadis lagojn kaj arbarojn, ili similas al niaj akvonimfoj kaj sovaĝaj ulinoj. Kiel la malnovaj grekoj imagis siajn diojn kaj heroojn, tion montras al ni skulpturoj kaj antaŭ ĉio bildoj sur antikvaj vazoj.

Tiuj bildoj kompreneble ne montras nur diojn kaj heroojn al ni, sed ankaŭ fabelecajn bestojn. Tiaj bestoj kompreneble ekzistis neniam. Ĉiuspecaj drakoj kaj monstroj, pri kiuj oni rakontis reciproke kaj kantis iam dum festenoj kaj en teatroj, fakte estis la plej diversaj katastrofoj, kiuj plagis la homojn de tiu erao. Drako kraĉanta fajron enkorpigis verŝajne danĝerajn kaj riskoplenajn vulkanojn, homvoranta monstro eble estis la pesto, kaj terura marserpento granda inundo. Ĉio, kion ili ne povis klarigi al si,

kiel ni jam menciis, atribuis la malnovaj grekroj al enigmaj estaĵoj.

Kelkaj legendoj esprimas pramalnovajn sonĝojn kaj sopirojn de la homoj. Ekde praaj tempoj la homoj jam sopiris levi sin en la aeron, simile al birdoj. En mitoj ili sukcesis. Homoj saltis sur la flugilhavan ĉevalon Pegazo kaj ekflugis. Aŭ ili surmetis la flugilojn de Ikaro. Nuntempe oni diras pri homo, kiu havas abundan fantazion, ke li rajdas Pegazon. Pegazo fariĝis simbolo por senlima verkista flugo.

Multajn parolturnojn el la greka mitologio ni uzas ankoraŭ nun. Esprimojn kiel kalkano de Aĥilo, fadeno de Ariadno, Prokrusta lito aŭ forta kiel Heraklo, kaj pliajn tiajn esprimojn, vi nun certe jam komprenas.

La grekaj mitoj akompanis ne nur mian junecon, sed ankaŭ tiun de niaj gepatroj, geavoj kaj gepraavoj. Vaste malantaŭen en la historion etendiĝas ilia famo. La grekaj herooj travivis neimageblajn aventurojn. Sed ili ne fariĝis famaj tial, ĉar ili volis fariĝi famaj, sed tial, ĉar ili helpis al kunhomoj per siaj agoj. En tiuj malnovaj tempoj estis heroaĵo venki sovaĝan rabobeston – ne nepre devis esti drako. La homoj rakontis reciproke pri la herooj kaj aldonis al la vero tion, kion ili elpensis mem. Ili elsendis en siaj rakontoj heroojn ankaŭ kontraŭ tiuj sekretoplenaj potencoj, kiujn ili ne komprenis, kiujn ili timis kaj kiujn ili imagis kruelaj estaĵoj.

Ĉu vi ankoraŭ rememoras, ke Prometeo kaj Heraklo batalis eĉ kontraŭ dioj? Prometeo per ruzo kaj Heraklo per forto kaj ruzo. La herooj de la malnova Grekio enfluigis kuraĝon kaj esperon al la homoj. La malnovaj mitoj kaj legendoj instruis al siaj aŭskultantoj: „Se vi volas esti saĝa kiel via preferata heroo, tiukaze

ekzercu vin tiel, kiel li, fariĝu fortika kaj justa kaj vi sukcesos ankaŭ pri la plej grandaj defioj.

La malnovaj grekaj legendoj kaj mitoj montris kaj montras ĝis nun, kiel oni atingu la vojon de heroo. Jen la celo de deca homa vivo. Kaj la vojo de la herooj finiĝos neniam.

Eduard Petiŝka

# REGISTRO

*uzebla ankaŭ por Vikipedio*

**A**

Admeto Afrodito Agamemno Aĥeloo Aĥilo Agenoro Ajakso Akrisio Alkesto Alkinoo, Alkmeno Amazonoj Ambrozio Amfiono Andromedo Anteo Antigona Antinoo Apolono Areso, Argo argonaŭtoj Ariadno Artemiso Asopo Atalanta Atena Atlaso

**B**

Baŭciso Belerofono

**C**

Cerbero ciklopo

**D**

Danao Dedalo Demetra Demodoko Dionizo

**E**

Edipo Eeto Eolo Eoso Epimeteo Erinioj Eroso Eŝilo Eteoklo

Eumaeus Eŭripido Eŭristeo Eŭropa

**F**

Faetono Fajakoj Filemono Filokteto Fineo Frikso

**G**

Gorgonoj Gyges

**H**

Hadeso  Harpioj  Hefesto  Hekabo  Hektoro  Helena, Helena mitologio,  Helios  Hera  Hestia  Heraklo  Hermeso  Hesperidinoj Hilo  Ĥimero

**I**

Ifigenio  Ikaro  Iliado  Ismena  Itako

**J**

Jazono  Jobato  Jokasta  Junono  Jupitero

**K**

Karibdo  Karono  Kirko  Kasiopejo  Korintio

**L**

Laio  Laokoonto  Leto

**M**

Medea  Meduzo  Menelao  Midaso  Milito de Trojo  Minoo Minotaŭro  Muzoj

**N**

Naŭsikaa  Neoptolemo  Niobo

**O**

Odiseado  Odiseo  Oineo  Olimpo  Omfalo  Oresto  Orfeo

**P**

Pajno Pandora Pariso Patroklo Pegazo Penelopo Pelopso Penteo Perseo Persefono Plutono Polifemo Poliniko Pozidono Preto Priamo Prokrusto Prometeo Psiĥo

**S**

Skilo Sofoklo Sparto Stikso

**T**

Tezeo Tiresio

**V**

Vesta Vulkano

**Z**

Zeŭso